

ISBN 978 92 9017 119 5

I NTERNACIA
K ONGRESA
U NIVERSITATO

65-a SESIO

Hanojo, Vjetnamio
28 julio – 4 aŭgusto 2012

Roy McCoy (red.)

Universala Esperanto-Asocio

Enhavo

Enkonduko	2
La rektoro.....	3
AIS 1 Trevor Steele: <i>Ĉu genocido pro neglekto?</i> <i>La malapero de la tasmaniaj aborigenoj</i>	4
AIS 2 Francesco Maurelli: <i>Subakva robotiko:</i> <i>de homa kontrolo al daŭra memregeco</i>	14
AIS 3 Stefan MacGill: <i>Vortŝercado en Esperanto</i>	23
IKU 4 Humphrey Tonkin: <i>Movado aŭ kulturo?</i> <i>La ideologia bazo de la Esperanto-poezio</i>	44
IKU 5 Mark Fettes: <i>Lernejo kaj naturo:</i> <i>novaj ebloj en epoko de ekologia krizo</i>	57
IKU 6 Laŭlum: <i>Lingvo, kulturo, literaturo</i>	69
IKU 7 Jukka Pietiläinen: <i>Novaĵoj translimen:</i> <i>geografia strukturo de eksterlandaj novaĵoj</i>	79
IKU 8 Jonathan Cooper: <i>Moderna arto:</i> <i>kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas?</i>	99
IKU 9 Gábor Márkus: <i>Kiu kontrolas la registarojn de la mondo?</i>	115

Enkonduko

Kune kun la 125-a jubileo de Esperanto, ankaŭ la Internacia Kongresa Universitato (IKU) markas iom “rondan” jubileon – la 65-an. La IKU ĉi-jara estas varia kaj altnivela kiel kutime. Apud oftaj popularaj IKU-prelegantoj, kiel Humphrey Tonkin (Esperanto-literaturo) kaj Jukka Pietiläinen (ĵurnalismo translimen), kaj konataj fakuloj kiel Mark Fettes (lernejo kaj naturo en ekologia krizo) kaj Stefan MacGill (vortŝercado en Esperanto), prelegos eminentaj Esperanto-verkistoj apenaŭ viditaj en IKU kiel Laŭlum (lingvo, kulturo, literaturo) kaj Trevor Steele (malapero de la aborigenoj) kaj talentaj fakuloj tute novaj por IKU, kiel Francesco Maurelli (robotiko), Jonathan Cooper (moderna arto) kaj Gabor Márkus (kiu kontrolas la registarojn?).

Kiel kutime okazos AIS-sesio kun tri kursoj, kiuj konsistas el po tri prelegoj: unua enkonduka IKU-prelego kaj du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto povos pli profunde kaj vaste prezenti la temon. La partoprenantoj en la AIS-kursoj povos ekzameniĝi por akiri AIS-ateston.

La resumoj de la prelegoj havas tradukojn en la angla, la franca kaj la vjetnama. Tiel la IKU-libro povas esti utiligata por demonstri la sciencan, fakan kaj edukadan aplikadon de Esperanto al eksteraj instancoj, kiel Unesko kaj scienc-rilataj kaj universitat-rilataj organizaĵoj.

Fine mi havas la plezuron danki al la kontribuantoj kaj kunlaborantoj kiuj ebligis la aperon de tiu ĉi libro: al miaj gekolegoj en la IKU-komisiono, kiuj havis la malfacilan taskon prijuĝi la prelego-proponojn; al la Centra Oficejo de UEA, precipe Roy McCoy kaj Pasquale Zapelli; kaj al la prelegantoj, kiuj preparis siajn prelego-tekstojn. Kiel ĉiam la resumojn kunordigis Claude Nourmont, kiu ankaŭ reviziis la francajn tradukojn kaj aliajn tekstojn. En la anglan tradukis Edmund Grimley Evans (reviziis Brian Moon); en la francan, Janine kaj Yannick Dumoulin; kaj en la vjetnaman, Nguyen Xuan Thu (Aŭtuno), Nguyen Thi Nep (Nepo) kaj Le Minh Thu (Helenjo).

AMRI WANDEL

Estrarano pri scienca kaj faka agado kaj IKU-sekretario

La rektoro




GOTOO Hitosi

Japano, naskiĝis en 1955. Ekde 1991 asista profesoro, ekde 2004 profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato Tohoku, Sendai, Japanio, kun specialiĝo pri historia lingvistiko pri latinidaj lingvoj kaj informadika lingvistiko. En 1999-2000 scienca vizitanto ĉe la Universitata Kolegio en Londono. Membro de Akademio de Esperanto 1995-2004. Membro de pluraj japanaj lingvosciencaj societoj, Societo pri Latinida Lingvistiko (Strasburgo), Internacia Asocio pri Okcitanaj Studoj (Montpeliero) kaj aliaj. Redakto-komitatano de *Esperantologio/ Esperanto Studies* (Upsalo) kaj *Corpora* (Edinburgo). Inter aliaj priesperantaj agadoj lokaj kaj landaj, li kunredaktis *Esperanto-japana vortaro* (JEI, 2006) kiel la vicprezidanto de la redakta komisiono. Li estas nun redaktanta *Biografia leksikono de la japana Esperanto-movado*, kaj aperigis serion da gazetartikoloj pri interesaj figuroj, precipe el la 1920-30-aj jaroj. Kadre de la Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en 2011, li prelegis kun la titolo “Esperanto inter la japana kaj korea popoloj – Ooyama Tokio kaj lia tempo”.

Ĉu genocido pro neglekto?

La malapero de la tasmaniaj aborigenoj



Trevor Steele

Trevor Steele estas aŭstralia instruisto kaj aŭtoro de dekduo da libroj en Esperanto, ĉefe romanoj. Lia plej lasta romano, *Paradiza insulo*, pritraktas ĝuste tiun ĉi temon.

Resumo

En 1800 vivis pluraj miloj da aborigenoj en la kolonio Tasmanio: post sepdek jaroj la lasta plensanga virino sur la insulo mortis. Oni ofte citas tion kiel klasikan kazon de genocido. Sed la mortigo de aborigenoj per pafiloj, veneno ktp daŭris nur kelkajn jardekojn. Poste la aborigenoj estis persvadataj de homo, kiun ili rigardis amiko, forlasi sian teritorion kaj iri al insuletoj, kie ili ne plu haltigos la blankulan setladon. Malsanoj kaj neglektado sur la insuletoj rapide metis finon al tiu homgrupo, kies antaŭuloj okupis Tasmanion antaŭ pluraj jardekmiloj. La prelego elstarigos la farojn de George Augustus Robinson, la ŝajna amiko de la aborigenoj, kiu unuflanke vere volis ilin helpi, aliflanke ekspluatis la situacion por riĉiĝi kaj fine faris nenion por eviti la katastrofon.

Genocide by neglect?

The disappearance of the Tasmanian Aborigines

Summary

In 1800 several thousand Aborigines lived in the colony of Tasmania: seventy years later the last full-blooded woman on the island died. This is often quoted as a classic example of genocide. But the killing of Aborigines by shooting, poisoning, etc. lasted only a few decades. Later the Aborigines were persuaded by a man they regarded as a friend to leave their territory and go to small islands, where they would no longer hold up white settlement. Sickneses and neglect on the islands rapidly destroyed that human group, whose ancestors had occupied Tasmania several millennia earlier. The lecture will largely concentrate on the deeds of George Augustus Robinson, the apparent friend of the Aborigines, who on the one hand really wanted to help them, but on the other exploited the situation to enrich himself and finally did nothing to avoid the catastrophe.

Un génocide par négligence ? La disparition des Aborigènes de Tasmanie

Résumé

En 1800, plusieurs milliers d'Aborigènes vivaient dans la colonie de Tasmanie: soixante-dix ans plus tard mourait la dernière pure représentante de cette ethnie sur l'île. On cite souvent ce fait comme exemple classique de génocide. Mais l'extermination d'Aborigènes par arme à feu, poison, etc. ne dura que quelques décennies. Par la suite, les Aborigènes furent persuadés, par un homme qu'ils considéraient comme un ami, d'abandonner leur territoire pour aller vivre sur des îlots où ils ne feraient plus obstacle à l'installation des Blancs. Les maladies et la négligence sur les îlots eurent rapidement raison de ce groupe humain, dont les ancêtres occupaient la Tasmanie depuis des dizaines de millénaires. La conférence mettra en relief le rôle de George Augustus Robinson, en apparence ami des Aborigènes, qui d'un côté désirait vraiment leur venir en aide, mais d'un autre côté profitait de la situation pour s'enrichir et en fin de compte ne fit rien pour éviter la catastrophe.

Tội diệt chủng do lãnh cảm? Sự biến mất của những người bản địa ở Tasmania

Tóm tắt

Vào năm 1800, có hàng nghìn người bản địa sinh sống tại thuộc địa Tasmania. 70 năm sau, người phụ nữ thuần chủng (không lai) cuối cùng trên bán đảo đã qua đời. Người ta thường trích dẫn điều này như là một trường hợp điển hình của diệt chủng. Nhưng việc giết chết những người bản địa bằng súng, thuốc độc, v.v. chỉ diễn ra trong vài thập niên. Sau đó, những người bản địa đã bị thuyết phục bởi người mà họ coi là bạn bè, rời vùng lãnh thổ của mình và đến những hòn đảo nhỏ, nơi mà họ không sẽ không còn chặn đứng làn sóng định cư của người da trắng. Bệnh tật và lãnh cảm kéo dài trên những hòn đảo nhỏ đã nhanh chóng đặt dấu chấm hết với nhóm người mà tổ tiên của họ đã từng sống tại Tasmania o cả chục nghìn năm trước. Bài thuyết trình này sẽ làm nổi bật lên những việc làm của George Augustus Robinson, người dường như là bạn của những người bản địa, một mặt thật lòng muốn giúp đỡ họ, nhưng mặt khác lại tranh thủ cơ hội làm giàu và cuối cùng đã không làm gì để ngăn chặn thảm họa đó.

Ĉu genocido pro neglekto?

La malapero de la tasmaniaj aborigenoj

La temo, kiun mi elektis, estas tre malgaja. La malapero de tuta gento. Genocido. Oni pensas pri la provo de la nazioj ekstermi la tutan judan popolon; aŭ eble pri la turka masakro de armenoj dum la Unua Mondmilito, aŭ pri la hororoj de Ruando. Sed tiuj grandegaj historiaj krimoj ne tute sukcesis. Ankoraŭ vivas judoj, armenoj kaj tucioj same. La aborigena popolo de Tasmanio fakte formortis, kvankam ankoraŭ hodiaŭ troviĝas homoj, kiuj asertas devenon de partaborigenaj antaŭuloj. Fakte, la formorto de la tasmanianoj estas foje citata kiel klasika ekzemplo de “sukcesa” genocido.

Laŭ ciferoj la malaperon de la tasmanianoj oni ne povas kompari kun la buĉado al la judoj, ekzemple. Laŭ la plej alta takso, vivis en la jaro 1800 eble 20 000 aborigenoj sur la insulo Tasmanio. Aliaj statistikistoj parolas pri 7 000 aŭ eĉ nur 2 000. La nazioj murdis pli da judoj en unu tago en Treblinka aŭ Auschwitz.

Kaj genocido antaŭsupozas **intencan** mortigon: la nazioj vere intencis iam murdi la lastan judon sur la tero. La situacio en Tasmanio estis alia: jes, estis blankuloj, kiuj dum la periodo, kiam la aborigenoj plej forte rezistis la invadon, nomis sin “ekstermistoj”, kaj okazis multe da intencaj murdoj. Sed la oficiala politiko de la koloniaj registaroj kaj de la Kolonia Oficejo en Londono tute ne estis ekstermista, almenaŭ surpapere. Daŭre la registaroj esprimis la deziron protekti la rajtojn de la indiĝenoj. La malapero de la aborigenoj rezultis nur parte el rekta mortigo per armiloj aŭ venenoj. Mi esploras dum miaj prelegoj la kaŭzojn de tiu formorto, sed mi diru anticipe, ke grandparte rolis ter-avido de blankuloj, krima forrabado de virinoj, senscio pri la aborigena kulturo, epidemioj, seksaj malsanoj, apatio kaj finfine neglektado.

Tuta popolo malaperis en tri generacioj. Post almenaŭ 20 000 jaroj da vivado sur la insulo. Bedaŭrinde ne unika kazo en tiu epoko, kiam eŭropaj potencoj sin trudis al la tuta planedo. Ne unika, sed ege malĝoja, kaj, mi kredas, esplorinda. Ni esperu, ke tiaj malaperoj – malaperigoj – ne plu okazos.

Do sume, la malapero de la tasmanianoj estis relative malgranda katastrofo kompare kun multaj aliaj en la historio, sed ĝi estas relative bone dokumentita. Ni konas la homojn de la lastaj jardekoj, eĉ iliajn nomojn – almenaŭ la nomojn donitajn al ili de eŭropanoj – kaj la lastaj jaroj, kiam la katastrofo estis neevitebla, estis korŝira sperto por ĉiuj, kiuj sentas sin parto de nedividebla homaro.

* * *

Tasmanio estas nun la plej suda el la aŭstraliaj provincoj. Ĝia areo similas tiun de Srilanko, aŭ Litovio, aŭ Togolando, aŭ duono de Urugvajo. Tasmanio situas inter la sudaj latitudoj 40 kaj 43,5. Grandparte ĝi havas montetan topografion. La plej altaj montoj ne atingas pli ol 1 550 metrojn, sed ne mankas neĝo vintre. Grava faktoro estas, ke ĝuste je tiuj latitudoj blovas elokcidente ventegoj nomataj angle “Roaring Forties” – kion ni eble povus traduki kiel *kriĉantaj kvardekaj*. Do la okcidenta marbordo havas tre altan pluvokvanton – ĝis 380 cm jare – tre fortajn ventojn, kaj malmulte da bestoj aŭ homoj – eĉ hodiaŭ estas sovaĝejoj tie malofte vizitataj. Abundas rapidflujaj riveroj kaj lagoj en tiu regiono kaj fakte en la tuta Tasmanio. La centro kaj oriento ĝenerale havas tre plaĉajn klimaton kaj pejzaĝon. Iu frua setlanto diris, ke tie oni havas “la belon de Anglio sen la aĉa klimato”.

Pri la indiĝenaj tasmanianoj ni havas multe malpli da informoj, ol ni ŝatus havi. Britaj setlantoj de la deknaŭa jarcento ne alte taksis la kulturon kaj lingvojn de “sovaĝuloj”, kaj multo estis nesaveble perdita, kiam la homoj mem forpasis. Ni ne havas fotojn de sanaj junaj aborigenoj. Kiam la fototeĥniko evoluis, vivis nur maljunuloj, kies vizaĝoj esprimas malesperon kaj suferadon. Estas kelkaj pentraĵoj de pli junaj homoj. La pentristoj probable ne tute sukcesis kapti la esencon de la homoj. Ekzemple, laŭ ĉiuj raportoj tiu ĉi virino, Trukanini, estis fama belulino. Jen Manalargena, laŭdire imponaspekta ĉefo. Jen Vuradi, unu el la edzoj de Trukanini, sorĉa rakontanto kaj lerta konstruanto.

Kiam mi estis juna, oni opiniis, ke la aborigenoj de Tasmanio estis de alia raso ol tiuj de la aŭstralia kontinento. La teorio estis, ke la tasmanianoj, relative malaltkreskaj kaj kun bukklaj haroj, diferencas de la plialtkreskaj, rektharaj aŭstralianoj. Plue oni opiniis, ke la “tasmanianoj” atingis la kontinenton antaŭ la “aŭstralianoj” kaj estis iom post iom forpuŝataj suden kaj povis sin savi nur pro tio, ke ili migris al Tasmanio kaj poste la marnivelo leviĝis kaj apartigis la insulon de la kontinento. Tamen ŝajnas, ke tiu teorio ne plu estas diskutata. Oni rigardas la malaperintajn tasmanianojn parto de la sama popolo, kiu venis al la kontinento antaŭ eble 50 000 ĝis 70 000 jaroj.

Vi vidas sur tiu ĉi mapo [montrita dum la prelego] la dividojn de la insulo laŭ la tribaj limoj, kiam eŭropanoj eksetlis tie. La punktoj kaj ciferoj indikas la bandojn. La homoj ofte vivis en nur familiaj grupetoj; ŝajne ili tiel preferis vagadi. Sed de tempo al tempo pluraj familioj kuniĝis por formi bandon, kaj estis iel agnoskate, ke bandoj parolantaj la saman lingvon formas tribon. Pri la lingvoj mi mem scias nenion, kaj mi kredas, ke ankaŭ la specialistoj havas nur limigitajn sciojn. Sed ĝenerale oni parolas pri du lingvaj familioj: la nordtasmania kaj la sudtasmania. Tamen ni scias, ke mesaĝoj povis rapide atingi ĉiujn homojn sur la insulo. Nomadoj tre ofte iras ekster la limojn de sia tria teritorio – foje kun la beno de la najbaroj, foje ne. Sed oftis komercaj interŝanĝoj, ĉefe de manĝaĵoj, de ornamaĵoj, kaj de okro, la ruĝbruna koto uzata por ornami la korpon, precipe la harojn.

Do dum almenaŭ 20 jarmiloj tiuj homoj vivis sukcese sur la akvoabunda insulo kiel nomadoj. Ili ne havis hundojn, nek metalajn ilojn, nek eĉ ostajn ilojn, ili ne uzis bumerangojn. Iliaj armiloj estis, krom ŝtonoj, kiujn ili ĵetis kun miriga ekzakteco, lancoj tre longaj – ĝis 5-metraĵ – kaj klaboj. Ŝajnas, ke ili ne kapablis facile fari fajron sed devis konstante kunporti ĝin. Laŭdire estis kutimo ke, se iu grupo perdis sian fajron, alia – eĉ malamika – devis pludoni sian. Do teĥnologie la tasmaniaj aborigenoj estis malpli evoluintaj ol la aŭstraliaj.

La aborigenoj tute ne portis vestojn. Ili sin protektis kontraŭ malvarmo per ŝmirado de miksaĵo de bestograsoj sur la tutan korpon. La viroj krome kutime ornamis siajn longajn bukklajn harojn per graso kaj ruĝbruna okro. La virinoj plej ofte tondis siajn harojn, ke nur stoploj restu. Alia kutimo de virinoj estis kovri la ŝultrojn per kangurupelto, precipe kiam ili portis bebojn.

Manĝaĵoj ne mankis en Tasmanio. Pluraj bestoj provizis per viando: kangurooj, valabioj, emuoj, falangeroj, fokoj, diversaj birdoj, foje eĉ surplaĝiĝintaj balenoj. Krome oni manĝis, depende de la aktuala situo, multe da konkuloj. Unu kuriozaĵo estas, ke ili rifuzis manĝi fiŝojn. Tion konstatis eŭropaj vizitantoj, kaj arĥeologoj asertas, ke ili ne manĝis fiŝojn dum la lastaj 4 000 jaroj! Kaj estas tiom da bongustaj fiŝoj en la maro, riveroj kaj lagoj de Tasmanio.

Krome ili manĝis multe da beroj, radikoj kaj plantoj. Iliaj manĝaĵaro kaj nomada vivmaniero probable estis tre sanigaj.

Laŭ la observoj de eŭropanoj la tasmaniaj aborigenoj ĝenerale estis monogamiaj, kaj la intima familio estis la solida bazo de la socio. Sed ekzistis ankaŭ la kutimo, ke viro prunedonas sian edzinon al alia viro kontraŭ ia komplezo. Ĉu la virinoj tion ŝatis aŭ ne, ni ne povas

juĝi. Certe la virinoj havis malsuperan rangon kompare kun la viroj. Neniu observanto iam ajn rimarkis, ke virino pruntedonas sian edzon al alia virino.... Kaj ĝenerale virinoj havis multe pli da laboro ol viroj. La viroj ĉasis la grandajn, rapidkurajn bestojn, kio donis al ili prestiĝon. La virinoj fosis kaj rikoltis kaj ĝenerale faris la ceteran laboron. Alia kuriozaĵo: la virinoj rikoltis marbestojn, ekzemple konkulojn, kio signifas, ke ili devis naĝi kaj plonĝi en la maron. Do naĝado estis virina afero, kaj malmultaj viroj degnis lerni naĝi. Eŭropanoj miris pri la naĝpovo de aborigeninoj, aparte pri ilia kapablo resti tre longe subakve. Kiam la grupo moviĝis al alia tranoktejo, ekzemple, la viroj portis nur siajn lancojn, klablojn, kaj la fajron. La virinoj devis porti ĉion alian: infanojn, korbojn, akvujojn, eventuale brullignon, siajn fosbastonojn kaj manĝujojn.

Ĉu do la aborigenoj de Tasmanio vivis en senproblema idilio? Apenaŭ. Ankaŭ inter ili okazis foje bataloj, ĉefe pro forkapto de virinoj. Sed onidire eĉ la “militoj” estis tre mildaj kompare kun la buĉado sur eŭropaj batalkampoj. Foje nur unu vundo sufiĉis por kontentigi la honoron de la akuza flanko.

Kiel mi jam diris, la loĝantaro de Tasmanio estis tre malgranda, laŭtakse maksimume 20 000. Sed la nomada vivmaniero postulas grandan areon. Ĉiu grupo bezonas lokojn vizitatajn laŭ la sezono; forpreni eĉ unu parton povas grave perturbi la vivritmon. Tion eŭropanoj simple ne komprenis.

Pluraj eŭropanoj komentis, ke estas nenia signo de religia kredo aŭ ritario en la vivo de la aborigenoj. Tiuj komentoj fontis el la limigita kompreno de la eŭropanoj. Vespere la aborigenoj dancis kaj kantis kaj rakontis. Tiuj ritoj, en kiuj partoprenis la tuta grupo, ne nur unuopaj steluloj, servis por provi solvi aktualajn problemojn en la vivo de la aborigenoj, sed ankaŭ memorigis pri la faroj de la antaŭuloj kaj la agoj de la spiritoj, kiuj kreis la mondon kaj kiuj povis interveni aŭ bonintence aŭ malice en aferojn de la vivantoj.

* * *

Nun ni parolu iom pri la unuaj kontaktoj de la aborigenoj de Tasmanio kun fremduloj, t.e. eŭropanoj. En la eŭropaj lingvoj ni uzas strangajn esprimojn, ekzemple ni diras, ke Kristoforo Kolumbo *malkovris* Amerikon, aŭ James Cook *malkovris* Aŭstralion. Kiel la praloĝantoj de tiuj kontinentoj pensus pri tia terminaro?

Nu, la unua konata “malkovrinto” de Tasmanio estis la nederlandano **Abel Jansz Tasman**. En la jaro 1642. Li estris la du ŝipojn *Heemskerck* kaj *Zeehaen*. Tasman ricevis de la guberniestro Van Diemen en Batavio (nun en Indonezio) la komision esplori por la Nederlanda Orient-Hinda Kompanio. Agante laŭ la prudenta principo, ke estas bone flati la ĉefon, Tasman nomis la insulon Van-Dimen-Lando.

Tasman havis la malbonŝancon aliri la insulon de la okcidenta flanko, kaj estis tiel fortaj ventoj, ke li apenaŭ povis surteriĝi en nedanĝera loko. Fine li atingis plaĝon eble 50 km sude de la nuna Macquarie-Haveno. Li ofte vidis fumon kaj aliajn signojn de homa loĝado, sed ne vidis homojn (sed estis certa, ke homoj vidas lin!). Unu kuriozaĵon li registris: sur grandaj arboj estis truoj elhakitaj kiel piedapogejoj. Tiuj vertikalaj truoj estis proksimume du metrojn apartaj – kaj ebla konkludo estis, ke gigantoj loĝas tie. Li ne sciis pri tre riska grimpmaniero, pri kiu la tasmanianoj majstris. Sed Tasman konkludis, ke tiuj homoj ne havas ian ajn valoraĵon por komerci, kaj do la lando estis seninteresa por la nederlanda imperio.

* * *

Jarcentojn la tasmanianoj restis “nemalkovritaj”, la povruloj. Sed en 1772 la franca ŝipestro **Marion du Fresne** alvenis. Marion estis adepto de Jean-Jacques Rousseau, kiu filozofiumis

pri “noblaj sovaĝuloj”. Marion konstatis, ke la indiĝenoj estas nudaj, do li persvadis du francajn maristojn demeti la vestojn kaj naĝi al la nudaj sovaĝuloj. Post starigo de pacaj rilatoj tiuj du donacos al la sovaĝuloj por montri, ke la civilizita Francio volas rilati amike al la noblaj sovaĝuloj. Poste oni kune diskutos filozofion kaj la strukturon de homaj socioj.

Nu, la kontakto komenciĝis sufiĉe bone. La nudaj francoj alnaĝis la sovaĝulojn kaj estis amike akceptitaj. Sed iomete poste okazis ia kultura miskompreno, kaj la sovaĝuloj fuĝis malantaŭ sablodunon kaj priĵetis la francojn per ŝtonoj. La francoj el siaj boatoj respondis per muskedpafoj, mortigis unu aborigenon kaj vundis plurajn. La sovaĝuloj kuris en apudan arbaron, kaj la francoj ne plu sukcesis fari kontakton. Ili pluveturis al Novzelando, kie maorioj mortigis kaj manĝis dekon da francoj, inkluzive Marion du Fresne. Kiam la pretervivantoj reiris al Francio, s-ro Crozet, kiu transprenis la gvidon post la morto de Marion, renkontis Jean-Jacques Rousseau kaj rakontis pri la kanibala sorto de la iama ŝipestro. Rousseau estis skuita de tiu informo kaj demandis: “Ĉu eblas, ke la infanoj de la Naturo vere povas esti tiel fiaj?” Ekde tiam la nobla sovaĝulo devis lukti en la menso de eŭropaj intelektuloj kontraŭ la “malnobla sovaĝulo”.

* * *

La unua anglo – malgraŭ la franca nomo – kiu “malkovris” Van-Dimen-Landon, estis **Tobias Furneaux**. Li komandis la ŝipon *Adventure*, kiu estis parto de ekspedicio sub komando de la fama kapitano James Cook. En 1773 Furneaux veturis laŭ la orienta marbordo. Ĉie li vidis fajrojn kaj foje kabanetojn. La angloj prenis el unu kabaneto lancojn kaj korbojn – do evidente la sovaĝuloj vidis la anglojn kaj fuĝis. Sed nenie estis videblaj la homoj mem. Furneaux konkludis, ke VDL estas parto de la kontinento tiutempe nomata Nova Holando.

* * *

La fama **kapitano James Cook**, kiu laŭveturis la orientan marbordon de Aŭstralio en 1770, revenis en 1777 al Tasmanio, t.e., al VDL. Liaj kontaktoj kun la aborigenoj estis multaj, kaj de li ni havas la unuajn sencohavajn komentojn (li ne teoriumis pri noblaj aŭ malnoblaj sovaĝuloj). Mi citu el lia taglibro: *Ili estas tute nudaj, mezaltaj laŭ statur, iom sveltaj, haŭto kaj haroj estas nigraj, la haroj estas bukaj kiel tiuj de la indiĝenoj de Nova Gvineo, sed ili ne havas la elstare dikajn lipojn kaj platajn nazojn de la novgvineanoj. Male, iliaj vizaĝtraĵoj estas sufiĉe plaĉaj. Ili havas sufiĉe bonajn okulojn, kaj iliaj dentoj estas tre regulformaj, sed tre malpuraj.*

La kuracisto de tiu ekspedicio diris: *Ili havas malmulte de la fera aŭ sovaĝa aspekto kutima inter homoj en ilia situacio, sed male ŝajnas mildaj kaj bonhumoraj, ne retiriĝemaj aŭ ĵaluzaj rilate al fremduloj.*

Cook donacis al la aborigenoj vestojn kaj ornamaĵojn, panon kaj kaptitajn fiŝojn. Nenion ili trovis utila, sed ĵetis en la maron. Sed birdojn ili akceptis. Krome Cook donacis du geporkojn, kaj tuj la aborigenoj kaptis la strangajn bestojn ĉe la oreloj kaj volis buĉi. Komence Cook intencis donaci du gebovojn, du gekapojn, du geŝafojn kaj la geporkojn. Fakte li poste liberigis la du geporkojn, esperante, ke ili sufiĉe bone sin kaŝos, ĝis ili sin reproduktos. La aliajn bestojn li decidis ne donaci, ĉar ili certe estus tuj buĉitaj. Tia estas nomada kutimo.

Junulo havis enmane lancon, kaj la angloj petis lin montri sian ĵetkapablon. Ili pendigis lignan tabulon de arbo. La junulo ĵetis kelkfoje, sed tute ne trafis. Do Omaj, indiĝeno de Tahitio, kiu vojaĝis kun Cook, volis montri al la aborigenoj la potencon de blankula armilo. Per muskedo li alpafis la tabulon. Ĉu li trafis, ni ne scias, ĉar la eksplodo de la muskedo tiel timigis la aborigenojn, ke ili forkuris. Ili kuris rekte al aliaj angloj sur la plaĝo, kaj tiuj

kredis, ke la sovaĝuloj atakas, do ankaŭ ili pafis per muskedo, kaj estiĝis granda panikiĝo. La nigrujoj malaperis kiel eble plej rapide en apudan arbaron.

Cook supozis, ke li ne plu vidos la aborigenojn, sed li ne pravis. Kiam liaj ŝipoj la postan fojon alplaĝiĝis, renkontis la anglojn amika grupo da aborigenoj, kies stelulo estis viro kun ĝiba dorso. Liaj aktorado kaj babilado tiel amuzis la ceterajn, ke Cook vere bedaŭris, ke li komprenas eĉ ne unu vorton. Tiuj aborigenoj volonte akceptis medalojn kaj bidoĉenojn, sed kiam Cook proponis al ili fiŝkapto-hokojn kaj ferajn ilojn, ili simple forĵetis la fremdajn aĵojn.

Fine la angloj renkontis ankaŭ virinojn. Laŭ la sperta juĝo de suboficiro la maljunulinoj estis nebelaj, la junulinoj plaĉaspektaj, kaj la infanoj vere belaj. Cook poste komentis, ke estas nenia indiko pri religia kredo, nek pri kultivado de la tero, nek pri sistemo de leĝoj. Do Cook, klera kaj tolerema homo laŭ tiutempaj kriterioj, tamen konkludis, ke la aborigenoj en tia stadio de evoluo ne kontraŭus britan okupacion de la tero.

Mi ne komprenas la logikon de tiu konkludo de James Cook. Kiel anglo li akceptis, ke oni rajtas posedi teron nur, se oni ĝin kultivas. La aborigenoj ne kultivis la teron, simple rikoltis, do ili ne posedis ĝin. Tiu brutala rezonado estigis la teorion pri *terra nullius* – nenies tero. Nu jes, sed kial Cook supozis, ke la aborigenoj akceptus la teorion kaj volonte transdonus la teron al invadantoj?

* * *

En 1788 la kverelema **kapitano William Bligh** vizitis la plaĝon ĉe la nuna Adventure Bay. Lia ŝipo estis nomata “Bounty” kaj estis survoje al Tahitio. Liaj rilatoj kun la aborigenoj de Tasmanio estis ĝenerale bonaj, kvankam li opiniis, ke ilia lingvo similas al “blekado de anseroj”. Bligh admiris la atletan kapablon de la homoj, kiuj tiel lerte kuris trans la rokojn kaj facile mane kaptis najlojn alĵetitajn al ili. Ankaŭ li komentis pri la absoluta nudeco de la homoj, kies ripozpozicio estis sidi sur la kalkanoj kaj meti la genuojn sub la akselojn. Bligh plantis diversajn fruktarbidojn: poman, cidonian, figan, granatan, kaj ankaŭ rosmarenon kaj fragojn. Oni konstatis tri jarojn poste, ke nur la pomarbido pluvivas.

Bligh pluveturis al Tahitio. Dum la revenvojaĝo okazis unu el la plej konataj ribeloj en la brita marhistorio. Sed tio estas temo ekster nia kadro.

* * *

En 1789, la jaro de la Franca Revolucio, alia angla kapitano, kiu fakte postĉasis fokojn kaj balenojn, sendis maristojn surteren serĉi akvon ie sur la orienta marbordo de Van-Dimendlando. La kapitano estis **John Henry Fox**. Fox estis certa, ke estas aborigenoj proksime, sed ili bone sin kaŝis. Lia grupo trovis primitivajn kabanetojn kaj apude restaĵojn de ostroj kaj pektenoj. La trian tagon Cox eĉ vidis fumon. Li sendis oficiron esplori. La oficiro atingis la aborigenojn kaj provis komuniki kun ili. Ili imitis lian parolmanieron kaj ridis, sed evidente ne fidis lin, ĉar ili baldaŭ malaperis en marĉan regionon. La postan tagon Cox mem kondukis grupon da viroj, kiuj sukcesis trovi aborigenojn. La nigraj homoj estis sufiĉe amikaj, sed post iomete ankaŭ ili malaperis en arbaron. Leŭtenanto Mortimer havis tempon por observi kaj raportu: ... *ili estas tatuitaj en kurioza maniero: la haŭto estas levita por formi reliefaĵojn; iliaj korpoj estas ŝmiritaj de ia malpura ruĝa farbo aŭ tero. Ili estis tute nudaj krom unu viro, kiu havis kolĉenon el etaj konkoj, kaj kelkaj virinoj havis ian sakon aŭ robon sur la ŝultroj: mi supozas, ke ili portas sur tiuj la infanojn kaj siajn malmultajn posedaĵojn. Ĝenerale ili ŝajnas timema, nedanĝera homraso, kaj donas belan bildon de la homa naturo en ĝia plej kruda kaj nekultivata formo. Dum kelka tempo ni provis vekti en ili fidemon. Sed kvankam ili*

ŝajnas tre gajaj, ridante kaj imitante niajn moviĝojn, ili daŭre rapide foriris. Ni imagis, ke ili gestas, ke ni ilin sekvu, sed baldaŭ ili perdiĝis inter arbojn.

* * *

Multe pli longan kontakton havis la posta ekspedicio de la franco **Bruny d'Entrecasteaux**. D'Entrecasteaux serĉis la malaperintan kapitanon La Pérouse. La raportanto ĉi-foje estis la kuracisto Jacques-Julien Houton de Labillardière. Labillardière estis alia disĉiplo de Jean-Jacques Rousseau, sed li sciis pri la terura sorto de Marion du Fresne, tiu manĝita de maorioj, do li ĉiam havis apude armilon. Sed liaj kontaktoj kun aborigenoj de Van-Dimen-Lando estis ĝenerale tre amikaj, aparte kun la junulinoj. Li skribis pri tia kontakto: *Kvar junulinoj akceptis indiferece la vestojn, kiujn ni donacis al ili, kaj, por ne esti ŝarĝitaj de senutilaĵoj, ili tuj pendigis ilin sur arbustojn apud vojo, sendube kun la intenco trovi ilin revenante.*

Estas nenia dubo, ke ni perdis multon pro nekompreneo de la lingvo de tiuj indiĝenoj, ĉar unu el la knabinoj diris multon al ni; ŝi longe parolis kun eksterordinara esprimemo, kvankam ŝi devis konstati, ke ni ne komprenas ŝian diraĵon; egale, ŝi devis paroli. La aliaj provis pli ol unu fojon ĉarmi nin per kantado kun modulado, kiu aparte imponis al mi pro la granda simileco al melodioj de araboj en la Mezoriento. Plurfoje du kantis la saman melodion samtempe, sed ĉiam unu kantis pli altan harmonion ol la alia, farante konkordon ege ekzaktan. Baldaŭ post atingo de la enirejo en la havenon du el la junulinoj laŭiris la kurbiĝojn de la plaĝo sen malfido, ioman distancon for de la ceteraj indiĝenoj, kun tri el niaj maristoj, kiuj kaptis la okazon por trakti ilin en maniero iom truda kaj ricevis reagon tute alian ol ili esperis. La junulinoj tuj flugkuris al la rokoj elstarantaj en la maron, kaj ŝajnis pretaj por salti en ĝin kaj fornaĝi, se niaj viroj ilin sekvos.

Entute la virinoj de Van-Dimen-Lando ravis Labillardière: belaj kaj tamen ĉastaj. Nur unu afero kolerigis la galantan franco: ke la virinoj devas fari la danĝeran laboron plonĝi en la maron kaj naĝi, kie abundas ŝarkoj. Labillardière provis instigi la virojn transpreni la taskon, sed la sinjoroj nur rideteme ŝultrumis: ha, tio estas virina afero, ili indikis. Cetere, tiu stranga labordivido estis kontraŭ la principoj de Jean-Jacques Rousseau, kaj tio iom skuis la mondbildon de Labillardière. Kiel vera franco, li ne komprenis, kial la aborigenoj rifuzas fromaĝon, panon kaj brandon.

Alia interesa incidento priskribita de Labillardière: *Niaj viroj atingis grandan fajron, ĉe kiu ok sovaĝuloj, ĉiuj kun kangurupelto ĉirkaŭ la ŝultroj, sin varmigis helpe de kvar ŝirmiloj kontraŭ la vento. Ili tuj forkuris, vidinte nin. Maljunulino, kiu prizorgis la manĝaĵojn, kiujn ŝi ne volis forlasi, estis kaptita de kelkaj el niaj maristoj. Kun aspekto de kontentulino ŝi akceptis koltukon proponitan al ŝi, sed vidinte tranĉilon, kiun la maristoj volis donaci al ŝi, ŝi tiel ektimis, ke ŝi saltis malsupren de klifo pli ol 15 metrojn alta kaj forkuris inter rokojn, kie ŝi baldaŭ malaperis.*

* * *

En 1793 alia anglo nomata **kavaliro John Hayes** multe esploris en la regiono kun la nuna nomo Storm Bay. Li malavare donis novajn nomojn al lokoj jam nomitaj de francaj kaj anglaj antaŭuloj, kaj en kelkaj kazoj la nomo donita de Hayes iĝis oficiala. Ke la aborigenoj jam de jarmiloj uzas proprajn nomojn, ne gravis. Hayes ne sukcesis vidi iun ajn aborigenon, sed multaj vidis de kaŝlokoj lian ŝipon.

* * *

En 1798 la juna aventurema angla paro **Bass kaj Flinders** faris apenaŭ kredeblan vojaĝon per remboato laŭ la orienta marbordo de Van-Dimen-Lando. Ili surteriĝis ie ĉe bordo de la granda rivero Derwent. Ili vidis du virinojn kaj unu viron. La junaj angloj aliris kaj volis donaci nigran cignon, sed la du virinoj forkuris. Bass priskribis la viron kiel malaltkreskan, maldikan, mezaĝan. Li tre volonte akceptis la birdon. Li aspektis pli bonintenca kaj inteligenta ol feroca kaj stulta. La angloj konstatis, ke la materia kulturo de la vandimenlandanoj estas primitiva kompare kun tiu de la aborigenoj de Nova Holando. La vandimenlandanoj posedis nek kanuojn, nek efikajn ĉasarmilojn, nek bonajn ŝirmejojn. Ili ne interesiĝis pri agrikulturo kaj havis nenian rimedon por forpeli invadantojn. Konklude: la vandimenlandanoj tre profitus de enkonduko de eŭropa civilizacio.

Bass kaj Flinders iris pluen kaj pruvis, ke Van-Dimen-Lando estas insulo sendependa de la kontinento. Tiu informo zorgigis la guberniestron en Sidnejo, King, kiu timis, ke la francoj povus fondi kolonion sur Van-Dimen-Lando. Do necesis establi britan stacion por eviti francan okupacion.

* * *

Kaj francoj ja interesiĝis pri la insulo. En 1801 **kapitano Nicolas Baudin** alvenis. Li estris du ŝipojn, *Le Géographe* kaj *Le Naturaliste*. Longajn priskribojn pri kontaktoj kun aborigenoj ni ŝuldas al la zoologo François Péron kaj al lia zoologa kolego Leschenault.

Péron kaj kolego-oficiro Freycinet esploris la regionon, kie la rivero Huon fluas en la maron. Ili renkontis junan viron de impona staturo kun vizaĝo “vigla kaj esprimriĉa”. Ili volis ĉirkaŭbraki la noblan sovaĝulon, kiu tamen ne komprenis la sencon de tiu eŭropa gesto. Lin tamen ege interesis la blanka haŭto. Baldaŭ aliaj aborigenoj alvenis kaj invitis la francojn kunmanĝi konkulojn. Péron kaj Freycinet “ege ĝuis” la manĝon kaj montris sian dankemon per kantado de *La Marseillaise*: tio tre amuzis kaj mirigis la aborigenojn. Inter la noblaj sovaĝuloj estis belulino nomata Ouré-Ouré. Ŝajnas, ke Péron enamiĝis al la knabino. Entute estis rava sperto por la du francoj; Péron skribis pri la amikeco, bonkoreco kaj malavaro de la noblaj sovaĝuloj.

Tamen la alia zoologo Leschenault havis tute aliajn impresojn. Li iris kun la kapitano Baudin, Hamelin (la estro de *Le Naturaliste*), kaj la desegnisto Petit. Ili renkontis aborigenojn en alia loko ol amikoj Péron kaj Freycinet; la renkontiĝo estis unue sufiĉe amika, ĝis iu rimarkis, ke Petit desegnas la aborigenojn. Tio evidente ofendis, kaj kelkaj provis ataki Petit kaj forkapti la desegnaĵojn. Tio konvinkis Leschenault, ke estas stulte imagi, ke homoj “en la natura stato” estas pacemaj. Li konvinkiĝis, ke tiaj homoj bezonas civilizacion por bridi iliajn sovaĝajn instinktojn.

Ŝajnas, ke Leschenault forte influis Péron per sia vidpunkto, ĉar tiu amiko de noblaj sovaĝuloj tute ŝanĝis sian melodion. Kune kun du oficiroj Péron vizitis Bruni-Insulon. Ili renkontis grupon da virinoj, kiuj insistis, ke la francoj unue surterigu siajn armilojn. Poste la sovaĝulinoj sidis surkalkane kaj agis tute nature: ili ridis pri la stranga aspekto de la francoj. Péron skribis, ke la aspekto de la virinoj estas *en la pleja grado naŭza kun escepto de du-tri junulinoj, kiuj havis molajn kaj tenerajn trajtojn*. Péron konkludis, ke la streĉa vivo daŭre devi postĉasi manĝaĵojn malfeliĉigas la virinojn, kiuj cetere havis ĉie vundmarkojn, sekvo de la mistraktado far la ferocaj edzoj.

Poste Péron kaj Kompanio trovis kremaciejon. Tre mirigis ilin, ke la aborigenoj sin klopodigas por tiel ceremonie bruligi kadavrojn, ĉar ili estis *fremduloj al ĉia principo de socia ordo, ili estas sen leĝoj, sen vestoj, sen ĉia ajn formo de kulturo, sen fiksa loĝloko, sen armiloj krom krudaj lancoj kaj klaboroj*.

La pozitivaj impresoj de Péron do transformiĝis en la malon. Liaj skribaĵoj estis vaste legataj en Eŭropo, kaj oni komencis rigardi la aborigenojn de Van-Dimen-Lando la plej primitivaj homoj sur la tero. Poste en la jarcento, kiam la verkoj de Darwin tre populariĝis, oni konjektis, ke la tasmanianoj estas eble la mankanta ĉenero inter simioj kaj homoj.

* * *

La eŭropanoj, kiuj renkontis la aborigenojn de Van-Dimen-Lando, tre interesiĝis pri tiuj fremdkulturaj homoj kaj faris multajn noticojn pri kontaktoj kun ili. Foje ili trovis la nigrulojn belaj, foje forpuŝe malbelaj, foje amikemaj, foje agrese malafablaj. Sed la eŭropanoj ŝajne neniam pripensis, kian impreson *ili* faras sur la aborigenoj. Kion la nigruloj, fortranĉitaj de la cetera mondo, opiniu pri tiuj strangaj estaĵoj, kiuj venis per nekredeble grandaj boatoj kun nuboj supre, kiuj havis haŭton kun la koloro de kadavroj aŭ renaskiĝintoj, kaj kiuj havis strangajn kaj timigajn armilojn? Eble estuloj de alia planedo...

Bibliografio

Cowling, C.C., *Pri la iamaj tasmanianoj*. Christ College, Hobart, 1935.

Rae-Ellis, Vivienne, *Tracanini, Queen or Traitor?* Australian Institute of Aboriginal Studies, Canberra, 1981.

Rae-Ellis, Vivienne, *Black Robinson, Protector of Aborigines*, Melbourne University Press, dua eldono 1996.

Robson, Lloyd, *A History of Tasmania (Vol. 1)*, Oxford University Press, 1983.

Ryan, Lyndall, *The Aboriginal Tasmanians*, University of Queensland Press, Brisbane, 1981.

Taylor, H.G., *The Discovery of Tasmania*, Cat & Fiddle Press, Hobart, 1973.

Turnbull, Clive, *Black War – The Extermination of the Tasmanian Aborigines*, Sun Books, Melbourne, dua eldono 1965.

Subakva robotiko: de homa regado al daŭra memregeco



Francesco Maurelli

Postdoktoriĝa esploristo ĉe la universitato Heriot-Watt de Edinburgo, Skotlando, kie li nun ĉefe mastrumas la eŭropan projekton *Pandora*, kiu celas daŭran memregecon kaj konscion en subakvaj robotoj. Laborante pri la temo ekde 2007, li aktive partoprenis en la eŭropa projekto *FREEsubNET*, kie li respondecis pri laborpakaĵoj pri memrega navigado kaj alkroĉiĝo; ĉefkontribuis nome de la universitato por *SEAS-DTC Exemplar 1*, pri multrobota kunlaboro cele al memrega kontraŭmina agado; aktive kontribuis al *MoD Competition of Ideas* kaj al la pria trisemajna testado en skota lago; ĉefrolas en projekto kunlabore kun *DRDC* pri multrobota konstrutekniko. En 2009 li gvidis teamon por konkurso inter subakvaj robotoj – *SAUC-E*,

kiu atingis la unuan lokon, kaj la postan jaron partoprenis en la teamo, kiu atingis la duan lokon. Antaŭ ol zorgi pri subakvaj robotoj, li interesiĝis pri memregaj aŭtomobiloj, esplorante pri la temo ĉe Fraunhofer Institut IAIS en Sankt Augustin, Germanio, kaj ĉe la Sud-Okcidenta Esplorinstituto en San Antonio, Usono, kie li partoprenis en la unua fazo de la *Darpa Urba Defio* (konkurso inter memregaj aŭtomobiloj) kun *Team Berlin*. Li ĉefrespondecis pri tridimensia laserskanilo uzata por stratrekonado, obstakloanalizo kaj memrega decido ĉe vojkrucoj. Li verkis pli ol dudekon da sciencaj artikoloj por prestiĝaj internaciaj konferencoj kaj fakaj sciencaj ĵurnaloj.

Resumo

Eĉ se tio povas soni strange, la homaro scias pli pri la kosma spaco ol pri la fundo de la oceanoj. Pli ol du trionoj el la tera surfaco estas kovrita de akvo, kaj tiu grandega parto de la terglobo iĝas pli kaj pli strategie grava. Estas pluraj kialoj, ekzemple naturmediaj kaj arkeologiaj, rilataj al ekspluato de la naturaj rimedoj, industriaj, militaj ktp.

Ju pli la homa interesiĝo pri la subakva mondo plialtiĝis, des pli sciencaj kaj teknikaj eltrovoj estis bezonataj por efike labori en tiu medio.

La unua roboto kiu eniris la akvon estis plene regata de la homo. Tiaj robotoj estas nuntempe ofte rutine uzataj en petrol-industriaj medioj. Homa piloto enŝipe regas la roboton per longa kablo (ĝi povas esti ĉe plurkilometre longa!). La roboto estas ekipita per sensoroj – kameraoj kaj eĥosondiloj, kies datumoj estas alireblaj por la piloto, kiu tiel decidas la movojn de la roboto.

Estas klare ke tiu aliro havas multajn limojn: la kosto de la ŝipo kaj de la homa piloto, la malhelpo de la kablo, la plena senkonscieco kaj nepovo reagi de la roboto, la maleblo aliri specifajn lokojn (ekzemple subglaciajn). Nova generacio de subakvaj robotoj estis elpensita, havanta apartan econ: la memregecon. Estas tamen multaj niveloj de memregeco. Memregeco ne estas sinonimo de konscio, inteligento aŭ decidokapablo. Ĉiu donas apartan nuancon, apartan kapablon. La unuaj memregaj robotoj simple kapablis naĝi laŭ home antaŭdifinita kaj antaŭplanita vojo.

La nuna esplorado male celas daŭran memregecon, kapablon por la roboto konstrui mem planon el altnivele priskribita misio, kapablon adapti kaj ŝanĝi tiun planon laŭnecese, kapablon konscii pri siaj kapabloj kaj mastrumi laŭeble fiaskojn kaj difektiĝojn.

La tuta artikolo, kaj kompreneble la prezentaĵo, referencos ankaŭ al pluraj projektoj en kiuj la aŭtoro estis mem engaĝita, financitaj el eŭrop-uniaj fontoj kaj de la defendministerioj brita kaj kanada.

Underwater robotics: From human control to permanent autonomy

Summary

It may seem strange, but mankind knows more about outer space than about the bottom of the oceans. More than two thirds of the earth's surface is covered by water, and this enormous part of the globe is becoming more and more important strategically. There are several reasons for this, for example environmental, archeological, industrial, military, resource-related, etc.

The more human interest in the underwater world increases, the more scientific and technical discoveries are needed in order to work efficiently in this environment.

The first robot that entered the water was completely controlled by humans. Such robots are often used currently in oil-industry environments. A human pilot on a ship controls the robot via a long cable (which can be even several kilometers long!). The robot is equipped with sensors – cameras and sonar devices whose data are accessible to the pilot, who uses them to determine the movement of the robot.

It is clear that this approach has many limitations: the cost of the ship and of the human pilot, the hindrance of the cable, the total lack of consciousness and ability to react on the part of the robot, and the inability to reach certain places (for example beneath ice). A new generation of underwater robots has been conceived, possessing a special characteristic: autonomy. There are nonetheless many levels of autonomy. Autonomy is not a synonym of consciousness, intelligence, or decision-making ability. Each level imparts a distinct nuance, a distinct capability. The first autonomous robots were simply capable of swimming in a previously defined and planned route.

Current research, on the other hand, is aimed at a permanent autonomy, an ability for the robot itself to construct a plan from a mission described at a higher level, to be conscious of its capabilities, and to manage accidents and damage to the extent possible.

The entire article, and of course the presentation, will additionally reference several projects, financed by EU sources and the British and Canadian defense ministries, in which the author himself is involved.

Robotique sous-marine: du pilotage humain au pilotage automatique permanent

Résumé

Même si cela peut sembler étrange, l'humanité en sait plus sur l'espace cosmique que sur le fond des océans. Plus des deux tiers de la surface de la terre sont recouverts d'eau, et cette immense partie du globe terrestre prend de plus en plus d'importance stratégique. A cela il y a plusieurs raisons, par exemple écologiques, archéologiques, industrielles, militaires, ou relatives à l'exploitation des ressources naturelles, etc.

Plus l'intérêt de l'homme pour le monde sous-marin s'est accru, plus les découvertes scientifiques et techniques sont devenues nécessaires pour travailler efficacement dans ce milieu.

Le premier robot à entrer dans l'eau était intégralement piloté par l'homme. De tels robots sont aujourd'hui communément utilisés dans les milieux de l'industrie pétrolière. Un pilote humain commande le robot depuis un bateau par l'intermédiaire d'un long câble (qui peut même atteindre plusieurs kilomètres de long!). Le robot est équipé de senseurs – caméras et sonars, dont les données sont accessibles au pilote qui peut ainsi décider des mouvements du robot.

Il est clair que cette approche a de nombreuses limites: le coût du bateau, du pilote humain, la gêne occasionnée par le câble, l'absence totale de conscience et de pouvoir de réaction du robot, l'impossibilité d'atteindre certains endroits (par exemple sous la glace). Une nouvelle génération de robots sous-marins a été conçue, dotée d'une particularité: le pilotage automatique. Il existe cependant de nombreux niveaux d'automatisme. Automatisme n'est pas synonyme de conscience, d'intelligence ou de pouvoir de décision. Chaque niveau correspond à des nuances, à des capacités particulières. Les premiers robots automatiques pouvaient seulement nager en suivant un trajet prédéfini par l'homme.

La recherche actuelle au contraire vise un automatisme de longue durée, la capacité pour le robot de construire par lui-même un plan à partir d'une mission décrite de façon très détaillée, la capacité d'adapter et de modifier ce plan selon les besoins, la capacité de prendre conscience de ses propres capacités et de gérer au mieux les échecs et les dégradations.

Tout l'article, et bien sûr la présentation, feront également référence à plusieurs projets dans lesquels l'auteur a été personnellement impliqué, financés par des fonds de l'Union Européenne et par les ministères de la défense britannique et canadien.

Môn robot học dưới biển: từ việc dẫn tàu do con người tới việc dẫn tàu tự động lâu bền

Tóm tắt

Dù điều này xem có vẻ kỳ lạ, nhưng quả thực nhân loại biết về không gian vũ trụ nhiều hơn về đáy đại dương. Hơn hai phần ba diện tích Trái Đất được bao phủ bởi nước, và phần rất lớn này của địa cầu ngày càng có tầm quan trọng chiến lược. Có thể viện dẫn nhiều lý do, thí dụ lý do môi trường, sinh thái, khảo cổ học, công nghiệp, quân sự hoặc liên quan tới việc khai thác các tài nguyên thiên nhiên, v.v.

Mối quan tâm của con người về thế giới dưới biển tăng bao nhiêu, thì những phát minh khoa học và kỹ thuật càng trở nên cần thiết bấy nhiêu để có thể làm việc có hiệu quả trong môi trường đó.

Robot đầu tiên xuống nước hoàn toàn do con người dẫn lái. Ngày nay những robot như vậy được dùng trong các môi trường của công nghiệp dầu khí. Một người dẫn lái điều khiển robot từ một tàu thủy, thông qua một dây cáp dài (có thể dài thậm chí tới vài kilomet!). Robot được trang bị những cảm biến – những máy ảnh và xôn-a, cho những dữ liệu mà dữ liệu người dẫn lái có thể tiếp cận được, nhờ đó có thể quyết định những chuyển động của robot.

Rõ ràng là cách tiếp cận đó có những hạn chế: giá của tàu thủy, chi phí cho người dẫn lái, sự gò bó do dây cáp gây ra, robot hoàn toàn không có ý thức và khả năng phản ứng, không thể tới một vài nơi (thí dụ dưới tầng băng). Một thế hệ mới robot dưới biển đã được nghĩ ra, có một đặc điểm là vận hành tự động. Tuy nhiên có nhiều mức độ tự động. Tự động không đồng nghĩa với ý thức, trí thông minh hoặc khả năng quyết định. Mỗi mức độ tương ứng với những sắc thái, khả năng riêng. Những robot đầu tiên chỉ có khả năng bơi theo một lộ trình do con người xác định từ trước.

Trái lại, nghiên cứu ngày nay nhằm một sự tự động dài hạn, robot có khả năng lập ra một kế hoạch từ một nhiệm vụ được mô tả rất chi tiết, khả năng thích nghi và sửa đổi kế hoạch đó theo các nhu cầu, ý thức được khả năng của mình và xử lý tốt nhất những thất bại và những hỏng hóc.

Toàn bộ bài viết, và tất nhiên bài thuyết trình cũng sẽ dẫn chứng nhiều dự án mà bản thân tác giả đã tham gia, được tài trợ bởi quỹ của Liên hiệp châu Âu và các Bộ Quốc phòng Anh Quốc và Canada.

Subakva robotiko: de homa regado al daŭra memregeco

Enkonduko

La planedo Tero estas ofte nomata “planedo de akvo” – tio ĉar 71% el la tuta terglobo estas kovrita de akvo. Akvo historie havis ĉiam apartan gravecon. Civilizoj naskiĝis ĉe ĉeakvaj lokoj kiel riveroj, lagoj kaj maro. Krom esti provizanto de necesa eco por vivi kaj transporta vojo por komerco aŭ militoj, la akva mondo havas ankaŭ tiun apartan econ enhavi mirindan mondeton, kaŝitan al la plejmulto, en kiu estas ne nur gravaj rimedoj, kiel petrolo ekzemple, sed ankaŭ mirindaj estaĵoj. Subakva teknologio kompreneble multe antaŭeniris en la lastaj kelkaj jaroj. Tiu ĉi kurseto enfokusiĝas ĉefe pri subakvaj robotoj, komparante tiun fakon kun tiu de aliterenaj robotoj, kiel surgrundaj aŭ enaeraj. Pli detale, en tiu ĉi sesio, ni analizos la enakvajn kondiĉojn, kiuj igas tiun medion tute aparta kaj malsimila al aliaj medioj. Poste ni prezentos la unuajn robotojn kiuj aperis kaj kiuj estas nuntempe abunde rutine uzataj de petrol-industrioj: la ForRegataj Robotoj (FRR-oj, angle *Remotely Operated Vehicles – ROVs*). Kiel la nomo diras, tiuj robotoj estas regataj defore de homo kiu, per aparta ilaro, movas la roboton. Trie, ni prezentos novan koncepton de subakva roboto, kiu ne estas konektita per kablo al homo, sed kiu mem havas ian memregecon.

La dua sesio fokusiĝos pri specifa kapablo en memregaj robotoj: memlokiĝo. Ni tiel pri-diskutos diversajn eblojn por roboto memlokiĝi, komparante la teknikojn en la subakva medio kun alimediaj.

Fine, la tria sesio fokusiĝos pri daŭra memregeco de robotoj, pri decido-alprenado, kompreno pri la mondo kaj ĝia interna reprezentado, kaj pri kunlaborado inter similaj kaj malsimilaj robotoj.

La naturmediaj enakvaj kondiĉoj

Kiel oni povas facile imagi, subakva roboto renkontas diversajn defiojn en sia medio, tute malsama al aliaj. Pro tio, la dezajno, la uzeblaj sensoroj kaj la taskoj estas malsimilaj.


Ni komencu per banala konstato: akvo kaj elektro ne estas bonaj amikoj. Ĉefe sala akvo tute ne bone rilatas kun elektro. Do, ĉefe tiuj robotoj kiuj iras en sala akvo (t.e. maro kaj kelkaj lagoj) devas esti tute bone protektitaj kontraŭ likiĝoj.

Ni nun prikonsideru la densecon: akvo estas ĝenerale 800-foje pli densa ol aero, kaj tio ja donas ideon pri ties influo al la optikaj sensoroj kaj pri la dezajno de la roboto. Plie, sala akvo kaj sensala akvo havas malsaman densecon. Praktike, se la sama roboto estas uzata en lago kaj en maro, oni ja devas ordigi/ŝanĝi kelkajn agordojn, ĉar la samaj ne validas en ambaŭ medioj.

Luma dispersiĝo kaj refrakto ŝanĝas la direkton kaj rapidecon de la lum-ondoj, kun evidenta efiko sur la optikaj sensoroj. La energio de la suno estas la unua vivpova lumfonto por kaj enakva kaj eksterakva ekosistemoj. La enakva profundeco atingata de tiu lumo, kiu do lasas plantojn vivi, estas nomita *fotona zono*. Ankaŭ la kvanto da lumo kiu sukcesas eniri la akvon dependas de pluraj faktoroj, kaj ne estas ĉiam sama. La kvanto da dissolvitaj mineraloj kaj aliaj eroj en la akvo multe influas, ĉefe pri luma dispersiĝo kaj sorbado [15]. Dum la enakviĝo parto de la lumo estas sorbata kaj konvertata al varmo aŭ uzata por

fotosintezo de la plantoj. La blanka lumo de la suno estas disigata en siajn kolorfrakciojn, kiuj estas sorbataj en malsamaj profundoj. Ju pli mallonga la ondolongeco estas, des pli profunde la lumo sukcesas iri. Sekve, ruĝa lumo – karakterizita de longa ondo kaj malalta energio – estas unue sorbata kaj ne iras tiom profunde kiom ekzemple la blua aŭ la violkolora – karakterizita de mallonga ondo kaj alta energio –, kiel montrite en la sekva tabelo kaj en bildo 1.


<i>Koloro</i>	<i>Ondolongeco</i>	<i>Profundeco</i>
Ruĝa	780 ĝis 622 nm	5m
Oranĝkolora	622 ĝis 597 nm	15m
Flava	597 ĝis 577 nm	30m
Verda	577 ĝis 492 nm	60m
Blua	492 ĝis 455 nm	75m



Bildo 1: Atingita profundo de la diversaj kolorfrakcioj de lumo

Depende de la agprofundeco de la roboto, neregula marsurfaco povas multe influi la videblon en pluraj manieroj. El varia refrakto rezultas malpliboniĝo de la videblo de iu celobjekto. Ventoj kiuj apenaŭ malglatigas la marsurfacon malplibonigas tiun videblon je 40%, laŭ [3]. Ankaŭ apero kaj malapero de nuboj estas aparte malpliboniga faktoro por subakvaj robotoj, kvankam ne nur.

Ĉi tiuj faktoroj igas kameraojn uzeblaj nur por kelkaj metroj, dum robotoj kiuj agas for de akvo kutime povas vidi per kameraoj ĝis minimume pluraj dekoj da metroj, kaj ofte ĝis pluraj centoj. Bildo 2 montras la enakvan lumpropagadon laŭ diversaj specoj de akvo [3].



Bildo 2: Lumpropagado laŭ diversaj akvotipoj

Alia sensoro tre ofte uzata en alimediaj robotoj estas laserskanilo. Ankaŭ ĝi ne povas esti facile uzata en akvo, denove pro distancproblemoj. En la kosmo ili povas esti uzataj por vidi ĝis pluraj centoj da metroj [19] [4]. Memregaj aŭtomobiloj uzas ilin por vidi je pluraj dekoj da metroj [12] (en Esperanto), [7], [18]. Male, ili estas malfacile uzeblaj en la akvo. Eĉ en la plej puraj akvaj kondiĉoj, ili kutime atingas videblon de malpli ol 10 metroj, kiel ekzemple SeaLaser [1]. Se konsideri ke agado en pura akvo estas tre maloŭta, laserskaniloj – kaj ilia geometria precizeco – estas praktike neuzablaj en la realo.

Pro tio, la plej uzata sensoro en la akvo estas eĥosondilo (sonaro). La principo estas fakte simila al tiu de laserskanilo, sed anstataŭ dissendi lumon, ĝi dissendas sonondon kaj atendas ĝian revenon. Sono estas multe pli malrapida ol lumo, kaj plie ĝia ondo estas multe pli granda. La rezulto estas ke la bildoj estas tre *brua*, kaj ke tute ne eblas havi la saman precizecon kiel ĉe laserskaniloj.

Alia tre grava diferenco inter la medioj rilatas al la maleblo ricevi signalon de Tutmonda NavigSistemo (TNS, angle *GPS*) sub la akvo. Ni revenos al tio en la dua sesio, ĉar ĝi prezentas gravan obstaklon por lokalizi roboton, kaj por ke ĝi mem komprenu sian lokiĝon.


Fina konsidero rilatas al transsendo de datumoj. Por surgrundaj aŭ aeraj robotoj, tio tute ne estas granda problemo. Male, en akvo, akustikaj modemoj povas transsendi nur ege malrapide, kaj nur ege malgrandajn datumpakaĵojn.

ForRegataj Robotoj

La unua speco de roboto kun kiu ni konatiĝu estas la tiel nomata ForRegata Roboto (FRR, angle: *Remotely Operated Vehicle – ROV*). Ĝiaj ĉefaj trajtoj estas:

- La roboto havas neniun memregecon, kaj neniun konscion.
- La roboto estas ligita al granda kablo, por ricevi elektron kaj por ricevi la komandojn.
- La komandoj ricevitaj estas plene malaltnivelaj, ne altnivelaj taskoj.
- Homa piloto gvidas ilin.

Tipa FRR aperas en bildo 3.



Bildo 3: FRR de NOAA *Ocean Explorer*

La fakto ke elektro estas liverata deekstere permesas la uzon de lampoj por lumigi la ĉirkaŭaĵojn. Plie, se konsideri ke ankaŭ la datumoj iras tra kablo, tute ne ekzistas la problemoj priskribitaj pri akustikaj modemoj, kaj kameraoj samtempe sendas informojn al la homa piloto. La piloto kutime decidas kien la roboto moviĝu, kaj tre ofte komandas la moviĝon de robotika brako de la roboto. Fakte tiuj robotoj estas vaste uzataj por manipulado. La tasko de la piloto ne estas aparte simpla, ĉefe kiam la videblo ne estas alta kaj estas forta akvofluo. Ekzemple, ĝi devas regi la lokon de la roboto, kiu estas forprenita de la akvofluo, dum ĝi devas manipuli valvon, malfacile videblan el ekrano, kiu montras datumojn el la kameraoj. Plej ofte temas pri instalaĵoj, kies rompiĝo estas riparebla nur je rimarkinde alta kosto.

Tamen, ĉiu misio en kiu FRR-oj partoprenas bezonas helpan ŝipon (kun ŝipano) en kiu estas loko por la stiristo de la roboto, kaj de kiu eblas malfaldi la kablkonjektantan la FRR-on kun la surfaco. La tagaj kostoj estas tre altaj, ĝis pluraj dekmiloj da eŭroj.

Aliaj limoj kiuj devenas el la kablo estas la maleblo interagi kun kompleksaj strukturoj, ĝuste pro la kabla ligo al la surfaco. Simile, maleblas esplori akvokavernojn, kaj sub glacio.

Tamen, FRR ja sukcese plenumas multajn nuntempajn bezonojn de la petrol-industrio kaj de biologia priesplorado. Jen du sensaciaj ekzemploj. Japana FRR – *Kaiko*, de Jamstec – sukcesis atingi la plej profundan lokon de la maro, je pli ol 11 km sub la akvonivelo. Temis pri duetapa FRR: el la ŝipo estis ligita “meza” roboto al kiu ligiĝis la fina parto. Usonaj FRR-oj de WHOI (Woods Hole Oceanographic Institution) sukcesis eniri kaj filmi la faman ŝipon *Titanic* en la Atlantika Oceano.

Memregaj Robotoj

Memregaj Subakvaj Robotoj (MSR-oj, angle *Autonomous Underwater Vehicles – AUVs*) estis elpensitaj ĝuste por transpasi tiujn limojn de FRR-oj. Ĉefe por ĝeneralaj priesploraj taskoj, la uzado de FRR iĝas tre malfacila pro la altaj kostoj kiuj ligiĝas al ili. La uzado de MSR-oj ŝajnas tre promesplena kaj kostefika, tial esplorado – unue en universitato kaj tuj poste ĉe industrioj – koncentriĝis al tiu ĉi temo. Ĉar MSR-oj estas kapablaj agi sen kablo, ili permesas la malĉeeston de la kosta helpa ŝipo kaj, plie, malaltigas la kvanton de la homa laboro.

La ĉefa ŝanĝo estas la malapero de la kablo: MSR-oj naĝas libere subakve. Tio postulas ke la energio estu iel stokita en la roboto mem, do oni devas zorgi uzi ĝin por ne riski tro fruan elĉerpiĝon, kaj la roboto devas havi komputkapablon. Sekva ŝanĝo estas la formo de la roboto. Dum FRR-oj ne povas esti uzataj por longaj priesploraj misioj, MSR-oj estas idealaj,

kaj do pli fluid-dinamika formo estas bezonata por pli bone adaptiĝi al la medio kaj rapide naĝi.

Unuaj aplikoj estis por geologiaj esploradoj, mara biologio kaj oceanografio. Iom post iom, la robotoj iĝas pli kapablaj kaj bone ekipitaj, kaj jam estas kelkaj aplikoj por proksima inspektado, specimeno-kolektado kaj militaj taskoj kiel bomb-rekonado kaj haven-gardado. Progresigo en tiu ĉi kampo iras al la koncepto de tute memrega interago inter Intervenaj MSR-oj (IMSR-oj) kaj subakvaj strukturoj. Tio kompreneble postulas altan memregecon en la roboto, temo pritraktota en la tria sesio.

Sensacia ekzemplo de uzo de MSR-oj rilatas al la eltrovo de la restoj de la aviadilo de AirFrance, kiu kolapsis en 2009 en la Atlantikan Oceanon survoje de Rio de Janeiro al Parizo. Tri *Remus 6000* (bildo 4) el WHOI estis uzitaj por tiu misio, en aprilo 2011.



Bildo 4: MSR *Remus 6000* de Hydroid/Kongsberg

Referencoj

- [1] Deepsea – sealaser, <http://www.deepsea.com/slzr100.html>. resource accessed 2008/10/07.
- [2] L. Collin, S. Azou, K. Yao, and G. Burel. On spatial uncertainty in a surface long base-line positioning system. En *Proc. 5th Europ. Conf. Underwater Acoustics, Lyon, France, 2000*.
- [3] Glenn R. Elion and Herbert A. Elion. *Electro-Optics Handbook*. CRC Press, 1979.
- [4] R.T. Howard, T.C. Bryan, and M.L. Book. An advanced sensor for automated docking. *Digital Avionics Systems, 2001. DASC. The 20th Conference, 2:8B6/1-8B6/7* vol. 2, October 2001.
- [5] R.E. Kalman. A new approach to linear filtering and prediction problems. *Journal of Basic Engineering*, 1960.
- [6] David M. Lane, Francesco Maurelli, Tom Larkworthy, Darwin Caldwell, Joaquim Salvi, Maria Fox, and Konstantinos Kyriakopoulos. Pandora: Persistent autonomy through learning, adaptation, observation and re-planning. En *Proceedings of IFAC NGCUV 2012 – Navigation, Guidance and Control of Underwater Vehicles, 2012*.
- [7] F. Maurelli, D. Droschel, T. Wisspeintner, S. May, and H. Surmann. A 3D laser scanner system for autonomous vehicle navigation. En *International Conference on Advanced Robotics, 2009. ICAR 2009*, p. 1-6, June 2009.
- [8] F. Maurelli, S. Krupinski, A. Mallios, Y. Petillot, and P. Ridao. Sonar-based AUV localization using an improved particle filter algorithm. En *Proceedings of IEEE Oceans '09, Bremen, Germany, 2009*.
- [9] F. Maurelli, A. Mallios, S. Krupinski, Y. Petillot, and P. Ridao. Speeding-up particle convergence with probabilistic active localisation for auv. En *IFAC IAV, Intelligent Autonomous Vehicles, Lecce, Italy, 2010*.

- [10] F. Maurelli, A. Mallios, D. Ribas, P. Ridaou, and Y. Petillot. Particle filter based auv localization using imaging sonar. En *Proceedings of IFAC MCMC '09, Sao Paulo, Brazil*, 2009.
- [11] F. Maurelli and Y. Petillot. Particle diversity reduction for auv's active localisation. En *Proceedings of IEEE Oceans '10, Sydney, Australia*, 2010.
- [12] Francesco Maurelli. Memregaj aŭtomobiloj: ekde la unuaj elpensoj ĝis la modernaj defioj. En *Proceedings of KAEST 2010 – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, 2010.
- [13] Francesco Maurelli, Szymon Krupiński, Panagiotis Sotiropoulos, Angelos Mallios, and Rudolf Haraksim. Lokiĝo kaj hejmeniro de memrega subakva roboto. En *Proceedings of KAEST 2008 – Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, 2008.
- [14] Francesco Maurelli, Pedro Patrón, Joel Cartwright, Jamil Sawas, Yvan Petillot, and David Lane. Integrated MCM missions using heterogeneous fleets of AUVs. En *Proceedings of IEEE-MTS Oceans '12, Yesou, South Korea*, 2012.
- [15] Tiah E. McKinney. What is the biological affect of spectrophotometry of light in water? <http://www.ed.mtu.edu/esmis/id65.htm>. resource accessed 2008/10/07.
- [16] Y. Petillot, F. Maurelli, N. Valeyrie, A. Mallios, P. Ridaou, J. Aulinas, and J. Salvi. Acoustic-based techniques for AUV localisation. *Journal of Engineering for Maritime Environment*, 2010.
- [17] N. Storkensen, J. Kristensen, A. Indreeide, J. Seim, and T. Glancy. Huginuuv for seabed survey. *Sea Technology*, 1998.
- [18] S. Thrun, W. Burgard, and D. Fox. *Probabilistic Robotics*. The MIT Press, Cambridge, Massachusetts/ London, England, 2005.
- [19] J. R. Wertz and R. Bell. Autonomous rendezvous and docking technologies: status and prospects. En P. J. Tchoryk and J. Shoemaker, editors, *Society of Photo-Optical Instrumentation Engineers (SPIE) Conference Series*, vol. 5088, p. 20-30, August 2003.

Vortŝercado en Esperanto



Stefan MacGill

Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto. Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964). Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis instruisto en 1974. Oficisto de UEA (1976-86). Redaktoro de Jarlibro kaj teknika redaktoro de *Kontakto* (78-86). Vicprez. de TEJO (77-79), prez. (1979-80). Direktoro de CO (1980-85). Redaktoro de *Juna amiko* (1986-96 kaj ekde 2000). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94 kaj ekde 2009). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95). Profesie ekde 1989 verkas help-tekstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karaktro-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas Esperantajn instru-materialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn: Karina (1990), Hajnal (1992) kaj Sonja (2000) - denaskaj esp-istoj. Verkoj: lernila serio *Tendaraj tagoj, Najbaroj kaj boroj* (1991), *Nemave Edifi* (2007) k.a.

Resumo

En nia strebo montri ke Esperanto estas vivanta, aŭtentika lingvo taŭga por praktika uzo, ni devas montri ĝiajn konvenecon kaj meritojn sur kiel eble plej diversaj kampoj. Ĵurnalistoj raportante pri la lingvo ofte elektas la pli banalajn el tiuj – ĉu eblas blasfemi, ĉu eblas ŝerci, ĉu eblas amori, ĉu eblas vortŝerci...

Spite la diron de la taglibristo Samuel Johnson (1709-84) “Vortŝercado estas la plej banala formo de humuro”, ni alfrontas la temon. Esperanto ofertas buntajn – eĉ elstarajn – eblojn por vortŝercoj, kontraŭe al la imago, ke lingvo praktike sen homonimoj malkonvenas por tiu arto. Manko de homonimoj troviĝas alte sur la listo de nepraj lingvaj kriterioj por konvena internacia lingvo, sed ĝi ja ekskludas tiun fonton de vortŝercoj. Miloj el la lingvoj de la mondo estas pli-malpli fonetikaj, kaj homoj sukcesas abunde kaj lerte vortŝerci en tiuj lingvoj – ĉefe per vortkalemburoj devenantaj el vortkombinoj. Ĝuste tiel okazas en Esperanto, eĉ ĝis ekstrema nivelo. Pro la unika kaj fekunda eblo por vortkombinado – la ebloj por vortŝercado estas simile vastaj.

Post rapida superrigardo pri la kategorioj de vortŝercado en malfonetikaj lingvoj, kaj la historio de vortŝercado en Esperanto, ni dediĉos nin al la kategoriigo de la specoj de vortŝercoj en Esperanto. Ne mankos konkretaj ekzemploj.

Nia ĉefa kategorio por vortŝercado devenas de vortkunmetado, kaj la kapablo du- aŭ plurmaniere redividi rezultajn litervicojn.

Prefikso-vorto // vorto: ge-latine / gelatine; sen-tas' / sentas; fi-liko / filiko...

Vorto // vorto-sufikso: kolego / kol-ego; lekanto/lek-anto; haringo / har-ingo...

Vorto// du vortoj: damaĝo/dam-aĝo; flagrus/flag-rus'; amuzo/am-uzo; fervora/fer-vora...

Du vortoj // du vortoj: pie dirante / pied-irante; pen-salta / pens' alta; kurta volo / kur-tavolo; reglamento / reg-lamento; pro verbo / proverbo; tru-karto / truk-arto...

Kiel supre, sed uzante afikson: skiz-ono / ski-zono; gru-pigo / grup-igo; par-kanto / park-anto; regu lite / regul-ite; plu-veti / pluv-eti; rel-ego / re-lego; trib-anoj / tri banoj; vendredon / vend-re-don'; vest-ig-ante / vesti-gante; ekster-milite / ekstermi lite...

Kun pli ol du elementoj: pen-du-mila / pend-um-ila; deduktus / de-duk-tus'; kata pul'torento / katapulto-rento; pando-ras'-kat'-ole' / pandora-skatole...

Aldone, ni rigardos la eblojn por anagramoj, palindromoj kaj la rimarkindaj ebloj por krei kriptajn krucvortenigmojn. Kadre de tio, ni demonstros konvinke la superecon de Esperanto rilate al vortkombina fleksebleco. Ni prezentos serion da ekzemploj, kiu atingas rezulton fareblan nur en Esperanto – ni starigas defion al ajna alia lingvo en la universo atingi similan nivelon.

Word jokes in Esperanto

Summary

In our efforts to demonstrate that Esperanto is a living language, suitable for practical use, we must show its suitability and merits on as wide a range of fields as possible. Journalists reporting on the language often choose the more banal of those – is it possible to swear, to joke, make love, and puns...

In spite of the quote from Samuel Johnson (1709-84), “Puns are the lowest form of wit”, Esperanto provides abundant – even outstanding – opportunities for punning, running against the common perception that a language practically without homonyms is unsuitable for punning. Lack of homonyms is high on the list of required criteria to deem a language suitable as an international language, but it does exclude that source of word jokes. However, that omission is more than compensated by the unique and rich possibilities in Esperanto for word building.

After a quick summary of the categories of puns in unphonetic languages, we will explore the main categories for word jokes in Esperanto. There will be no lack of concrete examples, particularly in the two sessions for Akademio Internacia de la Scencoj (AIS), which will also include group exercises in identifying puns from cryptic descriptions.

The main category for punning arises from compound words, with the ability to redivide the character strings into two or more interpretations. These are as follows:

Prefix + Word1 = Word 2

Word1 + Suffix = Word 2

Word1 + Word 2 = Word3

Word 1 + Word 2 = Word 3 + Word 4

As above but involving affixes or other elements

Cases involving more than two words or elements.

We will additionally explore anagrams, palindromes and the striking opportunities for creating and solving cryptic crosswords.

Le jeu de mots en espéranto

Résumé

Dans notre effort de montrer que l'espéranto est une langue vivante, authentique, qui convient à un usage pratique, nous devons montrer son adéquation et ses mérites dans des domaines aussi variés que possible. Les journalistes qui écrivent sur la langue choisissent souvent les plus communs d'entre eux: permet-elle de blasphémer, de plaisanter, de faire l'amour, de faire des jeux de mots

Malgré l’assertion du diariste Samuel Johnson (1709-1784) « Le jeu de mots est la forme la plus banale de l’humour », nous affronterons le sujet. L’espéranto offre des possibilités de jeux de mots très variées, et même extraordinaires, contrairement à l’idée reçue selon laquelle une langue quasiment sans homonymes est impropre à cet art. L’absence d’homonymes figure haut sur la liste des critères linguistiques indispensables pour une langue internationale digne de ce nom, mais elle exclut effectivement cette source de jeux de mots. Des milliers de langues de par le monde sont plus ou moins phonétiques, et les gens parviennent à produire en abondance de subtils jeux de mots dans ces langues, essentiellement au moyen de calembours dérivant de combinaisons de mots. Il en est exactement ainsi pour l’espéranto, parfois même jusqu’à un niveau extrême. Du fait de son unique et féconde capacité à combiner les mots, les possibilités de jeux de mots sont également immenses.

Après un rapide survol des catégories de jeux de mots dans les langues non phonétiques, et de l’histoire des jeux de mots en espéranto, nous nous attacherons à catégoriser les différentes espèces de jeux de mots en espéranto. Les exemples concrets ne manqueront pas.

Notre principale catégorie de jeux de mots provient de la composition de mots, et de la possibilité de redécouper de deux ou plusieurs façons différentes les chaînes de lettres qui en résultent.

Préfixe+mot // mot: ge-latine / gelatine ; sen-tas’ / sentas ; fi-liko / filiko...

Mot // Mot+suffixe: kolego / kol-ego ; lekanto/ lek-anto ; haringo / har-ingo...

Mot // deux mots: damaĝo / dam-aĝo ; flagrus / flag-rus’ ; amuzo / am-uzo ; fervora / fer-vora...

Deux mots // deux mots: pie dirante / pied-irante ; pen-salta / pens’ alta ; kurta volo / kur-tavolo ; reglamento / reg-lamento ; pro verbo / proverbo ; tru-karto / truk-arto...

Comme ci-dessus, mais avec un affixe: skiz-ono / ski-zono ; gru-pigo / grup-igo ; parkanto / park-anto ; regu lite / regul-ite ; plu-veti / pluv-eti ; rel-ego / re-lego ; trib-anoj / tri banoj ; vendredon / vend-re-don’ ; vest-ig-ante / vesti-gante ; ekster-milite / ekstermi lite...

Avec plus de deux éléments: pen-du-mila / pend-um-ila ; deduktus / de-duk-tus’ ; kata pul’ torento / katapulto-rento ; pando-ras’-kat’-ole’ / pandora-skatole...

De plus, nous nous pencherons sur les possibilités d’anagrammes et de palindromes, et sur les remarquables possibilités de créer des grilles de mots croisés cryptées. Dans ce cadre, nous démontrerons de façon convaincante la supériorité de l’espéranto pour la souplesse de la composition de mots. Nous présenterons une série d’exemples qui produisent un résultat possible seulement en espéranto. Nous mettons au défi n’importe quelle autre langue de l’univers d’atteindre un niveau équivalent.

Lối chơi chữ trong Esperanto

Tóm tắt

Trong nỗ lực của chúng ta để chứng minh rằng Esperanto là một ngôn ngữ sống, đích thực thích hợp để sử dụng trong thực tiễn, chúng ta phải cho thấy tính tương hợp và giá trị trên càngh nhiều lĩnh vực khác nhau càng tốt. Các nhà báo khi báo cáo về ngôn ngữ thương hay chọn những lĩnh vực tầm thường nhất như có thể bóng bô, nói đùa, làm tình, chơi chữ... hay không.

Bất chấp câu nói của người viết nhật ký Samuel Johnson (1709-84) “Lối chơi chữ là hình thức tầm thường nhất của sự hài hước” chúng tôi vẫn đối mặt với chủ đề này. Esperanto cung cấp những khả năng muôn màu – thậm chí vượt trội – về lối chơi chữ, trái với điều

người ta vẫn tưởng, theo đó một ngôn ngữ hầu như không có từ đồng âm không thích hợp với nghệ thuật này. Sự thiếu những từ đồng âm đứng hàng đầu trong danh sách những tiêu chí ngôn ngữ nhất thiết phải có đối với một ngôn ngữ quốc tế thích hợp, nhưng đương nhiên nó loại trừ nguồn chơi chữ này. Có hàng nghìn ngôn ngữ trên thế giới ít nhiều mang tính ngữ âm học, và người ta dễ dàng có nhiều thành công trong việc chơi chữ bằng các ngôn ngữ đó – chủ yếu bằng lối chữ phái sinh từ các tổ hợp từ. Chính điều đó xảy ra như vậy đối với Esperanto, thậm chí tới cực độ. Do khả năng ghép từ thật độc đáo và phong phú – những khả năng chơi chữ cũng rộng rãi như vậy.

Sau khi điếm nhanh các loại chơi chữ trong các ngôn ngữ không theo ngữ âm học, và lối chơi chữ trong Esperanto, chúng tôi tập trung vào việc phân loại lối chơi chữ trong Esperanto. Sẽ không thiếu những thí dụ cụ thể.

Loại chơi chữ chủ yếu của chúng ta có xuất xứ từ ghép từ, và khả năng chia lại thứ tự các chữ cái theo hai hoặc nhiều cách.

Tiền tố-từ // từ: ge-latine / gelatine (nam nữ – gelatin); sen-tas' / sentas (không có chén – cảm nhận); fi-liko / filiko (xấu xa – rò rỉ / cây dương xỉ)...

Từ // từ-hậu tố: kolego / kol-ego (bạn đồng nghiệp/cỗ to) ; lekanto/lek-anto (hoa cúc tây/ người liếm) ; haringo / har-ingo (cá trích / dụng cụ giữ tóc)...

Từ // hai từ: damaĝo/dam-aĝo (sự thiệt hại / tuổi của phu nhân); flagrus / flag-rus' (sáng rực / cờ Nga); amuzo / am-uzo (sự vui đùa / sử dụng tình yêu) ; fervora / fer-vora (nhiệt tình / ăn sắt)...

Như ở trên nhưng dùng tiếp tố: skiz-ono / ski-zono (ước số của phác thảo / thất lung trượt tuyết) ; gru-pigo / grup-igo; (con sếu – con chim ác là / sự tập hợp thành nhóm) / parkanto / park-anto (song ca nam nữ / người cho xe vào bãi xe) ; regu lite / regul-ite (trị vì trên giường / theo quy tắc) ; plu-veti / pluv-eti (đánh cược lại / mưa lác đác) ; rel-ego / re-lego (đương ray lớn / đọc lại) ; trib-anoj / tri banoj (những thành viên bộ tộc / ba cuộc tắm); vendredon / vend-re-don; (ngày thứ sáu / bán, lại cho); / vest-ig-ante / vesti-gante (mặc áo cho ai / đi găng) ; ekster-milite / ekstermi lite (ngoài chiến tranh / diệt ở trên giường)...

Với hơn hai yếu tố: pen-du-mila / pend-um-ila (bút – hai – nghìn / thuộc về dụng cụ để treo) ; deduktus / de-duk-tus' (suy luận / từ – công tước – ho); kata pul' torento / katapulto-rento (thuộc mèo – con rắn – dòng thác / máy bắn – tô tước); pando-ras'-kat'-ole' / pandora-skatole (gấu trúc – dòng giống – mèo – đầu / thuộc đàn ba dây – hộp)...

Thêm vào đó, chúng tôi sẽ xem xét những khả năng làm từ đảo chữ, từ đọc ngược xuôi, và những khả năng đáng chú ý để làm trò chơi ô chữ. Trong khuôn khổ đó, chúng tôi sẽ chứng minh đề thuyết phục về tính ưu việt của Esperanto liên quan tới tính linh hoạt trong việc ghép từ. Chúng tôi sẽ trình bày một loạt các thí dụ, đã được kết quả chỉ trong Esperanto – chúng tôi nêu thách bất kể ngôn ngữ nào trên thế giới đạt được trình độ tương tự.

Vortŝercado en Esperanto

Enkonduko

[Vidu resumon.]

Homonime bazita ŝercado en malfonetika lingvo

El la miliardoj da eblaj ekzemploj, mi citas nur unu, el mia alia gepatra lingvo. Ĝi ekspluatas la du-sencecon de tri parolataj vortoj en unu frazo:

Tri filoj fondis farmbienon kun bovinoj. Ili nomis ĝin ‘Fokuso’. Kial?

...Because that’s where the sun’s rays meet. (ĉar tie la sun-radioj renkontiĝas) ... kaj krome:

...Because that’s where the sons raise meat. (ĉar tie la filoj levas [bredas] viandon).

Nun ni pluiru al analizo de la fontoj de vortŝercoj en Esperanto.

Dividoj kaj redividoj

Ĉi tiu estas eble la plej fekunda tipo de vortŝercado en Esperanto. Ĝia bunteco devenas de la konsiderinda kapablo konstrui kunmetitajn vortojn en la lingvo, kaj uzi abunde afiksojn. Tre ofte eblas redividi ekzistantan vorton por formi alian. En la apendico ni identigas ses kategoriojn de tiaj vortoj. Jen ili, kun ekzemploj:

Afikso-vorto // vorto (D1¹)

GE-LATINE // GELATINE *Glue kaj pare en Suda Ameriko. (52)*

SEN-TAS’ // SENTAS *Havas impreson, ke mankas trinkuj’*

Vorto // vorto-sufikso (D2)

Je la risiko tedi, ĝemigi aŭ kolerigi la leganton, oni tamen devas konstati, ke la evidenta ekzemplo estas la arketipa kaj tro ofte citata ekzemplo:

KOLEGON // KOL-EGON *Kion havas ĝirafo por neniam esti sola? (ne en apendico)*

LEKANTO // LEK-ANTO *Floro pensigas pri kato ĉe lakto. (ne en apendico)*

INDIANO // INDI-ANO *Devas valori membro, precipe se pra-amerikano (61)*

Strikte, ĉi tiu bezonus apartan kategorion, ĉar la dua vorto temas pri du sufiksoj kune.

Vorto // du vortoj (D3)

DAMAĜO // DAM-AĜO *Rezultas sufero se mi diras kiom maljunas la eleganta sinjorino.*

PEN-SALTA // PENS’ ALTA *Kiel provo altigi sin, kiel himalaja cerbumaĵo. (162)*

Du vortoj // du vortoj (D4)

PIE DIRANTE // PIED-IRANTE *Per sanktaj vortoj priskribi kiel paŝi (172)*

KURTA VOLO // KUR-TAVOLO *Mallonga deziro pri kur-nivelo (99)*

Efektive, guto da kompato al la suferanta solvonto videblas tie, ĉar la bezonata vorteto “kur-” aperas sen ĉirkaŭ-skribo.

¹ Tra la teksto, ekzemploj havas interkrampe la serionumeron asignitan en apendico 1.

Du vortoj // du vortoj sed kun afikso uzita (D5)

SKIZONO // SKI-ZONO	<i>Nur parto de la plano por vintrosporta teritorio. (226)</i>
KOM-BATA // KOMB-ATA	<i>Terure! Esti akuzata je krueleco kontraŭ interpunkcio, nur ĉar vi lasas al iu ordigi vian hararon. (86)</i>
FINANC-ENDON // FINAN CENDON	<i>Devas subteni mone, jam nun ni vidas la lastan moneron. (44)</i>

Kun pli ol sume kvar elementoj (D6)

PEN-DU-MILA	<i>Strebo pri Y2K ekzekutata.</i>
PENDUM-ILA	

En 2001, mi skribis: “Post jaro aŭ du, necesos reformuli tiun help-indikon”. *Jam temp’ esta.* Notu krome, kiel ĝi ekspluatas la du- aŭ plur-sencecon de “ekzekuti”.

DEDUKTUS	<i>Gorĝ-purigo de nobel’ – almenaŭ tion mi supozus laŭ observado.</i>
DE DUK’ TUS	<i>(25)</i>
KATA PUL’ TORENTO	<i>Luo de armilo estas la sola defendo, kiam dorlotbesto eksuferas je</i>
KATAPULTO-RENTO	<i>inundo de parazitaj. (79)</i>
PANDO-RAS’-KAT’-OLE	<i>Ĉina urso, gent’ dorlot-best’, nigra or’ – vere ĉio troveblas tie ene.</i>
	<i>(140)</i>

Jen kvar pretersave disaj vortoj aŭ radikoj. Nur la ĉion-entena nocio de la skatolo de Pandoro permesas al ni elegante kunligi ilin.

Jen oportuna momento fermi la sekcion pri vort-redividaj ŝercoj, kun komento, ke ĝiaj eblecoj riĉas ja kiel la ĵus aludita skatolo.

Aldonoj kaj forprenoj

Vortaj aldonoj

Jen kategorio en kiu oni formas novan vorton el la kunigo de du vortoj, sed unu eniras la alian. Kutime la aldona vorto estas mallonga, ekzemple numeralo aŭ pronomo. Ekzemple:

FIKO + LI	<i>Viro ŝovas sin en la seksa agado, kun botanikaj sekvoj. (ne en apendico)</i>
FILIKO	
KLARO + UNU	<i>Unu eniras la lumon, jen gaja kompanio. (81)</i>
KUNULARO	

La inverso eblas:

MILITO	<i>Mi forlasas la batalegon cele al dormloko. (ne en apendico)</i>
LITO - MI	

PARIZO	<i>Grup’ forlasas la francan ĉefurbon serĉante por verda legometo.</i>
PIZO - AR’	

Literaj aldonoj

Speciala kazo de la enmeto estas kiam ne vorto aŭ vortelemo eniras alian, sed nur unu litero. Alivorte, vi havas vortparon, kiu diferencas je nur unu litero. Tiaj kriptajoj apenaŭ aperas en apendico 1. Por ili estas rezervitaj apendicoj 2 kaj 3. Ĝi prezentas kelkcenton da tiaj vortparoj. Unue ili aperas alfabeto laŭ la pli mallonga vorto de la paro, poste ili aperas alfabeto, laŭ la aldonenda litero. Se la pli longa vorto el la paro aperas en la enigmo kaj la malpli longa en la help-indiko, temas pri aldona formo. La inversa subtraha formo egale eblas, kun la pli longa formo en la krucenigma krado.

La adicia formo estas:

KASO *Nenio aldoniĝas al la kaso, tamen estas kompleta malordo!*
KAOSO

La subtraha formo de tio estos:

KANZONO *Se ekmankas la kapo de Zamenhof, agrabla melodio transformiĝas al io multe pli*
KANONO *brua kaj malamika.*

Ŝlosilvortoj por la aldona formo estas:

eniras, trudas sin en, venas en la mezon de, ni aldonas al, suplementas...

Ŝlosilvortoj por la subtraha formo estas:

forlasas -on, foriras de, elfalas, iras ekskursi, malaperas, ekmankas...

Kiam temas ne pri vorto aldonenda aŭ subtrahenda sed nur litero, estas malpli facile aludi tion en help-indiko. Iom stultas nur vicnumerada solvo:

AERO, APERO *Vidiĝo, ke la dudeka litero aldoniĝas al la atmosfero.*

Pli kontentiga estas:

AERO, APERO *Vidiĝo de la kapo de Paĉjo en la atmosfero.*

Mankas al ni kelkaj trukoj de la naciaj lingvoj. En eŭropaj lingvoj, oni ĉiam havas je dispono la romiajn numerojn: I V X L C D M. Sed en Esperanto ni ne rajtas supozi, ke ĉiu en la mondo konas tiun sistemon. Maksimume, la litero O estas aludebla kvazaŭ “nulo”.

En la angla unu vorto por ĉefo “Leader” signifas ankaŭ “Komenc-litero”. Tiel, oni povus diri “La estro de UEA” por signi la literon U. Tio ne funkcias en Esperanto.

Simile, itale “capo” estas samtempe “kapo” kaj “ĉefo”. Oni povus vortludi por la litero S: “La ĉefo de la stacidomo.”

En Esperanto, ni povas maksimume uzi “kapo” por la komenc-litero kaj vosto por la lasta. Eĉ la vostaĵ aludoj ne tre utilas, pro niaj alikampaj mirindaj finaĵoj. Ili ege simpligas la gramatikon, sed fuŝas la vivon por kriptistoj! Jen do kelkaj propraj solvoj:

D: la kapo de la drako

I: la fino de la senvosta simio

E: Esperantisto mallonge. Tiel ni profitas la tempan kaj fizikan ambiguecon de “mallonge”.

Similaj vortoparoj

Eblas el tiuj krei kunmetitajn vortojn por uzo en poezio, aŭ en prozo, por akiri apartan efekton: Tramotrako, reĝoseĝo, pramodramo, retetiketo, gruotruo, pastofasto, kokokolo, ranobano, pluvodiluvo, uvokuvo... kaj la kulmina: retretret’.

Anagramoj

Difino kaj ekzemploj

Anagramo estas kutime du malsamaj vortoj, formitaj el la samaj literoj, ekzemple: TEMAS, METAS

Tamen pluraj aliaj varioj estas eblaj:

Unu vorto/unu vorto:	ŜRANKO - KRAŜON
Unu vorto/unu radiko:	NOKTAS - NASKOT'
Unu vorto/ kunmetita vorto:	NOKTAS - KAT-SON'
Unu vorto/ du vortoj:	PAPRIKO - PRI KAPO
Kunmetita vorto/ du vortoj:	SUN-EKLIPSO - PLUSE KISON

Apliko al krucenigmoj

Anagramoj estas ofte uzataj en kriptaj krucenigmoj. Unu el la anagram-vortoj aperas en la help-indiko, la alia estas la bezonata solvo. Kutime la pli simpla el la du estas la trovenda, kaj la pli kompleksa aperas en la 'help'indiko. Iu vorto aŭ esprimo troviĝas en la help-indiko, kiu servas al la solvonto kiel kod-vorto, ke temas pri anagramo, kaj ke necesas reordigi literojn el iu(j) vorto(j).

Avantaĝoj

Pro la afiksa kaj vortkunmeta sistemoj, ege multaj anagramaj ebloj ekzistas, pli ol el aliaj lingvoj. Ekzemple:

BIRDO, BORDI, BRODI, BRIDO, BO-DIR, DI-BOR, ORB-ID, ROB-ID, DI-ROB, DI-ORB, BID-OR...

KANTOS, KASTON, KOSTAN, KONTAS, NOKTAS, TASKON, TAKSON, TOKSAN, TANKOS, SKOTAN, SANKTO, SKATON, STOKAN, STAKON, NASKOT', SKANOT', AKT-SON', AKS-TON', ANS-KOT', KAT-SON', KAS-TON', KAS-NOT, SAK-TON', SAK-NOT', SAN-KOT', TON-KAS', NOT'SAK', TAS-KON'...

Evidente, iuj el tiuj "vortoj" estas malpli senco-havaj ol aliaj.

Malavantaĝoj

Ne tiom abundas vortaj sinonimoj kiom en iuj naciaj lingvoj por uzo en la help-indikoj; tamen la afiksa sistemo proponas elturniĝojn. Forestas homonimoj, do ne eblas uzi trukojn kiaj "sonas kvazaŭ...". La deviga markado de akuzativoj kaj pluraloj ĉe adjektivoj devigas foje uzon de pli tordaj helpindikoj, kompare kun lingvoj sen tiuj gramatikaj ecoj. La helpindiko devas respekti la gramatikajn finaĵojn de la vorto en la enigmo.

Principoj

En la elekto de anagramo kaj kreo de la help-indiko, necesas sekvi kelkajn principojn. La du solvoj prefere:

- ◆ ne komenciĝu per la samaj literoj
- ◆ ne havu tro da literoj en sama sinsekvo
- ◆ prefere ne apartenu al la sama gramatika kategorio

Ekzemple: BATALU - BATULA estas anagramoj, sed ili estas forme kaj signife tro proksimaj. Preferinda anagramo, kun la help-indiko estas:

TABULA *Plano tabula modifita por ke oni luktegu. (15)*
BATALU

Ĉi tie la formo estas pli malsama – ja la vokaloj kaj konsonantoj okupas samajn lokojn, sed almenaŭ la konsonantoj estas ĉiuj rearanĝitaj. La donita helpilo kondukas nin al principoj en la verkado de helpiloj: La aludo al la du solvoj, laŭeble

- ◆ formu koheran frazon, kiom eble sencohavan.
- ◆ trovu idean komunecon inter la du solvoj.
- ◆ ne enhavu vorton tute similan al la trovota.

Bonaj ekzemploj de kohereco kaj komuneco estas:

RABO *Arbo frakasita pro ŝtelo. (198)*
ARBO

Ŝteloj estas ofte ja perfortaj agoj, en kiu arbo povus esti frakasita.

LAMPOJ *Lumigiloj ĉe plaĝplantoj (ne en apendico)*
PALMOJ
LUDON *Amuzaĵon kuriozan post dimanĉo. (ne en apendico)*
LUNDO
LU-DON' *Forprunt' malorda, komence de la semajno. (ne en apendico)*
LUNDO

Kelkfoje, tia komuneco simple ne troveblas, kaj la frazo iĝas pli peza kaj artefarita, ekzemple:=

GENTA MET (239)
TEGMENTA

Oni kutime ne metas gentojn, kaj eĉ metita gento havas malmultan rilaton kun tegmento. Ĝia help-indiko tiom nekoheras, ke ĝi ne ricevas la ekstran publikecon de aperigo ĉi tie. Tamen, ĝi ilustras interesan trakton de la kod-vorto, kiu plej oportune lokas sin meze de la anagramo, kvankam ĝi mem ne partoprenas en ĝi: genta mis-met.

Ja per iom da rakonto, oni povus krei komunecon inter la du disaj partoj, sed en help-indiko oni ne havas lokon por romano. Tiu livero de komuneco estas aldonebla, nur se farebla tre koncize, en kvar-kvin vortoj. Ĉi-kaze, malfacilus, ekz; Genta mis-met, sed almenaŭ kun tia solvo, kiu donas ŝirmon de pluvo. La komplika vortumo kun 'tia' necesas, por sugesti ke adjektiva formo estas bezonata en la solvo. Ofte, specifa gramatika kategorio estas postulata de la anagramo mem. La adjektiveco estas tiel postulata en la supra ekzemplo. 'Tegmento' pli facile aludeblas, kaj fakte, ĉi-foje eblas reiri al la anagramo kaj ŝanĝi ĝin:

GENTO-MET *Gento-mis-met', sed almenaŭ sub ŝirmilo. (Bonigo por 239)*
TEGMENTO

Kelkfoje ambaŭ anagramitaj vortoj estas kaŝitaj, kaj la solvado povas ekesti tre malfacila. Tiukaze, tamen, almenaŭ unu el la du vortoj estu relative facile diveneblaj. Ekzemple:

RABUS *Ŝtelus grupon da disfalintaj strataj transportiloj senfine.(199)*
BUSAR'

La senca diferenco inter ŝtelus kaj rabus malgrandas, solvonto rapide atingus konsideron de tiu vorto. Same "strata transportilo" kaj "grupo". La anagramiga kod-vorto estas "disfalinta", kredeble aplikebla al buso. Plia kod-vorto "senfine" signalas uzendon de nur la radiko. Foje eblas indiki mankon de finaĵo forlasante finaĵon en la responda help-indika vorto. Ĉi-kaze, tiu vorto estas "grup' ", sed tion ne eblas elizii, ĉar ĝi devas aperi akuzative por doni sencohavon al la frazo. Sekve, restas la rimedo "senfine" au "radike". Tiu lasta laŭeble uziĝu kiam unu el la anagramitaj vortoj havas biologiajn ligojn, ekzemple:

TALIKTR' *Tro tikla per genetika inĝenierado la kreo de ĉi tiu ĝarden-ornama herbo – do kreu*
TRO TIKLA *nur la radikon. (237)*

Rimarku, ke la pli konciza formo “krei ĉi tiun... herbon” neblas, ĉar la trovenda vorto devas esti radika, do ne rajtas stari kun akuzativo. Do, necesas la pli vortoza “la kreo de ĉi tiu... herbo”.

Se eblas en la anagramon plekti iom da devigaj movadaj konoj, tiom pli bone. La plej bona ekzemplo devas malaperi, ĉar ni uzos ĝin en la AIS-sesia konkurso. Anstataŭe:

PENDOL-IGO *Streb’, sekve ILEI ekipas horloĝon. (160)*
PEN’ DO LIGO

Por solvi tion, necesas scii la plenan formon de ILEI, kaj ke ĝi estas Ligo.

Anagramaj kod-vortoj

Anagrama help-indiko kutime enhavas kod-vorton, kiu indikas, ke oni devas rearanĝi la literojn de iu aŭ iuj vortoj en la help-indiko. El la dekoj da eblaj kodvortoj, kelkaj estas: fuŝe, erare, mise, konfuziĝas, konfuzite, rearanĝi, inverse, revenas, eksplodigita, genetike manipulita... En la ekzemploj en apendico 1, la anagramaj kod-vortoj estas donitaj. La kodvortoj laŭeble alprenu kredeblan signifon en la frazo kaj se eble havu ligon kun la senco-kampo de unu el la anagramataj vortoj.

TAPIŜO *Tapiŝo faldita cele al mara ekspedo. (238)*
ŜIPOTA

Oni ne emas eksplodigi aŭ frakasi aŭ konfuzi tapiŝojn, sed ja faldi ilin. “Cele al” jam indikas la estontecan aspekton de “ŝipota”.

(Cetere, kaj tre parenteze, “ŝipi” estas aldonebla al la mallonga listo de verboj en PIV, kiuj estas samtempe transitivaj kaj maltransitivaj).

En raraj kazoj, eblas eĉ plekti la kod-vorton en la anagramon mem. Ekzemploj estas:

KAVALIRE *Kvar alie aranĝita laŭ nobela ĉevalista maniero. (80)*
KVAR ALIE

La kod-vortoj estas “alie aranĝita”, sed “alie” apartenas al la anagramo.

Jen pli kompleksa ekzemplo:

TAPIŜA FLORO DUBE MIN... *Tapiŝa floro dube min memorigas pri siatempa*
BUDAPEŝTA INFORMILO *hungara revuo. (21)*

La kod-vorto “dube” estas ene de la anagramo.

Alia formulo por la helpindiko, eble marĝene pli sencohava, estus: “Bude tapiŝa floro min memorigas...”. Tamen tio malpli bonas, ĉar ĝi komenciĝas ĝuste per la literoj BUD, same kiel la trovenda anagramaĵo.

ŜRANKO *Literatura subtenanto suferas kraŝon. (236)*
KRAŜON

Ĉi tie la anagramaj kodvortoj estas “suferas kraŝon”, sed la anagramenda vorto mem estas “kraŝon.” Rimarku cetere la malicete misgvidan priskribo de “ŝranko”, kiu ekspluatas la dusencecon de “subtenanto” – unuavice oni riskas pensi pri persono, nur duavice pri mekanika senviva subtenilo. Esperanto celas esti kiel eble plej unusenca lingvo, sed kelkaj tiaj malprecizaĵoj sukcesis eniri la lingvon el ĝiaj kontribu-lingvoj, kaj la krucenigmisto devas tiujn senkompatate ekspluati.

Nia antaŭlasta ekzemplo celas montri la buntecon de anagramoj kaj de kod-vortoj kaj de sinonimoj por nia komenca vorto PLANEDO. Ni permesas al vi prijuĝi la lertecon de la help-indikoj (iuj estas malpli ol brilaj!), kaj kelkajn ni lasas fine al via propra inventemo:

PLANEDO	Globo konstatebla de l'pano dispecigita.
DE L'PANO	Jupitero, ekzemple, iras mikse al depon'.
AL DEPON'	Merkuro kaj Venuso videblaj en plado kirlita.
EN PLADO	Astro devias de plano.
DE PLANO	Priskribu nian terglobon, ne precize po-lande.
PO LANDE	Sun-sistema globo deziratas, do pelan perturbon ni donu.
DO PELAN	El pando venas nia loĝloko.
EL PANDO	Advokato konfuziĝas inter Urano kaj Neptuno.
PLEDANO	Orbitanto estas mise pendola.
PENDOLA	Lad-peon' eksplodigita, sed restas la tero.
LAD-PEON'	Revoluciulo, en maniero de Kopenhagano sekvata de Varsoviano.
POL-DANE	Mise maljun-lukta la deziro de astro.
OLD-PENA	Panelo D rebonigenda por ke Marso, ekzemple, vidiĝu.
PANELO-D	
DA PLENO	
ALP-NODE	
PAL-ONDE	
PEND-ALO	
PEL-DONA	

Inversaj anagramoj

Speciala kazo estas kiam la anagramo simple uzas la literojn en la inversa ordo:

PAR/RAP	Du revenas kiam videblas legom'
SUB/BUS'	Sub tranportil'?' Tempo reveni!
MET'/TEM	Por ĝusta difino de lokad' necesas apliki desubisman sintenon al la tem'.

Anagramoj en la apendico

Anagramaj kriptogramoj aperas en apendico 1 kun la kodlitero A. La trovenda vorto aperas kiel vorto 1, kaj la vorto en la help-indiko aperas kiel vorto 2. Ni krome montras la kodvortojn, kiuj indikas, ke anagramigo necesas. Ni aldonas al la kodlitero A asteriskon, kiam la kod-vorto estas plektita en la anagramo mem.

Pinto de l'anagrama arto

Ni nun demonstros konvinke la superecon de Esperanto rilate al vortfarado kaj fleksebleco. Rigardu la tekstojn en la kesto: La ĉeftitolo kaj subtitolo estas dupartaj, kaj anagramaj. La du tekst-alineoj ambaŭ enhavas 163 literojn – kaj ili estas identaj: 19-foje A kaj E, 18-foje I, 16-foje N, 13-foje T, dekfoje O, R kaj S, sepfoje J, K, L kaj U, 4-foje P, trifoje C kaj D, dufoje M kaj V kaj unufoje B, F, G, Ĝ, H, kaj Z. Nur pro la unika flekseblo de Esperanto eblas konstrui tiom sencohavajn frazarojn per precize identaj literaroj. La teksto aperis en la verko *Streĉ eĉ Steĉj-skeĉ'!* de la nuna preleganto en 1986:

Steĉjagramoj: ĉarmaj gestoj

**anagramatiko – literaturparnasos
aparta-ranga natura litero-mikso**

Anagramatiko estas inter la novaj sciencoj, fakte ĝi estas literatura lerto; arto, kiun la nuna libreto deziras pioniri. Dependinta je neniuj aliaj eksteraj helpintoj, mi unuope konvinke sukcesis.

Nur por la unua fojo en la centjara historio de Esperanto, iu artstile verkis du sinsekvajn alineojn, kiuj entenas precize la identajn literarojn. Ĝi estis taske komplika. Entute, kia ambicia atingo!

Palindromoj

EGE: *Ekstreme palindroma. (31)*. Pliaj ekzemploj:

Simplaj vortoj: iri, savas, sanas, samas, sunus, sidis, sonos, ululu.

Simplaj radikoj: divid', galag', kajak', radar'.

Kunmetitaj vortoj kun afiksoj ks: amema, amerik-akirema, divers-revid', erik-ekire, malam', mamam', mesem'.

Kunmetitaj vortoj kun du radikoj: Aliro-gorila, Arabo-bara, Asketo-teksa, Domo-mod', Katar-atak', Laget-egal', Ole-rab-barelo, Orelo-tolero, Pluko-kulp', Rapir-ripar', Talpo-plat', Tram-art', Verko-krev'.

Apartaj vortoj: Dirata rid', Edifi fide, Eniroto Torine, Eskimo mikse, Geparda drapeg', Kurta truk', Merkata krem', Modula lu-dom', Natale celatan, Norda dron', Rivera rev-ir', Sakeo ekas, Satrap' artas, Signalo langis, Simile limis, Soradilo solidaros, Sube rebus', Toksa skot', Trovata vort'.

Specialaj teknikoj

La lastaj ekzemploj montras aliajn uzeblajn teknikojn, por kriptaj krucenigmoj, kaj certe ne ĉiujn.

Komencliteroj:

SNOB *Se ni observas bone, sed nur komence, jen pretenda kaj afektoma kultur-elitul' (227)*

Supersignoj:

PLAGO/ PLAĜO Sufiĉus surmeti ĉapelon, por ke teruraĵo iĝu agrabla sabla ripozejo.

Pronomoj:

Jen la kulmina eblo sur tiu tereno, kiu ne aperas en la apendico:

Ok pronomoj en la vico? Jen la rezulto: Froti, fuŝi, ekesti mezur-bastono:

VIŜI, MISI, LINILIĜI = VI + ŜI MI + SI + LI + NI + ILI + ĜI

Verkante help-indikojn por kriptaj krucenigmoj

En tiu verkado necesas zorgi, ke la aludvortoj en la help-frazo havu la saman gramatikan formon kiel la serĉata. Se tio ne eblas, necesas uzi ĉirkaŭpriskribon. Foje tre malfacilas trovi ĉirkaŭ-priskribon por utila vortero, ekzemple: TRA, TRUO.

En pretigo de help-indiko, oni povas celi koncizecon (ekz. frazoj 88, 108, 149, 161, 229...), lasante al la solvonto elpensi vastan gamon da ebloj el la minimumo, aŭ eblas doni tre detalan priskribon (ekz. frazoj 1, 20, 40, 58, 86, 237, 267...), lasante la solvanton kun svarmo da ireblaj vojoj el la abundo.

Konstruante la kradon por kriptaj krucenigmoj

Jen kelkaj konsiloj:

- ◆ Elektu ok aŭ dek vortojn, kiujn vi nepre volas loki (eble ili havos komunan temon).
- ◆ Provu konekti ilin en limigita spaco.
- ◆ Rezignu pri unu/du se necese.
- ◆ Se aliaj ĉef-vortoj konvene eniras la formon, provu trovi kriptajon por ili.
- ◆ Laŭ la disponeblaj literoj, serĉu en indekso de vortoj kun jam verkitaj help-indikoj.

- ◆ Provu plenigi la ceterajn spacojn per interesaj malĉefaj vortoj.
- ◆ Estu preta rezigni pri solvoj kaj reiru al pli frua stadio serĉonte novajn solvojn.
- ◆ Eĉ por mallongaj vortetoj aŭ vorteroj aŭ nevortaj literoj, oni povas trovi konvenajn kriptajojn.
- ◆ Havu multan paciencon kaj bonan skrapgumon (aŭ, nuntempe, komputilon).

La prezentaĵo venas al fino, kun la espero, ke ĝi kuraĝigos homojn fronti vortserĉojn kaj kriptajn krucenigmojn kun pli da kuraĝo, scio kaj entuziasmo, kaj eble eĉ spronos novajn verkantojn de ĉi tiuj tre specifaj artformoj.

Apendico 1. Vort-kalemburoj, kriptogramoj kaj priskriboj

Ĉi tiu listigo estas koncizigo de listo kun 267 vicoj (ricevebla laŭpete). Tial la numerado ne estas sinsekva. Dudeko da linioj estas forigitaj por formi ekzercojn kiujn ni konkurse plenumos en la du plusaj prelegoj por AIS. La ekzemplotipajn kodojn klarigas la ĉefa teksto. * = ne konvena por *Juna amiko*. Interkrampe foje aperas la kodvorto por sugesti, ke temas pri anagramo).

N-ro	Tipo	Vorto 1	Vorto 2	Priskribo
1	D6	akva relikvar'	akvareli kvar	Mergita kolekto de sanktaj ostoj – jen pri kio povus pentri (ne oleo) Renoir, Degas, Miro kaj Picasso.
2	D1	an-teno	anteno	Konservo de membroj por program-vidigilo.
3	D4	anti-kvalito	antikva lito	Kontraŭ elstareco ĉe la malnova kuŝejo.
4	A	antonim'	nomitan	Konfuzo nomitan – ĉar la signifo estas radike la malo.
5	D3	apre zumi	aprez-umi	Taksi valoron malprecize dum oni porke aŭ abele bruas.
6	D6	argentino	ar-gent-ino	Grupotribo sekvata de femalo tiulande.
9	A	atingi	tiga in'	Veni ĝis tiga in' kaj skuu forte.
10	A	atmosferon	fea monstro	Fea monstro krevigas sin en klopodo akiri aeron.
11	M	ban + an + o	banano	Membro mallonge sed fruktodone eniras lavkuvon.
12	D6	barlastono	bar-las-ono	Laŭ fama fraŭlino, muzika sono indikas, ke obstaklo restas netuŝita.
13	A	basi	bisa	Kanti malaltvoĉe, eĉ dum mise konceptita prezentaĵo kroma.
14	D3	batalo	bat-alo	Lukto en kiu la flugilo de aviadilo estas trafita.
15	A	batalu	tabula	Plano tabula modifita per ke oni luktegu.
16	A	birdo	brodi	Fluganto volas brodi mise.
18	D3	bluzon	blu-zon'	Vestaĵon por ĉielkolora teritori'.
19	D3	bru-las	brulas	Foriro malsilenta kiam fajras.
20	D5	bru-stara	brust-ara	Sono seĝforlasa pensigas pri multaj mam-regionoj – jes, tia penso!
21	A*	Budapeŝta Informilo	Tapiŝa floro dube min	Tapiŝa floro dube min memorigas pri siatempa hungara revuo.
22	D3	ci-tinto	cit-into	Glastuŝo kun pronoma intimeco, kiun menciis tiu.
23	A	ĉapel	plaĉe	Plaĉe aranĝita kapvest'.
24	D6	ĉarma vaz-on'	ĉar mava zon'	Plaĉa ujo-pec'. Kial? Pro tio ke aĉas la distrikt'.
25	D6	deduktus	de-duk-tus	Gorĝ-purigo de nobelul' – almenaŭ tion mi supozus laŭ observado.
27	D6	de monorelo	demon-orelo	Irante malal avangarda transportilo, jen aŭskultilo de diabet'.
28	A+S	dimanĉe	di-man-ĉe	Man' de dio ĉe sankta tago sende. (sende = sen 'de')
29	D3	distilo	di-stilo	Ĉiopova maniero krei viskion.
31	S	ege	-	Ekstreme palindroma.
32	A	eklipson	pluse kison (perforte akiri)	Pluse kison perforte akiri kiam mallumiĝas tage.
33	D1	ek-rano	ekrano	Sprono al Kermit ĉe televida vidigilo.
34	D6	ekskurson	eks-kur-son	Bru' de iama piediro karakterizas promenon.
36	F *	eliranto	elito (- ran')	Amfibi' estus tiu, kiu forlasas la aliajn, restas vere ekskluziva grupo. (ekzemplo)

37	D2	em-baras	embaras'	Volas, sed senfina obstaklo intervenas – jen ĝensent'.
38	D3	emocia	emo-cia	Kor-inspirita deziro uzi intiman pronomon.
39	A	enta	etna (eksplozo)	Vulkana eksplozo en Italio ŝajnas esti reala ekzistaĵo, tamen ĝi estas nur abstrakta.
40	A	fago	gafo	Velboata mastostangeto formita el majesta arbo-specio.
41	D4	febla zono	fe-blazono	Ĉe malforta teritorio videblas heraldika signo de spiritaj estaĵoj.
42	D3	fer-deko	ferdeko	“Ora duopo”. Se malpli valorus la metal' kaj ok aliĝus, akireblus ŝipa planko.
43	D5	fiks-ata	fik-sata	Oni iom post iom ligiĝas al la ideo ke oni sufiĉe seksumis. *
44	D5	financ-endon	finan cendon	Devas subteni mone, jam nun ni vidas la lastan moneron.
45	D5	fin-skota	fi-naskota	La lasta norde de la muro de Hadriano estos bastardo?
46	D4	fingr-umas	fin-grumas	Palpas kaj beligas ĉevalon – jen, preta!
47	D3	flag-rus	flagrus	En Moskvo, ruĝa-blanka-blua ŝtofo flirtus treme.
48	D3	fontas	fon-tas'	Originas el fora trinkuj'.
49	D5	for-cito	forc-ito	Tio devige kreskigita pledas por distancigo de ies diro.
51	D3	for! mus'!	formus (=konsistigus)	Krio de diligenta kato konsistigus averton al ĝia predo.
52	D1	gelatine	ge-latine	Glue kaj pare en Suda Ameriko.
53	A	glosi	siglo (konfuza)	Siglo tiom konfuza, ke oni devas klarigi ĝin piednote.
55	D3	har-ingo	haringo	Ujo por meti kapan kreskaĵon: konvena por fiŝo?
56	P	Havajo	havajo	Sufiĉus surmeti ĉapelon, por ke tiu pacifika insulo estu posedata.
57	M	helpato	hepato	Tiu ricevas asiston, imagi kiam kvindek eniris organon en romiaj tempoj....
58	M	hordo	hordeo (+E)	Esperantisto mallonge eniras la nomadan popolon kaj rikoltas ion taŭgan por bierfarado.
60	D5	ik-arus	Ikarus	Sciencbranĉa indikilo starus en grupo por flugi al la suno.
61	D2	indi-ano	indiano	Devas valori membro, precipe se pra-amerikano.
62	D5	informis	in-for-mis'	Sciigis pri eraro pro malproksimeco de virino.
63	D1	ing-veno	ingveno	Proksimiĝo de ujo por unu aĵo, kaj la loko kiun ujumitaj aĵoj emas celi. *
64	D2	inklini	in-klini	Emi ĉar virino decidus fleksi sin. (eblas ankaŭ: ink-lini').
65	D6	intelekte	in-te-lek-te'	Per cerba kapablo, virino trinkis infuzajon, langoŝmace, trinkis denove.
66	D5	inter-estaŭrista	inter-estaŭrista	Eĉ kun fascino pri bov-batalistoj, oni sentas sin tia en kompanio de rebonigistoj.
67	D2	interfero	inter-fero	Ĝeno por iu sur la trako.
70	D4	kab-laboro	kabla boro	Entrepenado ĉe la malgolfo — ĝuste ili fosas por enterigi draton.
71	D3	kal-drono	kaldrono	Pereiga subakvigo de haŭta malmolejo, en kuir-potego.
72	D2	kalkul-iton	kalku liton	Ordonu al tiu, kiun oni jam nombris, ke tiu blankigu dormlokon...
73	A	kamene	ke amen (miksiĝas)	Ŝajnas ke amen miksiĝas ĉe la dom-fajrejo.
74	D3	kam-paro	kamparo	Du ne-centritaj radoj portas nin ekster la urbo.
75	D3	kan-ono	kantono	Muziko el laga planto el svisa regiono.
76	D4	kar-memora	karme mora	Tenata en estimo, ĉar etike kondukta laŭ budhisma koncepto.
77	D6	kastroto	kas-troto	Baldaŭna eŭnuko kuretas kun la asocia mono.
78	D6	kata-pul-tus	katapultus	Ege saltigus pro gorĝeksplozo ĉe dombesta parazito.
79	D6	kata-pul-torento:	katapulto-rento:	Luo de armilo estas la sola defendo, kiam dorlotbesto eksuferas je inundo de parazitaj.
80	A*	kavalire	kvar alie (alie aranĝita)	Kvar alie aranĝita laŭ nobela ĉevalista maniero.
81	M	klaro + unu	kunularo	Unu eniras la lumon, jen gaja kompanio.
82	D3	kolo-raj	koloraj	Buntaj estas multaj, precipe la antaŭnuka parto de marfiŝ'.

83	A	kolumno	lum-kono (ŝveba)	Eĉ ŝveba lum-kono helpas al vi aranĝi tekston sur ĵurnala paĝo.
84	D2	komata	kom-ata	Senkonscia pri aldono de paŭzigoj.
85	D5	komenc-ito	kom-en-cito	Tiu, kiun oni startigis, aldonis interpunkcion al ies diro.
86	D5	kom-bata	komb-ata	Terure! Esti akuzata je krueleco kontraŭ interpunkcio, nur ĉar vi lasas al iu ordigi vian hararon.
87	D2	kom-paro	komparo	Du interpunkciaĵoj unu apud la alia, inspektocele.
88	D3	kon-doma	kondoma	Arĥitekta saĝo estas protekta. *
89	A	koniton	tonikon (miksi)	Miksi tonikon, ĉar ni memoras iaman sed nepluan amikon — eble eĉ ne amikon, sed...
90	D3	konkon	kon-kon	Maraĵon, pri kiu mi estas dufoje informita.
92	A	kratera	rekta ar' (ne plu)	Ne plu rekta ar' kun vulkana aspekto.
93	D4	kre-mastro	kremas tro	Estiga ĉefo diras, ke lakto-supras superflue.
97	A	kristano	rakontis (strange)	Rakontis strange pri di-kredanto.
98	D4	kurba talus'	kur-batalus	Ronda fervoja digo helpus al pied-soldatoj lukti.
99	D4	kurta volo	kur-tavolo	Mallonga deziro pri kur-nivelo.
100	A	lakonaj	kanajlo (misirinta)	Malmultvortaj estas la diroj de la misirinta kanajlo.
101	A	lampiroj	pli romaj (disflugintaj)	Pli romaj nun impresas la disflugintaj bril-bestetoj.
102	D3	lanon	la non	Trovu ŝaf-kovraĵon, kiu memorigas pri difinita franca negativo.
103	D3	la tento	latento	La dezirego de kuŝanta potencialo.
104	A	latere	telera (rearanĝo)	Telera rearanĝo impresas rektlinie — tiel oni devas kreive pensi.
105	D3	legoma	leg-oma	Nutraĵ-planta kontrolo de rezisto.
109	D5	lu-dono	lud-ono	Pagita prunto estas nur parto de la amuzaĵo.
110	D6	manifestacio	mani-fe-stacio	<i>(lasita por vi!)</i>
111	D3	mankon	man-kon	Malsuperfluan da sci' pri brakfinaj'.
112	D5	mar-kanto	mark-anto	Ŝipista melodio por tiu, kiu indikas ion.
113	D3	mar-don'	mardon	Donaco de akva areo nek lundon, nek merkredon.
114	D3	mas-akro	masakro	Pezo kun tranĉkapablo en buĉatako.
115	M	mano + ŝi	maŝino	Homa ilo iĝas mekanika laborilo kiam virino mallonge intervenas.
116	S+A	matematik'	mat-e-mat-ik' (matx2)+kie	Tapiŝet-par kie rearanĝita? Jen demando por kalkul-scienc'.
117	A	Meksiko	kies + kom	Demando pri posedo de interpunkciaĵo tiulande.
118	D3	memoro	mem-oro	Ne-forgeso pri la sorto de Midas kiam li tuŝas sin.
120	S	mi-li-ono	miliono	Eĉ frakcio de parolanto sekvata de alia viro sumas je multego.
121	D4	mira-klasego	mirakla sego	Granda grupo en la lernejo surpriziĝas pro vere eksterordinara apartigo.
122	D2	mon-dona	mond-ona	Donaco cele al parto de la tero.
123	D3	mon-donaci	mondo-naci'	Konduki kiel mecenato, akireblos ne nur lando, sed la tuta tero!
124	D3	montru	mon-tru	Indiku, en kiun nenion meti la pagon.
125	A	ne katastrofe	fenestratako (konfuzita)	Fenestr-atako konfuzita, tiel ke ĝi impresu ne tiom serioze.
127	A	naski	skani (mise)	Zorgu ne skani mise – vi riskas fariĝi patrino.
128	D4	ne-ĝenas	neĝ-enas	Problemo ne estas, eĉ se vintre precipitas interne.
129	D6	nest' rebatas	ne streb-atas	Venĝemas birdejo – al tio ne estas klopodate.
130	A	neviva	vane vi (konfuziĝas)	Vane vi konfuziĝas, jam ĝi estas morta.
131	D3	nukaj	nu-kaj	Malantaŭkolaj partoj pri kiuj aŭdeblas hezito plus...
132	S	oeron	on + ero	Tuta parto eniras ne-tutan, por ke ni trovu ion malmultvaloran en Oslo.

133	S	on	Londono	Du partoj en la brita ĉefurbo identas.
134	D3	ordeno	ord-eno	Honorigo pro interna neteco.
135	D5	orel-fosis	or-el-fosis	Purigis aŭdilon por scii kiel oni minis Kalifornie post 1850.
136	M	os	pato / patoso	Kiam tiu futuraĵo eniras platan kuirilon, la rezulto estas drameca tristeco.
137	D3	Pacifike	paci-fike	Oceane, oni volas trankvili dum seksumado. *
138	D3	paki stanon	Pakistanon	Envalizigi grizan metalon ironte Islamabadon aŭ Peŝvaron.
139	S	palis	palis'	Ne fort-koloris la stang'.
140	D6	pandoraskatole	pando-ras-kat-ole'	Ĉina urso, gent', dorlot-best', nigra or' – vere ĉio troveblas tie ene.
142	D4	pap-ermino	paper-mino	Pelto por vatikana estro sufiĉas por malverŝajna fonto de skribmaterialo.
143	A	paprike	ke pipra (miksaĵo)	Ke pipra miksaĵo impresu hungare.
144	D3	paprikan	pap-rikan'	Ĉu hungar-spican? Aŭ eble malica rid' de religia estro.
145	D3	para bolo	parabolo	El duopa ardo rezultas rondiro.
146	M	par + al + izo	paralizo	Al-veno al la mezo de la franca ĉefurbo, sed pro tio ne plu povas forlasi ĝin.
147	D6	paralizo-ligo	par' al izol-igo	Asocio por movhandikapitoj sendigas du en azilon.
149	D3	para ŝuto	paraŝuto	Du verŝitaj per sobigilo.
151	S	par + ok + sismo	paroksismo	Entute dek pro tertremo suferas konvulsion.
152	D5	parol-anta	paro-lanta	Dum oni babilas pri malrapida duopo.
153	D3	parolas	paro-las'	Buŝe komunikas pri duopo ne kunportita.
154	D4	par-oliva	parol-iva	Solida parto de duobla martinio estas babilema.
155	D6	pasporte	pas-por-te'	Per tiu legitimilo eblas preteriri cele al refreŝiga trinkaĵ'.
156	D5	paŝ-into	paŝ-tinto	La bovinon li finmanĝigis, aŭdeblas ĝia sonorilo dum ĝi piediras. (ekzemplo!)
157	D3	pat-agonio	Patagonio	Stomak-doloro pro fritiĵo en Andoj.
158	D5	pen-diga	pend-iga	Strebo de la juna nederlanda heroo...
159	D6	pendolas	pen', do las'	Ĝi swingiĝas tien reen ritme, sed kapti ĝin bezonus troan klopodon, sekve, rezignu!
160	D6	pendol-igo	pen', do ligo	Streb', sekve ILEI ekipas horloĝon.
161	D6	pen-du-mila	pend-um-ila	Strebo pri Y2K ekzekutata.
163	D4	pens-ema	pen-sema	Inklino al meditemo pri antaŭrikolta fortostreĉo.
164	D6	pesi-mis-mete	pesimism-ete	Iom negative oni taksas provon mezuri la pezon de io, kion oni fuŝlokas.
165	D5	pent-rito	pentr-ito	Tradicia religia faro por bedaŭri siajn pekojn, taŭga por Mona Lisa.
166	D5	perd-ekstra	per-dekstra	Aldona manko akirita helpe de malliva rimedo.
167	D5	perl-aĉo	per laĉo	Malbonkvalita marjuvelo provizas per rimedo ligi ŝuon.
168	D3	peri ferion	periferion	Tasko de vojaĝet-agento ĉe la rando.
169	D6	per la moto	perlamoto	Helpe de difinita devizo akireblas la interna belaĵo de konko.
170	D1	Persoj	per soj'	Irananoj nutras sin helpe de viand-surogat'.
171	M	peto + li	pelito	Kiam viro mallonge ligis sin al dezir-sciigo, oni forĉasis lin.
172	D4	pie dirante	pie-dirante	Per sanktaj vortoj priskribi kiel paŝi.
173	D5	pira tigo	pirat-igo	Frukta tenilo respondecas pri kreo de mara rabisto.
174	D5	pist-ema	pis-tema	Li iĝas inklina al batado, se oni ekparolas pri urinado.
175	D3	plankon	plan-kon'	Starejon — tie akireblas sci' de l'intenc'.
176	D1	plukis	plu-kis	Prenis floron, per ke ne ĉesu buŝ-tuŝ'.
177	D1	plu mon'	plumon	Pagado daŭras, sekve ni povas akiri skribilon.
178	D2	plu raj'	pluraj	Ĉu travivos tiu glisema fiŝ'? Jes, eĉ signife pli ol unu!
179	D5	plus-emas	plu semas	Inklinas al adicio, do daŭre plantas.
180	D5	plu vanta	pluv-anta	Eble oni persistas esti orgojla, ĉar faladas akvo el la nuboj.

181	D3	polura	pol-ura	Briliga, precipe ĉe Białowieska.
182	D5	por-debata	porde bata	La afero estas diskutenda, do ne forlasu la ĉambron tiom brue.
183	D1	por-kaj	por kaj	Kiuj estas ŝinkprovizaj? Serĉu inter tiuj por kaj kontraŭ.
184	D5	pram-aro	pra-mar	Kolekto da pendol-ŝipoj memorigas priakva areo el la fora historio.
185	D5	prav-esto	pra-vesto	Ekzisto de ĝusteco videblas kiam temas pri antikva kostumo.
186	D5	prav-igo	pra-Vigo	Pruvo pri korekteco en malnova galega urbo.
187	D6	pretekste	pret-eks-te'	Herba trinkaĵo de hieraŭ revarmigita kaj ŝajnice servata.
188	D6	printempas	print-em-pas'	Estas primavero kiam preteriras la deziro surpaperigi tekstojn el komputilo.
189	D1	prizono	pri zono	Malliberejo teritori-rilata.
190	D1	pro gramo	programo	Eta pezo kaŭzas, ke ekestu organizita distraĵo.
192	D1	promeso	pro meso	Sindevigo kaŭzita de diservo.
193	D6	prud-emi	pru' de mi	Ne volas pensi peri voluptaĵoj, pro boat-antaŭo apartenante al la parolanto.
194	D2	Prus-ego	pru-sego	Granda nord-germano forigas la antaŭon de ŝipo.
195	D3	pun-don'	pundon	Juĝista tasko; eble tiom pagendis pro krimeto en iama Britio.
196	D4	pun-tagordo	punt-agordo	<i>(lasita por vi!)</i>
198	A	rabo	arbo (frakasita)	Arbo frakasita pro ŝtelo.
199	A	rabus	busar'	Ŝtelus grupon da disfalintaj strataj transportiloj senfine.
200	D5	ran-ĝemo	ranĝ-emo	Malĝoja bruo de amfibio pri deziro rearanĝi aferojn ĉe la fervojo.
201	S+A	reciproke	por ke (re) ci (miksiĝas)	Pro ke denove ci miksiĝas kaj tiel efikas du-direkte.
202	D3	reflektoro	REF-lektoro	Povas esti brila la preleganto en Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj.
203	D3	reg-lamento	reglamento	Ploro pri la gvido per regularo.
204	D5	regul-ite	regu lite	Ordigite, ke vi estru dorm-ĉambre.
205	D5	re-meti	rem-eti	Movi boaton iom, sed poste ĝin loki kiel antaŭe.
206	D3	rifuzo	rif-uzo	Malpreteco utiligi maran muron.
208	D3	rigora	Rig-ora	Pri severa latva valorajo.
209	A	rilati	tirila	Tirila renverso: al tio devas ligiĝi.
210	D5	rim-ar-kanta	rimark-anta	Voĉ-muzika poem' venanta al nia atento.
211	D2	rimeno	rim-eno	Pantolon-tenilo por tradicia poeto.
212	D4	rit-montratan	ritmon tratan	Religia kutimo, kiun oni vidigas, postulas tre regulan pagadon ĉe banko.
213	S	rj	rojo	Poezia rivereto sonas same, eĉ kiam ĝia duono malaperis.
214	S	rr	roro	Tiu leon-bleko sonas same feroce eĉ kiam duone farita.
215	D3	sal-tus	saltus	Gorĝ-ŝtopiĝo pro pipra najbar' — pro tio vi lanĉus vin supren.
216	M	sandalon	skandalon	La kapo de konko eniras vian plaĝo-ŝuon – hontindan situacion!
217	D3	SAT-elito	satelito	Malpleboj de laborista movado ĉe spac-veturilo.
218	D1	seĝo	se "Ĝ"	Sidloko dependa de la naŭa litero.
219	D5	sekv-anto	se kvanto	Tiu, kiu postiras, kondiĉe pri certa nombro.
221	D6	sent-en-cito	sentenc-ito	Aforismo kun emocio pri ies diro.
222	D4	sep identoj	sepi-dentoj	Iu kun malsama identeco por ĉiu tago de la semajno emas je maĉiloj de dekpedul'.
223	D3	Sidnea	sid-nea	Tia estas olimpik-urba insisto ne uzi seĝon.
224	D6	si-met-rio	simetrio	Mem-lokiĝo en brazila urbo certigas, ke vi havu saman formon ambaŭflanke.
226	D5	skiz-ono	ski-zono	Nur parto de la plano por vintrosporta teritorio.
227	S	S + N + O + B	snob'	Se ni observas bone, sed nur komence, jen pretenda kaj afektema kultur-elitul'.
228	D3	sol-dato	soldato	Unika tempo-punkto por batalanto.
229	D6	sol-id-aro	solidaro	Simpatio por grupo de senfrat(in)uloj.

230	A	stak'	task'	Rearanĝa task': ĉiuj aĵoj estu unu sur la alia.
231	D3	standardo	stand-ardo	Flago atestas je entuziasmo pri la budo.
232	D3	stati kaj	statikaj	Farti, krome, senmovaj.
233	A	sterko	kresto (iĝas rubo)	Koko manĝita, ĝia kresto iĝas rubo, kaj kontribuos al ĝardena fekundigilo.
234	A	stokis	kostis (reordigi ilin)	Havis la varojn, sed devis reordigi ilin por scii kiom kostis.
235	S	ŝilinge	ŝi + lin + ge	Virino viron mallonge parigis, memorante pri iama pagmaniero en Londono.
236	A *	ŝranko	kraŝon (kraŝon suferis)	Kraŝon suferis tiu meblo.
237	A	taliktr'	tro tikla (genetika inĝenierado)	Tro tikla la genetika inĝenierado necesa por kreo de ĉi tiu ĝarden-ornama herbo – do uzu nur la radikon. (radiko biologia aŭ gramatika?)
238	A	tapiŝo	ŝipota (faldita)	Tapiŝo faldita cele al mara ekspedo.
239	A	tegmenta	genta met' (mis)	genta mis-met'', sed almenaŭ sub ŝirmilo (miks-indikilo meze de la anagramaĵo).
240	D4	tek-stakanto	teksta kanto	Melodio kun vortoj kreita de homo kiu metas valizetojn unu sur la alia.
241	D4	tek-starigo	tekst-arigo	Malkuŝigi valizetojn por kolekti dokumentojn.
242	D3	tempan	tem-pan'	Kronologian aspekton havas bakaĵ' sub diskut'.
243	D3	tenajla	ten-ajla	Pinĉila solvo por la pren' de fortgusta cepeto.
244	D6	te-salon-iko	Tesaloniko	Scienca studo de eleganta trinkejo troviĝas en greka urbo.
246	A**	tiele	elite (ne tiumaniere)	Elite? Eble, sed ne tiumaniere.
247	D3	Trabanto	tra banto	<i>(lasita por vi!)</i>
248	D5	trabo-ardis	tra-boardis	Ligno-peco entuziasmis kiam la boato zigzage navigis de komenco ĝis fino de la kanalo.
250	D6	trafaj reguloj	tra fajreg-uloj	Konvenaj leĝoj ricevitaj pere de grand-brulaj brigadanoj.
251	D6	tragedioj	tra ge-dioj	Katastrofoj pere de plenpotencaj paroj.
252	D5	trakt-enda	trak-tenda	Necesas okupiĝi pri la fervoj-linio al la kanvasa loĝejo.
253	D3	traktora	trak-tora	Tirila maŝino videbla ĉe ringa vojo.
254	D4	tre malinda	trema, linda	Ege nemerita estas la timigita, svelte alloga knabino.
255	D5	tram-eto	tra-meto	Malgranda urba trafikilo penetre lokita.
256	D5	trem-ata	trem-pata	Metita en akvo, kiam ĝi oscilas en la kuirilo.
258	D6	trib-estr-eto	tri-best-reto	Pigmea ĉefo kunvivas kun komputile ligitaj turdo, testudo kaj tigro. <i>(mallonge: TTT)</i>
259	D5	tru-diga	trud-iga	Muro-manko enpuŝas ĝenulon //aŭ// Danĝera situacio ĉe mar-muro ne estas ignorebla.
260	D3	trukon	tru-kon	Trompon, eble magiistan, kiu dependas je scio pri ĉirkaŭata nenio.
261	A	trunko	rukton	Rukton eksplodiĝintan ĉe la bazo de arbo.
262	D3	univers'	uni-vers:	Ĉio, kio ekzistas resumeblas per poemer' de asoci'.
264	D3	ven-tas'	ventas	Proksimiĝo de ujo kiam blovas.
265	D4	ver-dire	verd-ire	Parolante honeste, oni estas survojanta al esperantisteco.
266	D6	vesti gante	vest-ig-ante	Surmeti mankovraĵojn kadre de pli ĝenerala surmetado.
267	S	viŝi linion	vi + ŝi + li + ni +on	Unue vi, poste virino, poste viro, poste ĉiuj, kunlaboras forigi strekon de tabulo, ke restu en la fino nur frakcia markil'.

Apendico 2. Vortparoj kun diferenco de unu litero

ordigitaj laŭ la diferenciga litero

A

anso / anaso
aparta / aparata
arbo / arabo
balo / balao
bela / abela
ero / erao
lia / alia
monto / monato
muzo / amuzo
rela / reala
resti / aresti
vendi / venadi
vindo / viando

B

komato / kombato
lago / blago
razi / brazi
rido / brido
ruli / bruli
rumo / brumo
vero / verbo

C

ento / cento
puna / punca

Ĉ

brano / branĉo
falo / falĉo
fari / farĉi
lano / lanĉo

D

abomeno / abdomeno
beno / bendo
buo / budo
koro / kordo
mono / mondo
sono / sondo
teno / tendo
teo / tedo
truo / trudo
vera / verda

E

apro / apero
ardo / ardeo
aro / aero
hordo / hordeo

ido / ideo
milo / mielo
muzo / muzeo
pomo / poemo
rara / erara

F

ama / fama
buo / bufo
ino / fino
oko / foko
ono / fono
orta / forta
truo / trufo
valo / vaflo

G

anilo / angilo
rano / rango
teo / tego

Ĝ

mano / manĝo
rano / ranĝo
soni / sonĝi
tani / tanĝi

H

elo / helo
omo / homo
ordo / hordo

Ĥ

oro / ĥoro

I

ĉe / ĉie
kuri / kuiri
pro / piro
sofo / soifo
stelo / sitelo
tra / tria
tri / tiri
vando / viando

J

en / jen
fono / fojno
kato / kajto
mastro / majstro

Ĵ

uro/ĵuro
kolao/kolajo

K

bano / banko
dano / danko
paro / parko
rimo / krimo
teo / teko
truo / truko

L

buo / bulo
fari / flari
fumo / fulmo
kie / kiel
kubo / klubo
pano / plano
pato / palto
satas / saltas
truo / trulo

M

buo / bumo
faro / farmo
teo / temo
truo / trumo
varo / varmo (ekzemplita tekste)

N

fojo / fojno
foto / fonto
kato / kanto
koto / konto
ligo / ligno
mato / manto
poto / ponto
rado / rando
tedo / tendo
teo / teno
triki / trinki
truko / trunko

O

duno / duono
kanto / kanoto
karto / karoto
kaso / kaoso
kulo / okulo
lasta / lasota

pensi / pensio
 peto / poeto
 pri / porĵi
 ranĝo / oranĝo
 relo / orelo
 spiri / sopiri
 ŝvito / ŝovito
 taksi / taksio

P
 koro / korpo
 kula / kulpa
 ordo / pordo (PASP!)
 temo / tempo (PASP!)
 truo / trupo

R
 azeno / razeno
 famo / farmo
 foto / forto
 koto / korto
 kovi / kovri
 mato / marto
 pato / parto
 petas / pretas
 teo / tero
 tigo / tigro

S
 ano / sano
 beto / besto
 buo / buso
 fako / fasko
 foto / fosto
 koto / kosto
 kruta / krusta
 lito / listo
 mato / masto
 pato / pasto
 truo / truso
 veni / sveni

Ŝ
 buo / buŝo
 pota / poŝto

T
 ateno / atento
 fako / fakto
 poŝo / poŝto
 pruno / prunto
 rompi / trompi
 salo / salto
 teno / tento

truo / truto
 truso / trusto
 viro / vitro / virto
 voro / vorto

U
 kano / kanuo
 pro / pruo
 saltas / salutas

Ŭ
 kazo / kaŭzo
 nazo / naŭzo

V
 kala / kalva
 koto / kvoto
 pruo / pruvo
 valo / valvo

Z
 kanono / kanzono
 kuro / kurzo
 pulo / puzlo
 teo / tezo

Apendico 3. Vortparoj kun diferenco de unu litero

ordigitaj alfabete laŭ la komenclitero de la pli mallonga vorto, kun la aldonita litero indikita

A		buo / bufo	F	falo / falĉo	Ĉ
abomeno / abdomeno	D	buo / bulo	L	famo / farmo	R
ama / fama	F	buo / bumoo	M	fari / farĉi	Ĉ
anilo / angilo	G	buo / buso	S	fari / flari	L
ano / sano	S	buo / buŝo	Ŝ	faro / farmo	M
anso / anaso	A			fojo / fojno	N
aparta / aparata	A	Ĉ		fono / fojno	J
apro / apero	E	ĉe / ĉie	I	foto / fonto	N
arbo / arabo	A			foto / forto	R
ardo / ardeo	E	D		foto / fosto	S
aro / aero	E	dano / danko	K	fumo / fulmo	L
Ateno / atento	T	duno / duono	O		
azeno / razeno	R			H	
		E		hordo / hordeo	E
B		elo / helo	H		
balo / balao	A	en / jen	J	I	
bano / banko	K	ento / cento	E	ido / ideo	E
bela / abela	A	ero / erao	A	ino / fino	F
beno / bendo	D			K	
beto / besto	S	F		kala / kalva	V
brano / branĉo	Ĉ	fako / fakto	T	kano / kanuo	U
buo / budo	D	fako / fasko	S		

kanono / kanzono	Z	ono / fono	F	spiri / sopiri	O
kanto / kanoto	O	ordo / hordo	H	stelo / sitelo	I
karto / karoto	O	ordo / pordo	P		
kaso / kaoso	O	oro / ĥoro	Ĥ	Ŝ	
kato / kajto	J	orta / forta	F	ŝvito / ŝovito	O
kato / kanto	N				
kazo / kaŭzo	Ŭ	P		T	
kie / kiel	L	pano / plano	L	taksi / taksio	O
kolao/kolaĵo	Ĵ	paro / parko	K	tani / tanĝi	Ĝ
komato / kombato	B	pato / palto	L	tedo / tendo	N
koro / kordo	D	pato / parto	R	temo / tempo	P
koro / korpo	P	pato / pasto	S	teno / tendo	D
koto / konto	N	pensi / pensio	O	teno / tento	T
koto / korto	R	petas / pretas	R	teo / tedo	D
koto / kosto	S	peto / poeto	O	teo / tego	G
koto / kvoto	V	pomo / poemo	E	teo / teko	K
kovi / kovri	R	poŝo / poŝto	T	teo / temo	M
kruta / krusta	S	poto / ponto	N	teo / teno	N
kubo / klubo	L	poto / poŝto	Ŝ	teo / tero	R
kula / kulpa	P	pri / por	O	teo / tezo	Z
kulo / okulo	O	pro / piro	I	tigo / tigo	R
kuri / kuiri	I	pro / pruo	U	tra / tria	I
kuro / kurzo	Z	pruno / prunto	T	tri / tiri	I
		pruo / pruvo	V	triki / trinki	N
		pulo / puzlo	Z	truco / trunko	N
		puna / punca	C	truo / trudo	D
				truo / trufo	F
L		R		truo / truco	K
lago / blago	B	rado / rando	N	truo / trulo	L
lano / lanĉo	Ĉ	ranĝo / oranĝo	O	truo / trumo	M
lasta / lasota	O	rano / rango	G	truo / trupo	P
lia / alia	A	rano / ranĝo	Ĝ	truo / truso	S
ligo / ligno	N	rara / erara	E	truo / truto	T
lito / listo	S	razi / braz	B	truso / trusto	T
		rela / reala	A		
M		relo / orelo	O	U	
mano / manĝo	Ĝ	resti / aresti	A	uro/ĵuro	Ĵ
mastro / majstro	J	rido / brido	B		
mato / manto	N	rimo / krimo	K	V	
mato / marto	R	rompi / trompi	T	valo / vaflo	F
mato / masto	S	ruli / bruli	B	valo / valvo	V
milo / mielo	E	rumo / brumo	B	vando / viando	I
mono / mondo	D			varo / varmo	M
monto / montr	R	S		vendi / venadi	A
muzo / amuzo	A	sal		veni / sveni	S
muzo / muzeo	E	salto	T	vera / verda	D
		saltas / salutas	U	vero / verbo	B
		satas / saltas	L	vindo / viando	A
N		sofo / soifo	I	viro / vitro / virto	T
nazo / naŭzo	Ŭ	soni / sonĝi	Ĝ	voro / vorto	T
		sono / sono	D		
O					
oko / foko	F				
omo / homo	H				

Movado aŭ kulturo?

La ideologia bazo de la Esperanto-poezio



Humphrey Tonkin

Magistro de la Kembriĝa Universitato kaj doktoro de la Universitato Harvard; Universitata Profesoro pri Humanistiko ĉe la Universitato de Hartford, Usono, kaj Emerita Prezidanto de tiu universitato. Iama prezidanto de TEJO, li fariĝis estrarano de UEA, kaj dum entute naŭ jaroj estis prezidanto de la Asocio. Li estas nun membro de la Honora Patrona Komitato kaj Akademiano de Esperanto. Li verkis kaj tradukis abunde en Esperanto kaj la angla lingvo pri literaturaj, lingvaj, movadaj kaj internaciistaj temoj. Li reprezentas UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko.

Resumo

Oni povas prave nomi la poemojn de Zamenhof movadaj poemoj, verkitaj por instigi la fruajn esperantistojn labori por la lingvo, aŭ por esplori la komplikajn sentojn de la aŭtoro de Esperanto fronte al la verko, kiun ni nomas Esperanto. Li tiel fondis longan tradicion de verkoj pri Esperanto kaj la Esperanto-movado – ofte (sed ne ĉiam) verkitaj de t.n. poetoj kun pli da entuziasmo ol poezia talento. Tute nature, la korifeoj de la Esperanto-literaturo deklaris sian literaturon matura ĝuste tiam kiam ĝi komencis superi tiujn temajn limigojn kaj esplori aliajn dimensiojn de la homa vivo ne nepre ligitajn al la laboro por la Internacia Lingvo. Tamen, poeziaj esploroj pri la situacio de laboranto por Esperanto daŭras – nun ofte maskataj malantaŭ aliaj temoj. Se la hodiaŭa Esperanto-kulturo jam akiris la diversecon kaj buntecon de la nacilingvaj kulturoj, ĝi ne perdis sian ideologian bazon. En tiu ĉi prelego ni pluesploros tiun ideologian bazon de la Esperanto-poezio.

Movement or culture?

The ideological basis of Esperanto poetry

Summary

It would be correct to call Zamenhof's poems "movement poems", written to encourage the early Esperantists to promote the language, or to explore the complex feelings of the author of Esperanto in the face of the work of art that we call Esperanto. In writing these poems he founded a long tradition of works about Esperanto and the Esperanto movement – often (but not always) written by so-called poets with more enthusiasm than poetic talent. Naturally, the foremost figures in Esperanto literature declared their literature mature at the point when it began to overcome the limitations of topic and explore other dimensions of human life not necessarily linked to work for the International Language. Yet poetic explorations of the situation of the promoter of Esperanto continue – now often masked by other subjects. If today's Esperanto culture has now acquired the multicoloured diversity of the cultures of national languages, it has not lost its ideological basis. In this lecture we will further explore this ideological basis of Esperanto poetry.

Mouvement ou culture ? Le fondement idéologique de la poésie en espéranto.

Résumé

On peut à juste titre nommer les poèmes de Zamenhof poèmes du mouvement, écrits pour inciter les espérantistes des premiers temps à œuvrer pour la langue ou pour étudier les sentiments complexes de l'auteur de l'espéranto face à la création que nous appelons espéranto. Il fonda ainsi une longue tradition d'ouvrages sur l'espéranto et sur le mouvement espéranto – souvent (mais pas toujours) écrits par de prétendus poètes qui montraient plus d'enthousiasme que de talent poétique. Tout naturellement, les coryphées de la littérature en espéranto déclarèrent que leur littérature avait atteint sa maturité précisément quand elle commença à s'affranchir de ces limites thématiques pour explorer d'autres dimensions de la vie humaine pas nécessairement liées au travail en faveur de la langue internationale. Pourtant, des études poétiques sur la situation de ceux qui œuvrent pour l'espéranto durent encore – souvent masquées maintenant derrière d'autres thèmes. Si la culture espéranto a aujourd'hui acquis la diversité et la variété des cultures liées aux langues nationales, elle n'a pas perdu son fondement idéologique. Dans cette conférence, nous approfondirons l'étude de ce fondement idéologique de la poésie en espéranto.

Phong trào hay là văn hóa? Nền tảng tư tưởng của thơ trong Quốc Tế Ngữ

Tóm tắt

Người ta hoàn toàn có thể gọi những bài thơ của Zamenhof là thơ phong trào, được viết để khuyến khích các nhà Quốc Tế Ngữ sớm đến với phong trào làm việc cho ngôn ngữ hoặc để khảo sát những cảm xúc phức tạp của tác giả Esperanto khi phải đối đầu với công trình mà chúng ta gọi là Esperanto. Như thế, Zamenhof đã lập nên một truyền thống lâu đời cho các tác phẩm viết về Esperanto và phong trào Esperanto, thường (không phải luôn luôn) được sáng tác bởi những người mà chúng ta gọi là nhà thơ vì lòng nhiệt tình hơn là vì tài năng thơ phú. Hoàn toàn tự nhiên, những nhân vật quan trọng nhất trong nền văn học Esperanto đã công bố các tác phẩm chín muồi của họ ngay tại thời điểm nó bắt đầu vượt ra khỏi những giới hạn về mặt chủ đề và khám phá những khía cạnh khác của đời sống con người mà không nhất thiết bị ràng buộc bởi việc viết vì Quốc Tế Ngữ. Tuy nhiên, những nghiên cứu thơ phú về hoàn cảnh của những người làm việc vì Esperanto vẫn tiếp tục – dù hiện tại chúng thường bị che lấp bởi những chủ đề khác. Nếu văn hóa Esperanto thời nay đã đạt đến sự đa dạng và đa sắc của các nền văn hóa có ngôn ngữ dân tộc thì nó không hề mất đi nền tảng tư tưởng vốn có. Trong bài phát biểu này, chúng tôi sẽ tìm hiểu thêm nền tảng tư tưởng của thơ ca Esperanto.

Movado aŭ kulturo? La ideologia bazo de la Esperanto-poezio

En la jaro 1939, en la momento de ekflamo de la Dua Mondmilito, eta kolekto de poemoj de Kálmán Kalocsay sidis finpresita sed nebindita en la sidejo de Literatura Mondo en Budapeŝto. La volumeto ne aperis: la milito haltigis la agadon de la eldonejo. Nur kelkajn jarojn post la milito, Reto Rossetti trovis la dismetitajn paĝojn kaj sukcesis kunmeti kvin ekzemplerojn. La verko fine aperis ĉe UEA en la jaro 1977. Ĝia titolo estis *Izolo*.¹ En la historio de la Esperanto-poezio ĝi ludas gravan rolon – ne nur ĉar ĝi enhavas plurajn el inter la plej perfektaj poemoj de nia plej perfekta poeto, sed ankaŭ ĉar ĝi markas momenton en la historio, nome la jaron 1939, en kiu la espero, tiu abstrakta sed samtempe praktika koncepto plej grava al Zamenhof, ŝajnis malaperanta. Tiu momento kondukis al paŭzo en la disvastiĝo de Esperanto kaj la krea spirito de ĝiaj adeptoj.

La titolo, *Izolo*, portas kaj subkomprenigas multajn nuancojn. Per sia agado en la 1920aj kaj 1930aj jaroj, kiam li rolis kiel eldonisto, redaktoro, poeto, kaj mentoro al multaj aliaj aspiraj Esperanto-verkistoj, la energia Kalocsay samtempe strebis por konstrui kreaĵon komunumon de beletristoj Esperantaj, kaj restis mem konvinkita pri la fragileco de tiu konstruo kaj la esenca izoliteco de la esperantista verkisto. Eĉ en siaj plej gloraj jaroj, la revuo kiun li redaktis kun Baghy, *Literatura Mondo*, havis nur kelkajn centojn da abonantoj (la homoj ŝajne preferis revuojn kiel *Heroldo de Esperanto* kaj *La Praktiko*). Pluraj liaj poemoj aludas al tiu sento de kultura kaj psika izoleco. Rigardante ĉirkaŭ si, Kalocsay vidis florantajn naciajn literaturojn, ĉiu kun sia lingvo, kun siaj institucioj, kun sia legantaro – dum ĉe la esperantistoj necesis konstrui tutan tradicion – en diaspora komunumo kie ĉiu uzanto de la lingvo estas certagrade soleca. Unu el la grandaj dilemoj, kiun ĉiu konscia Esperanto-verkisto devas fronti, estas la demando kian literaturan komunumon imagi, kaj klopodi krei. Ĝis kiu grado verki en Esperanto similas ĉiun alian verkadon (verkado sub flago, por tiel diri – verkado en la kadro de nacia kaj lingva historio, kun klare difinita kultura civitaneco) kaj ĝis kiu grado ĝi diferencas? Se necesas krei kulturen kadron, kian kadron krei?

La fruaj esperantistoj havis sian respondon al tiu demando. Tre frue en sia historio, la Esperanto-movado adaptis kaj adoptis la karakterizojn de ŝtato, kun sia flago, siaj alvokoj al solidareco, siaj konsuloj kaj sia akademio. Tiuj estis la solaj ĝenerale konataj simboloj je la dispono de tiu embria popolo kiu vivis en mondo dividita inter ŝtatoj. En tiu senco, la Esperanto-movado iĝis ŝtateca – en epoko de kreskanta naciismo, kiu tamen montris la danĝerojn de ŝtatismo. Nur Eugène Adam, la kontraŭisto Lanti, kategorie malakceptis tiujn simbolojn, ligante Esperanton al senŝtateco, al sennaciismo. Zamenhof daŭre ŝanceliĝis inter esprimado de la diferencoj kaj utiligo de la simileco de la Esperanto-movado kaj la ŝtatoj. La verda standardo, sub kiu li preĝis, ja estis alispeca standardo, sed tamen standardo.

Tiu kontraŭdiro – inter la simboloj de ŝtateco alproprigitaj de la fruaj esperantistoj, kaj la insistado ke la Esperanto-movado estas io nova kaj tute alia – iasence trafluis nian tutan historion. Zamenhof kreis revolucion lingvon, malsimilan al ĉiuj aliaj – sed zorge prezentis ĝin al la publiko en la Unua Libro kvazaŭ ĝi similas ĉiujn ekzistantajn lingvojn. Li verkis originalajn poemojn – sed li ankaŭ dediĉis sin al grandega kaj monumenta traduka programo, esperantigante Ŝekspiron, Schiller, Molière, La Malnovan Testamenton, kvazaŭ kreante por Esperanto inventitan literaturan kaj kulturen pasintecon. Kaj, se temas pri la originala poezio, neeviteble Zamenhof alproprigis la poeziajn formojn de la literaturoj, kiujn li konis –

¹ K. Kalocsay, *Izolo* (Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1977).

kaj ankaŭ iliajn metaforojn. La poemo *La espero*, ekzemple, emfazas en sia unua strofo la nocion de vento, kiu blovas tra la mondo; de birdajflugiloj, kiuj soras kiel soras birdoj; de “voko” kiu trairas la mondon iom kiel la “voko” de Jehovo (laŭ judoj kaj kristanoj) kreis la fizikan mondon. Ne malfacilus trovi ekzemplojn de tiu pensmaniero kaj de tiuj simboloj en multaj literaturoj – precipe tiuj tuŝitaj de la romantikismo, kiu ja parte inspiris Zamenhof. Ofte, vento estas ligata al spirado, al la poezia “inspiro” (t.e. en-spiro); ofte ĝi estas ligata ne nur al printempeca renaskiĝo sed ankaŭ al la aŭtuna purigo, kiu antaŭas tiun renaskiĝon, kiel ekzemple en la *Odo de la okcidenta vento* de la romantika angla poeto Percy Bysshe Shelley, kiun Kalocsay mem elektis traduki.² En la komencaj versoj de *Paradizo Perdita* de la angla poeto Milton, ni renkontas ne nur la nocion de enspirado (la enspirado de la sankta spirito en la poeton ebligas al la poeto elspiradi lingve kaj poezie), sed ankaŭ flugilojn – kaj la flugadon de la poezia kanto de la poeto.

Per siaj tradukoj kaj sia originala poezio, kreante la estontecon Zamenhof do unue kreis, aŭ alproprigis, la pasintecon. Lia celo kompreneble estis doni senton de seriozeco, de estableco, al la movado, kaj uzi la signifojn de la pasinteco en nova formo por doni signifon al la estonteco. Ŝlosila elemento en la tuto estis la nocio de espero.

Post Zamenhof venis dekoj da ne ĉiam kompetentaj poetoj, kiuj, uzante similajn metaforojn kiel tiujn de Zamenhof, enradikigis ilin en la lingvan simbolaron. Oni povas nomi tiujn poemojn populara poezio, celanta levi la spiriton. Alvokoj al agado, odoj al kongresoj, omaĝoj al movadanoj, abunde aperis en la ĉiam kreskanta Esperanto-gazetaro. Ne malofte aperis kantoj kaj muziknotoj: la levo de la voĉoj en kantado estas plej elementa esprimo de la grupa solidareco, komuna al multaj siatempaj sociaj kaj religiaj movadoj: armeoj marŝas; movadoj kantas. Foje ili ambaŭ faras ambaŭ (*La espero* en la formo, en kiu ni ĝin kantas, havas marŝan ritmon...). Tiu populara poezio utiligis la bazan simbolaron, kiun Zamenhof establis. Inter ili: kompreneble la espero.

Kiel oni jam multfoje rimarkigis, espero, la preferata karakterizilo de nia lingvo, estas neperfekta, kovrante la grundon inter neperfekta nuno kaj ideala sed neniam atingebla estonta perfekte: espero tenas en si implicojn de sia malo: neatingo, malespero.

Nesurprize, do, ke sub la ŝovinisma bardumado de la fruaj poeziaj aspirantoj en Esperanto fluis kontraŭkurento de pesimismo – videbla plej elstare en nepre la plej interesa poemo Zamenhofs, *Mia penso*, sed esprimata ankaŭ en la poezio de Kurzēns, Schulhof, kaj aliaj. Schulhof fakte konstruas sian poemon *Desperanto* sur la optimismajn ŝablonojn troveblajn ne nur en la poezio de Zamenhof sed ankaŭ en la abundaj poeziaĵoj de liaj unuaj adeptoj:

Dolĉe sonas via nova nomo,
ho Espero! nia bela vorto!
En la nokto plena je sopiro
vi, Espero, estas eliksiro
sed nur eliksiro sen la forto....

... Tre agrable vere estas sonĝo,
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,
pri senĉesa homa harmonio,
unu amo, unu familio
– sukeraĵo por la infaneco.

² *Angla antologio, dua parto*, red. Albert Goodheir (Londono: Esperanto-Asocio de Britujo, 1987), pĝ. 69.

Ni atendas vane tempon belan,
kiam regos sole via nomo.
En eterna monda karuselo
vi Espero restos ĉiam stelo,
Ĉiam malproksima por la homo.... (EA 35³)

La deirpunkto de Schulhof estas la poemo *La espero* de Zamenhof. Parodioj de tiu poemo aperadas pli-malpli konstante en Esperanto, ankaŭ hodiaŭ.

Kalocsay heredis tiun disfenditan ideologion, inter optimismo kaj pesimismo, sed, pli grave, inter la nocio de kontinueco kun la aliaj lingvoj kaj la nocio de io lingve kaj koncepte komplete nova. Kalocsay kreis originalajn poemojn – sed la plej efikaj kaj atentindaj estas tiuj, kiuj majstris la ritmojn kaj formojn de la eŭropa poezio, kiun li konis kaj amis. Kaj se liaj originalaj poemoj estas inter la plej imponaj de nia literaturo, li estis egale, eĉ unavice, tradukisto, laborante, same kiel Zamenhof, por loki la Esperanto-kulturon inter la mondajn kulturojn kaj sekve la landajn kulturojn. Lia unua poemaro nomiĝis *Mondo kaj koro*, lia dua *Streĉita kordo*. Dum la unua, frua kolekto kvazaŭ pruntis la titolon *Mondo kaj koro* de la temoj de la fruaj Esperanto-verkistoj (kies koroj batis takte kun tiu de Zamenhof, kaj kies vizio ampleksis mondojn), la dua esprimis alian nocion – ke, dank’ al la laboroj de la ekipo de Literatura Mondo – kun helpo precipe de Grabowski kaj la rusoj de la 1920aj jaroj – la instrumento de la Esperanto-poezio ne nur fabrikiĝis sed staris preta kaj agordita por melodii en la internacia lingvo.

Kiel ni rimarkis, ankaŭ la titolo de la tria poemaro, *Izolo*, portis siajn asociojn – la izolo, kiun Kalocsay sentis, en movado materiisma, kiu nesufiĉe priatentis siajn beletristojn; la izolo de la Esperanto-kulturo en la mondo de la kulturoj; kaj, fine kaj plej grave, tiu dolora izolo de la Bono kontraŭ la Malbono, en mondo, kiu, pretigante sin por milito, ignoris aŭ misuzis la noblajn sentojn favore al la malnoblaj.

Inter la poemoj en la volumeto, verkita rande de Mondmilito, estas serio de tielnomataj “Japaneskoj”, miniaturaj kaj plej simplaj poemoj, unu el kiuj fariĝis aparte fama. Ĝi nomiĝas “Gruoj”:

En triangulo
La grupoj grege iras.
Liter’ giganta!
Mi volus VO prononci,
Sed VE mi elsuspiras. (EA 178)

Vo estas nomo de litero en Esperanto; ve estas esprimo de malespero. La erara eldiro de la poeto, en kiu la Esperanta nomo de la litero kvazaŭ misglitas en tiun deklaron de malespero, kvazaŭ simbolas perdon de la kapablo sin esprimi en Esperanto, igante la lingvon neatingebla: la poeto volas paroli Esperanton, sed elsuspiras nur “ve”, kvazaŭ kiel viktimo de apopleksio kiu ne kapablas ligi la deziron paroli kun la signifo de la vortoj, kiujn li eligas.

Tiu vortludo (vortludo en du sencoj), en kiu la lingvo Esperanto forglitas de la lango, estas nova varianto, nova alproprigo, el longa tradicio. La antikvaj grekoj, en kies alfabeto ne troviĝis ekvivalento de la litero Vo, imagis la flugiformon de grupoj kiel la literon ipsilono, kiu siavice ne troviĝas en la Esperanta alfabeto. La litero ipsilono, laŭlegende, estis eltrovita de la greka lertulo Palamedo, ĝisosta malamiko de Odiseo, per observo de la formacio de

³ EA: *Esperanta antologio*, red. William Auld, dua eldono (Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984).

gruoj. La greka filozofa Pitagoro asertis ke la litero ipsilono signifas disdividon de vojoj inter virto kaj malvirto. La “Adiaŭo” per kiu la volumo de Kalocsay finiĝas, akceptas, ke la vojo de malvirto estas jam elektita, kaj ke la virto cedos antaŭ la neeviteblo de milito:

Nun ĉe l’abismo, antaŭ la fata salto,
En la momento lasta, vere lasta,
Ni frapu sur la kordo malelasta,
Ni frapu morne, sen esper’ pri halto,

Kaj antaŭ la falego el la alto
Ni adiaŭu al la revo ĉasta,
Kiun ni, malgraŭ trista spert’ kontrasta,
Pri l’ homfuturo flegis en ekzalto!

Tiu kordo malelasta estas la antaŭ kelkaj jaroj “streĉita kordo” de la titolo de la antaŭa Kaloĉaja poemaro, de la jaro 1931, kiam la mondo aspektis almenaŭ iom pli hela, ol ĝi nun fariĝis. Nun, tamen,

Forsonos kant’ kaj mortos trilkoncertoj!
Dezertas koroj, kaj, post sangelĉerpo,
La landoj same iĝos jam dezertoj,
Kie apenaŭ kreskos eĉ la herbo.

Jam tiam, en 1931, Kalocsay “En amara horo” priploris la disdividon de la esperantistoj, kiuj ŝajne ne kapablis kunlabori, ne komprenas la esencon de la afero: “Nenio estas vi, nenio, / Se pri la senco sen konscio, / Vi hurlas pri la ‘nova sento’!” En tiu sama poemo, per fame konataj versoj li esprimas la frustrigon de “Poeto sen popolo, ho animprema scio, / Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko.” (EA 146)

La aludo al la “nova sento” reportas nin al la kerna poezia esprimiĝo de esperantisteco, nome la Zamenhofa poemo *La espero*, al kiu mi ŝatus ĵeti plian rigardon. En prelego en la Internacia Kongresa Universitato antaŭ deko da jaroj, mi parolis detale pri la Zamenhofaj poemoj. Mi reiru al kelkaj punktoj, kiujn mi prezentis tiam, ĉar ili rilatas al la nuna argumento. Mi diris tiutempe, ke, laŭ la kutima kalkulo, Zamenhof verkis naŭ originalajn poemojn en Esperanto. Du el ili, *Mia penso* kaj *Ho, mia kor’*, aperis en la Unua Libro kaj do konsistigas la unuajn originalajn literaturaĵojn en la nova lingvo. En la unua numero de *La Esperantisto*, en septembro 1889, Zamenhof aperigis dediĉan poemon al la nova gazeto, en Esperanto kaj en la germana. Tio do konsistigas trian originalan verkon. *Al la fratoj* aldoniĝis en 1890, aperigite en *La Esperantisto* la 25-an de aprilo. La kvina poemo, la plej fama el ĉiuj, *La espero*, estis publikigita en la tielnomata Poŝa Lernolibro por ruslingvanoj, kiu aperis en 1890 (*Lingvo Internacia Esperanto: Plena lernolibro*). Ĝi estis poste represita, kune kun la jam aperintaj *Mia penso*, *Ho, mia kor’*, *Al la ‘Esperantisto’* kaj *Al la fratoj*, en *La liro de la esperantistoj*, kiun Antoni Grabowski eldonis en 1893. Preskaŭ ĉiuj tiuj poemoj aperis ankaŭ en la *Fundamenta Krestomatio* de 1903.

Ne en *La liro* sed jes en la *Fundamenta Krestomatio* troviĝis la sesa poemo, *La vojo*, kiu unue aperis en la revuo *Lingvo Internacia* en junio-julio 1896. En la dua eldono de la *Krestomatio* de 1905, Zamenhof presigis la himnon *Preĝo sub la verda standardo*, kiu aperis ankaŭ en *Lingvo internacia* en tiu sama jaro (15 aŭgusto). Lia oka poemo, *Pluvo*, aperis en 1909 en la aŭgusta–septembra numero de *Tutmonda Espero*. Naŭa poemeto, *Saluto al ‘Verda*

Radio’, estis mallonga dediĉa poemo al broŝura kolekto de originalaj verkoj aperigita en Rigo en 1911 de la Esperantista Literatura Rondeto.

La forta interesiĝo de Zamenhof pri poezio komenciĝis en la frua junaĝo, longe antaŭ la apero de la Unua Libro. Li konfesis, ke en sia junaĝo li revis fariĝi poeto en la rusa lingvo. Al sia *Provo de gramatiko de la jida lingvo* (verkita inter 1879 kaj 1882, dum la periodo de lia interesiĝo pri cionismo, nocio, kiun li poste forlasis) li eĉ aldonis kelkajn poemetojn por ilustrati la metrikon en la jida. La kajeroj, kiuj entenis la pra-Esperanton de la fruaj 1880aj jaroj, do la unuajn malnetojn de la nova lingvo, enhavis tradukon de la balado de Heine “En sonĝo princinon mi vidis”, kiu en sia fina formo aperis en la Unua Libro de 1887, kaj unu originalan poemon, nome la unuan version de la poemo *Mia penso*, ankaŭ en la Unua Libro.

Ni povas do sen troigo aserti, ke la fruaj provoj de Zamenhof pri socia aktiveco – ĉu la Cionismo de la fruaj 1880aj jaroj, ĉu la planlingvismo kiu fine kondukis al la Unua Libro de 1887, estis trempitaj en la poezio. Ne nur tio: ekzistas rimarkinda kontinueco inter la sentoj kaj temoj esprimataj en la jidaj poemoj aŭ en la praesperantaj poemoj kaj tiuj sentoj kaj temoj de la matura Esperanto. Zamenhof vivis en tiuj tagoj (kiel li vivis iasence tra la tuta vivo) en lingva fandejo, en kiu samaj sentoj manifestiĝis en diversaj lingvaj kunteksto kaj motivigis al diversaj celoj. Ne ignoreblaj estas ankaŭ la novaj entuziasmoj de la periodo post 1887, notinde la interesiĝo pri Hilelismo kaj Homaranismo.

Jen la kerna punkto: La ĉeesto de poezia esprimiĝo je ĉiu stadio en lia evoluo implicas, ke Zamenhof malmulte diferencigis la poezion disde la socia aktivado. Krei lingvon estis verki poemon; krei poemon estis verki lingvon. Tiu ligo inter la poezio kaj la lingvo Esperanto donas apartan nuancon al la verkoj de tiuj Esperanto-poetoj, kiuj poezias pri parolado, pri spirado, pri la homa voĉo. Kiel esperantistoj, kaj malgraŭ ilia eventuala neligiteco al la formala Esperanto-movado aŭ al tiu, kiun oni foje erare nomas Finvenkismo, ili neeviteble ligas poemokonstruadon kun lingvokonstruado. Tiu ligiteco povas igi poemojn kiuj unuavide neniel rilatas al Esperanto, tamen poemoj, en kiuj esprimiĝas espero kaj duboj pri la komuna lingva iniciato, kiu nomiĝas la Esperanto-movado.

La espero, ni notu, venas kvazaŭ en la dua stadio, post la tute fruaj poemoj *Mia penso* kaj *Ho mia kor’*. Ĝi estas poemo dediĉita al inspirado de la homamaso, sen la duboj de la pli fruaj poemoj, kaj tuŝanta ideojn, por ne diri kliŝojn, konatajn al ĝiaj legantoj (kaj kantantoj), precipe el la juda kaj kristana Biblio: la kreo de la mondo, la falo de la muroj ĉe Jeriĥo, la Turo de Babelo, la Sankta Spirito.

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ni ne ignoru ankaŭ la fakton, ke la flugo de la voko iras tiel facile ĉar Zamenhof kaj liaj samtempuloj vivis en periodo kiam novaj inventaĵoj, kiel la telegrafo kaj la telefono, ebligas tujan komunikadon trans longaj distancoj. Esperanto, laŭ la imago de Zamenhof, estis la softvaro de tiu nova reto de elektrona komunikado.

En sia postparolo al la *Esperanta antologio* (1984: 835), William Auld aludas al la “verdstelaj versaĵoj, la rutinaj ampoemoj kaj mortosopiraj facilanimaĵoj” de la frua epoko, ne tute senbaze. Almenaŭ ĝis la Unua Mondmilito, la Esperanto-poetoj (kun unu-du esceptoj) ĉefe celis montri, ke Esperanto entute kapablas funkcii kiel literatura lingvo. En siaj verdstelajoj ili ne ĉiam sukcesis... Sed unu el tiuj esceptoj estis Antoni Grabowski, kies bonekonata originala poemo *La Tagiĝo* apartenas al la inspiriga tradicio de Zamenhof (“Tagiĝo, tagiĝo

radias en rond’, / La ombroj de nokto forkuras el mond’’). Tamen Auld enmetas en sian Esperantan antologion longan poemon de Mozes Goldberg pri la Babelturo, kiu evidente pruntas abunde kaj ne tre lerte el Zamenhof mem: “Ĝoje l’espero nin jam karesas / Proksiman celon montrante: / L’internacia lingvo progresas, / Amikojn ĉie trovante” (EA 11-13). Pli subtile Marie Hankel traktas la esperon per priskribo de la sezonoj en sia poemo *Vana espero* (EA 32).

Pri Stanislav Schulhof, kies malgranda kolekto de dek poemoj aperigita en 1911 nomiĝis *Per espero al despero*, mi jam parolis. Vi ne ricevu la impreson, ke pesimismo estis lia ĉefa temperamenta kondiĉo, eĉ male: pluraj el la poemoj estas simplaj alvokoj al entuziasma varbado: “Nur antaŭen, nur antaŭen / tra la maroj, tra la lando. / Malgraŭ ĉio, forto, aĝo, / rido kaj la mokataĵo, / iru nia propagando.” “Kun Espero en la koro / kun la stelo sur standardo, / marŝu nia avangardo / nur antaŭen por la gloro!” Aliaj priskribas situacion en kiu la poeto, enua kaj senespera, trovas la miraklon de Esperanto kaj estas per tio savita: “Dankon al vi, stranga verda stelo, / kiu en la nokto sen espero / el putranta, ŝima atmosfero / ekaperis hele sur ĉielo.”

Kalocsay, en sia poemo “Gruoj”, estis heredanto de tradicio jam kvindek jarojn longa. Lia poemo estas poemo pri skribado kaj legado: li *legas* la gruojn, sed la gruoj defias lian interpreton. Gruoj havas longan historion kiel literatura simbolo, precipe en la rusa literaturo, ofte elvokaj pri espero kaj pri kontinueco. Sed la enigmaj gruoj de la poemo de Kalocsay *rifuzas signifi* aŭ, pli precize, redonas alian mesaĝon. Ĉu signoj do de alvenanta printempo aŭ de proksimiĝanta vintro? Evidente ili ne venas, sed foriras....

La milito, kiun Kalocsay antaŭvidis, ŝanĝis la pejzaĝon de la Esperanto-poezio. Kvankam Baghy kaj Kalocsay daŭre verkis, pasis ilia glora periodo, kaj la surlokaj cirkonstancoj en kiuj la hungara reĝimo bremsis la Esperanto-laboron, malhelpis la internacian kontakton. Venis novaj talentoj, interalie la britoj William Auld kaj Marjorie Boulton, kaj, por ilin nutri same kiel la eldonejo Literatura Mondo nutris la poetojn de la intermilita periodo, venis la eldonejo Stafeto kaj ties gvidanto Juan Régulo Pérez. Se Kalocsay estis la ĉefa rolanto en la maturigo de la Esperanto-poezio, la poetoj de la periodo post la Dua Mondmilito povis iasence profiti el tiu starigita kulturo – eble ne kulturo en la senco, ke nacia kulturo kapablas involvi komplete siajn anojn, sed kulturo de internacieco, kies valoroj kvazaŭ suplementas aŭ modifas la naciajn. Unu el la karakterizoj de nia moderna mondo kaj ĝia relativa libereco estas tio, ke ĝi ebligas al homoj preni sur sin pli ol unu identecon, kiel ja ofte okazas pro la migrado de homoj, kiuj naskiĝas en unu lando kaj transiras al alia. La Esperanto-kulturo estas en tiu senco alternativa kulturo.

Eĉ tiam, kiam la Esperanto-poezio jam atingis plenan maturecon, la interesiĝo de niaj poetoj pri la esperantismo ne malaperis. Ni povus citi dekojn da poetoj, kiuj de tempo al tempo, ankaŭ hodiaŭ, verkas rekte aŭ malrekte pri sia esperantisteco kaj pri la Esperanto-idealaj, kompreneble ne ĉiam kun kontento. Kiel Ŝtefo Urban koncize esprimas sin per eĥo de la Zamenhofa poemo *La vojo*:

Eĉ guto malgranda
konstante frapante
progresas, ho Dio,
tro lante! (EA 481)

Carmel Mallia, titolante unu sian poemon *Mia penso*, ree esploras la lingvadon de la spirito kaj ties Zamenhofan teritorion (EA 692). Eble la poemo ŝajnas unuarigarde ne tuŝi Esperanton, sed la titolo mem invitas komparojn. Efektive, verkante en Esperanto, poetoj

vole-nevole devas preni en konsideron la apologian tradicion, kiun ni ĉi tie spuras, kaj eĉ poemoj ŝajne ne temantaj pri Esperanto kvazaŭ fluas en tiun semantikan spacan pro la ekzisto de la Zamenhofaj modeloj.

En tiun kulturalan medion paŝis en la jaro 1955 la poetino Marjorie Boulton per volumo eldonita de Regulo kun la titolo *Kontralte*. Ĝi estis eksterordinara atingo: poeto apenaŭ tridekjara, kiu prezentas sur 270 paĝoj pli ol 200 poemojn, ĉiu fajne polurita kaj kun kompleta rego de la lingvo kaj mirinda poezia facileco. Evitante poezian obskuron, kaj funkciante senprobleme ene de vortprovizo kaj sintakso alirebla de ĉiu laika esperantisto lingve kompetenta, la poeto kreis poemojn de mirinda klareco. Unu tuta sekcio de la libro – la lasta – nomiĝis “El verda notlibro” kaj prezentis omaĝojn, laŭ la stilo de la rimportretoj de Kalocsay, al diversaj esperantistoj (inter ili, Kalocsay mem). Jen kaj jen, pliaj poemoj en la kolekto aludis rekte aŭ malrekte al Esperantaj temoj, kiuj do restis integra parto de la poemaro.

La libro estas intense persona, prezentante la poeton kiel personon kiu, sub la kulturita ekstero de kolegia profesoro, kaŝas sentojn bolajn kaj komplikajn. Ja la titolo de la volumo aludas al la kontraŭta poeta voĉo; kaj la kolekto komenciĝas per prologa konfeso de la aŭtoro mem, *La triopa memo*:

Mi estas tri. La digna lektorino
Kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
De l' dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume, en koro, primitiva dramo
Okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
Sub nigra robo brulas nun pro amo
Virino simpla en dezir' tortura.

La lektorino pensas. La virino
Baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la Poet', per arta disciplino,
Observas ilin ambaŭ, kaj komentis.

Se la poezio ebligas al Boulton la tenon de la mensa ekvilibro, troviĝas indikoj dise en tiu ĉi volumo kaj la posta kolekto, *Eroj*, ke la lingvo Esperanto ludas similan rolon en ŝia vivo. En pluraj lokoj en ambaŭ kolektoj oni havas la impreson, ke la du kunfandiĝas aŭ intermiksiĝas.

Konsideru en tiu rilato la poemon *Memnon*, eble la plej elstaran en la kolekto. En la volumo de 1955 ĝi sidas sen klarigo; sed en la unua eldono de *Esperanta antologio*, la notaro (bedaŭrinde forviŝita el la dua eldono) donas la jenan utilan informon:

Memnon: Memnono, laŭ helena legendo, filo de Titono kaj Aŭrora, venis helpi al la trojanoj; la helenoj donis lian nomon al unu el la kolosaj statuoj egiptaj de Amenof la Tria, ĉar ĝi sonis muzike ĉe la sunleviĝo – kion ili interpretis kiel saluton de Memnono al la patrino.

Jen la poemo:

Statuo, ŝtono en dezerto,
Sur brila sablo, brulsoifa,

Mi staras morta, sensignifa;
 Ĉe la piedoj nur lacerto

 Estas kunulo kaj konsolo.
 En spaco sen videbla verdo
 Mi staras, monument' de perdo
 Granita, trista en izolo,

 Sen homa koro aŭ kapablo,
 Kaj ŝtoniĝinta per doloro.
 Mi staras sub kruela gloro
 De brula suno sur la sablo.

 Sed, ŝtono kiu vundojn sentas,
 Per mia propra sango ruĝa,
 En sabloŝtorm' turmenta, muĝa,
 Mi staras blinda. Mi silentas.

 Sed kiam ŝtormas ventaj vipoj,
 Tra mia korpo sen espero
 Dum sunleviĝo aŭ vespero
 Mi kantas tra la ŝtonaj lipoj.

 Ne mi, ne mi, sed senkompata
 Kaj stranga vento lipojn movas,
 La akra vento, kiu blovas
 El lando nigra, nekonata. (EA 514)

La poemo troviĝas meze de tiu sekcio de la libro kiu nomiĝas “Unu virina koro.” La poemo tuj antaŭ ĝi titoliĝas *Metamorfozo* kaj priskribas la transformiĝon de la aŭtoro “mi” kiu en someraj tagoj “promenis ... sub ore varmaj suno-sagoj, / En la volupto vasta, nobla” kvazaŭ leono. Nun venis la vintro, kaj tiu “mi” fariĝis “malestimata dom-pasero” kiu serĉas panerojn. Ne estas klare, ke la metamorfozo ripetiĝos en la posta printempo aŭ ĉu la nova kondiĉo estas konstanta. La tuj posta poemo nomiĝas *Vivciklo*, kaj priskribas serion da mortoj kaj reviviĝoj inter vintro kaj printempo “Ĝis ni el rado / Sen novaj fortoj, / Finmortas pro la ado / De tiuj mortoj.” Se juĝi laŭ la loko de la poemo en la kolekto, ne eblas ne rigardi la poemon *Memnon* alie ol kiel tute personan.

En mia prelego de 2002 mi diris pri tiu poemo pli-malpli la jenon. Jam ĉe la titolo oni haltas. La nomo *Memnon* ja ne estas Esperanto-nomo, sed almenaŭ dum momento ĝi ŝajnas esti. Ĉu Boulton estis logita al tiu ĉi temo parte pro tio, ke la nomo Memno memorigas pri Memo, kaj la ŝajne akuzativa formo emfazas la fakton, ke Memnon, la rolanto en la poemo, ne agas, sed la ĉirkaŭaĵo agas kontraŭ ĝi? Oni bezonas eĉ kelkajn sekundojn por orientiĝi entute en la komenco de la poemo. Ĉu oni rigardas statuon aŭ oni mem estas statuo, kaj ĉu oni trovas tie la *certon* aŭ *lacerton*? Eĉ la strofofino sen interpunkcio heziligas la leganton. Kiam la situacio klariĝas, estas evidente, ke la parolanto de la poemo, la poeto mem, imagas sin ŝtona, trista en izolo, sen homa koro, ŝtoniĝinta per doloro. Ja tro ofte en la kolekto *Kontralte* oni havas la impreson, ke la poeto, aktiva en sia flamanta imagopovo, restas tamen senmova, dum aliaj moviĝas ĉirkaŭ ŝi: la leono de la imagopovo fariĝas la pasero de la realo.

Tamen, en iu senco tiu ŝtono vivas, kiel oni rimarkas en la dua duono de la poemo: ĝi havas sian “propran sangon ruĝan” kaj sian “korpon sen espero.” En mateno kaj vespero ĝi “kantas tra la ŝtonaj lipoj.” Tiu tragedia bildo de ŝtoniĝinta poeto, kiu tamen estas samtempe ŝtona kaj viva, samtempe granita kaj sangohava, prezentas unuavice malnovan ideon de la bardo, kiu verkas ĉar la spirito spiras kaj inspiras lin, tiel ke la facila vento (ĉi tie ĝi fariĝas “stranga vento”) kvazaŭ kontraŭvole tamen kreas harmonion – harmonion, kiu eventuale eĉ nur dolorigas iun, per kiu ĝi esprimiĝas.

Sed la poemo de Boulton samtempe levas en niaj mensoj, post nia mallonga ekskurso tra la Esperanto-poezio, du pliajn eblecojn. Unue, Boulton, poeto plene engaĝita de Esperanto dum granda parto de sia vivo sed konstante frustrita de la stumbla progreso de nia lingvo (kaj de karaktero, almenaŭ laŭ la propra juĝo, iom retiriĝema, malsekura), prezentas en tiu ĉi poemo eble ne nur bildon de “poeto malgraŭ si”, sed ankaŭ de “esperantisto malgraŭ si”. Dum al Schulhof la verda stelo venas por lin savi el despero, al Boulton la Esperanto-movado “lipojn movas” pli mistere, pli necerte, kaj apenaŭ esperige. Super la poemo ŝvebas mistero: ĉu tamen optimisma (eĉ ŝtonon la spirito kapablas vivigi), ĉu tamen pesimisma (la vivo iras; mi restas ŝtona)?

La poemo de Boulton ebligas al ni rekonsideri la Zamenhofan himnon *La espero*. Tiu facila vento, kiu portas la fortan vokon (kaj kion diras tiu voko, kion celas?), samtempe movas la lipojn de tiuj, sur kiujn ĝi blovas. Tiu facila vento ne nur parolas, sed paroligas: la Voko eligas respondon per la sama lingvo.

Eĉ se la revolucia fervoro de la fruaj tagoj iom dampiĝis, niaj poetoj ankoraŭ frontas la demandon kiel difini kaj kiel trakti la idealismon (temo ofta en la poezio de Mauro Nervi, ekzemple, kaj ankaŭ, malrekte, en tiu de Ragnarsson); ili poezias pri la fenomeno Esperanto kaj, ĉefe, poeziantes per Esperanto ili daŭrigas tradicion, kiu komenciĝis en la Unua Libro.

Mi finu per du poemoj el la nuna epoko. Unu, el 2003, de Mikaelo Giŝpling, *La lingvo de espero*, fermas delikate la fendon inter la pesimismo kaj la optimismo, transire al iu trankvila fatalismo.⁴

Por kio versas mi en lingvo, kiun konas
Apenaŭ dudek mil stranguloj en la mond’?
Kaj eĉ el tiu kvant’ nur tre malvasta rond’
La poezion ŝatas kaj bezonas.

Verdire tio ĉi ne multe min afliktas.
Mi skribas ne por mend’, sed sole por mi mem:
El maro de la viv’ emerĝas nova tem’
Kaj tekston de poem’ en tiu lingvo diktas.

Min logas tiu ĉi komuna idiomato –
La lingvo de esper’ de Majstro Zamenhof,
Belsona, kiel flut’, por poezia strof’
Kaj kuniganta homon kun la homo.

Kaj ne certigu min, ke l’ celo estas mita,
Ke en la lingvo mem forestas ĉia senc’,
Ke fakte estas ĝi nur revo, nur intenc’,
Per kiuj la Infer’ jam estas pavimita.

⁴ *Moskvaj sonoriloj: Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj*, red. Nikolao Gudskov (Moskvo: Eldonejo Impeto, 2007), pĝ. 84.

Ligiĝis mia vers' al lingvo Esperanto.
Se ĝi ekzistos plu, do restos mia spur',
Se iam mortos ĝi, do mortos mia kanto...
Sed nun mi versu – juĝu la futur'.

En *Koploj kaj filandroj* (2009),⁵ Jorge Camacho prezentas poemon kies titolo *En vespera horo* jam signalas meditado de la speco de la Zamenhofa poemo *Mia penso* kaj ties momento “antaŭ nokto de somero.” Ĝi komenciĝas: “Finiĝas la vespero kaj / somero” kaj kondukas tuj al resumo de la historio de la Esperanto-poezio –

Sed sin prezentas la demando
– kiom kunligas esperanto?
Ĉu temas do pri branĉ' matura
de la arbeg' literatura?
Aŭ eble nur filandro plia,
fragile freŝa, simpatia
kontribuanto de la reto?
Tutmonda literatureto,
tamen pokhoma kaj plurkapa,
diverskiale handikapa.

Camacho havas sian respondon – respondon, kiu reportas nin al la komenco de nia ekskurso. Redefinante la korokrion de Kalocsay, la poeto sen popolo, la poeto en izolo, en amara horo, li reintegras la Esperanto-poezion en la mondan kulturon: Esperanto estas ero, kaj ero ĉiam pli digna, en la homa poezia kolektivo:

Poetoj sen popolo, ho animleva kredo,
ke preter tempoj nin la poezi' kunligas
sur ĉiaj regionoj kaj urboj de l' planedo;
ke arto poezia nin fandas kaj fratigas
kun la aŭtor' enigma de l' fama prapoemo
pri Gilgameŝ, Enkidu kaj amikec' fascina;
kun Homer', Odiseo, Penelop', Polifemo;
kun antikvuloj, kiuj en la japana, ĉina,
en fajnaj vortobildoj sur silko kaligrafis
poemojn peniktuŝe; aŭ kun Ĥajam' la perso
kaj, ok jarcentojn poste, kun Whitman aŭ Kavafis,
kun Lorca kaj Pessoa, virtuojoj de l' verso
ne truka kaj afekta, asepsa, malsincera,
sed sonore preciza en univers' mistera.

Ambaŭ poetoj certgrade forturniĝas de la aktiva esperantisteco. Iuj dirus, ke tiu estas signo de perdo de la komuna strebado al pli multnombra Esperanto-socio; aliaj dirus, ke en la matura movado ekzistas nun loko abunda por aktivuloj kaj por la ĝenerala amaso de aktivaj esperantistoj, eĉ ke movado fariĝis kulturo. Sed la rimenoj de la ideologio ankoraŭ tiras: ankoraŭ necesas deklari sian pozicion rilate la movadon, eĉ se temas pri ironia normalo.

⁵ Jorge Camacho, *Koploj kaj filandroj* (Novjorko: Mondial, 2009), pĝ. 75

“Revolucia normalo / brulas en mi ankoraŭ,” deklaras Miyamoto Masao en unu el siaj poemoj, *Iun tagon*, sed ĉio burĝe normalas ĉirkaŭ li:

Al mia kapo pretervenas rememoro:
“Stafeto eldonos mian poemaron.”
Tuj demandis Ŝia Edzina Moŝto:
“Kiom da tantiemo?”
Someras prema nubo ankaŭ ĉi-matene.⁶

El du-tri ekzemploj mi ne volas ĝeneraligi konkludon, nur diri, ke la fajnajn kontribuojn de Giŝpling kaj Camacho ebligis iliaj antaŭuloj, ke la Esperantisma fadeno (aŭ filandro?) ankoraŭ trakuras la nuntempan Esperanto-poezion, kaj ke ni feliĉas havi tiel talentajn poetojn inter ni. Ĉu poetoj sen popolo aŭ popolo kun poetoj? Certagrade, tamen, feliĉe, ĉi-lastata.

⁶ *Verkoj de Miyamoto Masao 3* (Japana Esperanta Librokooperativo, 1993), pĝ. 270.

Lernejo kaj naturo: novaj ebloj en epoko de ekologia krizo



Mark Fettes

Mark Fettes estas asista profesoro pri edukado en la universitato Simon Fraser, Vankuvero, Kanado, kie li okupiĝas pri la rilatoj inter lernejoj, komunumoj, indiĝenaj kulturoj, kaj naturo. Liaj esploroj fokusiĝas al la rolo de la fantazio, aŭ imagopovo, en la analizado kaj transformado de la lerneja instruado por fari ĝin pli vivproksima kaj gastama al homa, kultura kaj ekologia diverseco.

Resumo

Kvankam la plej fruaj lernejoj estis sendube subĉielaj, jam de longa tempo oni al kutimiĝis al la ideo, ke lernantoj pasigas plimulton de sia tempo en klasĉambro, izolite de la ventoj, pluvoj, sunbrilo, kaj aliaj kapricoj de la naturo. Nur lastatempe komencis populariĝi la ideo, ke tiu izolado malhelpas gravajn facetojn de la lernado. Sen kontakto kun la vivanta mondo, infanoj ne povas esplori sian ligitecon kun la naturo kaj kun la kompleksa reto de interrilatoj kiu ĉirkaŭas, trateksas, kaj subtenas homajn sociojn. Precipe nuntempe, kiam ankaŭ ekster la lernejo infanoj ne tiel ofte ludas subĉiele kaj pasigas malmultan tempon en vera naturo, edukistoj riskas plifortigi tiun tendencon de kultura fremdiĝo disde la ekologia bazo de nia ekzisto.

Kion fari, do? Tra la jardekoj oni eksperimentis diverslande kun lernejoj kaj lernprogramoj en kiuj la naturo rolas pli centre. La prelego revuos kelkajn el tiuj provoj, substrekante ilian potencialon sed ankaŭ la diversajn barojn kaj kaptilojn, kiuj subfosas ilian efikon aŭ malhelpas pli vastan adopton. Poste mi fokusiĝos al nova projekto en Brita Kolumbio, kiun mi helpis plani kaj lanĉi kunlabore kun lerneja distrikto proksime de Vankuvero. Temas pri “lernejo sen muroj”, en kiu sesdeko da infanoj pasigas siajn tagojn lernante en arbaroj, ĉe riverbordoj, en publikaj ejoj de la komunumo, kaj diversaj aliaj lokoj neligitaj al la oficiala lerneja sistemo. La tuta studplano de la jaro – la sama, kiun oni sekvas en tradiciaj klasĉambroj – disvolviĝas tiamaniere en proksima kontakto kun la natura kaj homa historio de la regiono.

La lernejo malfermiĝis (se tiel diri) en septembro 2011, tiel ke eblas raporti pri la unua jaro de funkciado, krom la antaŭaj tri jaroj de preparlaboroj. Esplorteamo observis kaj dokumentis la lernospertojn de la infanoj, la profesion disvolviĝon de la instruistoj, kaj la evoluantajn opiniojn kaj konstatojn de la gepatroj. Multas pozitivaj indikoj, sed ankaŭ profundaj defioj, se temas pri la adaptado de instrumentoj kaj pritaksado al tia “surloka” lernado. Sekvos kelkaj konkludoj pri la plej prioritataj temoj por plia esplorado kaj praktika evoluigo, kaj konsiloj por tiuj, kiuj volus stimuli similajn eksperimentojn en aliaj lokoj tra la mondo.

Schooling and nature: New possibilities in an era of ecological crisis

Summary

Although the earliest schools were certainly located in the open air, it has long been taken for granted that school-age learners spend most of their time in classrooms, insulated from the wind, rain, sunshine, and other whims of nature. Only recently has the idea begun to spread that such insulation hinders important aspects of learning. Lacking contact with the natural world, children are unable to explore their connectedness with nature and with the complex network of relationships that surrounds, interweaves with and supports human societies. In the present day in particular, when children play less often out of doors and spend little time in genuinely natural settings, educators run the risk of reinforcing this cultural tendency towards alienation from the ecological basis of our existence.

So what is to be done? Over the decades there have been experiments in a number of countries with schools and programs in which nature plays a more central role. A few of these attempts will be reviewed in the lecture, with an emphasis on the positive potential of such efforts, but also on the various barriers and traps that undermine their impact or stand in the way of more widespread adoption. Subsequently, the talk will focus on a new project in British Columbia, Canada, which I helped to plan and launch in collaboration with a school district outside of Vancouver. This is a “school without walls”, in which some 60 students spend their days learning in woods, on riverbanks, in municipal buildings, and in various other places unconnected to traditional school infrastructure. The entire curriculum for the year – the same as is taught in traditional classrooms – thus unfolds in close contact with the natural and human histories of the area.

The school opened (so to speak) in September 2011, so that it is possible to report on its first year of operation in addition to the prior three years of preparation. A team of researchers has observed and documented the learning experiences of the children, the professional development of the teachers, and the evolving opinions and observations of the parents. Positive experiences and indications abound, but so do significant challenges where the adaptation of teaching methods and the assessment of learning “in place” are concerned. A few conclusions will be drawn as to the most urgent priorities for further research and practice, and advice will be offered to those who would like to encourage similar experiments in other places around the world.

Ecole et nature: nouvelles possibilités dans une époque de crise écologique

Résumé

Alors que les écoles des premiers temps étaient sans doute à ciel ouvert, cela fait déjà longtemps que l'on s'est fait à l'idée que les élèves passent le plus clair de leur temps dans une salle de classe, à l'abri du vent, de la pluie, du soleil et autres caprices de la nature. Ce n'est que récemment qu'a commencé à se populariser l'idée selon laquelle cet isolement empêche d'importantes facettes de l'apprentissage. Sans contact avec le monde vivant, les enfants ne peuvent approfondir leurs liens avec la nature et avec le réseau complexe d'interrelations qui entoure, tisse et soutient les sociétés humaines. À l'heure actuelle surtout, où même hors

de l'école, les enfants n'ont pas si souvent l'occasion de jouer en plein air et passent bien peu de temps dans la nature véritable, les éducateurs risquent de renforcer cette tendance à l'aliénation culturelle par rapport au fondement écologique de notre existence.

Que faire, donc ? Au cours des décennies, on a mené dans divers pays des expériences d'écoles et de programmes pédagogiques dans lesquels la nature joue un rôle plus central. La conférence passera en revue quelques-unes de ces tentatives, en soulignant leurs potentialités, mais aussi les différents obstacles et pièges qui minent leur efficacité ou en empêchent une adoption plus large. Je me concentrerai ensuite sur un nouveau projet que j'ai aidé à élaborer et à lancer en Colombie Britannique, en collaboration avec un district scolaire des environs de Vancouver. Il s'agit d'une « école sans murs », dans laquelle une soixantaine d'enfants passent leurs journées à apprendre au milieu des forêts, au bord des rivières, dans des lieux publics de la commune, et en divers autres lieux sans rapport avec le système scolaire officiel. Tout le programme d'études de l'année, identique à celui appliqué dans les salles de classe traditionnelles, se déroule ainsi en contact étroit avec l'histoire naturelle et humaine de la région.

L'école a ouvert (si l'on peut dire) en septembre 2011, de sorte qu'il est possible de faire le bilan de sa première année de fonctionnement, sans compter les trois années précédentes de préparation. Une équipe de recherche a observé et documenté les expériences d'apprentissage des enfants, le développement professionnel des enseignants, et l'évolution des opinions et des constats des parents. Les indications positives abondent, mais aussi de profonds défis quand il s'agit d'adapter les méthodes d'enseignement et d'évaluation à une telle forme d'apprentissage « sur le terrain ». Suivront quelques conclusions sur les thèmes les plus prioritaires pour l'extension et l'évolution pratique de l'expérimentation ainsi que des conseils pour ceux qui voudraient initier de semblables expériences dans d'autres lieux à travers le monde.

Trường học và thế giới tự nhiên: những khả năng mới trong kỷ nguyên khủng hoảng sinh thái

Tóm tắt

Mặc dù các trường học đầu tiên là trường học ngoại thiên nhưng đã từ rất lâu người ta đã quen với quan niệm rằng học sinh dành nhiều thời gian trong lớp học hơn là tiếp xúc với thế giới tự nhiên như gió, mưa, nắng và các biến đổi khác của thiên nhiên. Chỉ đến thời gian gần đây người ta mới nhận ra rằng sự cô lập đó chính là rào cản lớn nhất đối với nhận thức của học sinh. Không được giao tiếp với thế giới xung quanh sẽ làm cho trẻ không thể khám phá được mối liên hệ của chúng với môi trường xung quanh cũng như các mối quan hệ phức tạp khác của thế giới bên ngoài và xã hội con người. Đặc biệt ngày nay, khi mà trẻ không còn được thoải mái vui chơi ngoài trời và chỉ dành rất ít thời gian cho thế giới tự nhiên thực sự, thì các nhà giáo dục lại có cơ phải chịu sự rủi ro làm cho xu hướng ngoại lai hóa nền văn hóa mạnh lên, tách rời khỏi nền tảng sinh thái của cuộc sống của chúng ta

Vậy chúng ta phải làm gì? Qua nhiều thập kỷ, người ta đã thí nghiệm chương trình giáo dục mới với vai trò trung tâm là thế giới tự nhiên ở nhiều trường học tại nhiều quốc gia. Bài thuyết trình này sẽ điểm lại một vài chương trình trong số các thử nghiệm đó, cả những thuận lợi và hạn chế của chúng. Sau đó tôi xin trình bày về dự án mới ở British Columbia, một dự án mà tôi đã giúp lập kế hoạch và khai trương ở nhiều trường học xung quanh Vancouver. Dự

án với tên gọi “Nhà trường không tường ngăn” đã thử nghiệm với 60 trẻ vừa học trong rừng, bờ sông, các địa điểm công cộng và các địa điểm khác mà không hề liên quan gì tới hệ thống trường học chính quy. Chương trình học hoàn toàn giống với chương trình học truyền thống, nhưng lại được phát triển trong môi trường gần gũi với thiên nhiên và lịch sử con người ở chính vùng đó.

Trường học mở cửa (nếu có thể gọi như vậy) vào tháng 9 năm 2011, vì vậy tại thời điểm hiện tại, tôi có thể tổng kết về năm học đầu tiên của trường, ngoài 3 năm cho công tác chuẩn bị. Chúng tôi đã cử một đội chuyên trách việc đánh giá, ghi chép lại các trải nghiệm của học sinh, sự phát triển chuyên môn của giáo viên cũng như những quan điểm và đánh giá của phụ huynh học sinh. Có nhiều dấu hiệu tích cực, nhưng cũng có những thách thức sâu sắc liên quan đến việc thích ứng các phương pháp dạy và đánh giá với việc học “tại thực địa” này. Tiếp theo là một vài kết luận về những chủ đề ưu tiên nhất cho việc phát hiện và phát triển kỹ năng thực hành, và những lời khuyên cho những ai muốn thực hiện các cuộc thử nghiệm tương tự ở những nơi khác trên thế giới.

Lernejo kaj naturo: novaj ebloj en epoko de ekologia krizo

Rolo de la naturo en la homa lernado

Estas malfacile por ni nuntempuloj pensi ekster la kadro de la tradicia lerneja sistemo. Memoru, ke preskaŭ ĉiu el ni pasigis pli ol dek mil horojn de la infanaĝo en lernejoj kaj klasĉambroj. Laŭ la populara ĵurnalisto de ideoj Malcolm Gladwell, aŭtoro de libroj kiel *Outliers* kaj *Blink*, dek mil horoj reprezentas la tempon bezontata por fariĝi fakulo sur iu kampo de la homa scio. Do, *ni ĉiuj estas fakspertaj lerneĵanoj*. Niaj imagoj pri lernado kaj instruado estas profunde mulditaj de la sidado ĉe skribotabloj, la soleca plenumo de tedaj skribaj taskoj, la silenta aŭskultado de instruistaj klarigoj, kaj tiel plu.

Necesas do unue rekonscii, ke tiu modelo de homa lernado estas io tre nova, radikala, eĉ stranga, laŭ la ĝeneralaj fluoj de la homa historio. La modernan lernejan sistemon pioniris Prusio fine de la 18a jarcento; tie oni unue eksperimentis pri ĝenerala deviga edukado, nacia studprogramo, naciaj ekzamenoj, kaj faka trejnado de instruistoj. La racieco kaj universaleco de tiu sistemo tre konvenis al la temperamento de la epoko post la usona kaj franca revolucioj, kaj iom post iom disvastiĝis tra la eŭropaj landoj kaj iliaj kolonioj. Kvankam oni ankaŭ multe kritikis tiun sistemon kaj provis modifi ĝin laŭ diversaj manieroj, ĝi restas la baza modelo de publika edukado pli-malpli ĉie en la mondo.

Apenaŭ necesas substreki por ĉi tiu publiko, ke tiu modelo ne estas kulture neŭtrala, sed fakte baziĝas sur sufiĉe specifa mondrigardo de mezkleraj urbanoj el la regantaj klaso kaj etno. Tial, ekzemple, la lingvo de instruado estas plej ofte la nacia lingvo (aŭ unu el la naciaj lingvoj, en oficiale plurlingva lando). Aliaj lingvoj estas foje tolerataj, sed preskaŭ neniam ludas kernan strukturan rolon en la instruado. Ne gravas kiom multlingva kaj multdialekta estas la socia kunteksto, la lernejo havas sian propran logikon kiu tendencas al unuformeco ene de la limoj de ŝtato aŭ alia politika unuo.

Tiu tendenco de la lernejo distanciĝi de la ĉirkaŭa medio validas ankaŭ se temas pri la naturo. Se oni pensas pri la klasika klasĉambro, kun ĝiaj rangoj de tabloj kaj seĝoj, ĝiaj fermitaj fenestroj kaj artefarita lumo, ĝi estas evidente tre homfarita spaco. Eble tie kreskas iu planto en potoj, eble oni foje vidas akvarion aŭ simile, sed ĝi estas tamen ĝenerale kaj emfaze *nenatura* loko. Kaj tio validas ankaŭ grandparte pri la eksteraj spacoj de la lernejo, kie plej ofte regas ludterenoj kaj asfaltitaj kortoj, kaj arboj kaj plantoj nemalofte forestas entute. Kiel minoritataj lingvoj kaj kulturoj, tradicie la naturo estas en plej bona kazo *tolerata*, kaj en la studprogramo ĝi okupas nur tre marĝenan lokon.

En ĉi tiu prelego, ni rigardos al kelkaj provoj ŝanĝi tiun situacion en la lasta jarcento. Plej interesos nin, kion ni povus nomi “edukaj movadoj”, kiam multaj lernejoj kaj instruistoj diverslande organiziĝas sub komuna etiketo aŭ konceptaro. Tiuj movadoj alprenas tre diversajn formojn, baziĝas sur malsamaj filozofioj, kaj fakte havas malsamajn celojn. Mia intenco ne estas argumenti por unu aliro aŭ alia, sed montri al vi, kiel kompleksa kaj defia estas tiu rilato homo-naturo en la kunteksto de la formala edukado. En la dua parto de la prelego, mi priskribos por vi lernejan eksperimenton, en kiu mi mem partoprenas kiel esploristo. Tio donos okazon por rigardi de pli proksime, kiel evoluas tiuspecaj iniciatoj en la praktiko. Gravus lerni de tiaj kazoj, ĉar kredeble ni troviĝas nun ĉe la sojlo de amasa eksperimentado pri pli naturproksimaj edukistemoj, responde al la akriĝanta ekologia krizo kaj al profundiĝanta konscio pri la rolo de lernejoj en ĝia disvolviĝo.

“Plenaeraj lernejoj” – ekde 1904

La unua granda movado por malfermi la lernejojn al la naturo havis radikojn pli kuracajn ol edukajn. En 1904, la germana kuracisto Bernhard Bendix kunlaboris kun la instruisto Hermann Neufert por fondi la tiel nomatan Waldeschule, aŭ arbaran lernejon, en Charlottenburg apud Berlino. La celgrupo estis infanoj ĉe kiuj oni diagnozis la unuajn simptomojn de tuberkulozo; oni kredis, ke ili havos pli da ŝancoj resaniĝi, se ili pasigos la tutan tempon en la freŝa aero de la arbaro. La eksperimento disvastiĝis tre rapide: oni malfermis similajn lernejojn en Belgio samjare, en Svislando, Anglio, Italio kaj Francio en 1907, en Usono en 1908, en Hungario en 1910, kaj en Svedio en 1914. Post la unua mondmilito, tiuj disaj iniciatoj kuniĝis en veran movadon kun propraj asocioj kaj kongresoj (la lasta okazis en 1956) kaj interesaj eksperimentoj pri arĥitekturo.

Tamen, la fokuso de tiuj plenaeraj lernejoj evidente restis ĉe la homoj, ne ĉe la naturo. Se oni rigardas la fotojn, oni vidas jen lernantojn arigitajn en duonrondo ĉirkaŭ la instruisto, jen infanojn kiuj vigle marŝas por ekzerci la korpon, jen kuracistojn kiuj kontrolas la fizikajn efikojn de tia reĝimo. Krome, kun la paso de la tempo, la koncepto evoluis al lernejoj kies klasĉambroj ja estas malfermitaj al la ekstero, sed tamen restas ĉambroj. Tiaj lernejoj ankoraŭ ekzistas en diversaj landoj, ekzemple en Fendalton, Novzelando, aŭ en Schoten, Belgio. En aliaj kazoj, la lernejoj ankoraŭ portas la nomo “plenaera” sed tute perdis la originan koncepton, kvankam ili ĝenerale plu okupiĝas pri malsanemaj infanoj; tiaj estas ekzemple la lernejoj en Roterdamo, Nederlando, kaj en Durbano, Sudafriko.

Tiu ĉi evoluo ilustras ĝeneralan tendencon en la lerneja sistemo. Kiam lanĉiĝas iu nova iniciato, ofte komence ĝi estas tre klare distingita de la antaŭa praktiko. Kutime ekzistas unu fokusa ideo pri tio, kion oni volas ŝanĝi – ekzemple, ĉi-kaze, ke la infanoj pasigu la lernejan tempon ekstere en la plena aero. Okazas multe da diskutoj kaj planado ĉirkaŭ tiu ĉefa celo. Sed multon oni *ne* reripensas. En la plenaeraj lernejoj oni daŭre instruis matematikon, sciencon, lingvojn ktp en pli-malpli la sama stilo, kiun oni uzis en tradiciaj lernejoj. Kaj ĉar tiu tradicia pedagogio ne *bezonas* plenaerecon, la daŭripovo de la reformo dependas esence de eksteraj faktoroj. Post kiam la tuberkulozo renkontis draste pli efikan kuracilon en la formo de streptomicino (1946), la plenaeraj lernejoj iom post iom transformiĝis en ordinarajn lernejojn, aŭ simple malaperis. Tiel estas pri edukreformoj ĝenerale: ŝanĝo eblas, kiam socia bezono koincidas kun proponata solvo, sed nur tiel longe, ke oni enmetas energion en la sistemon de ekstere. Kiam malaperas la energifonto, la sistemo pli aŭ malpli rapide drivas en sian antaŭan staton.

Medikonscia edukado – ekde 1970

Tra la periodo de la plenaeraj lernejoj, ekzistis ankaŭ movado por t.n. “natur-studado”, kiu emfazis la kvalitajn diferencojn inter lernado el libroj en klasĉambro kaj la lernado el propraj spertoj en la naturo. Ĝi estis tamen konsiderata nur kiel unu aspekto de la lernprogramo, ne kiel la bazo de tuta lerneja filozofio. Nur fine de la sesdekaj jaroj, kadre de ĝenerala ondo de socia konsciiĝo pri mediaj problemoj, oni komencis paroli pri “medikonscia edukado” kiel pli vasta koncepto. En 1970 Unesko kunvokis t.n. “laborkunsidon” en Nevado, Usono, kiu difinis medikonscian edukadon por inkluzivi konceptojn, valorojn, decidkapablon, kaj regadon de la propra konduto en la rilato homo-naturo. Pere de la UN-sistemo kaj diversaj internaciaj neregistaraj organizoj, tiuj ideoj rapide disvastiĝis; fine de la 70aj jaroj, multaj landoj oficiale apogis medikonscian edukadon kadre de la ŝtata lerneja sistemo.

Kvankam “medikonscia edukado” estas sufiĉe ĝenerala termino kiu povas kovri grandan gamon de praktikaj agadoj, plej ofte tiuj agadoj ne esence ŝanĝas la formon kaj organizon de la lernejo. Mi donos du ekzemplojn el mia hejmlando Kanado. Ĉe ni la edukado estas ĵaluze gardata provinca respondeco, kaj vi devas kompreni, ke “provinco” estas simple nia termino por unu el la dek aŭtonomaj gubernioj en la kanada federacio.

En Ontario, provinco kun dek milionoj da loĝantoj kaj areo pli granda ol la kombino de Francio kaj Hispanio, ekzistas ampleksa reto de t.n. “Eko-lernejoj” (komprenu: ekologiaj lernejoj). Sonas bele, ĉu ne? Kaj la celoj de la eko-lernejoj estas tute laŭdindaj: malpliigi energiuzadon, minimumigi la forĵetaĵojn, pliverdigi la lernejterenon, kaj plibonigi la ekologian komprenon de la instruistoj kaj lernantoj. La kunordigantoj de la reto asertas, ke per tiaj agadoj la lernantoj povas plenumi la ĉefan parton de la provinca medikonscia studprogramo.

Evidente, kompare kun la plenaeraj lernejoj, la fokuso ja moviĝis iom pli malproksimen de la homo. Nun oni koncentriĝas al la efikoj de la homa konduto sur la medion, ĉefe kiam tiu konduto povas noci la naturon, ĉu tuj apude (se temas pri solidaj forĵetaĵoj), ĉu pli malproksime (se temas pri malpurigado de akvo), ĉu je tergloba nivelo (se temas pri klimatsanĝo). Ankaŭ la naturo mem ricevas iom da rekono, ĉefe en la formo de arboj plantitaj por doni ombron kaj helpi pri energikonservado. Sed pri intima kompreno de la naturo oni ne povas paroli. La lernado daŭre okazas ĉefe en klasĉambroj, la studprogramo estas daŭre fokusita al tekstoj anstataŭ spertoj, kaj la lerneja modelo estas tute sama, ĉu temas pri urba lernejo en Toronto, rura lernejo en kampara urbeto, aŭ indiĝena lernejo en norda arbaro. La vizio estas tiu de industria homo, por kiu la naturo estas io “ekstera”, resursa bazo por la homa vivado kaj ne multe pli.

En Brita Kolumbio, mia hejmplinco, ni ne havas tian reton de eko-lernejoj, sed la Ministerio pri Edukado stiras diversajn iniciatojn kun simila tendenco. Ekzemple, oni havas programojn por “daŭripovaj lernejoj” (temas pri energikonservado), “verdaj olimpikoj” (konkurso pri kreaj solvoj al lokaj medi-problemoj), “arboj por morgaŭ” (verdigo de publikaj spacoj) kaj tiel plu. Denove, temas ne pri fundamenta reformo de la lerneja sistemo, sed pri mildigo de ĝia naturfremdeco. Iomete pli radikala estas ministeria dokumento pri “medikonscia lernado kaj lernado per spertoj” kiu instigas la instruistojn ligi la tutan studprogramon al “kompreno, aprezo, respondeco kaj etiko” pri la naturo. Sed tiuj preskriboj estas sufiĉe svagaj, kaj kiam okazas pli radikala medikonscia edukado, plej ofte temas simple pri la agado de unuopaj instruistoj en lernejoj alirilite tradiciaj.

Per tiuj ekzemploj mi volas ilustru duan regulon pri eduksistema ŝanĝo: lernejo estas kultura realaĵo, ne nur teknika rimedo kiun oni povas senĝene adapti al siaj bezonoj. Pensu interalie pri la faktoj, ke la infanoj kutime pasigas ĉ. ses horojn tage en proksima kontakto unu kun la aliaj; ke la instruistoj devas organizi la konduton de la infanoj dum tiuj ses horoj; ke la infanoj venas el diversaj familiaj kaj kulturaj fonoj, kiujn la instruisto nur parte konas, se entute; ke lernado ne estas nur unuopula afero, okazanta interne de la kapo, sed ĝi estas ankaŭ profunde socia kaj kultura, fizika kaj emocia; kaj vi komprenos, ke la enhavo de lerneja tago estas kunkreaĵo de la lernantoj, la instruistoj, la gepatroj, la lernejo kiel institucio, la ĉirkaŭaj komunumoj, la registara politiko, la amaskomunikiloj ktp.

Ĉiuj ŝanĝoj en la eduksistemo devas trovi sian lokon en ĉi tiu kompleksa ekologio. Ju pli specifa kaj limigita la ŝanĝo, des pli bonaj estas la ŝancoj, ke la sistemo povos akcepti ĝin; sed por tio oni evidente pagas prezon, nome, ke nenio vere grava ŝanĝiĝos! Oni povus eĉ argumenti, ke nia nuna lerneja sistemo evoluis al stato maksimume rezista al profunda ŝanĝo, kiu kapablas aktori memkritikon kaj evoluemon sed fakte transformas ĉion en varianton de la sama baza modelo. Tiel, medikonscia edukado kutime alprenas formojn de “studunuoj”,

“projektoj”, “esplor-ekskursoj” kaj simile, ĉar tiuj postulas tempe limigitan engaĝon de instruistoj kaj lernantoj kaj lasas la ceteran studprogramon netuŝita.

Arbaraj lernejoj – ekde la 90aj jaroj

La medikonscia edukado havas radikojn esence politikajn kaj socikritikajn; tial ni ne miru, ke ĝia disvolviĝo kondukis en direktoj relative homcentraj. Por kompreni alternativan tendencon, kiu malrapide disvastiĝas en la lastaj dudek jaroj el la nordaj eŭropaj landoj, oni devas turni sian atenton al la *ontologiaj kaj hermeneŭtaj* dimensioj de la edukado. Tiuj estas neoftaj vortoj en ĉiutaga konversacio, sed eblas ilin klarigi sufiĉe koncize. Se ni parolas pri edukado el ontologia vidpunkto, ni demandas, *kia* estas la edukita homo – kiel li aŭ ŝi perceptas, sentas, agas, rilatas al si mem kaj al aliaj, kaj kompreneble, ĉi-kuntekste, ankaŭ al la naturo. Temas do pri aliro multe pli vasta kaj tuteca ol demandi nur, kion tiu homo scias aŭ kapablas praktike realigi. Kaj se ni parolas pri edukado el hermeneŭta vidpunkto, ni demandas, kiel la edukita homo venas en pli profundan komprenon pri la mondo – kiel la rilato homo-mondo povas fariĝi pli intima kaj reciproke riĉiga. El hermeneŭta perspektivo, ne havas sencecon paroli pri sciado de nur unu flanko, kvazaŭ la homoj starus tute aparte de la naturo (ekzemple) kaj rigardus ĝin de ekstere. Male, oni devas esplori, kiel la homa kompreno de la naturo radikas en nia *partopreno* en ĝi.

Oni trovas spurojn de tiu filozofio en la tradicio de “naturstudado” menciita pli frue, kaj aliajn spurojn en diversaj eksterlernejaj programoj por eduki infanojn subĉiele (en arbaroj kaj montaroj, surmare, ĉe farmbienoj k.s.). Tamen nur en la lastaj dudek jaroj komencis kreski vera eduka movado bazita sur tiu vidpunkto. En Norvegio kaj Danio, kie aperis la plej fruaj studoj ĉi-temaj, oni nomas tiun aliron “uteskole” respektive “udeskole”, proksimume “ekstera lernejo;” en Britio, kie ĝi ekdisvastiĝis en la lastaj dek jaroj, oni nomas ĝin “arbara lernejo.” Kvankam ne nepre temas pri arbaroj, ĉi tiu termino estas certe pli bildiga, kaj do mi adoptis ĝin por Esperanto.

Mi devus klarigi, ke la aktivuloj de tiu movado ĝenerale ne rekonas la vortojn “ontologia” kaj “hermeneŭta”. Ili simple dividas la konvinkon, ke infanoj lernas ion tre gravan per regula persona kontakto kun arbaroj kaj aliaj naturaj lokoj. Parte temas pri t.n. disvolviĝo de la personeco kaj akirado de socia kapableco; parte temas pri evoluigo de la lernkapablo per libera esplorado kaj malkovrado; sed tiuj estas nur limigitaj fenestroj al io pli kompleksa kaj tuteca, kiun la adeptoj de la arbaraj lernejoj mem malfacile priskribas aŭ difinas.

La skandinaviaj landoj kiel Norvegio kaj Danio tradicie lasas multe da libero al la instruistoj elekti siajn instrumentojn kaj interpreti la studprogramon laŭ la propraj ideoj. Do, ia plioftigo aŭ pliintensigo de kontaktoj kun la naturo povas okazi sen granda bruado aŭ teoriado. Tiel efektive okazas; en lastatempa studo pri la danaj lernejoj, ekzemple, la esploristoj miris, ke 28% de la respondintaj lernejoj jam praktikas ian formon de “udeskole” sen aparta kuraĝigo aŭ kunordigado je nacia nivelo. La esploristoj ankaŭ malkovris, ke tiu praktiko disvastiĝas pli rapide ekde 2000 – neniu scias certe, kial. Tamen ankaŭ en 2000 lanĉiĝis la internacia kampanjo “Lernado en Arbaro” de la Fondaĵo por Medikonscia Edukado, kiu nun listigas 21 landojn kiel membrojn, do evidente ruliĝas iu pli vasta ondo de interesiĝo pri arbara edukado en vasta senco.

La plej bone dokumentita evoluo okazis en Britio. La unua iniciato venis de la sudokcidenta altlernejo Bridgwater College, kies specialistoj pri fruaĝa edukado inspiriĝis per la dana modelo de *udeskole* dum studvizito en 1993. Bridgwater fondis la unuan britan arbaran lernejon, por infanoj de la antaŭlerneja aĝo, kaj kreis sian propran trejnprogramon pri arbaraj lernejoj, nun en tri niveloj. En la postaj jaroj la koncepto rapide disvastiĝis tra tuta Britio.

La unuaj universitataj studoj kaj registaraj raportoj ekaperis ĉirkaŭ la jaro 2005, kiam ekzistis almenaŭ kvindek de tiaj lernejoj; nuntempe ekzistas pluraj centoj. Tutlandan kunordigan rolon ludas la Arbar-Edukada Iniciato, kun apogo de naŭ naturkonservaj organizoj. Ne malpli ol dek tri diversaj instancoj proponas instruistan trejnadon por tia specialiĝo.

Kiel en ĉiuj movadoj de tiu speco, ekzistas verŝajne sufiĉe granda gamo de variantoj de arbara edukado. Tamen, la kerna koncepto estas tio, ke la infanoj pasigu plurajn horojn en la naturo tre regule (almenaŭ unu fojon semajne) kaj tra la daŭro de tuta jaro por sperti la pason de la sezonoj. La aperintaj studoj ĝenerale indikas, ke la infanoj tre ĝuas eksterajn ludojn, konstruadon de fortikaĵoj kaj kaŝejoj, faradon de fajroj kaj simile; ke ili fariĝas pli lertaj kaj memregaj fizike kaj emocie; kaj ke ilia konscio kaj aprezo pri la naturo kreskas. Tamen verdire mankas studoj, kiuj sukcesas penetri sub la plej evidentajn signojn de engaĝo, por esplori kiel ŝanĝiĝas la memkompreno kaj interrilatado de la infanoj en la naturo. En la plej lasta studo pri tiu temo, kiu aperis en februaro ĉi-jare, la esploristoj mem komentas, ke ili sentis “maltrankvilon kaj frustriĝon” pro la malfacileco prezenti “pli riĉan kaj detalan bildon” de la spertoj de la infanoj.

Lerneja eksperimento en Brita Kolumbio – ekde 2011

Nun venis la tempo por priskribi lernejan eksperimenton pri kiu mi mem persone okupiĝas. Temas pri “lernejo sen muroj”, kiun mi helpis plani kaj lanĉi kunlabore kun lerneja distrikto tridekon da kilometroj ekster Vankuvero, en la rapide kreskanta urbo Maple Ridge. Ĝi prezentas la kulminon de la arbarlerneja koncepto en tio, ke la tuta studplano de la jaro – la sama, kiun oni sekvas en tradiciaj klasĉambroj – disvolviĝas en arbaroj, ĉe riverbordoj, en publikaj ejoj de la komunumo, kaj diversaj aliaj lokoj neligitaj al la tradicia lerneja infrastrukturo.

La iniciato krei tian lernejon venis de du flankoj. En la distrikto, oni konsciis pri la fakto ke diversaj studentoj simple ne bone fartas en tradiciaj klasĉambroj, kaj oni kredis – simile kiel en la dana *udeskole* – ke pli da kontakto kun la naturo povus helpi ilin. En la universitato, ni interesiĝis pri la ideo kunligi la tutan studprogramon al la natura kaj homa historioj de la regiono, kaj ankaŭ al planado por la estonteco – t.n. daŭripova planado. Dum niaj unuaj interparoloj, la koncepto plivastiĝis al lernokomunumo, en kiu kunrolu la gepatroj, diversaj partneraj organizoj el la regiono, reto de instruistoj tra la distrikto, kaj universitataj esploristoj kaj studentoj.

Niaj diskutoj kondukis al principaro, kiu restas gvida dokumento por la tuta projekto. Jen ĝi, tre resume:

Loko kaj Komunumo: lernado enloka, priloka, perloka – grandparte ekstere, kaj en dialogo kun plej diversaj lokanoj.

Naturo, Ekologio kaj Daŭripovo: aŭskultado de la pli-ol-homa mondo, tra sezonoj kaj jaroj, por lerni kiel vivi pli daŭripove en ĉi tiu specifa loko.

Esploroj kaj Eblecoj: evoluigo de multaj vojoj de lernado kaj instruado, multaj formoj de scio, kun partopreno de ĉiuj.

Interdependeco kaj Bonfarto: kultivado de rilatoj kaj sistemoj kiuj subtenas la bonfarton de ĉiuj, ne nur individue sed familie, komunume, loke.

Imagipovo kaj Integrado: enplekto de la imagopovo en la lernado, integrado de la lernado trans studobjektoj kaj fakoj.

El tiuj principoj vi vidos, ke ni ne ambicias ŝanĝi nur la studprogramon, nek la situon de la lernado, kiel la aliaj reformoj kiujn mi priskribis. Ni celas reŝanĝi ĉion el loka perspektivo. Temas do pri plej radikala interpreto de la koncepto de arbara lernejo.

Kun universitata kolego mi verkis esplorproponon pri tiu projekto en aŭtuno 2008, kaj submetis ĝin al nacia programo por subteni kunlaborajn esplorojn inter universitatoj kaj komunumaj organizoj. Tiu procezo daŭris pli ol jaron, ĉar ni konkursis kontraŭ multaj aliaj projektoj en sinsekvaj etapoj, sed en la fino ni ricevis la monon – unu milionon da dolaroj por kovri kvin jarojn da esploroj. La akcepto venis komence de 2010. Dek monatojn poste, post multe da preparlaboro, la loka lerneja konsilio formale aprobis starigon de tia lernejo en la sekvonta lernojaro. Oni komencis registri lernantojn en februaro 2011, dungis la instruistojn en majo-junio, kaj en septembro la lernejo komencis sian ekziston en arbara parko rande de Maple Ridge, kun sesdeko da infanoj inter la aĝoj 4-jaraj kaj 12-jaraj.

Spaco kaj tempo ne permesas eniri multajn detalojn de tiu unua jaro. Sed mi provos resumi por vi la ĉefajn atingojn, la ĉefajn malfacilaĵojn, kaj kelkajn finajn pensojn pri la signifo de ĉio ĉi por loka edukado en aliaj regionoj kaj kontinentoj.

Edukaj aspektoj

La lerneja distrikto mem nomis la projekton “environmental school”, t.e. “medikonscia lernejo” aŭ simple “naturlernejo”. En la praktiko, tamen, ĝi estis unuavice, kiel mi diris, *arbara* lernejo. La studprogramo baziĝis sur la fakto, ke ĉio okazis ekster klasĉambro, kaj plejparte subĉiele, en arbaro.

Rimarku, ke nenio en la gvidprincipoj de la lernejo postulas, ke ĉio okazu plenaere. Tio estis la decido de la lernejestro, kiu kompreneble ludas tre influan rolon ankaŭ en aliaj aspektoj de la lernejo. Ekzemple, li ankaŭ forte kontraŭas detalan antaŭplanadon de la studprogramo. Mi persone favoras iom da planado, ĉar tio helpas la instruistojn pli celkonscie gvidi la lernospertojn de la infanoj; sed mi ankaŭ bone komprenas la fontojn de lia opozicio, ĉar tro rigida sekvado de antaŭpreparita plano povas terure bremsi la engaĝiĝon kaj aŭtonoman pensadon de la infanoj. Ĉiukaze, tra la tuta jaro la studprogramon ĝenerale karakterizis minimuma antaŭplanado, kaj do la instruistoj multe improvizis, de semajno al semajno, tago al tago, kaj foje de horo al horo.

Improvizado povas esti sukcesa, se oni estas sufiĉe sperta aŭ havas apartan talenton por tio, kaj certe okazis sukcesoj per tiu metodo. Sed la sukcesoj estis limigitaj interalie pro tio, ke la instruistoj ne estis trejnataj pri tiuspeca plenaera pedagogio. Du estis spertaj instruistoj en tradiciaj lernejoj; la alia estis juna novico, kiu ne gvidis propran klason antaŭe kaj do ankoraŭ ne havis tre vastan pedagogian repertuaron. La anoj de la universitata esplorteamo fakte havis multe pli da spertoj pri tiuspeca alternativa pedagogio, sed estis praktike neeble transdoni multajn el tiuj spertoj en la kondiĉoj de la lerneja tago.

Jam antaŭ la malfermo de la lernejo ni parolis pri tio, ke necesus enplekti aliajn plenkreskulojn en la instruadon – homojn el la komunumo, kun specialaj scioj pri tiu aŭ alia loko, tiu aŭ alia faceto de la natura aŭ kultura historio de Maple Ridge, tiu aŭ alia instruebla praktiko, kaj tiel plu. Tio ja okazis iomete tra la jaro, ekzemple kiam la trejnisto de la kanada bicikloakrobata teamo organizis tutsemajnan lernadon por la infanoj sur la loka trejntereno. Tamen la improvizateco de la programo esence subfosis tiun intencon, ĉar kiel inviti eksterulon, se oni ne havas planon kiel uzi lin aŭ ŝin? Tiel, neeviteble, la instruado restis plejparte en la manoj de la instruistoj mem, kaj en tio la lernejo pli similis al tradiciaj lernejoj, ol eksterulo povus supozi.

Por la plej junaj infanoj, la 5- kaj 6-jaruloj, la sperto estis mirinda. Ili interesiĝis pri ĉio, ili ĝuis la eblon konstante aktivi korpe kaj mense, ili trovis sin kvazaŭ en familio kun pluraj zorgemaj gepatroj anstataŭ nur unu instruisto. Pli-malpli senescepte, la familioj de tiuj infanoj estis tre kontentaj pri la jaro. Por la pli aĝaj infanoj, la spertoj esti pli miksitaj. Kiel en la aliaj arbaraj lernejoj, ili ŝatis la ludojn, la konstruadon de fortikaĵoj, la kuiradon de komunaj manĝoj, la esplorado de la arbaro, la familiecan etoson. Aliflanke mankis al ili la kutimaj normoj de la lernejo, la senton de progreso, kaj eble ankaŭ la intelekta stimulo, kvankam tio ne estas ĉiama elemento en la lerneja sperto ĉiukaze!

Por la esplorteamo, la spertoj estis simile tre miksitaj. Ni ne antaŭvidis, ke la instruistoj kaj lernejestro metos tiel fortan enfazon sur la enarbarecon, kvazaŭ tio en si mem garantius edukan sperton. Ni ne antaŭvidis la konstantan improvizado, nek la reziston al eksplicita pritaksado de la lernatingoj de la infanoj. Kiel iu en la teamo komentis, ne estis ĉiam klare, ĉu temas pri eko-lernejo aŭ anti-lernejo.

Sed jen, tio estas interesa malkovro. Kredeble ankaŭ aliaj projektoj por proksimigi lernejon kaj naturon alfrontos similajn defiojn. La tradicia lernejo, kiel ni konstatis pli frue, estas kompleksa kultura realaĵo, en kiu multaj diversaj elementoj apogas unu la alian. Se oni volas radikale ŝanĝi tion, kiel scii, kiujn elementojn gardi, kiujn forĵeti? Neniu elekto estas facila, neniu vojo estas la sola kaj ĝusta vojo. Kvankam la detaloj estus malsamaj en ĉiu kazo, la konkurado inter disaj principoj kaj vizioj certe estos trovebla ĉie.

Kio kondukas nin al la sekva aspekto de la temo.

Sociaj-kulturaj aspektoj

Kial gepatroj enskribas siajn infanojn por tia lernejo? Pro diversaj motivoj, kaj ne nepre pro tio, ke la lernado okazas en arbaro. Pluraj familioj elektis la lernejon simple pro la alternativeco. Ne malofte iliaj infanoj havis tre malbonajn spertojn en pli kutimaj lernejoj, kaj ili estis pretaj provi ion ajn, kio ŝajnis promesi malsaman rezulton. Aliaj jam konis unu el la instruistoj aŭ la lernejestron kaj fidis ilian juĝon, aliaj pensis ke la lernejo traktos iliajn infanojn pli individuece, kaj tiel plu. Do, oni tute ne povas paroli pri komuna kredaro aŭ vizio, kiu karakterizus la familieron komence de la lerneja jaro.

Zorgi pri bona komunikado kaj komuna decidado en tiaj cirkonstancoj estis malfacila defio por la lernejo. Jam dekomence oni indikis al la gepatroj, ke ilia aktiva partopreno, pli ol kutime eblas en publika lernejo, estus tre bonvena. Kelkaj familioj, proksimume deko, vere kaptis tiun okazon kaj fariĝis aktivaj kontribuantoj; ekzemple, familio kiu posedas restoracian entreprenon en la urbo organizis varman tagmanĝon unu fojon monate, kiun la lernejoj mem pretigis, kuiris kaj disdonis (jes, meze de la arbaro!). Aliaj partoprenis en ardaĵoj pri la konceptoj de ekologia lernado, ekzemple, aŭ venis legi al la pli junaj infanoj dum la legohoro. Sed en tiu maniero iom post iom kreiĝis divido inter la plej engaĝitaj familioj, kiuj sentis sin kvazaŭ kavaliroj de la lernejo kaj volis defendi ĝin kontraŭ ĉiuj kritikoj, kaj aliaj familioj, kiuj havis foje tute pravajn kritikojn sed sentis ke oni ne pretas aŭskulti ilin. Tiel multaj kritikoj ne venis rekte al la instruistoj, sed nur malrekte pere de la esplorteamo, dum la lernejestro, ĉiam konscia pri la reputacio de la lernejo, ĝenerale evitis ĉiujn malfacilajn demandojn kaj prezentis tre idealan bildon en siaj publikaj elpaŝoj.

Kiel vi povas imagi, la esplorteamo mem, konsistanta el tri profesoroj kaj ses studentoj kaj doktoriĝintoj, alfrontis tiklajn etikajn demandojn pri sia rolo. Neniu sentas sin plene objektiva observanto: ĉiuj kovas esperojn pri la evoluo de la lernejo, konvinkojn pri la lernprioritatoj, simpatiojn al tiu aŭ alia familio, frustrigojn pri tiu aŭ alia maltrafita okazo. Sed kiugrade oni rajtas esprimi tiujn opiniojn, preni flankon en la diskutoj, kaj kiugrade oni devas stari flanke,

lasante al la instruistoj kaj gepatroj elnegoci la evoluon? Ni ne trovis simplan respondon al tiu demando, kaj devis navigi malfacilan vojon inter la rifoj de diversaj veroj kaj valoroj.

Ĉio ĉi montras al dua konstato: ke la rilato lernejo-naturo estas ne nur teknika demando, solvebla per spertaj profesiaj instruistoj laborantaj en la ĝustaj kondiĉoj; ĝi estas profunde *politika* demando. Fakte la edukado estas ĉiam interalie politika afero, entrepreno kiu profunde radikas en la konvinkoj, valoroj kaj potencrilatoj de la socio. Se per la lernejo ni volas kuraci la fremdiĝon de nia civilizacio disde la naturo, ni devas esti pretaj por malfacilaj intertraktoj kaj por reripensado de niaj tradicioj de decidado kaj gvidado. En nia lernejo, tia reripensado apenaŭ okazis ĝis nun. Tamen, en nia jarfina konsiliĝado kun la instruistoj kaj la lernejestro, ni interkonsentis pri kelkaj paŝoj al pli inkluziva decidprocezo, enplektanta la studentojn same kiel la gepatrojn. Ni vidos, kiel tio evoluos.

Kelkaj perspektivaj evoluoj

En ĉi tiu enkonduka prelego, ne eblis eniri multajn interesajn detalojn de la studprogramo en la lernejo, kiujn ni esperas signife pluevoluigi en la venonta jaro. Mi mencias nur tri, ligitajn inter si:

- En la kondiĉoj de plenaera lernado, la parola lingvo estas multe pli grava ol la skriba. Tradiciaj lernejoj dediĉas malmultan atenton al evoluigo de la parola arto. En nia lernejo, profesia buŝa rakontisto helpas al la infanoj, instruistoj kaj gepatroj plibonigi sian kapablon paroli kuraĝe, klare, kaj zorge, kun atento al la vortprovizo kaj la disvolviĝo de rakonta fadenado.
- Pro tio, ke multaj lern-okazoj prezentas sin spontane, dum la fluo de la tago, ofte ne eblas havi antaŭfiksitajn mezurilojn por pritaksi la progreson de la lernantoj. Anstataŭe, ni eksperimentas per t.n. lern-rakontoj, en kiuj la instruistoj (aŭ alia atestanto) priskribas la disvolviĝon de difinita lernosperto, petas komentojn de la gepatroj kaj aliaj, aldonas siajn takson kaj konsilojn por la lernanto, kaj el ĉio ĉi plibonigas sian kapablon reagi al estontaj okazoj. Tiu ĉi relative nova taksostategio, kiun oni pioniris en Novzelando, povus trovi vastan aplikon en aliaj arbaraj lernejoj kaj similaj projektoj.
- Tiujn du strategiojn ni intencas kunigi en parolajn diskutojn, fine de ĉiu tago, pri la lernospertoj de la antaŭaj horoj. En la tradicia lernejo, almenaŭ en Norda Ameriko, oni malmulte parolas pri la lernado aŭ la instruado kun la infanoj (aŭ eĉ, por diri la veron, inter la instruistoj). En nia lernejo, ni esperas ke eĉ la plej junaj infanoj komencos demandi sin: Kion mi lernas? Kiel mi povus lerni pli? Kaj kiel mi povus helpi la lernadon de aliaj?

Per tiuj ekzemploj, kiel per la antaŭaj konkludoj, mi esperas montri al vi, kiel kompleksa kaj interesa estas la rilato lernejo-naturo, kaj kiel profunda estas la defio, venki la naturfremdiĝon kiu kuŝas radike de la ekologia krizo. Mi ne dirus, ke tio estas neebla. Male, mi kuraĝigus vin ĉiujn esplori tiajn eblojn en viaj hejmlokoj. Parolu kun instruistoj, parolu kun lernejestroj kaj eduk-politikistoj, legu librojn, klerigu vin! Sed se iu diros al vi, ke tiu havas la solvon – ke ekzistas klara recepto, ke sufiĉas fari tion aŭ jenon – ne kredu lin aŭ ŝin! Ni paŝas sur novan, malfacilan teron.

Sed, kiel diris la Majstro: ni paŝo post paŝo, post longa laboro...

Lingvo, kulturo, literaturo



Li Shijun

Li Shijun (plumnomo: Laŭlum) naskiĝis en 1923, lernis Esperanton en 1939, laboris kiel instruisto de la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto en mezaj kaj superaj lernejoj, ĵurnalisto, tradukisto, vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, *La Mondo* kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo, estro de Ĉina Esperanto-Instituto, membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983, honora membro de UEA, honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj honora komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo. Verkoj esperantigitaj de li: *Aŝma* (epopeo), *Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang* (rakonto en versoj), *Aŭtuno en la printempo* kaj *Frosta nokto* (romanoj de Ba Jin), *Qu Yuan* (dramo de Guo Moruo), *Ĉe akvorando* (ĉina klasika romano), *Romano pri la tri regnoj* (ĉina klasika romano), *Pilgrimo al la Okcidento* (ĉina klasika romano), *Mirrakontoj de Liaozhai* (klasika novelaro de Pu Songling), *Noktomezo* (romano, ĉefverko de Mao Dun), *Kvar generacioj sub la sama tegmento* (romano de Lao She). Li verkis Esperantajn kurso-librojn por komencantoj kaj progresantoj, centojn da poemoj, noveloj, fabloj, eseoj kaj recenzoj, kiuj aperis en gazetoj en-kaj eksterlandaj, kompilis *Esperantan Vortaron por Lernantoj* ilustritan per preskaŭ 4000 versaĵoj por helpi la lernantojn, kaj lernolibrojn pri la traduka arto kaj literaturo de Esperanto. Pro siaj kontribuoj en kulturaj kaj literaturaj aktivadoj li ekde 1990 ĝuadas ŝtatan pension. Gajnis en 2003 la unuan premion de Fondaĵo Grabowski de UEA, gajnis premion de la Ĉina Tradukista Ligo pro sia kontribuo al la traduka kulturo en 2010, gajnis premion de ĈEL en 2011 pro sia kontribuo al la Esperanto-movado, kaj lia traduko *Ĉe akvorando* gajnis la premion OSIEK en 2011.

Resumo

Lingvo estas ne nur portanto de scioj kaj informoj, sed ankaŭ instrumento por pensi; ĝi estas la plej grava karakterizaĵo por distingi la homojn de la bestoj. Lingvo estas grava portanto de kulturo kaj mem estas grava konsistiga parto de la homa kulturo. Lingvo estas ankaŭ grava karakterizaĵo de la etnoj.

Kulturo estas spirita civilizacio kaj tre valora kreaĵo de la homoj. Per siaj kulturoj, la popoloj de la mondo formas multkoloran internacian kulturon, kies ekzisto kaj evoluo estas dezirinda. Por konservi tiun buntecon de la homa kulturo, ni devas klopodi por protekti la lingvojn kaj kulturojn de la popoloj, precipe tiujn de la malgrandaj etnoj.

Literaturo estas lingva arto kiu evoluigas kaj riĉigas la lingvojn. Literaturo estas grava konsistiga parto de kulturo. Per konservo kaj disvolvo de literaturo ni povas riĉigi la kulturon. Zamenhof alte taksis la literaturon kaj donis lernindan ekzemplon en kreado de la Esperanta literaturo. Per esperantigo de diversnaciaj literaturoj, ni riĉigas la literaturon de Esperanto kaj diskonigas la literaturajn trezorojn de la popoloj. Tio estas bona por kultura interŝanĝo kaj protekto de la kulturoj de la popoloj.

Language, culture, literature

Summary

Language is not just a carrier of knowledge and information but also an instrument of thought; it is the most important characteristic distinguishing humans from other animals. Language

is an important carrier of culture and is itself an important constituent part of human culture. Language is also an important characteristic of ethnic groups.

Culture is civilisation of the spirit and an extremely valuable human product. With their individual cultures, the nations of the world form a multicoloured international culture whose existence and development is desirable. To conserve the colourfulness of human culture we must endeavour to protect national languages and cultures, particularly those of smaller ethnic groups.

Literature is language art that develops and enriches languages. It is an important constituent part of culture. By conserving and developing literature we can enrich culture. Zamenhof put great value on literature and was exemplary in creating Esperanto literature. By translating into Esperanto the literatures of different nations we enrich Esperanto's literature and disseminate national literary treasures, which is good for cultural exchange and for protecting national cultures.

Langue, culture, littérature

Résumé

Une langue est non seulement porteuse de connaissances et d'informations, mais c'est aussi un instrument pour penser ; c'est l'élément le plus caractéristique qui permet de distinguer l'homme des autres animaux. Une langue est un important vecteur de culture et constitue en elle-même une partie importante de la culture humaine. Une langue est également une caractéristique importante des peuples.

La culture est une civilisation de l'esprit et une création humaine de grande valeur. Par leurs cultures, les peuples du monde forment une culture internationale multicolore, dont l'existence et l'évolution sont souhaitables. Pour conserver cette diversité de la culture humaine, nous devons nous efforcer de protéger les langues et les cultures des peuples, particulièrement celles des petits peuples.

La littérature est un art linguistique qui fait évoluer et enrichit les langues. La littérature est un important élément constituant de la culture. Par la préservation et le développement de la littérature, nous pouvons enrichir la culture. Zamenhof avait une haute idée de la littérature et il a donné un exemple à suivre en créant la littérature en espéranto. En traduisant en espéranto des œuvres littéraires issues de diverses nations, nous enrichissons la littérature de l'espéranto et faisons connaître au monde les trésors littéraires des peuples. Ce qui est bon pour l'échange culturel et la préservation de la culture des peuples.

Ngôn ngữ, văn hóa, văn học

Tóm tắt

Ngôn ngữ không chỉ là phương tiện chuyển tải kiến thức và thông tin, mà còn là công cụ suy nghĩ, nó là đặc điểm trọng yếu nhất để phân biệt con người và các động vật khác. Ngôn ngữ là phương tiện quan trọng để chuyển tải văn hóa, bản thân nó là một yếu tố quan trọng của nền văn hóa nhân loại. Ngôn ngữ cũng là một đặc điểm quan trọng của các dân tộc.

Văn hóa là nền văn minh tinh thần và sự sáng tạo vô giá của loài người. Bằng văn hóa của mình, con người trên toàn thế giới đã tạo ra nền văn hóa quốc tế đa màu sắc, mà sự tồn tại

và phát triển của nó là đáng ao ước. Để bảo vệ sự đa dạng, phong phú của nền văn hóa nhân loại, chúng ta phải nỗ lực hết sức để bảo vệ ngôn ngữ và văn hóa của từng dân tộc, đặc biệt là các dân tộc thiểu số.

Văn học là một nghệ thuật ngôn từ, góp phần làm giàu và phát triển các ngôn ngữ. Văn học là một thành phần quan trọng trong văn hóa. Bằng cách bảo tồn và phát triển văn học dân tộc chúng ta cũng khiến nền văn hóa trở nên phong phú. Zamenhof đã từng đề cao văn học và để lại rất nhiều tác phẩm văn học Quốc tế ngữ đáng để chúng ta học hỏi. Bằng việc Esperantohóa các tác phẩm văn học nổi tiếng thế giới, chúng ta đã và đang làm giàu thêm nền văn học Esperanto cũng như phổ biến kho tàng văn học. Điều đó đóng vai trò quan trọng trong việc giao lưu văn hóa và bảo vệ nền văn hóa của các dân tộc.

Lingvo, kulturo, literaturo

Estimataj kaj karaj gesamideanoj.

Vi ja scias, ke UEA havas sian strategion disvastigi Esperanton por protekti la lingvojn kaj kulturojn de la malgrandaj etnoj, en kunagado kun Unesko. Kiel veterana Esperanta batalanto kun sperto de 73 jaroj en lernado, instruado kaj laborado per kaj por Esperanto, hodiaŭ mi volas iom paroli pri tiu ĉi problemo. Mia parolo konsistas el tri partoj: lingvo, kulturo kaj literaturo.

1 Lingvo

Lingvo estas ne nur portanto de informoj kaj plej grava komunikilo de la homoj, sed ankaŭ instrumento per kiu ni pensas kaj esprimas niajn pensojn. La homoj konservas kaj transdonas la civilizaciajn fruktojn per lingvo, kaj lingvo estas la esenca karakterizaĵo por distingi la homojn de la aliaj animaloj; krome ĝi estas plej grava karakterizaĵo de la etnoj. Lingvo estas speco de socia fenomeno, kiu aperas kun la socio kaj evoluas kun ĝi.

Lingvo estas grava portanto de kulturo kaj ankaŭ grava konsistiga parto de la kulturo. Ĉu filozofio, astronomio, biologio, botaniko, fiziko, kemio, medicino, kaj ĉiuj aliaj sciencoj estas imageblaj sen lingvo? Ĉu poezio, romanoj, fabeloj, dramoj kaj ĉiuj aliaj literaturaj verkoj estas eblaj sen lingvo? Ne.

Lingvo por la homa socio similas al aero por la homa vivo. Ni vivas ĉiutage kun aero, tamen nur kiam aero mankas al ni en vivbezono ni sentas ĝian gravecon. Same tiel estas lingvo por la socio.

En nia mondo ekzistas miloj da lingvoj, kaj la diverseco de lingvoj malfaciligas la komunikadon inter la popoloj. Efektive oni povas renkonti malfacilojn ankaŭ pro ekzisto de dialektoj de lingvoj. Mi naskiĝis en Norda Ĉinio kaj migris al Sichuan-Provinco de Sudokcidenta Ĉinio en 1939 pro la invado de japana armeo al Ĉinio. Mi trovis malfacilojn en la vivo pro tio ke tie oni parolas alian dialekton de la ĉina lingvo. Ekzemple, en Norda Ĉinio ni nomas geknabojn *hajzi*, kaj ŝuon *ŝjezi*; sed en la Sichuan-a dialekto, oni nomas geknabojn *ŝjezi*, kaj ŝuon *hajzi*. Ankaŭ diferencis la parolmanieroj de la Sichuan-a dialekto. Foje, en kamparo nordulo perdis la orientiĝon kaj devis peti helpon de maljuna kampulo por ke li montru al li la vojon. La maljunulo pacience aŭskultis lian klarigon pri la bezono de lia helpo, kaj diris afable: “*Ŝjaŭ de lej*.”

Laŭvorte tiuj tri vortoj signifas “scias ja”, do la nordulo pensis ke sekvos lia klarigo pri la vojo. Sed la maljunulo silentis fininte tiun frazon. La nordulo devis ripeti sian demandon post momenta atendo pensante, ke la maljunulo scias la vojon. Sed la maljunulo ripetis sian respondon “*Ŝjaŭ de lej*” pli laŭte kaj iom malpacience, kvazaŭ la nordulo ne bone aŭdis lian respondon. La nordulo do petis, ke li diru al li la direkton kaj vojon. Tiam la maljunulo diris kolerete: “*La-go ŝjaŭ-de lej!*” Laŭvorte interpretite, tio signifas “kiu ja scias?!” Poste la nordulo informiĝis, ke “*ŝjaŭ de lej*” efektive signifas “ne scias” laŭ la kutima parolmaniero de tiu loko!

En la redakcio de *El Popola Ĉinio* laboris kaj suduloj kaj norduloj. Veterana esperantisto Tikos el la sudĉinia urbo Ningbo de Zhejiang-Provinco, parolis dialekton de Ningbo tute nekompreneblan por mi, kaj ofte ni devis interparoli en Esperanto.

La supraj ekzemploj montras al ni, ke ankaŭ la dialektoj de la lingvoj alportas malfacilojn en komunikado per la sama lingvo.

En 1952 vizitis Pekinon Islanda Kultura Delegacio, kies konsilanto s-ro Thobegur Thodarson estis fama verkisto kaj veterana esperantisto. Mi estis sendita al la delegacio por ĝin helpi kiel interpretisto laŭ peto de s-ro Thobegur Thodarson. Antaŭe mi neniam parolis kun fremdlandaj esperantistoj kaj nun mi timis, ke estos malfacile por mi kompreni la islandan samlingvanon pro diferencoj en prononcado kaj parolmaniero. Sed post kontakto kun s-ro Thobegur Thodarson mi konstatis, ke tute ne ekzistas tia malfacilo. En Esperanto ne estas dialektoj, kaj ĝia fonetika sistemo estas simpla kaj klara. Pere de Esperanto, mi eĉ ĉinigis poemon de la delegaciestro s-ro Koetlom por saluti la ĉinan popolon okaze de ĝia nacia festo en la unua de oktobro.

Tamen, foje ni vizitis agrikulturan kooperativon en antaŭurbo de Pekino. La kooperativo aranĝis por ni bankedon, dum kiu s-ro Thobegur Thodarson flustris al mi: “Mi volas maltrinki.” “Maltrinki”? Neniam mi aŭdis aŭ legis tiun vorton. Kion ĝi signifas? Post kelkaj sekundoj, mi divenis ĝian signifon kaj kondukis la spritan verkiston al la necesejo. Tiu sperto montris al mi, ke Esperanto vere vivas kaj evoluadas, kaj en la praktika uzado kreiĝas ankaŭ spritaj eŭfemismoj. Mi admiris la kreemon de la islanda veterana samideano.

Alia konstato pri la evoluo de la lingvo okazis al mi en 1987, kiam mi partoprenis la Internacian Kulturalan Festivalon de Esperanto en Jugoslavio. Studentino Sonja kondukis nin viziti parkon kaj diris al ni: “La parko estas proksima, do ni piedu.” Neniam antaŭe mi renkontis la verbon “piedu” kaj tamen post komparo de ĝi kun la verbo “marteli” mi komprenis, ke ĝi signifas “agi per la piedoj”, do ŝi petis ke ni “piediru”. Ĝi estas pli mallonga. Esperanto vere vivas kaj sane kreskadas kiel la naturaj naciaj lingvoj.

En lernado de fremda lingvo, ni ofte renkontas malfacilon pro diferenco de la kulturaj fonoj kaj ekzisto de idiotismoj.

Antaŭ duonjarcento mi aŭdis rakonton pri honkonga mezlerneja studento, kiu lernis la anglan lingvon de angla instruisto. Foje li kulpis pro miskonduto kaj petis pardonon de sia instruisto dirante: “Pardonon, sinjoro! Mi estas juna kaj ne scias kiel altas la ĉielo kaj kiel dikas la tero!” La instruisto estis mirigita, ĉar ankaŭ li ne sciis tion. Efektive, la vortoj “ne scii kiel altas la ĉielo kaj kiel dikas la tero” estas tre populara ĉina idiotismo, kiu signifas “sencia”. Ne sciante la diferencon de la ĉina kaj angla lingvoj, la studento laŭvorte ĝin angligis kaj fiaskis en la komunikado.

La tradukistoj devas pli bone lerni la uzatajn lingvojn por plenumi sian taskon. Sed lingvo estas afero tre komplika, kaj malgraŭ diligenta studo, ili tamen ne povas eviti mistradukojn. En la kvindekaj jaroj, ni akceptis ĉeĥan ĉinologon en Pekino, kiu scipovis paroli ĉine. Sed ni tuj rimarkis, ke li uzadas lingvon klasikan de antikvaj verkistoj. En la jaro 1982-a, kiam mi kaj la germana kibernetikisto d-ro Frank kune vizitis parkon en la japana Esperanto-kongresa urbo Kamekura, d-ro Frank diris al mi montrante tabulon kun angla teksto pri interesa objekto: “Jen angla lingvo de la 14-a jarcento!” Kial oni uzas malnovan lingvon por la nuntempaj vizitantoj? Eble pro nescio pri la evoluo de la angla lingvo, sed ne por montri la antikvecon de la objekto.

Kiam mi poluris la manuskripton de la Esperanta traduko de la ĉina klasika romano *Ruĝdoma Sonĝo*, mi rimarkis mistradukon de la ideogramoj 撞客 (elp. *ĝŭang ke*), kiu signifas laŭvorte “renkonti gaston”. En la manuskripto ili estis esperantigitaj per “renkonti amikon”, sed efektive ili signifas “renkonti fantomon”. Rimarkinte la mistradukon, mi kontrolis la anglan version, kiu estis konsultata de la Esperanta tradukinto, kaj konstatis, ke same eraris la traduko en la angla versio. El tiu epizodo ni povas vidi, ke eĉ sperta uzanto de lingvo povas foje fali en eraron pro la komplikeco de lingvo. En la ĉina lingvo kun historio de miloj kaj miloj da jaroj, tre abundas historiaj aludoj, proverboj kaj idiotismoj, kiuj prezentas

malfacilojn en tradukado. Ekzemple, en la ĉina lingvo 足下 (elp. *zu ŝja*, kun signifo laŭvorte: sub piedo) signifas “estimata” kaj 风花雪月 (elp. *feng hua ŝüe jüe*, kun laŭvorta signifo: vento floro niĉo luno) signifas “amo inter geviroj”. Estas tute komprenebla afero, ke la eminentaj tradukistoj en UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizoj en interpretado povas bone plenumi nur 70 procentojn de sia tasko, laŭ aserto de la sperta interpretisto C. Piron.

Mi donu al vi ekzemplon pri tio: En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento, iu ĉina interpretisto rakontis pri sia sperto en artikolo, ke foje li interpretis en kongreso de UN. Li aŭdis esprimon nekompreneblan en sia interpretado kaj klopodis cerbumi por ĝin traduki, sed dume alvenis raporto pri la rezulto de voĉdonado. Li haste kaptis la ciferojn kaj ilin tradukis. Sed alrapidis ĉina delegito por lin riproĉi, ĉar li diris ke pli ol 170 voĉdonis por la propono, tamen efektive en UN tiam estis nur pli ol 120 membroŝtatoj. Sperta interpretisto lin instruis, ke li simple preterlasu la nekomprenatajn esprimojn en interpretado.

Pro sia praktika uzado dum jarmiloj, la ĉina lingvo estas abunda ankaŭ je sinonimoj. Ekzemple, ekzistas pli ol 150 vortoj kaj vortkombinoj por paroli pri belo kaj ĉirkaŭ 50 vortoj kaj vortkombinoj pri belo de virino. Ankaŭ en Esperanto ekzistas sinonimoj bela, ĉarma, linda, okulplaĉa... sed tro malmultaj kompare kun tiuj de la ĉina lingvo. Ne estas eblo resti fidela en esperantigo de ĉinaj literaturaj verkoj en tiu aspekto de la originalo. En la ĉina lingvo ekzistas speco de populara versparo, kiun oni aplikas por garni ambaŭ fostojn de pordego aŭ ambaŭflanke rulpentraĵon nomatan kakemono. Tiaj versoj konsistas el vortoj en paroj. Pro tio ke la ĉinaj ideogramoj estas unusilabaj, do la paraj vortoj povas stari rekte unu kontraŭ la alia. Tio estas regula en formo. Ĉu Esperanto povas fidele speguli tiun regulan formon en tradukado de ĉinaj koploj? Ĝenerale ne. En la ĉina lingvo tre abundas homofonoj, ofte uzataj por formi spritajn esprimojn. Eĉ ekzistas speco de sprita ĉina proverbo nomata “kompletigenda popoldiro”. En tia popoldiro, la unua parto estas ordinara normala frazo, sed ĝin sekvas kompletiga parto ofte el homofonoj. Ekzemple: 外生灯笼 — 照舅 (照旧) (elp. *ŭaj ŝeng da deng long – ĝaŭ ĝiŭ*). Laŭvorte, la frazo signifas: Nevo tenas lanternon – por prilumi patrinflankan onklon. Tamen pro tio ke la vorto 舅 (*ĝiŭ* patrinflanka onklo) estas homofono de 旧 (kiu signifas: malnovo), oni povas preni 照舅 (*ĝaŭ ĝiŭ*) kiel 照旧 (*ĝaŭ ĝiŭ*), kiuj signifas “kiel malnove, kiel kutime”. Tiamaniere kreiĝis la sprita kompletigenda popoldiro: 外生灯笼 — 照舅 (照旧). Ĝi estas vortludo netradukebla per Esperanto. Ne nur Esperanto, neniu lingvo povas fidele traduki tian vortludon.

El la donita ekzemplo vi povas vidi, ke ofte nur per studo de la originalo oni povas aprezi la kulturon portatan de lingvo. Ekzemple, en Esperanto oni povas ŝerce kaj sprite diri “Salton!” anstataŭ la kutiman “Saluton!”. Ĉu tia vortludo estas tradukebla por la angla aŭ franca?

En la libro *Nuntempa socilingvistiko* oni asertas: Hodiaŭ estas tre malfacile trovi landon, kie oni parolas nur unu solan lingvon”. Germanio kaj Francio ŝajne estas landoj kun po unu lingvo, sed efektive ne, en ili oni parolas ankaŭ aliajn lingvojn krom la germana kaj franca, kvankam la nombro de la parolantoj de tiuj lingvoj estas malgranda. Ankaŭ Usono ne estas lando kun unu sola lingvo, ne ĉiuj usonanoj parolas angle. Laŭ esploro de la lingvistikisto Fishman en 1974, en Usono oni parolas 23 lingvojn. En Ĉinio kunvivas 56 nacioj kun dekoj da lingvoj. La naturaj lingvoj de la etnoj naskitaj en malsamaj lokoj kaj tempoj alportis buntan kulturon valoregan, tamen multeco de lingvoj samtempe malfaciligas la komunikadon inter la popoloj. La franca verkisto Voltaire (1694-1778) diris, ke la diverseco de lingvoj estas granda malfeliĉo por la homaro.

En kunekzisto de la nacioj kun malsamaj lingvoj aperis la fenomeno de lingva diskriminacio.

En Usono, Svedio kaj Portugalio, nur unu lingvo estas uzata kiel oficiala tutlanda lingvo kaj la malgrandaj etnaj lingvoj estas en pozicio maloportuna. La civitanoj de la granda lingvo

ĝuas avantaĝon en edukado kaj akiro de profesiaj postenoj. La civitanoj de malgrandaj lingvoj ofte suferas diskriminacion, ĉar ili konsistigas nur malmultajn procentojn de la loĝantaro.

En Belgio, Srilanko kaj Kanado, kie pluraj lingvoj estas oficialaj, prezentiĝas problemoj. En 1821, kiam Belgio sendependiĝis, ĝia konstitucio kondiĉis, ke la franca lingvo estas ĝia landa lingvo kaj ĝi estu uzata en juĝejoj, lernejoj kaj la armeo. Ĝi permesis, ke la individuoj libere uzu sian lingvon. Tamen la flandroj nepre devis paroli la francan lingvon tiel bone kiel la patran lingvon por partopreni la vivon de la ŝtato. En 1840, dekmilo da flandroj kune prezentis petskribon al la loka registaro kaj postulis, ke la flandra lingvo estu uzata en juĝejoj, sed tiu petskribo ne ricevis sufiĉan atenton. En la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento, la flandroj kuraĝe leviĝis por postuli, ke ilia lingvo estu egalrajta kiel la franca lingvo; rezulte de tio la flandroj gajnis la rajton vivi en difinita aŭtonomia regiono kaj tiel solviĝis la problemoj kaj Belgio ne splitiĝis.

En 1947 sendependiĝis Srilanko, kies loĝantoj estis ĉefe sinhaloj kaj tamuloj. La sinhaloj estis duoblo de la tamuloj kaj dank' al tio ili okupis hegemonian pozicion en la ekonomio kaj kulturo. En la jaro 1956-a, la sinhala lingvo estis proklamita kiel la landa lingvo. Laŭleĝe, la leĝoj, oficistoj kaj edukaj institucioj de la tamuloj en la tamula regiono devas uzi la sinhalan lingvon. Kaj la lingva problemoj en Srilanko fariĝis la ĉefa kaŭzo de la enlanda milito. Kvankam la ribelo de la tamuloj devigis la sinhalojn proklami en la jaro 1966-a ke la tamula lingvo estu protektata, tamen la konflikto jam kaŭzis grandan neripareblan perdon. Nun, la sinhala, tamula kaj angla lingvoj estas proklamitaj kiel egalrajtaj landaj lingvoj de Srilanko.

En 1763, kiam Francio cedis Kanadon al Usono, plejparto de la loĝantoj de tiu regiono parolis la anglan lingvon kaj ili prezentis tendencon kontraŭ la franca lingvo, kio kaŭzis malkontenton al la parolantoj de la franca lingvo. En la jaro 1960, Kebekio eĉ postulis sendependiĝon kaj splitiĝo minacis Kanadon. Dum la regado de Kromvelo, la angloj regis Irlandon per la angla lingvo. En la fino de la 19-a jarcento, plejparto de la irlandanoj jam scipovis la anglan lingvon. Sed nuligo de la irlanda lingvo kondukis al splitiĝo. La ribelantoj de Irlando uzis la lingvan problemon kiel devizon por sia ribelo. En 1922 Irlando sendependiĝis, kaj tiam nur kvin procentoj de la loĝantoj parolis la gaelan lingvon. La registaro de Irlando proklamis la gaelan lingvon kiel oficialan landan lingvon kaj energie restaŭris tiun nacian lingvon.

Hindio prenis la hindan kaj anglan lingvojn kiel siajn oficialajn lingvojn kaj samtempe uzis ankaŭ aliajn lingvojn. Hispanio en sia konstitucio proklamis la eŭskan kaj katalunan lingvojn kiel laŭleĝajn regionajn lingvojn. Niĝerio kaj Hindio estis koloniaj landoj, sed 11 hindaj lingvoj havis sian tradician literaturon, dum la lingvo de Niĝerio ne posedas literaturon kaj tiu lando prenis la anglan lingvon kiel sian oficialan lingvon.

En Ĉinio plejparto de la loĝantoj parolas la han-nacian lingvon. Tamen la hana lingvo havas multajn dialektojn. La pekinanoj ne komprenas la dialektojn de Ŝanhajo kaj la sudaj provincoj Zhejiang, Fujian kaj Guangdong. Por faciligi la komunikadon, la ĉina registaro energie disvastigis la oficialan parollingvon *putonghua*, bazitan sur la Pekina dialekto, en la lernejoj per la helpo de la latiniga sistemo, kaj atingis grandan sukceson. Tamen homoj el Ŝanhajo vivantaj en Pekino ankoraŭ uzas sian dialekton hejme pro sento de intimeco. La pekinanoj nomas babiladon per *ljaŭ tian*, popolanoj de Shandong-Provinco nomas tion per *la ĝua*, homoj el la Nordoriento nomas tion per *laŭ ke*, kaj homoj el Sichuan-Provinco nomas tion *baj long men ĝen*. Pro faciliĝo en trafikado kaj intervizitado de diversregionaj ĉinoj nuntempe, ni havas pli kaj pli multe da ŝancoj kontakti la dialektojn kaj lerni iujn interesajn esprimojn de ili, kaj verkistoj foje uzas dialektojn en siaj romanoj kaj dramoj por pliintensigi

la vivetoso de siaj verkoj. Kaj iuj televidaj stacioj eĉ uzas dialektojn. Ĉu tio estas fenomeno bona aŭ malbona por la evoluo de lingvoj?

En Ĉinio ekzistas 56 nacioj kun dekoj da naciaj lingvoj. La ĉina konstitucio kondiĉas, ke ĉiuj ĉinaj nacioj havas la liberon uzi sian lingvon. Kaj por disvolvi la kulturon kaj edukadon de la nacimilitoj, la ĉina registaro establis multajn naciajn mezlernejojn kaj instituciojn kaj en Pekino ne nur estas nacia universitato sed ankaŭ mezlernejo por tibetanoj. Ĉu tio povas garanti la vivon kaj evoluon de la lingvoj de malgrandaj etnoj?

En la kvindekaj jaroj, mi laboris en la gubernia urbo Kaiyuan de Liaoning-Provinco en Nordorienta Ĉinio, kie vivis koreoj intermikse kun hanoj. Inter la tri mezlernejoj de tiu urbeto unu estis por koreaj lernantoj. Tiu lernejo por koreaj geknaboj estis pli bela kaj pli bone ekipita, tamen sufiĉe multaj koreaj geknaboj de tiu loko preferis viziti la mezlernejojn por hanoj ol tiun por koreoj. Kial? Ĉar studado en han-nacia mezlernejo povis havigi al ili pli multajn ŝancojn en daŭrigo de studo en universitatoj kaj trovi laborpostenojn. Tiu ekzemplo montras al ni, ke la vera egaleco de lingvoj ne estas simpla afero kaj ĝi ne estas efektivebla nur per leĝo.

En la jaro 1644, la manĉuroj prenis la regpotencon de Ĉinio, fondis la Qing-Dinastion kaj regadis la landon por pli ol 200 jaroj. La manĉura lingvo estis forte protektata dum la Qing-Dinastio. Por faciligi sian regadon super la granda han-nacio, la manĉuraj imperiestroj ne nur sin helpis per eminentaj ministroj de han-nacio sed ankaŭ mem bone lernis la hanan lingvon; iuj eĉ povis verki poemojn per ĝi. Kaj kio rezultis el tio? Hodiaŭ, la manĉura lingvo preskaŭ tute mortis. Mi demandis manĉurajn amikojn, ĉu ili parolas la manĉuran lingvon en sia familio? Ili neis. Nur tre malmultaj vortoj kiel *galaha* por porka artikolo uzata kiel ludilo de infanoj ankoraŭ ne estas forgesitaj. Hodiaŭ nur malmultaj specialistoj ankoraŭ scipovas legi librojn en la manĉura lingvo, kiu tamen ne estas uzata en instruado en lernejoj, ĉar la manĉuroj jam forgesis sian lingvon. Tiu ĉi ekzemplo montras al ni, ke eĉ politika regpotenco ne povas garanti la vivon kaj evoluon de lingvo, ĉu ne?

Pensante pri la egaleco de lingvoj, mi venis al la demando pri la valoro de la lingvoj kaj opinias, ke kulturo ludas gravan rolon en la vivo de lingvo. Ĉar la hana lingvo portas en si pli riĉan kaj valoran kulturon, ĝi havas pli grandan forton por daŭrigi sian vivon ol la manĉura lingvo.

2 Kulturo

Kio estas kulturo? La *Plena Ilustrita Vortaro* ĝin difinas jene: la kolektiva neheredita sciaro (tradicioj, kutimaj ag- kaj pens-manieroj ktp) amasigita, konservita k transdonita de ĉiu el la diversaj homaj grupoj (etnaj, religiaj, sociaj k.a.) aŭ de la tuta homaro. El tiu difino ni vidas, ke lingvo ludas tre gravan rolon en konservado kaj transdonado de kulturo.

Iuj asertas, ke Esperanto ne havas kulturon. Tiu aserto estas falsa. La esperantistoj faras diversajn kulturajn aktivadojn per sia lingvo: ni okazigas Universalan Kongreson, landajn kongresojn, seminariojn kaj kulturajn festivalojn de Esperanto, en kiuj ni prelegas pri diversaj aferoj, ni havas artajn vesperojn, ni havas literaturajn kaj oratorajn konkursojn, ni prezentas filmojn, teatraĵojn, ni interŝanĝas opiniojn kaj spertojn pri instruado de Esperanto kaj aliaj aferoj, ni ekskursas al pitoreskejoj kaj historiaj restaĵoj, ni havas Esperanto-domojn, Esperanto-stratojn, en Pekino ni havas Esperanto-Boskon en granda parko, ni havas Zamenhofajn statuojn en diversaj partoj de la mondo. Kaj aparte menciinde estas ke ni havas Esperantan literaturon tradukitan kaj originalan. Kiu povus aserti, ke literaturo ne estas kulturo?

En kulturo la lingvo ludas tre gravan rolon. Ekzemple, la ĉina tradicia medicino jam havas historion de miloj da jaroj, kaj ĝia grava verko *Neijing* estas ne nur konservata sed ankoraŭ

studata hodiaŭ, ĉar en tiu verko 18-voluma konserviĝas la medicinaj spertoj kolektitaj antaŭ pli ol 2000 jaroj. Laŭ korea samideano, s-ro Puramo Chong, tiu libro estas studata ankaŭ de koreaj kuracistoj. Kvankam Esperanto ankoraŭ ne havas multajn tiajn sciencajn verkojn originalajn, tamen oni jam komencis verki librojn pri sciencoj. Mi ne estas sciencisto, tamen mi legis en Esperanto verkojn pri botaniko, geologio, astronomio kaj matematiko verkitajn originale de esperantistoj. Mi legis ankaŭ Esperantajn verkojn pri malgrandaj popoloj de Finnlando, Hungario, Svedio, Norvegio, Bulgario, Kroatio, Vjetnamio k.a. Leginte romanojn, novelojn, popolrakontojn, fablojn, fabelojn, popolkantojn en Esperantaj versioj de diversaj popoloj, mi havas pli klaran bildon en mia menso pri la kulturo de tiuj popoloj.

Sen helpo de la lingvoj, ni ne povas teni kaj evoluigi la artojn, la religiojn, la filozofiojn, la gastronomion, la sciencojn kaj la literaturon (poezion, romanojn, dramojn, fablojn, fabelojn, anekdotojn, humuraĵojn k.a.). Leginte centojn da Esperantaj verkoj pri la diversnaciaj kulturoj, mi vidis la vere grandan valoron de Esperanto en internacia kultura interfluo. Kaj mi vidis, ke la literaturo ludas gravan rolon en tio. Kaj ni devas aparte paroli pri tiu kultura fenomeno literaturo.

3 Literaturo

Literaturo estas arto de lingvo. Ĝi naskiĝas el lingvo kaj la lingvo nutriĝas kaj kreskas pere de sia literaturo. La historio montras al ni, ke iuj lingvoj kun literaturo parolataj de malgrandaj nacioj ne pereas malgraŭ subpremado. D-ro Zamenhof ĉiam donis grandan zorgon pri la kreado de la Esperanta literaturo. Kiam la *Unua Libro de Esperanto* aperis en 1887, ĝi jam prezentis du poemojn originalajn, *Mia penso* kaj *Ho, mia kor'* de Zamenhof, kaj la Esperantan version de la poemeto de Heine *En nord' unu pino*. Do la literaturo de Esperanto naskiĝis samtempe kiel la lingvo mem. Tio estas unika fenomeno en la historio de la homaro.

Zamenhof ne nur verkis serion da poemoj por kulturi kaj kuraĝigi siajn adeptojn, sed ankaŭ esperantigis plurajn el la mondfamaj literaturaj verkoj kiel *Hamleto* de Ŝekspiro, *La revizoro* de Gogol kaj *Georgo Dandin* de Molière. Lian brilan ekzemplon sekvis multaj verkistoj kaj tradukistoj en diversaj landoj. Krom la dekojn da volumoj de antologioj angla, aŭstralia, belga, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hungara, itala, japana, kataluna, latina, pola, slovaka k.a. en Esperanto ni jam povas legi ne nur majstrajn verkojn de Ŝekspiro, Dante, Goethe, Puŝkin, Heine, Molière, Voltaire, Turgenjev, Tolstoj, Mickieviĉ, Li Bai, Du Fu, Lusin, Akita Uĵaku k.a., sed ankaŭ popolkantojn, popolrakontojn kaj interesajn romanojn de malgrandaj etnoj.

Mi volas aparte rimarkigi al vi, ke ekde la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento, ĉinaj esperantistoj jam ĉinigis literaturajn verkojn de Bulgario, Jugoslavio, Pollando, Rusio, Hungario, Svedio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando k.a. uzante Esperanton kiel pontlingvon. Kaj oni ankaŭ ĉinigis Esperantajn originalajn poemojn kaj romanojn de Julio Baghy, Jean Forge, Zamenhof, K. Kalocsay, Teo Jung k.a. Post la fonda de la Ĉina Popola Respubliko, la ĉinaj esperantistoj sukcesis eldoni pli ol 500 librojn en Esperanto; inter ili aperis konsiderinda nombro da ĉinaj literaturaj verkoj esperantigitaj, inkluzive de tri volumoj de *Ĉina Antologio* kun amplekso de pli ol 1000 paĝoj, la Esperanta versio de poemoj el la plej antikva antologio *Libro de Poezio*, la unua ĉina longa poemo *Lisao* de Qu Yuan, la rakonto en versoj *Fenikso flugas sudorienten* (pri malfeliĉa amo) de la Han-Dinastio, la kolekto de poemoj de Tang-Dinastio *Ĉinaj Klasikaj Poemoj Ilustritaj*, la epopeoj *Aŝma* de la malgranda etno de sanioj kaj *Ŭang Guj kaj Li Ŝjangŝjang*, elektitaj poemoj de Li Bai, Du Fu kaj Mao Zedong, la Esperantaj versioj de la 4 plej popularaj ĉinaj klasikaj romanoj *Ĉe akvorando*, *Romano pri la tri regnoj*, *Pilgrimo al la Okcidento*, kaj *Ruĝdoma sonĝo* (kiuj kun totala amplekso de pli ol 7 500 paĝoj estas rigardataj kiel enciklopedio de la ĉina kulturo), la klasikaj novelaroj *Mirrakontoj de*

Liaozhai, kaj *Noveloj el antikva Ĉinio*. Eldoniĝis el la ĉina moderna literaturo la kolekto de noveloj *Por nova afero nova maniero*, la romanoj *Aŭtuno en la printempo* (fratina romano pri amo de *Printempo en aŭtuno* de Julio Baghy), la romanoj-ĉefverkoj *La familio* kaj *Frosta nokto* (pri ĉinaj intelektuloj dum la Rezistmilito) de Bakin, *Noktomezo* de Mao Dun (pri la ĉina nacia burĝaro), *Kvar generacioj sub la sama tegmento* (pri Pekino dum la Rezistmilito) kaj *Kamelo Ŝjangzi* (pri laboraj popolanoj en Pekino) de Lao She, la historiaj dramoj *Qu Yuan* kaj *Bronza tigro* de Guo Moruo, la dramoj *Fulmotondro* kaj *Sunleviĝo* (pri la ĉina socio) de Cao Yu kaj *La tetrinkejo* (pri Pekina popolo) de Lao She, la sep kolektoj de popolrakontoj inkluzive de tiuj pri Afanti, sinjorino Blanka Serpento kaj la Bovisto kaj la Teksistino. Ĉinaj esperantistoj ankaŭ verkis originalajn poemojn, novelojn kaj dramojn, kiuj aperis aŭ en libroj aŭ en periodaĵoj.

Menciindas krome la kunlaborado de la esperantistoj diverslandaj en literatura aktivado. En la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento, d-ro K. Kalocsay helpis la ĉinan tradukiston Sun Yong en ĉinigo de la epopeo *Johano la Brava* de Petőfi, kaj Sun Yong helpis d-ron K. Kalocsay en esperantigo de ĉinaj poemoj. Teo Jung, Hilda Drezen k.a. verkistoj helpis nin en esperantigo de la novelaro de Lusin kaj donis al ni konsilojn por eviti ĉinismojn. En 2009, s-ro R. Corsetti kunlaborigis diverslandajn tradukistojn por eldoni novan pli bonan version de la populara vjetnama poemo *Historio de Kieu* de Nguyen Du por diskonigi tiun majstran verkon de la vjetnama popolo al la mondo. Multaj estas tiaj kunlaboroj, per kiuj ni sukcesis prosperigi nian literaturan aktivadon.

Hodiaŭ ni povas aserti, ke Esperanto ne nur havas sian literaturon originalan kaj tradukitan, sed ankaŭ eminentajn originalajn verkojn poeziajn kaj prozajn. W. Auld eĉ kandidatiĝis por la literatura premio de Nobel. Per sia literaturo, la esperantistoj ne nur firmigas la pozicion de Esperanto en la internacia kulturo, sed ankaŭ donas sian helpon en interfluo de la diversnaciaj literaturoj kaj kulturoj. Ĉu ni ne povas diri, ke Esperanto ludas aktivan rolon en la protektado de la naciaj lingvoj kaj kulturoj, precipe tiuj de la malgrandaj nacioj?

Dankon por via pacienca aŭskultado.

Bibliografio

1. Historio de la mondlingvo (E. Drezen)
2. Enciklopedio de Esperanto (represita de la Hungara Esperanto-Asocio, 1979)
3. Esperanto in the Modern World (dua eldono, Kanado)
4. Pri internacia lingvo (dua eldono, Israelo)
5. Esperanto en perspektivo (eldonita de UEA, 1974)
6. The Handbook of Sociolinguistics
7. The Handbook of Linguistics
8. Language, Society and Education in Singapore (S. Gopinnathan k.a.)
9. Socilingvistiko (Chen Yuan, eldonita de la Komerca Libreldejo)
10. Nuntempa socilingvistiko (Xu Daming, Tao Hongyin, Xie Tianwei k.a.)
11. Cent jaroj de Esperanto en Ĉinio (eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1999)
12. La arto labori kune (eldonita de UEA en 2010)

Novajoj translimen: geografia strukturo de internaciaj novaĵoj



Jukka Pietiläinen

Finno (1966), doktoro pri sociaj sciencoj en la fako de ĵurnalistiko (Universitato de Tampere 2002). Laboras kiel supera esploristo en Universitato de Helsinko. Okupiĝas pri esplorado de ruslandaj gazetaro kaj socio, internaciaj novaĵoj kaj evoluo de ĵurnalistiko kiel kultura fenomeno ĝenerale. Ĉefaj verkoj: *The regional newspaper in Post-Soviet Russia* (Tampere University Press, 2002), *Uutisia yli rajojen* (Novaĵoj translimen, en la finna; kune kun aliaj aŭtoroj, Helsinko 1998), *Maailman media* (Amaskomunikiloj tra la mondo, en la finna, kune kun aliaj aŭtoroj, aperonta en 2012), multe da sciencaj artikoloj en la finna, angla, Esperanta kaj rusa lingvoj.

Resumo

Eksterlandaj novaĵoj sekvas en preskaŭ ĉiuj landoj la samajn temojn, kaj ilia geografia strukturo estas relative simila en plej multaj landoj de la mondo. El dek plej ofte menciitaj landoj de internaciaj novaĵoj, sep aŭ ok estas kutime la samaj en ĉiuj landoj. Tiuj ĉi grandaj potencoj de internaciaj novaĵoj estas Usono, Britio, Francio, Ruslando, Japanio, Ĉinio, Germanio, kaj el internaciaj organizoj, UN. Temas pri malrapide ŝanĝiĝantaj strukturoj de internacia politiko kaj ekonomio, kaj nur kelkaj el la plej oftaj novaĵ-landoj estas gravaj sole pro novaĵ-eventoj.

La strukturo de la internaciaj novaĵoj de iu lando sekvas ankaŭ la internacian komercon de tiu lando. Same la novaĵoj sekvas geografie kaj kulture proksimajn landojn pli ol aliajn landojn. Tio estas videbla ekzemple en la fluo de novaĵoj inter grandaj eŭropaj ŝtatoj kaj iliaj eksaj kolonioj en Afriko. La rolo de internaciaj novaĵagentejoj ne estas decida en la elekto de geografia strukturo de novaĵoj, sed en malpli gravaj kaj abrupte okazantaj novaĵoj ili havas pli gravan rolon. Pri malpli grandaj kaj malpli gravaj landoj aperis plej ofte nur malbonaj novaĵoj kaj sportaj novaĵoj. La prelego fokusiĝas ankaŭ al ŝanĝoj en internaciaj novaĵoj en la Interreta epoko. Krome la prelego traktos la alternativon de gazeto *Monato* kiel fonto de internaciaj novaĵoj.

News across borders: The geographical structure of international news

Summary

Foreign news follows the same topics in almost every country, and its geographical structure is relatively similar in most countries in the world. Of the ten most frequently mentioned countries in international news, seven or eight are typically the same everywhere. These great powers in international news are the USA, the UK, France, Russia, Japan, China, Germany, and, among international organisations, the UN. It is a question of the slowly changing structures of international politics and the economy; only some of the most frequently mentioned countries in news are important merely because of events in the news.

The structure of a country's international news also follows the country's international trade. Similarly, the news reported follows countries with geographical or cultural ties more than otherwise. This can be seen, for example, in the flow of news between major European states and their former colonies in Africa. The role of international news agencies is not decisive in determining the geographical structure of news, but in less important and breaking news they have a more significant role. From smaller and less important countries usually only bad news and sports news is published. The paper also looks at changes in international news in the Internet era. In addition, the paper will address the alternative presented by the magazine *Monato* as a source of international news.

Informer par-delà les frontières: structure géographique de l'information internationale

Résumé

L'information internationale traite des mêmes thèmes dans presque tous les pays, et sa structure géographique est relativement similaire dans la plupart des pays du monde. Parmi les dix pays les plus souvent cités dans les nouvelles internationales, sept ou huit sont généralement les mêmes dans tous les pays. Ces grandes puissances de l'information internationale sont les Etats-Unis, la Grande-Bretagne, la France, la Russie, le Japon, la Chine, l'Allemagne, et parmi les organisations internationales, l'ONU. Il s'agit d'une lente mutation des structures de la politique internationale et de l'économie, et seuls quelques-uns des pays les plus fréquemment cités doivent leur importance uniquement à des événements médiatiques.

La structure de l'information internationale d'un pays donné suit également le commerce international de ce pays. De même l'information s'intéresse davantage aux pays géographiquement et culturellement proches qu'à d'autres pays. On peut le voir par exemple dans le flux d'information entre les grands états européens et leurs anciennes colonies d'Afrique.

Le rôle des agences de presse internationales n'est pas décisif dans le choix de la structure géographique de l'information, mais quand il s'agit de nouvelles moins importantes ou d'événements inopinés, elles jouent un rôle plus important. Sur les pays moins grands et moins importants ne paraissent la plupart du temps que de mauvaises nouvelles et des informations sportives. La conférence met aussi en évidence les mutations de l'information internationale à l'époque d'internet. Elle traitera en outre de l'alternative que représente la revue *Monato* comme source d'information internationale.

Tin tức xuyên biên giới: cơ cấu địa lý của thời sự quốc tế

Tóm tắt

Các bản tin thời sự quốc tế thường được phát đi ngay hầu hết ở tất cả các nước trong cùng một thời gian và cơ cấu địa lý cũng tương đối giống nhau ở hầu hết các nước trên thế giới. Trong số tin tức quốc tế của mười quốc gia thường xuyên được nhắc đến nhiều nhất, bảy hoặc tám tin thường là giống nhau tại tất cả các nước. Những cường quốc về tin tức quốc tế là Hoa Kỳ, Anh, Pháp, Nga, Nhật, Trung Quốc, Đức và trong các tổ chức quốc tế là Liên hiệp

quốc. Chúng chủ yếu đề cập đến các vấn đề chính trị và kinh tế thế giới đang thay đổi một cách chậm chạp, chỉ một vài bản tin trong số các bản tin về các nước nêu trên là thực sự quan trọng vì các sự kiện mang tính thời sự của chúng.

Cơ cấu thời sự quốc tế của mỗi nước thường còn theo thương mại quốc tế của chính nước đó. Thời sự cũng giống như đặc điểm địa lý và văn hóa, các nước gần nhau sẽ có xu hướng giống nhau hơn các nước khác. Một ví dụ điển hình là luồng tin tức thời sự giữa các nước lớn ở châu Âu và các thuộc địa cũ của họ ở châu Phi. Vai trò của các hãng thông tấn không mang tính quyết định trong việc chọn lựa cơ cấu địa lý của tin tức mà nằm ở những bản tin « giật gân » và ít quan trọng hơn, ở đó vai trò của họ được khẳng định hơn. Các nước nhỏ hơn và ít có tầm ảnh hưởng hơn chỉ được xuất hiện nhiều trong các bản tin mang tính tiêu cực hoặc bản tin thể thao. Bài thuyết trình còn đề cập đến các bản tin thời sự quốc tế trong thời đại internet. Ngoài ra, bài thuyết trình sẽ đề cập đến giải pháp thay thế của tạp chí *Monato*, như một nguồn tin tức quốc tế.

Novaĵoj translimen: geografio de eksterlandaj novaĵoj

Enkonduko

Eksterlandaj novaĵoj estas unu el la plej malnovaj interesoj de amaskomunikad-esploristoj. La esplorado de eksterlandaj novaĵoj celas klarigi tion, pri kiuj internaciaj novaĵoj amaskomunikiloj raportas en diversaj landoj kaj kio kaŭzas la diferencojn inter landoj. Kritikemaj esploristoj demandas, kial eksterlandaj novaĵoj estas tiom similaj en diversaj landoj kaj ĉu vere nur kelkaj internaciaj novaĵagentejoj difinas pri kiuj eksterlandaj aferoj ni povas informiĝi. Tradicie esplorado de eksterlandaj novaĵoj havis fortan politikan aspekton: la celo estis fari el eksterlandaj novaĵoj pli bonajn kaj egaligi internaciajn komunikadfluojn. En tempo antaŭ Interreto homoj plejparte ricevis siajn informojn pri eksteraj landoj pere de internaciaj novaĵoj kaj tial ne estis sensignife kiaj la novaĵoj estis kaj kian mondbildon ili proponis al sia publiko.

Jam la unua vasta esploro pri eksterlandaj novaĵoj, farita en 1953 en Usono, celis esplori, kian bildon eksterlandaj gazetoj donas pri Usono. Krome la esploristojn interesis ĉu la eksterlanda gazetaro estas kontraŭ-usona. Laŭ intervjuitaj usonaj eksterlandaj korespondantoj, kontraŭ-usoneco ne estis aparte rimarkinda fenomeno. (*The Flow of News* 1953, 109-119, 179).

Nuntempe gravas ankaŭ kian bildon amaskomunikiloj donas pri aliaj landoj en Usono, la plej forta lando en la mondo, kiu povas influi okazaĵojn en preskaŭ ĉiu parto de la mondo. Registaroj dungas agentejojn, kies tasko estas influi la publikan opinion en Usono kaj pere de ĝi la usonan registaron. Tio videblis, ekzemple, dum la bosnia milito.

Unesko, la UN-organizo pri edukado, scienco kaj kulturo, havis tradicie gravan rolon en la esplorado de internaciaj novaĵfluo. Tuj post sia fondiĝo en 1945 Unesko komencis esplorojn pri eksterlandaj novaĵoj. La intereso de Unesko estas komprenebla, ĉar unu el la celoj de Unesko estas antaŭenigi pacon kaj sekurecon per pliigo de informiĝo kaj kompreno inter la popoloj per ĉiuj amaskomunikiloj kaj per tio antaŭenigi la internacian liberan fluan de informoj. "Libera fluo de informoj" kiel koncepto estas problema, ĉar ofte temas pri unudirekta fluo kiun regas la sendantoj de informoj kaj ne la ricevantoj, aŭ de pli potencaj al malpli potencaj.

La komencaj internaciaj esploroj pri novaĵfluo estas menditaj de Unesko. La unua estis farita de William Buchanan kaj Hadley Cantril en la jaro 1948 kaj temis pri naŭ landoj (Aŭstralio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Norvegio, Meksiko kaj Usono). La esploro titoliĝis "How Nations See Each Other" (Kiel nacioj vidas unu la alian). La celo estis kolekti informojn pri tio, kiel homoj rilatas al homoj de aliaj landoj kaj kio influas iliajn opiniojn (Buchanan & Cantril 1953, 4-5). La rezulto estis, ke nacioj rilatas unu al alia pli pozitive, se ili estas lingve proksimaj kaj se inter la ŝtatoj ekzistas kunlaboro. Tiuj faktoj influas tion, ĉu iu lando estas atentata eksterlande kaj ĉu ĝi vekas timon aŭ fidon. (Buchanan & Cantril 1953, 93-94.) Laŭ tiu esploro la fremdaj landoj kaj iliaj registaroj kutime estas vidataj same. Krome la opinioj, kiujn homoj de iu lando iam ekhavis, kutimas konserviĝi longe helpe de literaturo, edukado kaj popola tradicio.

La esploroj faritaj en la 1950-aj jaroj estis unu, kiu komparis la novaĵojn de unu semajno en 17 landoj (Kayser 1953); kaj alia farita en 1952-1953 de Internacia Instituto de Gazetaro (IPI), kiu enhavis novaĵojn de kvin novaĵagentejoj kaj 177 gazetoj en Usono, ok okcident-eŭropaj ŝtatoj kaj Hindio (*The Flow of News* 1953, 5).

Laŭ tiuj esploroj la enlandaj novaĵoj ricevis kutime pli da atento ol eksterlandaj novaĵoj. La gazetoj publikigis la materialon de novaĵagentejoj senŝanĝe, kaj la naciaj voĉoj en la

internacia merkato de novaĵoj fariĝis pli marĝenaj. Oni vidis en tio problemon, ke la novaĵ-agentoj portis pretajn konkludojn kaj tio bremsis la liberecon de esprimado. La plureco de ĵurnalistiko estis en danĝero ne pro la limigoj de registaroj sed pro ekonomiaj kialoj. La uzo de ĉiam la samaj novaĵfontoj kaŭzis riskon ke la pensado unuiĝas tro, kio ne devus esti la celo de libera informfluo (Kayser 1953, 93-94).

La alia esploro, de Internacia Instituto pri Gazetaro, konkludis ke la eksterlandaj novaĵoj havas malgrandan signifon por la gazetaro, kaj ankaŭ ke la publiko ne aparte interesiĝas pri eksterlandaj novaĵoj. La eksterlandaj novaĵoj koncentriĝis al kelkaj ĉefaj landoj, kaj pere de novaĵagentoj ili temis plejparte pri unuopaj okazaĵoj, kvankam la kvanto de fona materialo kreskis (*The Flow of News* 1953, 8-10.)

Laŭ tiu esploro la landoj, kiuj plej ofte aperis en internaciaj novaĵoj, estis kulture aŭ alimaniere proksimaj landoj aŭ gravaj por la lando, kie la novaĵoj aperis. Ekzemple, en Usono la plej gravaj landoj estis Koreio kaj okcidenteŭropaj landoj, kaj en Okcidenta Eŭropo la plej gravaj landoj estis Usono kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj.

Wilbur Schramm (1960) esploris la novaĵojn de unu tago en gazetoj de diversaj landoj kaj notis ke la fluo de novaĵoj iras de industriaj landoj al evoluantaj landoj, de Eŭropo kaj Norda Ameriko al aliaj kontinentoj, kaj de Usono kaj Sovetio al aliaj landoj.

Alia esploro de Jacques Kayser fokusiĝis al 13 landoj kaj tri tipaj gazetoj en ĉiu lando en 1961. Laŭ tiu esploro Usono estis tiu lando kiu estis la plej ofte atentata eksterlando preskaŭ ĉie. Poste sekvis landoj kiel Sovetio, Francio kaj Britio. Ekzemple en Argentino ĉiu el tiuj landoj aperis pli ofte ol la najbara Brazilo. Same en Brazilo ili aperis pli ofte ol Argentino. La situacio estis simila en Hindio kaj Pakistano. Tiuj rezultoj formis la bazon de kritiko ke la novaĵfluo estas unudirekta kaj ke kelkaj ĉefaj landoj dominas la internacian novaĵfluan. Laŭ Schramm la novaĵfluo estas mallarĝa kaj malegala (multe da atento al industriaj landoj, malmulte da atento al evoluantaj landoj) kaj foje la novaĵoj malatentis gravajn okazaĵojn kaj malĝuste prezentis la realon (Schramm 1964, 65). Similaj rezultoj aperis ankaŭ en la 1970-aj jaroj (Gerbner & Marvanyi 1977). La problemo ne estis ke iuj landoj ricevis multe da atento, sed tio ke granda parto de la landoj restis tute neatentataj.

Novajkriterioj laŭ Galtung

Laŭ uzo de teorioj eblas dividi la esploradon pri internaciaj novaĵoj en du grupojn. La unua strebas kompreni kaj prognozi la kvanton kaj direkton de internaciaj novaĵfluo, kaj la dua celas kompreni kaj prognozi tiujn faktorojn kaj valorojn, kiuj influas tion, kiaj estas la internaciaj novaĵfluo (Galtung & Vincent 1992, 35).

Teorie la plej grava el la novaĵesploroj de la 1960-aj jaroj estis tiu de la norvegaj esploristoj Johan Galtung kaj Mari Holmboe Ruge. Ili celis klarigi la strukturon de eksterlandaj novaĵoj surbaze de teoria literaturo kaj empiria materialo. La esploristoj kritikis la strukturon de internaciaj novaĵoj kaj proponis al tio ŝanĝojn. La aŭtoroj demandis kial okazaĵoj eksterlande fariĝos novaĵoj, kaj ili prezentis 12 influajn faktorojn pri tio. Ok el tiuj faktoroj estas universalaj por ĉiuj kulturoj, kaj kvar validas almenaŭ en la okcidenta (eŭrop-usona) kulturo.

Jen la novaĵkriterioj laŭ Galtung kaj Ruge:

1. Frekvenco de apero rilate al ritmo de la amaskomunikilo
2. Sojlo, kiun la okazaĵo devas superi, rilate al grandeco kaj intenso de la okazaĵo, kaj kresko de intenso
3. Klareco de okazaĵo
4. Signifo por ricevantoj (kultura proksimeco kaj koncerneco)

5. Kongruo kun atendoj
 - 5.1. verŝajneco
 - 5.2. preferindeco
6. Malkongruo kun atendoj
 - 6.1. malverŝajneco
 - 6.2. rareco
7. Kontinueco
8. Konsisto de novaĵoj
9. Rilato al elitaj ŝtatoj
10. Rilato al elitaj personoj
11. Personiĝo
12. Negativa okazaĵo

(Galtung & Ruge 1965, 66-68)

Ju pli multe da tiuj faktoroj rilatas al iu okazaĵo, des pli verŝajne ĝi fariĝos raportita novaĵo. Kaj se la okazaĵo estas raportita kiel novaĵo, ĝia valoro dependas de tiuj faktoroj (Galtung & Ruge 1965, 71).

Unu el la supozoj de Galtung kaj Ruge estis, ke se iu okazaĵo havas malgrandan valoron ĉe iu faktoro, ĝi tamen povas fariĝi novaĵo, se ĝi havas altan valoron ĉe iu alia faktoro. Tiel ili formis kombinitajn faktorojn, kiujn ili testis per norvega novaĵmaterialo (Galtung & Ruge 1965, 72-75; Galtung & Vincent 1992, 52).

Samtempe kun Galtung kaj Ruge ankaŭ alia norvego, Einar Östgaard, prezentis siajn hipotezojn pri la karaktero de eksterlandaj novaĵoj. Li opiniis, ke la novaĵoj celas fortigi la ekzistantan socian ordon (*status quo*), kaj ili emfazas la personan agadon de gravuloj. Konfliktoj havas pli grandan rolon en la mondo de novaĵoj ol en la reala mondo, kaj la uzo de forto aperas kiel pli grava solvo de konfliktoj ol pacaj solvoj. Krome la novaĵoj fortigas la dividon en fortaj kaj malfortaj nacioj (Östgaard 1965, 55).

La praktikaj esploroj de Galtung kaj Ruge montris, ke 1) ju pli fora la lando, des pli verŝajne la novaĵoj temas pri elitaj personoj; 2) ju pli malalta la statuso de la ĉefa persono de la novaĵo, des pli negativa la okazaĵo devas esti por fariĝi novaĵo; kaj 3) ju pli kulture malproksima la loko estas, des pli signifa la okazaĵo devas esti. Galtung kaj Ruge ne sukcesis pruvi la hipotezon, ke ju pli fora la lando, des pli negativa la okazaĵo devas esti; tamen ilia praktika materialo temis nur pri tri konfliktoj en la unua duono de la 1960-aj jaroj (Galtung & Ruge 1965, 75-80).

Laŭ Galtung kaj Ruge la monda bildo de novaĵoj lasas malpli da aŭtonomeco al periferiaj landoj, kies ekzisto en novaĵoj baziĝas sur la bezonoj de la centro. Tiuj konektoj, kiujn la okazaĵoj povas havi de iu alia vidpunkto, restas tute sen atento. La amaskomuniko de la tria mondo kiuj uzas la novaĵojn faritajn el la centraj ŝtatoj de okcidento, raportas pri mondo kiu ne havas ligan al la realo de civitanoj de iliaj propraj landoj. Por plibonigi la situacion necesus raportoj pli pri la fono de la okazaĵoj; devus esti pli da raportoj el la ĉiutaga vivo; necesus raportoj pli pri kompleksaj kaj neklaraj okazaĵoj, kaj havi pli da raportoj el kulture malproksimaj lokoj. Devus esti pli da spaco por ne-elitaj personoj kaj pli da atento por pozitivaj okazaĵoj (Galtung & Ruge 1965, 84-85).

La kritiko kontraŭ novaĵoj baziĝas sur la fakto ke nur iuj ecoj de la realo estas raportataj en ili. La proceduro por produkti novaĵojn baziĝas sur tia praktiko por elekti okazaĵojn kiujn oni raportas, kaj kiujn eblas ŝanĝi kaj kiujn indas ŝanĝi por ke la novaĵoj donu pli realan bildon pri la mondo.

La ideoj de Galtung kaj Ruge ricevis ankaŭ fortan kritikon, ĉar la faktoroj kiujn ili listigis estas foje kontraŭdiraj inter si (verŝajneco – rareco). La kritikantoj faris ankaŭ siajn proprajn esplorojn. Ekzemple svedo, Karl Erik Rosengren, opiniis ke necesas kompari la ekzistantan realon kun la novaĵoj. Do, necesas informiĝi pri la realo tra aliaj kanaloj ol la novaĵoj kaj kompari tian bildon pri la mondo kun tiu, kiun donas la novaĵoj. Rosengren ekzemple esploris la novaĵojn pri parlamentaj elektoj en diversaj landoj kaj supozis ke elektoj en pli proksimaj landoj aperas en novaĵoj pli ofte kaj se la elektoj rezultigas ŝanĝon de la reganta partio, la novaĵvaloro estas pli alta. La rezultoj konfirmis la hipotezojn de Rosengren, sed la vera rezulto estis ke plej multe gravas la ekonomia kunlaboro inter la landoj, kion eblas mezuri per la grandeco de la eksterlanda komerco (Rosengren 1970, 1974).

Laŭ alia kritiko la veraj novaĵoj ne funkcias laŭ la hipotezoj de Galtung kaj Ruge. Ekzemple Haynes (1984, 214) emfazis ke ene de kontinentoj ekzistas rilatoj kiuj malplifortigas la dominadon de la okcidentaj centroj. La novaĵoj raportas ankaŭ pri la kunlaboro inter periferiaj landoj, kaj la landoj havas rilatojn ankaŭ kun aliaj eŭropaj landoj ol de sia propra centro (kutime la eksa kolonia mastro). Tamen veras ke en la evoluantaj landoj de la sudo aperas pli da novaĵoj el la nordo, ol en Eŭropo kaj Norda Ameriko aperas pri la evoluantaj landoj. La novaĵfluo estas unudirekta.

Esploro pri la internacia fluo de novaĵoj en 1979

La unua ampleksa esploro pri eksterlandaj novaĵoj estis farita en 1979 kun helpo de la Internacia Asocio de Amaskomunikad-esploristoj (IAMCR). Temis pri esploro de eksterlandaj novaĵoj en 29 landoj dum printempo 1979. La landoj estis Alĝerio, Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Ebury Bordo, Egiptio, Federacia Respubliko Germanio, Finnlando, Greklando, Hindio, Hungario, Indonezio, Irano, Islando, Jugoslavio, Kenjo, Libano, Malajzio, Meksiko, Nederlando, Niĝerio, Pollando, Sovetunio, Tajlando, Tunizio, Turkio, Usono, Zairio kaj Zambio. La rezulto estis, ke la eksterlandaj novaĵoj baziĝis preskaŭ ĉie sur la sama modelo. Plej multe da spaco ricevis la novaĵoj el la sama kontinento aŭ geografia areo. Nur el Pollando kaj Jugoslavio aperis pli da novaĵoj el Okcidenta Eŭropo ol el aliaj orient-eŭropaj landoj. Post la novaĵoj el la propra regiono sekvis ĉie la novaĵoj el Usono kaj Okcidenta Eŭropo. Nur en la tria loko estis la novaĵoj el evoluantaj landoj, kie okazis io “novaĵ-valora”. En tiu tempo la plej grava el tiuj regionoj estis la Meza Oriento, dum el landoj de Suda Ameriko kaj Orienta Eŭropo venis tre malmulte da novaĵoj (Sreberny-Mohammadi k.a. 1985).

La plej gravaj temoj de eksterlandaj novaĵoj estis ĉie la internacia politiko, enlanda politiko, militistaj aferoj kaj ekonomio. Orienteŭropaj gazetoj raportis pli pri kulturo kaj scienco kaj malpli pri krimoj, kaj ankaŭ en la novaĵoj de islamaj landoj estis malpli da krimoj. Novaĵoj kiuj venis el Norda Ameriko kaj Okcidenta Eŭropo temis pli ofte pri ĝenerale interesaj aferoj (*human interest*) kaj krimoj, dum la novaĵoj el evoluantaj landoj temis pli ofte pri politikaj okazaĵoj; dume, diversaj akcidentoj aŭ naturaj katastrofoj estis taŭgaj temoj por novaĵoj kie ajn ili aperis. El tio fakte ofte rezultas ke el iuj triamondaj landoj la novaĵoj estas nur pri konfliktoj, akcidentoj aŭ naturaj katastrofoj.

La novaĵoj venis ofte tra internaciaj novaĵagentoj aŭ enlandaj novaĵagentejoj. En okcidentaj industriaj landoj la kvanto da materialo farita de ĵurnalistoj laborantaj en amaskomunikilo kie la novaĵoj aperas, estis pli alta, kutime inter 10% kaj 40%.

Internacia esplorado pri eksterlandaj novaĵoj en 1995

La celo de tiu ĉi esplorado estis eltrovi ĉu la internaciaj novaĵoj ŝanĝiĝis post la kolapso de la soveta sistemo kaj la fino de malvarma milito. Inter la antaŭsupozoj estis ekzemple la ideo ke la internaciaj novaĵoj fariĝis malpli gravaj ĉar internaciaj konfrontiĝoj kaj konfliktoj ne plu havas saman signifon kiel en la epoko de la malvarma milito.

La esploro estis farita entute en 45 landoj, kvankam la grandeco de la esploroj en ĉiu unuopa lando tre variis. Tamen estis kolektitaj kaj analizitaj pli ol 63 000 novaĵoj, kaj simple pro tiu grandeco temas pri la plej signifa internacia esplorado pri internaciaj novaĵoj. La materialo estis kolektita en septembro 1995 dum unu aŭ du semajnoj, depende de la lando. La rezultoj de tiu esploro estis vaste raportitaj en la finna (Pietiläinen 1998), sed ankaŭ en la angla (Pietiläinen 2005, Wu 2000, 2003).

La eŭropaj landoj kiuj partoprenis estis Finnlando, Norvegio, Danlando, Germanio, Aŭstrio, Britio, Belgio, Hispanio, Portugalio, Greklando, Turkio, Kipro, Hungario, Slovenio, Bulgario, Estonio, Ruslando, Ukrainio kaj Armenio. El Azio estis reprezentitaj Israelo, Libano, Irano, Kuvajto, Hindio, Tajlando, Malajzio, Indonezio, Ĉinio kaj Japanio. Krome el Oceanio partoprenis Aŭstralio kaj Nov-Zelando. El Afriko estis Benino, Gambio, Eburabordo, Kenjo, Niĝerio, Senegalio kaj Sud-Afriko. El Ameriko partoprenis Usono, Meksiko, Brazilo, Kubo, Peruo kaj Venezuelo.

La partopreno dependis de la volo kaj financaj ebloj de la partoprenantaj teamoj, ĉar ne troviĝis internacia finacado por la projekto. En iuj landoj la esploristoj opiniis, ke la laboro estas tre temporaba kaj donas malmulte da novaj interesaj faktoj. Fakte la kolektita datumaro estis disdonita al ĉiuj partoprenantaj teamoj, sed nur malmultaj fakte utiligis ĝin. Ĝis nun troviĝas malpli ol dek internaciaj sciencaj artikoloj, kiuj baziĝas sur la materialo de tiu esplorado.

La rezultoj de la esplorado estis ke nenio fakte ŝanĝiĝis en internaciaj novaĵoj. Plej ofte la novaĵoj el eksterlando venas el najbaraj landoj kaj el kelkaj internacie gravaj landoj. En aliaj kontinentoj ol Eŭropo kaj Norda Ameriko la internaciaj novaĵoj kutime donas pli vastan kaj pli ampleksan bildon pri la mondo, ĉar ili ne enhavas nur novaĵojn de la propra kontinento sed ankaŭ novaĵojn el Eŭropo kaj Usono, dum en Eŭropo kutime du trionoj el la eksterlandaj novaĵoj venas el aliaj eŭropaj landoj kaj sesono el Usono, do restas nur malpli ol 20% por la resto de la mondo.

Eblas diri ke en ĉiuj landoj de la mondo la ĉefaj landoj aperantaj en eksterlandaj novaĵoj estas grandparte la samaj. Temas pri Usono, Britio, Francio, kaj tre ofte ankaŭ pri Rusio, Ĉinio, Germanio kaj Japanio. Kutime ĉie estas du-tri landoj kie okazas io aparte grava, ekzemple konflikto, milito aŭ simila okazaĵo. El internaciaj organizoj la plej ofte menciataj estas UN kaj NATO.

La plej pozitivaj novaĵoj venis el Vatikano (87% pozitivaj), Sirio (86%), Svedio (79%), Aŭstrio (78%), Portugalio (78%), Ĉeĥio (77%), Honkongo (76%), Usono (76%) kaj Svislando (75%). Eble mirigas la unuaj landoj en la listo. La pozitivan raportadon pri Vatikano klarigas la apero de Vatikano en la novaĵoj pri la UN-konferenco pri virinoj, kiu okazis en Pekino dum la semajno kiam la esplormaterialo estis kolektita, kaj kiu estis juĝita kiel pozitiva novaĵo kvankam la rolo de Vatikano eble ne estis inter la pozitivaj. La alta rezulto por Sirio okazis pro la fakto, ke en tiu tempo novaĵoj pri Sirio aperis plejparte nur en Libano kaj Kuvajto (el landoj partoprenantaj la esplorado) kaj ili estis kutime pozitivaj. La ĉefa temo raportita pri Svedio estis la parlamentaj elektoj, ankaŭ novaĵo kiu estis juĝita kiel pozitiva.

Aliflanke la plej negativaj novaĵoj venis el Afganio, karibaj insuloj, Franca Polinezio, Somalio, NATO kaj Bosnio. Temis pri novaĵoj pri militaj konfliktoj aŭ naturaj katastrofoj, aŭ en la kazo de Franca Polinezio la protestoj kontraŭ testado de nukleaj armiloj, kiuj okazis ĝuste

Tabelo 1. La geografio de eksterlandaj novaĵoj en diversaj landoj en 1995.
 Procentoj el ĉiuj eksterlandaj novaĵoj.

Lando (kvanto da novaĵ-artikoloj)	Okcidenta Eŭropo	Orienta Eŭropo	Meza Oriento	Azio	Afriko	Norda Ameriko	Latina Ameriko	UN, Mondo
Finnlando (3546)	48	17	2	10	4	12	2	5
Norvegio (455)	41	14	2	15	4	11	1	12
Danio (215)	36	23	3	11	2	13	3	7
Germanio (10249)	41	18	4	11	5	13	4	4
Aŭstrio (1829)	52	15	2	8	2	14	2	4
Belgio (1853)	48	12	4	10	7	9	2	8
Britio (4886)	36	11	4	15	5	20	4	5
Hispanio (1821)	39	15	4	10	6	11	7	9
Portugaliao (1237)	41	11	6	11	10	10	5	5
Grekio (218)	28	33	1	9	3	12	2	6
Turkio (1016)	30	23	9	12	3	15	2	6
Kipro (108)	37	24	3	12	1	16	3	8
Hungario (2398)	41	28	3	8	2	12	2	3
Slovenio (1514)	42	25	3	9	3	14	2	4
Bulgario (1488)	32	28	6	9	4	15	3	5
Estonio (800)	44	26	3	9	1	8	1	9
Ruslando (671)	36	32	3	14	1	11	2	1
Ukrainio (1545)	30	38	3	7	1	15	2	5
Armenio (822)	22	39	7	14	1	9	2	6
Israelo (2009)	28	11	21	9	6	17	4	4
Libano (3676)	21	9	34	7	14	9	2	3
Kuvajto (1538)	10	4	46	15	13	6	3	2
Irano (388)	25	13	14	21	7	12	4	4
Hindio (568)	18	8	5	39	4	16	1	11
Tajlando (672)	23	6	5	36	4	17	5	5
Malajzio (212)	7	0	4	47	4	15	3	19
Indonezio (588)	27	8	5	29	4	16	3	8
Ĉinio (356)	25	14	4	24	2	20	5	6
Japanio (3339)	25	9	5	31	2	21	3	6
Aŭstralio (1830)	27	7	3	30	4	21	3	7
Nov-Zelando (1424)	28	6	2	34	5	12	4	8
Benino (136)	19	1	8	6	44	9	1	11
Gambio (94)	22	13	4	19	28	5	0	8
Ebura Bordo (127)	15	4	5	4	49	7	3	15
Kenjo (1486)	15	5	6	20	33	9	1	11
Niĝerio (359)	20	5	7	11	29	13	4	12
Senegalo (421)	16	3	5	5	53	5	1	13
Suda Afriko (1505)	27	10	5	18	14	18	3	6
Usono (1213)	27	19	9	21	6	3	10	6
Argentino (2918)	29	5	2	7	2	18	31	6
Brazilo (310)	27	7	3	10	4	30	16	3
Kubo (204)	18	9	5	12	3	7	40	6
Venezuelo (829)	22	8	3	9	2	20	34	2

dum la esplormaterialo estis kolektata. Kiam la novaĵfluo estas mezurata laŭ kontinentoj, la novaĵoj estas pli pozitivaj se temas pri la propra kontinento. Tiam la novaĵoj estas ankaŭ teme pli plurflankaj, dum ekzemple novaĵoj kiuj venas el Suda Ameriko al aliaj kontinentoj ofte temas pri naturaj katastrofoj, akcidentoj kaj sporto, dum novaĵoj kiuj venas el Afriko temas pri militoj, terorismo, sporto, krimoj aŭ religio. Ĝenerale la plej multflankaj estis novaĵoj kiuj venis el Norda Ameriko aŭ Eŭropo. Tiam ankaŭ negativaj novaĵoj estis balancitaj per pozitivaj novaĵoj el kulturo, ekonomio aŭ politiko.

Mia propra esploro surbaze de tiu ĉi materialo temis pri rilato inter internacia komerco kaj eksterlandaj novaĵoj. La rezulto estis ke preskaŭ ĉie la komercaj rilatoj inter la landoj havas fortan ligan al la kvanto de eksterlandaj novaĵoj. La rilato estas pli alta se oni atentis nur la ekonomiajn novaĵojn. Tamen aperis interesa malkongruo kun tiu regulo: se la strukturo de la eksporto estis tre unuflanka, la eksterlanda komerco ne same bone klarigis tion, de kie venas la eksterlandaj novaĵoj. La signife komercaj rilatoj rezultigis strukturon de novaĵoj en malgrandaj okcidenteŭropaj ŝtatoj kiuj dependis forte de eksterlanda komerco. Dume, evoluantaj landoj ne same bone sekvis tiun regulon. Ankaŭ en la grandaj ŝtatoj kiel Usono la komerco nur parte havis rilaton al la strukturo de novaĵoj. En la kazo de Usono la ĉefa kialo estis ke la ekonomiaj rilatoj jam komencis esti pli fortaj kun Azio, dum en la novaĵoj daŭre dominis la okcidenteŭropaj ŝtatoj.

La kultura proksimeco estas unu el la kriterioj de eksterlandaj novaĵoj, kiu ne estas same facile mesurebla per kvantaj metodoj sed kies ekziston oni povas vidi en la reala elekto de novaĵoj. La kulturen proksimecon oni vidas ekzemple en la ĵus menciita kazo de Usono: la eŭropaj landoj plu restas gravaj en eksterlandaj novaĵoj, kvankam la komercaj rilatoj jam direktiĝis al Azio. Simile en Argentino, pro iu kialo (la kvanto de enmigrintoj el Italio) Italio estas unu el la ĉefaj landoj de eksterlandaj novaĵoj. Same en arabaj landoj la aliaj arabaj landoj aperas tre ofte, ekzemple en Kuvajto eĉ ok el dek plej oftaj landoj aperintaj en la eksterlandaj novaĵoj estis aliaj arabaj landoj.

Postaj esploroj

Ankaŭ poste estis faritaj similaj esploroj pri la eksterlandaj novaĵoj. Unu el la lastaj estis farita en 2008 surbaze de televidaj novaĵoj dum kvar semajnoj kaj publikigita ĉi-jare. Laŭ tiu esploro (Wilke, Heimprecht & Cohen 2012) vere malmulto ŝanĝiĝis en la strukturo de eksterlandaj novaĵoj. En Eŭropo la kvanto da novaĵoj el la propra kontinento estas la plej alta. Ĉi tie la novaĵoj raportas el limigita kvanto da landoj: dek plej oftaj landoj rezultigis ĉie pli ol duonon de la novaĵoj. Usono estis preskaŭ inter la plej ofte menciitaj landoj, dum ankaŭ najbaraj landoj kiel Argentino en Ĉilio, Ruslando en Pollando kaj Hispanio en Portugalio estis sur la unua loko. Eŭropo estas la plej ofte aperanta kontinento en eksterlandaj novaĵoj kaj ne estas kialoj kredi ke tiu eŭropocentreco baldaŭ malaperos. Ju pli da eksterlandaj novaĵoj aperas, des pli vastan geografian gamon ili reprezentas. Ankaŭ la regionoj kaj landoj kie okazas diversaj krizoj, aperas ofte en eksterlandaj novaĵoj, kvankam ilia loko kutime ne estas inter la plej ofte menciitaj landoj.

La esploroj faritaj dum la lastaj dek jaroj grandparte konfirmis la rezultojn de la pli fruaj esploroj. Ili emfazas ankaŭ la rolon de helpantoj (*fixers*) en raportado de eksterlandaj novaĵoj el lokoj, kie la ĵurnalisto mem ne havas spertojn aŭ kie li aŭ ŝi ne konas la lokajn kulturon kaj lingvon (Murrell 2010). Ekzemple, en arabaj landoj aŭ en landoj, kie la kono de fremdaj lingvoj (unuavice la angla) ne estas kutima, la helpantoj, ofte lokaj ĵurnalistoj, havas gravan rolon por ebligi la laboron de eksterlandaj korespondantoj. La novaj esploroj fokusigis ankaŭ al aliaj paĝoj ol eksterlandaj novaĵoj kaj trovis, ke tie fakte aperas (almenaŭ en kelkaj landoj) pli ampleksa kaj malpli negativa bildo pri triamondaj landoj (Barry 2012).

Tabelo 2. Geografio de televidaj novaĵoj en 2008. Procentoj el ĉiuj eksterlandaj novaĵoj.

Lando (kvanto da novaĵoj)	Eŭropo	Meza Oriento	Azio	Afriko	Norda Ameriko	Latina Ameriko	Aŭstralio, Oceanio
Ĉinio	57	5	28	13	13	4	3
Honkongo	25	9	22	0	45	3	3
Japanio	16	5	37	1	45	0	3
Singapuro	19	3	67	0	16	0	5
Tajvano	22	5	52	1	35	6	4
Tuta Eŭropo	58	14	11	4	18	4	4
Belgio	58	15	9	4	16	2	6
Germanio	53	20	11	5	18	5	2
Italio	53	15	16	1	27	2	1
Pollando	75	7	6	0	20	3	2
Portugaliao	51	10	15	6	15	9	2
Svislando	63	16	9	2	17	3	5
Kanado	21	20	17	5	62	6	1
Usono	13	64	21	8	6	17	2
Brazilo	33	7	12	1	33	31	1
Ĉilio	24	4	5	0	18	60	2
Egiptio	31	48	9	6	17	3	2
Israelo	24	51	5	4	26	4	4

Ĝenerale ankaŭ la postaj esploroj ne montris ion aparte novan. Malgraŭ ŝanĝiĝantaj teknikaj ebloj, la strukturo de eksterlandaj novaĵoj restas grandparte la sama kiel antaŭ sesdek jaroj, kiam la unuaj esploroj estis faritaj. La triamondaj landoj havas pli bonajn eblojn elekti mem siajn novaĵojn, sed ĝenerale la strukturo de internaciaj novaĵfluoj restas senŝanĝa.

La rezultoj de la esploroj kaj kritiko de la monda informa ordo

La du ĉefaj rezultoj de internaciaj esploroj pri eksterlandaj novaĵoj estas, unue, koncentriĝo al elitaj personoj kaj elitaj landoj kaj, due, kultura proksimeco. En eksterlandaj novaĵoj multe da atento ricevas elitaj personoj kaj elitaj landoj (Galtung & Ruge 1965; Galtung & Vincent 1992). Grava kialo por tio estas rutina elekto de novaĵoj: kutime la novaĵproduktantoj utiligas ĉiam la samajn fontojn, oficistojn, politikistojn, sekvadon de tipaj okazaĵoj kiel elektoj, ŝtataj vizitoj, katastrofoj kaj krizoj, el kiuj multaj estas prognozeblaj anticipe. Ankaŭ la geografia situo de eksterlandaj korespondantoj koncentriĝas al kelkaj centraj landoj de Eŭropo kaj al Usono (Cohen 1995).

Ankaŭ la fakto, ke grandaj internaciaj novaĵagentejoj havas siajn ĉefsidejojn en kelkaj gravaj landoj, havas sian influon. Ili peras novaĵojn el siaj hejmlandoj (Usono, Britio, Francio) al ĉiuj aliaj landoj (Schramm 1964, 61-62). La historiaj potencrilatoj kutimas konserviĝi tre longe. Tiel ekzemple en la 1990-aj jaroj 26 finlandaj amaskomunikiloj havis korespondanton en Stokholmo, sed nur unu sveda amaskomunikilo havis korespondanton en Finnlando, dum multaj havis korespondantojn aŭ regulajn kunlaborantojn en Norvegio kaj Danlando (Cohen 1995, 97).

Alia fenomeno estas kultura proksimeco, kio havas gravan rolon en la elektado de eksterlandaj novaĵoj. Kultura proksimeco signifas ne nur ekonomiajn kaj politikajn rilatojn, sed ankaŭ pli malfacile difineblajn kulturajn kaj historiajn rilatojn inter la landoj. Se landoj estas kulture pli proksimaj, inter ili fluas pli da novaĵoj. Kultura proksimeco estas tre konstanta

fenomeno, pli konstanta ol rapide ŝanĝiĝantaj politikaj aŭ komercaj rilatoj. Ekzemple dum la periodo kiam la landoj de Mezorianta Eŭropo apartenis al la soveta bloko, iliaj novaĵo-interesoj tamen sekvis la pli malnovajn kulturajn rilatojn, kaj granda parto el la eksterlandaj novaĵoj temis pri Okcidenta Eŭropo.

Aparte tiam, kiam la propra lando partoprenas en internaciaj novaĵoj, la novaĵo estas pli verŝajne raportata. Ekzemple usona esploro montris, ke se Usono partoprenas en iu internacia okazaĵo, la novaĵo estas pli verŝajne raportata en regionaj usonaj gazetoj; aparte grava estis la influo de la propra lando kiam temis pri novaĵoj el evoluantaj landoj (Hester 1971). Same, eksterlandaj korespondantoj situas kutime kaj en elitaj landoj kaj en kulture proksimaj landoj.

Kultura proksimeco klarigas ankaŭ tion, ke la greka gazetaro skribis pli multe kaj pli pozitive pri la grekdevena prezidenta kandidato de Usono Michael Dukakis en 1988, kvankam granda parto el la fotoj kaj novaĵoj venis tra novaĵagentejoj (Zaharopoulos 1990, 194). Simile okazis en 2008 kiam la indonezia kaj kenja gazetaroj skribis multe pli pri la kandidato Barack Obama, kiu havis personajn rilatojn kun tiuj landoj.

Ankaŭ la kondiĉoj en lando kie la novaĵoj aperas estas gravaj. La prioritatoj de la eksterlanda politiko de la lando klare videblas en la elekto kaj prezento de novaĵoj. Same la malnovaj stereotipoj klarigas multon de tio, kiam ekzemple Afriko aperas en eŭropaj novaĵoj kiel neprogresanta kaj tradicia, kaj konfliktoj klarigeblas per tribaj kaj etnaj kialoj. Eĉ la lokaj kondiĉoj havas sian rolon: usonaj gazetoj publikigis pli da novaĵoj el Meksiko, se en iliaj eldonlokoj troviĝis multe da meksikdevenaj enmigrintoj (Johnson 1997).

La diskuto pri la kvalito de eksterlandaj novaĵoj estis aparte forta en la 1970-aj jaroj. Tamen jam pli frue, tiam kiam la internaciaj novaĵagentejoj dividis la mondon inter si laŭ siaj regionoj de influo, la fakuloj kritikis la kvaliton de la eksterlandaj novaĵoj (Boyd-Barrett 1980, 23). La sendependiĝo de landoj de la tria mondo ne rezultigis liberiĝon de la dominado de okcidentaj landoj, kio videblis ankaŭ en la eksterlandaj novaĵoj. La eksterlandaj novaĵoj kiuj aperis en nove-sendependaj landoj ofte venis tra okcidentaj novaĵagentejoj kiuj ĉefe produktis novaĵojn por aliaj okcidentaj landoj, kio videblis en la bildo kiun ili donis pri la mondo. La evoluantaj landoj kritikis aperte la kulturan imperialismon, kio videblis en importo de kulturaj produktoj el centraj landoj de la okcidento kaj en la malĝusta bildo kiun okcidentaj novaĵagentejoj donis pri la mondo (Gunter 1978, 142).

En komunikad-fluoj inter landoj videblis klara unuflankeco; en landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko mankis informoj pri Afriko, Azio kaj Suda Ameriko. La novaĵoj produktitaj en Eŭropo aŭ Norda Ameriko ne taŭgis por publiko en la tria mondo (Masmoudi 1984, 14-16). En la fluo de televidaj programoj unuflankeco aperis de Usono al ĉiuj aliaj landoj, sed ne inverse. De Okcidenta Eŭropo venis pli ol 3000 horoj da programoj al Orienta Eŭropo sed nur 1000 horoj de televidaj programoj en la alia direkto. Tamen la esploristoj rimarkis ankaŭ la fortan fluon de televidaj programoj ene de arabaj landoj kaj ene de landoj de Suda Ameriko (Varis 1973, Nordenstreng & Varis 1974).

La evoluantaj landoj timis perdon de kultura identeco kaj aŭtonomio, kaj ankaŭ la dominadon surbaze de komunika teknologio kaj internaciigo de la ekonomio. La kultura importo ne okazis surbaze de la ricevanto sed surbaze de la celoj de la okcidento (Hamelink 1986, 241-242). Ne nur kvante sed ankaŭ kvalite aperis malkongruo: la novaĵoj el evoluantaj landoj ofte temis pri krizoj, ili estis unuflankaj kaj evitis traktadon de multflankaj okazaĵoj kaj de detaloj (Lent 1977, Masmoudi 1979).

La usonaj amaskomunikiloj evitis raporti pri atakoj kontraŭ homaj rajtoj en landoj, kiuj estis politike proksimaj al Usono (ekzemple Indonezio kaj Salvadoro). Unu esploro, kiu komparis la raportojn pri Salvadoro en Usono kun raportoj pri Afganio en Soveta Unio dum la unua

duono de la 1980-aj jaroj, emfazis ke nek en Usono nek en Sovetio la amaskomunikiloj donis kompletan bildon pri la konflikto (Downing 1988).

Nova monda internacia komunika ordo

Unu el la rezultoj de la kritiko estis deklaro pri amaskomunikado, kiun Unesko akceptis en sia ĝenerala konferenco en 1978 (Nordenstreng 1984a). La deklaro difinas internaciajn rajtojn kaj devojn de amaskomunikiloj, kaj postulas ankaŭ kvalitajn devojn al la enhavo de komunikado kun emfazo pri la demokratiigo de la internacia komunikado. Ne mirinde ke la Esperanto-movado sentis la celojn de tiu deklaro proksimaj por ĝi kaj UEA.

La deklaro de Unesko estis parto el la diskuto pri nova internacia komunika ordo. La grava parto de tiu diskuto estis kritiko kontraŭ la forta rolo de la internaciaj novaĵagentejoj, aparte kiam temis pri novaĵoj el triamondaj landoj kaj pri la dependeco de triamondaj landoj de materialo kiun la agentejoj peras al ili. Por ŝanĝi la situacion triamondaj landoj fondis siajn proprajn retojn de novaĵ-interŝanĝoj ene de kontinentoj kaj en la kadro de la movado de nealiĝintaj landoj (Boyd-Barrett 1980, 247).

La nova internacia komunika ordo malakceptis la pli fruajn opiniojn pri la senlima libereco de komunikado. La nova ordo baziĝis sur la opinio, ke la senkontrola libereco rezultigas monopoliĝon kiu kaŭzas dependecon de pli malfortaj landoj. Due, ĝi emfazis ke la formala rajto de libera komunikado kaj esprimado ne sufiĉas, kaj ke necesas praktikoj por realigi la liberecon. Trie, la nova ordo postulis ke la informo kiun oni komunikas devas esti bonkvalita, objektiva kaj ĝusta (Nordenstreng 1984b, 29).

Unesko starigis laborgrupon por la studado de komunikaj problemoj (Komisiono de MacBride), kiu prezentis sian raporton en 1980 (MacBride 1980). Ankaŭ socialismaj ŝtatoj komprenis la valoron, kiun reformado de la internacia komunika sistemo povus porti al ili. Tiuj ŝtatoj ne estis plene fermitaj, ili fakte ricevis pli da kulturaj produktoj kaj novaĵoj el la okcidento ol la okcidento ricevis el tiuj ŝtatoj (Nordenstreng & Varis 1974). Ŝanĝi tion povus montriĝi utile por socialismaj ŝtatoj, kiuj eventuale povus eksporti pli da kulturaj produktoj, se la okcidenta superrego rompiĝus. En la Komisiono de MacBride, ĝuste UEA estis tiu organizo, kiu levis la lingvan demandon, “insistente, ke oni ne povas studi la internacian komunikadon sen atento al lingvaj demandoj” (Tonkin 2006, 82).

Okcidentaj kritikantoj opiniis, ke la nova ordo celas kontrolon de eksterlandaj ĵurnalistoj fare de ŝtatoj. Sed tion Unesko fakte neniam proponis, sed ĝi ja proponis, ke necesus uzi gazetaran liberecon en respondeca maniero (Nordenstreng 1999, 258-259).

La ideo pri la nova internacia komunika ordo kaŭzis ankaŭ opozicion, kaj kelkaj el la problemoj de internacia komunikado solviĝis parte sendepende de la diskuto. Ekzemple, evolulandaj amaskomunikiloj komencis publikigi pli da novaĵoj el aliaj evolulandoj kaj malpli da novaĵoj el okcidentaj landoj. Samtempe evolulandoj strebis mem kontroli siajn informfluojn (Galtung & Vincent 1992, 104-105).

Pli egalan internacian komunikan ordon postulis ne nur evolulandoj de la tria mondo sed ankaŭ socialismaj landoj kaj kelkaj malgrandaj okcidentaj industriaj landoj. En la 1970-aj jaroj en UN tamen ne aperis grandaj opinikonfliktoj, kaj en 1981 kiam deklaro pri komunikado estis akceptita per voĉdonado, ĝin oponis nur Usono kaj Israelo. La okcidentaj amaskomunikiloj komencis oponi al la deklaro pri amaskomunikado kaj timis ke la praktiko signifos kontrolon de la laboro de internaciaj ĵurnalistoj. Ankaŭ tiuj, kiuj defendis la senkontrolan fluon de informoj havis politikajn celojn: la okcidento celis influi la opiniojn de civitanoj en socialismaj landoj kaj tiel ankaŭ la politikan evoluon en tiuj landoj. La esploroj post la kolapso de tiuj sistemoj montras klare ke la okcidentaj amaskomunikiloj havis sian

influan. Tamen ankaŭ Sovetio kaj pluraj mezeŭropaj ŝtatoj praktikis vastan informadon eksterlande pere de radio kaj gazetaro, kaj tio same havas klarajn politikajn celojn.

La konfliktoj videblis ankaŭ en esplorado. Ekzemple la esploron pri eksterlandaj novaĵoj kiun Unesko komisiis, eblis uzi por subteni tiun aŭ alian politikan konkludon. Nome, estas vero ke plej ofte la eksterlandaj novaĵoj venas el elitaj landoj de Okcidenta Eŭropo aŭ de Usono, sed ankaŭ veras ke ĉie plej multaj el la novaĵoj venas el la propra kontinento. Kritikantoj ankaŭ emfazis, ke socialismaj landoj aŭ kunlaboro de evolulandoj ne prezentas ian klare malsimilan alternativon al la okcidenta modelo. Krome la granda parto el la kritiko baziĝas sur malnoviĝintaj faktoj kaj problemoj kiuj jam solviĝis (Stevenson 1984, 134, 137).

La nova monda informa kaj komunika ordo vekis intereson ankaŭ ĉe la Esperanto-movado. Kiel lingva movado la Esperanto-movado estas proksima al komunikado, kaj la celo revolucii aŭ profunde ŝanĝi la internacian lingvan ordon estas ja proksima al la ideo pri nova informa kaj komunika ordo. La Esperanto-movado, unuavice CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj) kaj la novjorka oficejo de UEA traktis la lingvajn aspektojn de neegaleca komunikado en konferenco en Novjorko kiu okazis en decembro 1982. La konferenco atentigis i.a. pri la manko de instruado de fremdaj lingvoj en Usono (*Esperanto*, januaro 1983, 6-7). Tiutempe krom la Esperanto-movado malmultaj organizoj atentigis pri la lingva malegaleco de internacia komunikado. La Monda Komunika Jaro en 1983 estis unu el pluraj iniciatoj plibonigi la komunikan situacion en la mondo, sed la UN-rezolucio pri ĝi unuavice atentigis pri teknologio kaj ne pri la homa kaj lingva flankoj de komunikado. La Esperanto-movado atentigis pri la jaro en la UK kiu okazis en Budapeŝto samjare (Pietiläinen 2010, 787).

Iusence la kulmino kaj por la nova monda informa kaj komunika ordo kaj por Esperanto en Unesko estis la ĝenerala konferenco de Unesko de 1985 en Sofio. La ideoj de NMIKO ricevis fortan kritikon flanke de okcidentaj ŝtatoj, kiuj provis haltigi ĉiujn diskutojn kaj studojn rilate al NMIKO, sed finfine kompromiso estis trovita (Usono jam malaliĝis el Unesko en 1984), laŭ kiu Unesko daŭrigas “kolektadon kaj analizon de informoj, kiuj temas pri evoluigado de koncepto de nova monda informa kaj komunika ordo, kiun ĝi vidas kiel evoluantan kaj daŭran procezon” (citita laŭ Nordensteng 1999, 260).

Pri Esperanto estis unuanime akceptita nova rezolucio. En la sofia rezolucio Unesko invitas la ŝtatojn-membrojn “instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado” kaj “pristudi la eblon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn” (citita laŭ Tonkin 2001, 295-296).

Tamen la monda politika evoluo turnis sin kontraŭ la nova internacia komunika kaj informa ordo, kaj post du rondtblaj konferencoj de UN kaj Unesko pri ĝi (1983 kaj 1986) la tria konferenco neniam okazis, ĉar la politiko de Unesko rilate reformojn de la monda komunikado ŝanĝiĝis kun la ŝanĝo de la ĝenerala sekretario M’Bow al Federico Mayor en 1987. En la 1990-aj jaroj la koncepto ne plu estis eĉ menciita en Unesko, kaj diskutoj pri monda ordo fariĝis nur akademias (Nordensteng 1999, 262-264). Tonkin rezonas simile: “La okcidentaj ŝtatoj komencis la sisteman malmunton de debatostrukturoj ĉirkaŭ komunikado kaj redirektis Uneskon al malpli disdividaj temoj (kaj temoj malpli fekundaj por Esperanto)” (Tonkin 2001, 298). Mi traktis tiujn evoluojn en mia artikolo (Pietiläinen 2011) en la festlibro de Humphrey Tonkin kaj fakte surpriziĝis pri kiom similaj la evoluoj estis.

La alternativo de *Monato*

La fondiĝo de Esperanta revuo pri ne-Esperantaj aferoj, *Monato*, okazis en 1979 kiel rezulto de la kritiko pri la kvalito de eksterlandaj novaĵoj. La modelo de *Monato* jam de komenco estis

utiligi lokajn ĵurnalistojn (ofte amatorojn), ĉar tiuj povus raporti pli fidinde pri la okazaĵoj el tiu vidpunkto kiu gravas en la lando kie la novaĵo aperas.

La ideo malantaŭ la fondo de la revuo *Monato* aperis ĉe Stefan Maul, profesia ĵurnalisto el Germanio. Li havis sperton pri la fondado de novaj gazetoj kaj tial volis utiligi siajn spertojn ankaŭ rilate Esperanton. En la sama jaro aperis en pluraj germanlingvaj gazetoj artikolo pri la fakto ke svisoj eksciis, ke Wilhelm Tell ne vere vivis, sed ke li estas mita figuro. Nu, fakte ĉiuj svisoj jam sciis tion, kaj certe tia artikolo ne estus povinta aperi en germanaj ĵurnaloj se ĝi estus verkita de sviso. Tio pensigis Maul pri grava manko de la plimulto de la gazetoj, kiuj traktas internaciajn temojn. Plej ofte verkas por ili loĝanto de la lando kie la gazeto estas eldonata, ne loĝanto de la regiono pri kiu temas la artikolo (laŭ Esperanta Vikipedio: Stefan Maul; ankaŭ Maul 2005, 199-200).

En 1978 Maul konkretigis sian revon, presigante provnumeron de *Semajno*, 40-paĝan numeron DIN A4-formatan, nigre-blanke ilustritan, kun kontribuoj pri terorismo, pri la Olimpiaj ludoj en Moskvo de 1980, pri la politika situacio en Hispanio, pri gerontologio kaj multe pli. La eldonon Maul pagis el propra poŝo. Li estis kalkulinta, ke la projekto sukcesos, se *Semajno* havos 10 000 abonantojn. Li tute ne atingis tiun kvanton. Eĉ ne 1000 pretis pagi la abonprezon de 150 germanaj markoj por 50 semajnaj ekzempleroj. Maul forlasis la ideon kaj konsideris ĝin fiaskinta bela revo (laŭ Esperanta Vikipedio: Stefan Maul).

Kiam Maul rakontis pri la fondo de *Monato* kaj la principoj laŭ kiuj *Monato* devus superi la kutimajn eksterlandajn novaĵojn en sia artikolo en la festlibro por Juan Régulo Pérez (Maul 1987), li eĉ skribis pri “revolucii” la internacian fluon de novaĵoj. Klare lia pensado ricevis influon el la kritiko kiun esploristoj direktis en la 1970-aj jaroj kontraŭ la mankoj de la internacia informa sistemo. Maul listigis 11 fontojn de eraroj kaj miskomprenoj, el kiuj granda parto estas la samaj, kiujn ankaŭ esploristoj de la internacia komunikada sistemo rimarkis. Laŭ Maul “la plej grava fonto de eraroj, miskomprenoj kaj misprezentoj estas la fremdeco de eksterlanda korespondanto” (Maul 1987, 416). Tial unu el la ĉefaj principoj de *Monato* estas ke por ĝi raportas “nur indiĝenaj aŭtoroj de l’ koncerna lando kaj mond-regiono” (Maul 1987, 417). La rezulto de tiu praktiko estas ke plimulto el la aŭtoroj “ne estas profesiaj ĵurnalistoj, kaj *Monato* fakte estas revuo de legantoj por legantoj, do vere unika demokrata entrepreno” (Maul 1987, 420). Tiu unikeco estas ankaŭ kialo de unu el la ĉefaj mankoj de *Monato*, nome ĝia amatoreco. Por kompensi tion, aperis ankaŭ esperantlingva gvidlibro pri ĵurnalismo (Jungner & Maul 1982), kiu tamen estas pli okcidenta ol internacia.

Maul esprimis en 1987 ankaŭ ideon pri esperantlingva inform-agentejo, kiu povus krei veran alternativon por “ŝanĝi kaj plibonigadi helpe de Esperanto la internacian, tutmondan inform-ordon” (Maul 1987, 425). En siaj memoroj preskaŭ 20 jarojn poste, Maul (2005) ne estas same revoluciema, sed li prezentas la kialojn malantaŭ la fondo de *Monato* tiel, kiel ili poste aperis en la Esperanta Vikipedio. La celo estis fari pli bonan, pli veran kaj pli fidindan gazeton, en kiu la materialojn verkas personoj, kiuj loĝas en landoj pri kiuj ili raportas kaj pro tio havas pli bonajn fonajn sciojn pri la okazaĵoj.

Ĉu la internacia magazeno sendependa *Monato* sukcesis en la tasko kiun priskribis Maul? La komparo de la geografio de mondaj novaĵoj en *Monato* dum tri diversaj jaroj montras, ke novaĵoj venas parte el la samaj landoj kaj kontinentoj kiel en la kutimaj amaskomunikiloj, sed ke ekzistas ankaŭ gravaj diferencoj.

La landoj kiuj estis ĉeftemoj de artikoloj en 1982-1983 estis Germanio, Britio, Japanio, Francio, Ĉinio, Usono, Jugoslavio, Hungario, Nov-Zelando, Malagasio kaj Brazilo (Malagasio kaj Brazilo troviĝas en la dividita 10-a loko). El tiuj la lastaj kvin estas landoj, kiuj kutime ne aperas en pintaj lokoj de internaciaj novaĵoj. Tamen la unuaj ses estas ĝuste tiuj landoj,

Tabelo 3. La geografio de eksterlandaj novaĵoj en *Monato*.

Kontinento	1982-1983	2003	2011-2012
Okcidenta Eŭropo	41%	38%	46%
Meza kaj Orienta Eŭropo	14%	26%	24%
Norda Ameriko	5%	12%	8%
Meza Oriento	5%	9%	1%
Azio	17%	6%	9%
Afriko	7%	3%	6%
Latina Ameriko	4%	3%	2%
Aŭstralio kaj Oceanio	7%	1%	1%
Internaciaj organizoj	–	2%	3%

La jaroj 1982-1983 laŭ Maul 1987, 429-430, bazite sur iom aliaj kriterioj ol la aliaj jaroj.

La jaroj 2003 kaj 2011-2012: mia propra kalkulo.

kiuj ofte aperas en la similaj listoj de tradiciaj nacilingvaj amaskomunikiloj. En la 1980-aj jaroj Stefan Maul plendis, ke preskaŭ mankas kunlaborantoj en la orienteŭropaj socialismaj landoj, escepte de Hungario kaj Pollando (Maul 1987, 419). Tio eble estis unu el la kialoj pro la malalta kvanto da novaĵoj el tiu mondoparto en 1982-1983. Poste la afero tamen ŝanĝiĝis kaj aperis ankaŭ pli da novaĵoj (la divido en Okcidenta kaj Orienta Eŭropo ne plu havas senco, sed ĝi estas konservita pro la ebleco kompari la nombrojn).

La plej ofte menciitaj land(ar)oj en 2003 estis Usono, Germanio, Litovio, Britio, Francio, Irako, Ruslando, Irlando, Eŭropa Unio kaj Japanio. Inter ili nur Litovio kaj Irlando estas klare esceptoj de la monda oftocalkulo de internaciaj novaĵoj. Dum la jaro de majo 2011 ĝis aprilo 2012, la plej ofte menciitaj landoj en *Monato* estis Usono, Germanio, Albanio, Britio, Aŭstrio, Belgio, Eŭropa Unio, Italio, Kosovo kaj Ĉinio. Inter ili klare Albanio, Aŭstrio kaj grandparte ankaŭ Belgio kaj Kosovo ne aperas kutime en nacilingvaj internaciaj novaĵoj.

La analizo de la geografia distribuo de novaĵoj en *Monato* montras, ke geografie la diferenco kun la mondaj novaĵoj en nacilingvaj gazetoj fakte ne estas aparte granda. La geografio de *Monato* ekzemple ne grandparte reprezentas la distribuon de esperantistoj en la mondo, sed troviĝas iel meze de la distribuo de esperantistoj (la aktivaj kontribuantoj de *Monato*) kaj de mondaj novaĵoj ĝenerale kaj havas ankaŭ relative grandan parton de hazardo (ekzisto de aktiva kontribuanto). La rezulto estas pli hazarda ol planita, kio plu atestas pri la dependeco de la redakcio de *Monato* je siaj kontribuantoj, kies aktiveco ne ĉiam kongruas kun la graveco de la okazaĵoj en la mondo.

Monato estas tre eŭropa, sed malpli eŭropa ol eŭropaj gazetoj kutimas esti, kaj ĝi estas ankaŭ malpli eŭropa ol oni povus supozi pro la distribuo de esperantistoj. Tamen Azio havas en *Monato* malpli grandan parton ol ĝia signifo en la nuna mondo postulus. En 1982-1983 aziaj landoj aperis pli ofte (kvankam parte kaŭzis tion la alitipa kalkulado). Ankaŭ Latina Ameriko restas grandparte ekster la atento de *Monato*, eble plejparte ĉar mankas aktivaj kontribuantoj en Brazilo.

Ankaŭ aliaj alternativoj ekzistas, ekzemple novaĵagentejo pri evolulandoj IPS (*Inter Press Service*) peras novaĵojn, kiujn verkis ĵurnalistoj el triamondaj landoj. IPS komencis sian agadon en 1964 kiel kooperativo de latinamerikaj ĵurnalistoj, sed plivastigis sian agadon poste al Azio kaj Afriko kaj kunlaboras kun 30 naciaj novaĵagentejoj en triamondaj landoj (Altschull, 1994: 311-312). La geografio de la novaĵoj de IPS estas pli egaleca, sed ankaŭ ĝi peras malpli da novaĵoj el Afriko. El la novaĵoj de IPS, 26% estas el Norda Ameriko kaj karibaj insuloj, 23% el Eŭropo, 22% el Latina Ameriko, 21% el Azio kaj 8% el Afriko

(Geertsema 2005, 118). Laŭ komparaj studoj pri raportado de novaĵoj, IPS donas pli da spaco por reprezentantoj de triamondaj landoj kaj malpli da spaco por regantoj de Norda Ameriko kaj Eŭropo (Horvit 2006).

Alia alternativo povus esti la araba televid-kompanio Al-Jazeera, aparte kiam temas pri ĝia anglalingva kanalo, kiu povus doni alternativon el araba vidpunkto. La publiko de la anglalingva Al-Jazeera certe estas limigita, aparte kiam temas pri homoj ne ligitaj al Islamo.

Konklude

La kritiko pri la internaciaj novaĵfluoj fokusiĝis al neegaleco kaj unuflankeco de la internaciaj inform-fluoj. La diskuto estis aparte grava en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj, kiam ĝi ricevis multe da atento en Unesko kaj estis ligita ankaŭ al samtempaj streboj de la Esperanto-movado ricevi subtenon de Unesko. Nova monda informa kaj komunika ordo estis unu el la iniciatoj de Unesko kiuj kaŭzis fortan kritikon ĉe la flanko de okcidentaj ŝtatoj, kiuj timis forigon de dominado de okcidentaj kompanioj. Kvankam la iniciato ricevis subtenon komence, la evoluo en la fino de 1980-aj jaroj iris en alia direkto: Unesko fokusiĝis al problemoj pri kiuj eblis pli facile samopinii inter okcidentaj kaj aliaj ŝtatoj, kaj kiuj ne kaŭzis same fortajn politikajn konfrontiĝojn.

Same kiel la nova internacia komunika ordo, ankaŭ Esperanto estis danĝera por la unueco de Unesko, kaj sekve la diskutoj ene de Unesko direktiĝis al aliaj temoj kiuj ne estis same danĝeraj. Mia artikolo en la festlibro de Humphrey Tonkin montras ligojn inter la diskutoj pri la nova internacia komunika ordo kaj Esperanto ĉe Unesko. En siaj analizoj la du ĉefaj korifeoj de la temoj, Tonkin kaj profesoro Kaarle Nordenstreng de la Universitato de Tampere (Finnlando) priskribis la finon de tiuj novaj iniciatoj ĉe Unesko preskaŭ per la samaj vortoj (kvankam malsamlingve).

La esploroj pri internacia fluo de novaĵoj jam delonge montris, ke la novaĵoj baziĝas sur kelkaj gravaj landoj kaj kelkaj krizopunktoj de la mondo, kaj ke granda parto de la mondo restas ekster la atento en (okcidentaj) internaciaj novaĵoj, kiujn internaciaj novaĵagentejoj ankaŭ distribuas al la triamondaj landoj. Ankaŭ postaj esploroj konfirmas tiujn rezultojn, kaj la mondo vere malmulte ŝanĝiĝis eĉ en la Interreta epoko. En la nuna epoko certe estas pli facile trovi informojn per alternativaj fontoj, sed la gvidaj amaskomunikiloj malmulte uzas tiujn eblojn. La forta pozicio de novaĵagentejoj eble estis troigita en pli fruaj esploroj, ĉar finfine la ricevanto (amaskomunikilo kiu uzas la novaĵojn) tamen decidas kiujn novaĵojn ĝi elektas (tamen ne eblas elekti tion kio ne estas proponata).

La ekzemplo de *Monato* estis unika en ĝia tempo kaj ĝi vere povis, kaj daŭre povas, ŝanĝi la strukturon de eksterlandaj novaĵoj. Nur poste ankaŭ aliaj internaciaj novaĵagentejoj kaj grandaj amaskomunikiloj de la okcidento komencis vaste uzi la samajn metodojn, ekzemple utiligi lokajn redaktorojn en Meza Oriento aŭ Ruslando, ne nur pro tio ke tio estas ofte malpli kosta, sed ankaŭ pro tio ke la lokaj redaktoroj estas pli kompetentaj raporti el siaj propraj landoj (lingve kaj kulture), nur se ili unue lernis la okcidentajn kriteriojn pri novaĵoj, kaj ankaŭ pro tio, ke ili povas pli sendanĝere raporti el lokoj kie okazas konfliktoj kaj kie okcidenta ĵurnalisto tro facile povus fariĝi celo de atako.

La alternativo de *Monato* estas interesa, kaj ĝi almenaŭ parte plenumas sian taskon. Krome, la principoj de *Monato* montriĝis daŭripovaj kaj funkciantaj eĉ post la pensiigo de la unua redaktoro; eĉ nuntempe la magazino sekvas la samajn principojn kiujn Maul starigis ĉe la fondo de *Monato*. La nova ĉefredaktoro Paul Peeraerts en sia enkonduko al la maja numero de *Monato* en 2011 skribis:

“Kio estas valora informo por vi, kara leganto? Valora sendube ne estas tio, kion vi jam legis en via loka gazeto, vidis trifoje en via landa televidstacio, ĝi ne estas tio, kio estas antaŭmaĉita de la mondaj novaĵagentejoj ... Indaj informoj por *Monato* estas neatenditaj vidpunktoj, raportoj verkitaj de lokaj homoj, materialo verkita por internacia postulema publiko.”

Do, la rezulto ne estas fari pli bone la samon, kion jam faras la mondaj novaĵagentejoj (ĉar por tio *Monato* en sia nuna formo ne kapablas), sed doni ion alternativan.

Literaturo

- Altschull, J.H. (1994) *Agents of Power: The Media and Public Policy*. New York: Allyn and Bacon.
- Barry, Marguerite (2012): Notes from the semi-periphery: Ireland's press coverage of the developing world and the value of small state studies in international communications research. *The International Communication Gazette* 74 (2), 124–144.
- Boyd-Barrett, Oliver: *Contra-flow in global news: international and regional news exchange mechanisms*. London: Libbey, 1992.
- Boyd-Barrett, Oliver: *The International News Agencies*. London: Constable & Beverly Hills (Ca.): SAGE, 1980.
- Buchanan, William & Cantril, Hadley: *How Nations See Each Other*. Urbana (Ill.): University of Illinois Press, 1953.
- Cohen, Yoel: Foreign press corps as an indicator of international news interest. *Gazette*, 1995, 89-100.
- Downing, John D. H.: Trouble in the Backyard: Soviet Media Reporting on the Afghanistan Conflict. *Journal of Communication* 38:2 (1988), 5-32.
- The Flow of the News. A Study by The International Press Institute*. Zürich: IPI, 1953.
- Galtung, Johan & Ruge, Mari Holmboe: The Structure of Foreign News. *Journal of Peace Research*, 1965:1, 64-91.
- Galtung, Johan & Vincent, Richard C.: *Global Glasnost*. Cresskill, N.J.: Hampton Press, 1992.
- Geertsema, Margaretha: *Gender Mainstreaming in Globalized News: Cultural Globalization and the Inter Press Service*. Dissertation, University of Texas at Austin, 2005. Legebla ĉe <http://www.lib.utexas.edu/etd/d/2005/geertsemam95386/geertsemam95386.pdf>
- Gerbner, George & Marvanyi, George: The Many Worlds of the World's Press. *Journal of Communication* 1977:1, 52-66.
- Gunter, Jonathan F.: An Introduction to the Great Debate. *Journal of Communication* 28:4 (1978), 142-156.
- Hamelink, Cees J.: Dependency and Cultural Choice. En: Kivikuru, Ullamaija & Varis, Tapio (red.): *Approaches to International Communication*. Textbook for journalism education. Helsinki: Finnish National Commission for Unesco, 1980, 221-247.
- Haynes, Robert D.: Test of Galtung's Theory of Structural Imperialism. En: Stevenson, Robert L. & Shaw, Donald Lewis (red.): *Foreign News and the New World Information Order*. Ames (Iowa): The Iowa State University Press, 1984, 200-216.
- Hester, Al: An Analysis of News Flow from Developed and Developing Nations. *Gazette*, vol. 17, 1-2/1971, 29-43.
- Horvit, Beverly (2006): International News Agencies and the War Debate of 2003. *The International Communication Gazette* 68(5–6): 427–447.
- International News. Freedom Under Attack*. Edited by Dante B. Fascell. Beverly Hills-London: SAGE, 1979.
- Johnson, Melissa A.: Predicting News Flow from Mexico. *Journalism & Mass Communication Quarterly* 74:2 (1997), 315-330.

- Jungner, Judith & Maul, Stefan: Manlibro pri ĵurnalismo. Antverpeno / La Laguna: TK/Stafeto, 1982.
- Kayser, Jacques: One Week's News. Comparative Study of 17 Major Dailies for a Seven-day Period. Paris: Unesco, 1953.
- Kivikuru, Ullamaija & Varis, Tapio: Approaches to International Communication. Textbook for journalism education. Helsinki: Finnish National Commission for Unesco, 1980.
- Lee, Chin-Chuan & Yang, Junghye: Foreign News and national interest: Comparing U.S. and Japanese coverage of a Chinese student movement. *Gazette* 56 (1995):1-18.
- Lent, John A.: Foreign News in American Media. *Journal of Communication* 1977:1, 46-51.
- MacBride, Sean (1980) Many Voices, One World: Towards a New More Just and More Efficient World Information and Communication Order. Report by the International Commission for the Study of Communication Problems. Paris: UNESCO. Legebla ĉe: unesdoc.unesco.org/images/0004/000400/040066eb.pdf
- Masmoudi, Mustapha: The New World Information Order. En: *World Communications: A Handbook*. George Gerbner & Marsha Siefert (red.). New York & London: Longman, 1984, 14-27.
- Maul, Stefan (1987): Ĉu eblas revoluciigi la internacian inform-sistemon helpe de la internacia lingvo Esperanto? Konkludoj el la spertoj pri *Monato* magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo. En: Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo, II Esperantismo. La Laguna, 409-433.
- Maul, Stefan: El verva vivo ĵurnalista. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2005.
- Murrell, Correen: Baghdad bureaux: an exploration of the interconnected world of fixers and correspondents at the BBC and CNN. *Media, War & Conflict* 2010 (3):2, 125-137.
- Nordenstreng, Kaarle (1984a): Mass Media Declaration of UNESCO. Norwood (N.J.): Ablex, 1984.
- Nordenstreng, Kaarle (1984b): Defining the New International Information Order. En: *World Communications: A Handbook*. George Gerbner & Marsha Siefert (red.). New York & London: Longman, 1984, 28-36.
- Nordenstreng, Kaarle (1999): "The Context: Great Media Debate". En: Vincent, Richard C., Nordenstreng, Kaarle & Traber, Michael (red.): *Towards Equity in Global Communication*, MacBride Update. Cresskill, New Jersey: Hampton Press, p. 235-268.
- Nordenstreng, Kaarle & Varis, Tapio: Television traffic – a one-way street. A survey and analysis of the international flow of television programme material. *Reports and Papers on Mass Communication*, No. 70. Paris: Unesco, 1974.
- Östgaard, Einar: Factors Influencing the Flow of News. *Journal of Peace Research*, 1965:1, 39-63.
- Pietiläinen, Jukka: Uutisvirtojen maailma. En: Kivikuru, Ullamaija & Pietiläinen, Jukka (red.): *Uutisia yli rajojen. Ulkomaan uutisten maisema Suomessa*. Helsingin yliopiston Lahden tutkimus- ja koulutuskeskus, 1998, p. 64-83.
- Pietiläinen, Jukka (2006): Foreign News and Foreign Trade. *Gazette* 68(3): 217–228.
- Pietiläinen, Jukka (2010): Plurlingvismo kaj Esperanto: Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado. En: *La arto labori kune*. Blanke, D. & Lins, U. (red.). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 781-792.
- Rosengren, Karl Erik: International News: Intra and Extra Media Data. *Acta Sociologica* 13:2 (1970), 96-109.
- Rosengren, Karl Erik: International News: Methods, Data and Theory. *Journal of Peace Research* 1974:2, 145-156.
- Schramm, Wilbur: One Day in the World's Press: Fourteen Great Newspapers on a Day of Crisis. Stanford, Calif.: Stanford University, 1960.
- Schramm, Wilbur: Mass Media and National Development. The Role of Information in the Developing Countries. Stanford (Calif.): Stanford University & Paris: Unesco, 1964.
- Schramm, Wilbur & Atwood, Erwin: Circulation of News in the Third World. A Study of Asia. Hong Kong: The Chinese University Press, 1981.

- Sreberny-Mohammadi, Annabelle with Kaarle Nordenstreng, Robert Stevenson and Frank Ugboajah: *Foreign News in the Media: International reporting in 29 countries. Reports and Papers on Mass Communication*, No. 93. Paris: Unesco, 1985.
- Stevenson, Robert L.: Pseudo Debate. *Journal of Communication* 34:1 (1984), 134-138.
- Stevenson, Robert L. & Shaw, Donald Lewis: *Foreign News and the New World Information Order*. Ames (Iowa): The Iowa State University Press, 1984.
- Tonkin, Humphrey (1987): "Esperanto kaj la angla lingvo: Du lingvoj kun diversaj celoj". En: *Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo. Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto*. Tôkyô: Japana Esperanto-Instituto, p. 117-122.
- Tonkin, Humphrey (2001): "De Montevideo al Sofio. Esperanto antaŭ Unesko kaj Unesko antaŭ Esperanto". En: Lee, Chong-Yeong (Red.): *Esperanto en la 21a Jarcento*. Seoul: Korea Esperanto-Asocio, p. 277-301.
- Tonkin, Humphrey (2006): *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.
- Varis, Tapio: *International Inventory of Television Programme Structure and the Flow of Television Programmes between Nations*. University of Tampere, Research Institute, reports B no. 20/1973.
- Zaharopoulos, Thimios: *Cultural Proximity in International News Coverage: 1988 U.S. Presidential Campaign in the Greek Press*. *Journalism Quarterly*. 67:1 (1990), 190-194.
- Wilke, Jürgen, Christine Heimprecht & Akiba Cohen: *The geography of foreign news on television: A comparative study of 17 Countries*. *International Communication Gazette* (2012) 74: 301-322.
- Wu, H.D. (2000) 'The Systemic Determinants of International News Coverage: A Comparison of 38 Countries', *Journal of Communication* 50(2): 110-130.
- Wu, H.D. (2003) 'Homogeneity Around the World? Comparing the Systemic Determinants of International News Flow between Developed and Developing Countries', *Gazette* 65(1): 9-24.

Moderna arto: kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas?



Jonathan Cooper

Jonathan Cooper studis art-edukon ĉe la Universitato de Nova Sud-Kimrio, Aŭstralio. En 1982 lin dungis la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio (www.artgallery.nsw.gov.au) kiel muzean edukiston. Lia laboro inkluzivis liveron de edukaj servoj al diversaj grupoj kaj kreon de instruaj ekspozicioj, presaĵoj kaj videoj. En 1996 li iĝis ĉefo de edukaj programoj en la muzeo. Depost 2010 li estas la ĉefa kunordigisto de interretaj programoj, responsa por kreo de reta enhavo rilate al edukaj kaj eventaj programoj. Li ankaŭ ofte prelegas pri arto kaj art-eduko.

Jonathan eklernis Esperanton kiel junulo. En 1992 li prelegis Esperante pri arto ĉe la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio por grupo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso. En majo 2001 artikolo pri arto, kiun li verkis, publikigis en la revuo *Monato* (doctordada.com/erotiko-de-desegnado.html).

Resumo

Moderna arto jam okazas dum pli ol unu jarcento, sed eĉ nun multaj homoj ankoraŭ havas gravajn dubojn pri ĝi. Paroli pri tiu ĉi reputacia problemo estas la unua tasko de tiu ĉi prelego. La dua tasko estas difini stilon en arto, rilate al la intenco de la artisto.

Kvankam moderna arto naskiĝis en la komenco de la 20-a jarcento, la unua semo de ĝi, relativeco, ekkreskis en la 15-a jarcento, kaj la dua semo, memstareco, en la 19-a jarcento. La prelego eksplikos, kial moderna arto ne eblus sen tiuj ĉi gravaj ideaj ŝanĝoj.

En la multaĵo da diversaj artstiloj tra la historio estas du ĉefaj specoj, kiuj indikas du modalojn por vidi kaj figuri la mondon: la absolutan kaj la relativan. Absoluteca artaĵo figuras la mondon kiel, laŭ la artisto aŭ laŭ la societo de la artisto, ĝi 'estas', dum relativeca artaĵo figuras la mondon kiel ĝi ŝajnas, aŭ aspektas. Vario de relativeca artaĵo figuras la mondon kiel ĝi 'sentiĝas' – aŭ, por esprimi alie, tia artaĵo figuras la emocian sperton de propra renkonto kun la mondo. Dua grava semo de moderna arto estas la klopodo rompi la ligilon inter arto kaj la reala mondo, por ke artaĵoj staru per si mem. Tiu semo, memstareco, ebligas abstraktan (aŭ nefiguran) arton.

Modern art: What is it? Where did it come from?

Summary

Modern art has already been going for more than a century, but even now, many people have serious doubts about it. To address this reputation problem is the first task of this lecture. The second task is to define style in art, in relation to the intention of the artist.

Although modern art first appeared at the beginning of the 20th century, the first seed of it, relativity, started growing in the 15th century, and the second seed, self-sufficiency, in the 19th century. The lecture will explain why modern art would not be possible without these important conceptual changes.

In the multitude of different artistic styles through history there are two main types, which indicate two modalities for viewing, and depicting, the world: the absolute and the relative.

An absolutist artwork depicts the world as, according to the artist or the artist's society, it 'is', while a relativist artwork depicts the world as it seems, or appears. A variation of a relativist artwork depicts the world as it 'feels' – or, to put it another way, such an artwork depicts the emotional experience of a personal encounter with the world. A second important seed of modern art is the attempt to break the tie between art and the real world, so that artworks stand by themselves. This seed, self-sufficiency, enables abstract (or non-figurative) art.

L'art moderne: qu'est-il et d'où vient-il ?

Résumé

L'art moderne est né au début du vingtième siècle, mais on peut en trouver le premier germe, la relativité, au quinzième siècle, et le second, l'autonomie, au dix-neuvième siècle. Cette conférence expliquera pourquoi l'art moderne ne pourrait exister sans ces importants changements dans les idées.

Dans l'abondance des divers styles artistiques qui jalonnent l'histoire, il existe deux espèces principales qui reflètent deux façons de voir et de représenter le monde: l'absolue et la relative. Les œuvres d'art de type absolu représentent le monde tel que, d'après leurs auteurs, il « est », tandis que les œuvres de type relatif représentent le monde selon son apparence. Une variante de l'art relatif représente le monde tel qu'il est « perçu » ou, pour dire autrement, de telles œuvres représentent l'expérience émotionnelle d'une rencontre avec soi-même. Des germes de cette relativité, qui est un prérequis pour l'art moderne, se trouvent dans des œuvres de la Renaissance, des périodes baroque et romantique, mais encore plus dans l'impressionnisme et le postimpressionnisme français.

Un second germe de l'art moderne réside dans l'effort pour rompre le lien entre l'art et le monde réel, afin que l'œuvre existe par elle-même. Ce germe, l'autonomie, rend possible l'art abstrait (ou non figuratif). Paradoxalement, le mouvement qui insistait sur le fait que l'art doit représenter des sensations visuelles réelles fut l'impressionnisme français, mais c'est dans l'impressionnisme français qu'on trouve en premier le germe de l'autonomie.

Mỹ thuật hiện đại: định nghĩa và nguồn gốc

Tóm tắt

Những năm đầu thế kỷ XX, mỹ thuật hiện đại ra đời nhưng mầm mống đầu tiên của nó, tính tương đối, có thể tìm thấy từ thế kỷ XV và mầm mống thứ hai, tính độc lập, từ thế kỷ XIX. Bài phát biểu này nhằm giải thích lý do tại sao nền mỹ thuật hiện đại sẽ không thể tồn tại nếu thiếu những thay đổi về ý tưởng vô cùng quan trọng lúc đó.

Lịch sử mỹ thuật ghi dấu sự ra đời của hai trường phái mỹ thuật chính, thể hiện hai phong cách cảm nhận về thế giới: tuyệt đối và tương đối. Các tác phẩm theo phong cách tuyệt đối thể hiện và nhìn nhận thế giới theo một quy tắc đã được lấy làm nền tảng, là phải thể hiện sự vật « giống như thật », trong khi đó, trường phái tương đối lại mô tả thế giới theo nguyên tắc không cần thiết phải vẽ chi tiết hiện thực, mà chỉ chú ý đến bố cục và nhịp điệu chung của tác phẩm. Các tác phẩm thuộc trường phái thứ hai này nhận thức thế giới theo cảm nhận hoặc để thể hiện một cái nhìn khác, những tác phẩm như thế nhấn mạnh vào cảm xúc của người xem. Mầm mống của trường phái này – sự khởi đầu cho nền mỹ thuật hiện đại được tìm thấy trong

các tác phẩm thời Phục Hưng, Barốc, lãng mạn nhưng rõ nét nhất là trong chủ nghĩa ấn tượng và hậu chủ nghĩa ấn tượng Pháp.

Mâm mống thứ hai của mỹ thuật hiện đại đó chính là sự nỗ lực không ngừng để phá vỡ sợi dây liên kết giữa nghệ thuật và thế giới hiện thực, để mang lại tính độc lập cho các tác phẩm. Chính tính độc lập này đã mang lại cho nghệ thuật tính trừu tượng. Tuy nhiên, có một nghịch lý là, phong trào mỹ thuật tuyệt đối – mô tả chân thực về thế giới “giống như thật” được phát triển mạnh mẽ trong thời kỳ chủ nghĩa ấn tượng Pháp nhưng cũng chính ở đó, người ta lại tìm thấy những mâm mống đầu tiên của tính độc lập.

Moderna arto: kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas?

La reputacia problemo de moderna arto

La du demandoj de tiu ĉi prelego estas: “Kio estas moderna arto?” kaj, “De kie ĝi venis?” Sed multaj homoj eble demandas: “Kiu zorgas pri moderna arto?” Por ili, estas kvazaŭ mi demandas: “Kia estas la vetero sur Marso?” aŭ “Kiel oni fermentigas fiŝon?” Demandoj ne nur senrilataj por ili, sed pri io kion ili fakte ne ŝatas.

Do, devus esti *tria* demando, antaŭ la du aliaj: “Ĉu moderna arto indas?” Tio estas, ĉu ĝi estas rigardinda, studinda, kaj (eble) aĉetinda?

Mia celo estas ne ke vi ŝatu modernan arton, sed almenaŭ ke vi *interesiĝu* pri ĝi pli multe ol antaŭe.

Mi laboras ĉe la Art-Galerio de Nov-Sud-Kimrio (en Sidnejo, Aŭstralio). Ĉiujare, de post 1921, la Galerio organizas konkurson pri portret-pentrado, por la Archibald¹-Premio. Ĉi-jare, la premio estis donita al la artisto Tim Storrier², por lia senvizaĝa memportreto, *La histriona vojiranto (laŭ Bosch)* (bildo 1³).



Bildo 1: Tim Storrier *La histriona vojiranto (laŭ Bosch)* 2012

Tiu ĉi decido kaŭzas polemikon. Multaj homoj diris: “Tio ne estas portreto. Portreto bezonas vizaĝon!”⁴

¹ Prononcita: “Áĉibold”

² “Storja”

³ Ĉiu bildo estas videbla interrete, per la retpaĝo <http://doctordada.com/moderna-arto-figuroj.html>.

⁴ Fakte, la artisto enmetis figuron de sia vizaĝo, sur malgranda papero en la supra, dekstra angulo.

En 1973, la Nacia Galerio de Aŭstralio aĉetis pentraĵon, *Bluaj stangoj: numero 1*, faritan en 1952 de la Usona artisto Jackson Pollock⁵, por 1,3 milionoj da dolaroj. La aĉeto de la granda, abstrakta pentraĵo⁶, kiu kreiĝis per plaŭdigita kaj gutigita farbo, kaŭzis ne nur polemikon: ĝi kaŭzis skandalon. Multaj homoj diris indigne: “Ĉu oni nomas ĝin arto? Juna infano povus fari pli bonan pentraĵon ol ĝi! Kia perdo mona!” Gazeto tiutempa havis ĉeftitolon: “Ebriuloj faris ĝin!”

En 1959 aperis eldono de la satira revuo *Punch*⁷ kun komika desegnaĵo de moderna artisto sur la kovrilo. Kontraŭ la muro estas multaj grandegaj, abstraktaj pentraĵoj, kreitaj per ŝutado kaj gutigado de farbo. La artisto ĉagreniĝas ĉar lia hundo, kiu ĵus iris tra disverŝita farbo, estas irona sur blanka, streĉita tolo, kuŝanta sur la planko. La ŝerco estas: “Kial la moderna artisto ĉagreniĝas ke hundo fuŝos la pentraĵon? Moderna arto estas *tiel* malorda kaj sensignifa ke neniu rimarkus la diferencon!”

Moderna arto evidente havas reputacian problemon.

Ĉu vi aŭdis la esprimon “Mi ne scias multe pri arto, sed mi scias kion mi ŝatas”? Mi aŭdis ĝin tiel multe ke ĝi jam estas kliŝa. Sed homoj kiuj diras ĝin parolas vere. Ili diras, alivorte, “Eble, se oni studus arton kaj lernus pri artistoj, movadoj, stiloj ktp, oni komprenus kaj ĝuus ‘malfacilan’ arton, sed mi havas simplan, tujan ĝuon de arto, kaj mi kontentas pri tio.”

Difino de stilo

Multaj homoj opinias ke la du celoj de ‘reala’ artisto estas: unue, figuri ion, kaj due, fari ion belan. Sed, kvankam artaĵoj eble estas figuraj kaj belaj, la kreado de arto estas pri io alia. Mi demonstru:

Imagu ke ni ĉiuj estas kune en art-muzeo kaj *mi* estas artisto (aŭ mi almenaŭ tiel *konsideras* min). Mi decidus krei artaĵon por la muzeo. Mi havas skatolon plenan de forĵetaĵoj. Mi renversas la skatolon kaj la forĵetaĵoj falas sur la plankon (bildo 2).



Bildo 2: Forĵetaĵoj sur la planko en la artmuzeo

Nu, se ni forirus kaj postlasus la ‘artaĵon’ en la muzeo kaj *revenus* post unu tago, ĉu la artaĵo ankoraŭ estus tie ĉi? Ne? Kial ne? Kiu forprenus ĝin? Kiu havas la *veran* povon en la artmuzeo? Ĉu la direktoro? Ĉu la kuratoroj? Ne, la purigistoj! Estas ili kiuj devos decidi ĉu la amaso da objektoj estas vere artaĵo aŭ nur forĵetaĵoj. Do, kiel la purigisto decidus? Kaj ĉu ni povus certigi ke la ‘artaĵo’ estos tie ĉi morgaŭ? Kiel? Ĉu etikedo? Ĉu signo? Ĉu prez-signeto? Ĉu kadro?

⁵ “Ĝeksn Polok”

⁶ Videbla ĉe <http://nga.gov.au/international/catalogue/Detail.cfm?IRN=36334>

⁷ “Panĉ”

Tiuj ĉi objektoj *eble* sufiĉus, sed ni verŝajne bezonas ion pli *esencan*, ion, kio konvinkus purigiston (kaj aliajn) ke tio ĉi estas *vera* artaĵo, ne nur ke *ni* opinias ke ĝi estas tio.

Do, ni povus fari ion al la forĵetaĵaro mem, por ke ĝi aspektu pli ‘arta’ kaj intenca. Ni povus vicigi la objektojn. Ni povus elekti objektojn, kiuj havas similajn kolorojn.

Eble *ni* havas ideojn, sed kion iuj *artistoj* dirus al ni, se ili povus?

Nora Heysen⁸ eble dirus al ni, surbaze de sia pentraĵo *Mempotreto* (bildo 3): “Emfazu horizontalojn kaj vertikalojn. Uzu plejparte neŭtralajn kolorojn (brunojn, grizojn, kremojn, nigron kaj blankon) kaj eble malgrandan akcenton de brila koloro, ekzemple ruĝo.”



Bildo 3: Nora Heysen *Mempotreto* 1932

La artisto William Dobell⁹ estis fama pro siaj esprimriĉaj portretoj. Surbaze de sia portreto de Margaret Olley¹⁰ (bildo 4), li eble dirus al ni: “Emfazu kurbojn. Uzu similajn kolorojn, ekzemple kremojn, flavojn kaj helajn verdojn.”



Bildo 4: William Dobell *Margaret Olley* 1948

⁸ “Hajsn”

⁹ “Ŭiljm Doŭbél”

¹⁰ “Magret Oli”

Elioth Gruner¹¹ estis fama pro siaj impresionismaj pejzaĝoj. Li eble dirus al ni, surbaze de sia malgranda pentraĵo de virino sur la plaĝo (bildo 5): “Uzu atmosferon por malklarigi la bordojn inter objektoj, kaj malgrandigi la kolor-diferencojn.”



Bildo 5: Elioth Gruner *Bondi* 1915

Eric Wilson¹² estis raraĵo en la aŭstralia arto: vera kubisto, kiel Picasso. Vidu lian pentraĵon en bildo 6. Kion *li* eble dirus al ni? “Uzu dispecigadon.” Alivorte, dispecigu la objektojn kaj muntu la pecojn en alian aranĝon.



Bildo 6: Eric Wilson *Abstraktaĵo – la kuireja forno* 1943

¹¹ “Eljot Gruna”

¹² “Erik Ŭilsn”

Nu, ni povus peti konsilon de iu ajn artisto. Ĉiu respondus al ni laŭ sia propra metodo por ŝanĝi kaoson en ordon, por ŝanĝi ŝancon en intencon. Kaj ĉiu metodo estas afero, kiun oni kutime nomas ‘**stilo**’.

Relativeco

Sed tio ne eksplikas *kial* multaj modernaj artaĵoj ne similas al la reala mondo. Kial estas ofte distordo en moderna arto? Kial nun estas arto tute nefigura – nur formoj, linioj, koloroj ktp?

Por solvi tiun problemon, ni fakte devas veturi al la 15a jarcento.

Bildo 7 montras pentraĵon el la urbo Sieno, en la lando nun konata kiel ‘Italio’. Ĝin faris la artisto Sano di Pietro. Rimarku la oran fonon. Rimarku la Dipatrinon, Maria, en ŝia tradicia ultramara robo. Rimarku la nepran ordon de la homoj. Kaj rimarku la strangan apudmeton de la beba Jesuo kun plenkreska Johano la Baptisto (spite de la fakto ke ili estis samaĝaj). Tio signifas ke la realeco, kiun la artisto figuras, estas *spirita*, ne fizika.



Bildo 7: Sano di Pietro *Dipatrino kaj Infano kun la Sanktuloj Ĵeromo, Johano la Baptisto, Bernardino kaj Bartolomeo Malfrua* 15a jarcento

Koncize, la pentraĵo montras objektojn *ne* kiel ili aspektas, sed kiel ili ‘estas’ laŭ la tiama socio.

Domenico Beccafumi kreis pentraĵon, 50-70 jarojn poste, kun preskaŭ la sama temo (bildo 8), sed rigardu la diferencojn.



Bildo 8: Domenico Beccafumi *Dipatrino kaj Infano kun infana Johano la Baptisto* ĉ.1542

Rimarku la ombran modeladon sur la vizaĝoj kaj korpoj, kiuj helpas la iluzion de profundeco. La vizaĝoj en la Siena pentraĵo estas preskaŭ ebenaj. Rimarku la ĉirkaŭajn ombrojn, kiuj kaŝas detalojn. Rimarku la acidajn kolorojn, elektitajn de la *artista*, ne de tradicio. La pli frua pentraĵo havas haloojn kiel orajn brilojn ĉirkaŭ la kapoj. Ankaŭ la pli malfrua pentraĵo havas haloojn, sed ili ŝvebas *super* la kapoj, kiel apenaŭ videblaj ringegoj. Kial la artista pentris ilin *tiel*? La artista preferus *ne* figuri nefizikajn aferojn, sed, se li devus, li decidus pentri ilin *kvazaŭ* ili estus realaj, fizikaj objektoj.

La pentraĵo de la Dipatrino de Loreto (bildo 9), farita de la baroka artista Caravaggio¹³, ĉirkaŭ 60 jarojn poste, figuras ne *precize* la saman temon kiel la du antaŭaj, sed ĝia temo certe tre similas al ilia. Rimarku nun eĉ pli *grandan* realismon, kaj naturismon. La lumo kaj ombroj estas dramaj. Denove, la haloj estas ŝvebantaj ringegoj. Rimarku la nudajn piedojn de Maria, kaj la malpurajn, nudajn piedojn de la pilgrimanto, kaj notu la rompitan muron. Tiuj ĉi aferoj helpas nin imagi ke tiu ĉi sceno estas reala, ne nur mita rakonto.



Bildo 9: Caravaggio *Dipatrino de Loreto* 1604-06

¹³ “Karavaĝo”


De Sano di Pietro al Caravaggio, ni vidas progreson de unu aliro al alia. Sano di Pietro figuras aferojn kiel ili ‘estas’, sed Caravaggio figuras ilin kiel ili *aspektas* al li, aŭ laŭ siaj *sperto* kaj *sentoj* pri ili. (Jes, la artisto ne fakte vidis la eventojn de la Biblio, sed li uzis realajn homojn kiel pozistojn kaj desegnis ilin.)

La progreso estas de ‘**absoluta**’ al ‘**relativa**’ aliro.

Tio estas kial la inventado de perspektivo en la Renesanco estis tiel grava. Fine, artistoj povis figuri objektojn, homojn kaj scenojn kiel ili *aspektis*, de iu ajn angulo.

En la dudeka jarcento, multaj artistoj daŭrigis kaj streĉis la relativan aliron eĉ plue, diversmaniere.

Ekzemple, la pentraĵo de fajra nebuleto (bildo 10), pentrita de la artisto Lloyd Rees¹⁴ kiam li estis maljunulo. Kvankam la *detaloj* estas kaŝitaj per la fuma nebuleto (kaj eble per la malbona vidpovo de la artisto), la *koloroj* estas ja malkaŝitaj.



Bildo 10: Lloyd Rees *Fajra nebuleto ĉe Gerringong* 1980

Relativeco estis la unua ‘semo’ de moderna arto, kaj ĝi estas la aliro de moderna arto, ĉu vida (kiel la antaŭa ekzemplo) ĉu emocia (kiel la pentraĵo *Enirejo al la haveno de deziro* (bildo 11), farita de John Olsen¹⁵ en 1964, kiu estas figuro de la *sento* de unu homo pri la ‘sovaĝa’ urbo Sidnejo).



Bildo 11: John Olsen *Enirejo al la haveno de deziro* 1964

¹⁴ “Lojd Ris”

¹⁵ “Ĝon Olsn”

Memstareco

Sed, estas alia kialo ke multaj modernaj artaĵoj malsimilas al la reala mondo. Por trovi ĝin, ni iru al la malfrua 19a jarcento.

Kial tiel multaj ne-modernaj pentraĵoj havas kadrojn? Parte, ĉar kadro (speciale ora kadro) igas pentraĵon pli pompa, pli parada, sed plejparte ĉar kadro ĉirkaŭ pentraĵo kreas virtualan fenestron – kiu siavice kreas imagan mondon post la bild-ebeno. (Tial, plej multaj modernaj pentraĵoj havas tre malgrandajn kadrojn, aŭ eĉ tute *ne* havas kadrojn.)

La artisto kiu kreis la pentraĵon en bildo 12 (pentraĵo kun sia grandega kaj paradega kadro) certe *ne* deziras ke ni vidu farbon kaj penikmarkojn. Li deziras anstataŭe ke ni vidu karnon, marmoron, pelton, plumojn ktp.



Bildo 12: Edward Poynter *La vizito de la Reĝino de Ŝebo al la Reĝo Solomono* 1890

La rusa artisto Wassily Kandinsky¹⁶ (fama kiel la unua okcidentulo kiu kreis tute nefigurajn pentraĵojn) vidis, kiel juna artisto, pentraĵon de fojnstako, faritan de la franca impresionisto Claude Monet¹⁷. Similan pentraĵon vi povas vidi en bildo 13.



Bildo 13: Claude Monet *Fojnstako (Sunsubiro)* 1891

¹⁶ “Vasili Kandinski”

¹⁷ “Klod Moné”

Pli malfrue, Kandinsky skribis: “La katalogo eksplikis al mi ke ĝi estas fojnostako. Mi ne povis rekoni ĝin. Mi sentis embarason pro tiu manko de rekono. Mi ankaŭ sentis ke la pentristo ne havas la rajton pentri tiel maldistinge. Mi havis malakran senton ke la objekto mankas. ... Tutklara tamen estis la ne-anticipita povo de la paletro, ĝis nun nekonita de mi, kiu superpasis ĉiujn miajn revojn.”¹⁸

Kaj jen pentraĵo de Kandinsky, de 1913 (bildo 14). Estas neniuj virtuala fenestro nun, neniuj imaga mondo. ‘Farbo kiel iluzio’ vere iĝis ‘farbo kiel farbo’. Artaĵo povis stari per si mem.



Bildo 14: Wassily Kandinsky *Etudo por 'Pentraĵo kun blanka rando'* 1913

La dua semo de moderna arto estas memstareco.

Paradokse, la movado kiu insistis ke arto devas figuri realajn vidajn sensojn estis la franca impresionismo de Claude Monet, sed estas en franca impresionismo, kun ĝia malglata farbo kaj ĝiaj evidentaj penikmarkoj, kie oni unue trovas la semon de memstareco.

Parenteze, rigardu ankaŭ la pentraĵon de Monet kiel ekzemplon de relativeco. Vidu kiel lumo kaj atmosfero obskurigis la detalojn, kaj tio ĉi estas preskaŭ 90 jarojn antaŭ *Fajra nebuleto ĉe Gerringong* de Lloyd Rees.

Eksperimenteco

Ĝis nun, ni vidis du esencajn semojn, kaj trajtojn, de moderna arto: **relativecon** (figuri la mondon kiel ĝi **ŝajnas**) kaj **memstarecon** (uzi farbon *kiel farbon*). Sed estas alia trajto: la serĉo por io nova, io freŝa. De post la industria kaj scienca revolucioj, multaj artistoj ĉagreniĝas ke arto malfreŝiĝas, ke ĝi perdas sian potencon pro siaj reguloj, supozoj kaj kutimoj.

Ili scivolas, “Kio okazus se mi farus ion nekutiman, se mi intence rompus la regulojn?”

Unu regulo, aŭ kutimo, rilatas al *kiel* artisto kreas.

Kutima labormaniero por pentristo estas:

¹⁸ Wassily Kandinsky, “Reminiscences/Three pictures (Rememoraĵoj/Tri bildoj)” (1913) en Wassily Kandinsky, *Kandinsky: complete writings on art (Kandinsky: plenaj prozaĵoj pri arto)*, red. Kenneth C Lindsay kaj Peter Vergo, Da Capo Press, Nov-Jorko, 1994, p.363

- ĉe vertikala, ebena supraĵo (streĉilo, kiu estas akra-randa rektangulo), kiu estas sur stablo,
- rigardante la objekton,
- uzante penikojn, kaj *artistajn* oleofarbojn sur paletro,
- la artisto figuras la objekton, kiu estas la temo de la pentraĵo.

Anstataŭe, jen la usona artisto Jackson Pollock, kiu pentris la artaĵon *Bluaj stangoj*, laboranta (bildo 15).




Bildo 15: Jackson Pollock, pentranta

- La supraĵo estas horizontala
- kaj nestreĉita,
- la farbo estas ŝutata, gutigata, vipata,
- la artisto estas ‘en’ la bildo (ne rigardanta aliloken) kaj...
- la procedo de kreado estas la *temo* de la pentraĵo!

Alia, maljuna artisto, Hans Hoffmann, iam diris al Pollock: “Vi ne plu desegnas laŭ naturo; vi stagnos.” Pollock simple respondis: “Mi *estas* naturo.”

Kaj kiuj estas la ingrediencoj de la pentraĵo de Pollock? Ne oleofarboj sur tolo, sed, por *Bluaj stangoj*: “emajlaj kaj aluminiuj farboj kun vitro, sur tolo”.

Bildo 16 montras artaĵon de la greka artisto Jannis Kounellis¹⁹:



Bildo 16: Jannis Kounellis *Sen titolo* 1984-87

¹⁹ “Janis Kunelis”

La ingrediencoj estas: “ŝtalo, ligno, gipso, tuko, gasbrulilo, farbo kaj fulgomarkoj”. Tiu ĉi stilo iam nomiĝis ‘arte povera’ (kio signifas ‘arto povra’). La nomo devenis de la uzo de malmultekostaj kaj kutime uzofinitaj ingrediencoj.

La limo inter la artaĵo kaj la reala mondo estas intence malklara: vidu la fulgojn sur la muro, kiuj verŝajne temas pri fulgo de oleolampoj en tombejoj. La muro estas nun parto de la artaĵo!

Estas alia ingredienco en tiu ĉi artaĵo kiu eble estas unika, aŭ almenaŭ tre nekutima: fajro!

La krea procedo kiel arto

Unu problemo, kiun ni ankoraŭ ne solvis, estas: kial tiel multa moderna arto ŝajnas rapidkreita, maldiligenta kaj tro facila? Ni vizitu unu kroman pentraĵon, faritan de Peter Upward²⁰ (bildo 17).



Bildo 17: Peter Upward *Nova realeco* 1961

Imagu ke ni estas en la ateliero de la artisto de tiu ĉi pentraĵo, iun tagon en 1961. Imagu fakte ke *mi* estas la artisto:

Bonvenon al mia ateliero. Mi baldaŭ kreos grandan pentraĵon. Mi pentros *ne* sur tolo, sed sur tabulo. Mi metis ĝin sur la stablon, kaj nun mi prenas miajn paletron, farbojn kaj penikojn kaj preparas min por pentri...

Atendu momente. Ĉu tio pravas? Ĉu mi ja povas pentri tiun pentraĵon *tiel*? Kun malgranda peniko? Ne, la penikmarkoj estas tro larĝaj!

²⁰ “Pita Apŭud”

Ĉu mi metis la tabulon vertikale, sur stablon? Sed, la nigra farbo estas tre dika kaj buleca. Kio okazus se mi pentrus per tia farbo sur vertikala ebena? Ĝi gutus sur la plankon. Do, kion mi faru? Mi devas *kuŝigi* la tabulon horizontale, sur la plankon, kiel Jackson Pollock.

Kaj *per kio* mi surmetus la farbon? Per *larĝa peniko*.

Do, mi *nun* estas preta por pentri. Mi volas krei pentraĵon de energio kaj vivo, kiel dancon. Mi kreas fortan markon de *tie ĉi ĝis tie ĉi*.

Ho, mia dorso doloras pro la troa streĉado! Kaj pli bonus se mi povus pentri pli longan markon *per unu streko*! Tiu ĉi peniko devus esti pli longa. Kiel? Mi *povus* ligi ĝin al tenilo de balailo. Aŭ, kial ne *forĵetu* la penikon kaj uzu la *balailon* anstataŭe?

Mi formovas la uzitan tabulon, kaj anstataŭigas ĝin per alia, blanka tabulo. (Mi poste viŝos la uzitan tabulon por alia pentraĵo.) Nun mi ja pretas. Mi deziras pentraĵon kiel dancon.

Nu, mi pentras denove. – Hmm... mi ne tre ŝatas la rezulton. Ĉu mi devus ripari ĝin per malgranda peniko? Ne, tiel mi perdus la spontanegan energion de la farbstrekoj. Ne, mi devas tute *rekomenci*, kun nova tabulo.

Mi akiras novan, blankan tabulon, kaj pentras denove. – Ho ne, tio estas pli malbona ol la unua! Kion mi faru? Mi akiros *alian* novan, blankan tabulon kaj pentros denove.

Nu, imagu ke tia procedo ripetiĝas kvinfoje, sed mi *ankoraŭ* ne kontentas pri la rezultoj. Mi haltas por tagmanĝo.

Estas nun post tagmanĝo, kaj mi estas reveninta al la pentraĵo. Mi penas kvinfoje plu.

Mi lacas nun. Hodiaŭ mi laboros ĉe *alia* artaĵo.

Imagu ke nun estas la sekva tago. Mi penas fari la pentraĵon dekfoje plu.

Rapide antaŭenigu la tempon. Imagu ke du monatoj pasis. Mi faris 99 klopodojn kaj tiu ĉi estas mia *centa* klopodo.

Mi pentras denove – Jes! Tio estas la pentraĵo, kiun mi serĉis!”

Do, la grava demando estas: kiel longe daŭris la kreado de la fina pentraĵo? Ĉu malpli ol du minutojn, aŭ du *monatojn*? Aŭ eĉ, la tutan vivon de la artisto ĝis nun? Vere, artisto ne povas krei sian milan artaĵon sen fini 999 artaĵojn antaŭe.

Konkludo

Moderna arto havas multajn malsamajn formojn, sed ĝi emas havi tri ecojn, kiuj estas:

- **relativeco** – en kiu la artisto agnoskas ke lia aŭ ŝia sperto ne nepre estas la sama kiel aliaj,
- **memstareco** – en kiu la artaĵo, kiel aĵo, povas esti pli grava ol ĝia temo, kaj
- **eksperimenteco** – en kiu la artisto scivolas: “Kial mi devas ĉiam fari ion laŭ reguloj aŭ kutimoj? Kio okazus se mi farus ĝin alie?”

Fakte, tio ne estas *difino* de moderna arto. Neniu povis sukcese difini *arton* (spite de multaj klopodoj), do kiel oni difinus *modernan* arton? Mia celo *ne* estis ke vi sciu precize kio estas moderna arto kaj kio ĝi *ne* estas, aŭ ke vi ŝatu ĝin. Bonŝance, oni povas aprezi artaĵon, eĉ ĝui la sperton de pensado pri ĝi, sen nepre ŝati ĝin. Se vi sentas ke via aprezo de moderna arto estas kreskinta, eĉ iomete, mi feliĉos.

Notoj pri bildoj

- Bildo 1: Tim Storrier *La histriona vojiranto* (laŭ Bosch) 2012
© Tim Storrier
- Bildo 2: Forĵetaĵoj sur la planko en la artmuzeo
- Bildo 3: Nora Heysen *Memporetro* 1932
Kolekto AGNSW © Lou Klepac
- Bildo 4: William Dobell *Margaret Olley* 1948
Kolekto AGNSW © Sir William Dobell Art Foundation
- Bildo 5: Elioth Gruner *Bondi* 1915
Kolekto AGNSW
- Bildo 6: Eric Wilson *Abstraktaĵo – la kuireja fornelo* 1943
Kolekto AGNSW
- Bildo 7: Sano di Pietro *Dipatrino kaj Infano kun la Sanktuloj Ĵeromo, Johano la Baptisto, Bernardino kaj Bartolomeo* Malfrua 15a jarcento
Kolekto AGNSW
- Bildo 8: Domenico Beccafumi *Dipatrino kaj Infano kun infana Johano la Baptisto* ĉ.1542
Kolekto AGNSW
- Bildo 9: Caravaggio *Dipatrino de Loreto* 1604-06
Preĝejo de Sankta Agostino, Romo
- Bildo 10: Lloyd Rees *Fajra nebuleto ĉe Gerringong* 1980
Kolekto AGNSW © A & J Rees. Licencita de Viscopy, Sidnejo
- Bildo 11: John Olsen *Enirejo al la haveno de deziro* 1964
Kolekto AGNSW © John Olsen. Licencita de Viscopy, Sidnejo
- Bildo 12: Edward Poynter *La vizito de la Reĝino de Ŝebo al la Reĝo Solomono* 1890
Kolekto AGNSW
- Bildo 13: Claude Monet *Fojnstako (Sunsubiro)* 1891
Kolekto MFA, Bostono
- Bildo 14: Wassily Kandinsky *Etudo por 'Pentraĵo kun blanka rando'* 1913
Kolekto AGNSW © Wassily Kandinsky/ADAGP. Licencita de Viscopy, Sidnejo
- Bildo 15: Jackson Pollock, pentranta
- Bildo 16: Jannis Kounellis *Sen titolo* 1984-87
Kolekto AGNSW © Jannis Kounellis
- Bildo 17: Peter Upward *Nova realeco* 1961
Kolekto AGNSW © Julie Harris

Kiuj kontrolas la registarojn de la mondo?



MÁRKUS Gábor

MÁRKUS Gábor naskiĝis en 1948 en Hungario. Finis la studprogramon de la Budapesta Ekonomika Universitato en 1972 en la kampo de planado kaj matematiko. Dum la sekvontaj jaroj instruis matematikon en la sama universitato (ankaŭ por multnombraj vjetnamaj studentoj). En 1982 ricevis stipendion de la japana entrepreno Verda Stelo por studi en Nanzan-Universitato en la mezjapana urbo Nagoya. Post sukcesa fino de la studprogramo doktoriĝis pri la analizo de la japana ekonomia evoluo. En la naŭdekaj jaroj fariĝis strategia manaĝero de la plej granda hungara industria organizo, la Nacia Petrola Korporacio. Por konatiĝi kun la internacie uzataj plej modernaj entrepreno-direktaj metodoj, en 1993 sukcese finis studprogramon en la urbo Boston, Massachussetts, Usono. Kiam la orient-europaj landoj decidis aliĝi al la eŭropa komunumo, tiam fariĝis la estro de la hungara parlamenta kontrola kaj aŭditor-organizo havante du taskojn: kontroli la registaron kaj evoluigi la publikan administran sistemon por ke la lando povu aliĝi al la Eŭropa Unio. Verkinto de pli ol 150 libroj kaj artikoloj en diversaj lingvoj, la ĉefverkoj estas: *Perkomputilaj entrepreno-direktaj metodoj* (eldonis la universitato en 1974), *Internacia kunlaboro en la publika administrado* (eldonis la Ĉefministra Oficejo en 1995), *Financa kontrolo kaj aŭditorado en la Eŭropa Unio* (eldonis la Financa Ministrejo en 1994), *Ruĝa suno kaj verda stelo* (originale aperis en Esperanto en 2011, poste oni eldonis ankaŭ en hungara lingvo kun la titolo *Vörös nap és zöld csillag*, kaj ankaŭ japane kun la titolo 赤い太陽と緑の星).

Resumo

Estas konate, ke en modernaj socioj de la dudekunua jarcento registaroj organizas kaj kontrolas la ekonomian, socian kaj kulturan vivon en diversaj landoj de la mondo; do oni povas diri, ke registaroj kontrolas la homojn. Sed ne estas konate por ĉiuj homoj (kvankam la demando estas tre grava kaj signifeca), kiuj kontrolas la registarojn.

Laŭ la principo de Montesquieu, en demokratiaj sociaj sistemoj la parlamenta, la registara kaj la kortuma potencoj devas esti dividitaj kaj estas bezonate, ke forta ŝtata institucio havu rajton laŭleĝe efike kontroli la registarojn kaj aŭditori, kiel ili elspezas monon el la nacia buĝeto. Nuntempe tri sistemoj estas uzataj en la mondo.

1. Laŭ la mediteranea modelo specialaj kortumoj havas tiun funkcion, ekzemple la *Tribunal de Contas* en Portugalio, aŭ la *Cour des Comptes* en Francujo, ktp.
2. Laŭ la skandinavia modelo registaraj oficejoj plenumas tiun taskon, ekzemple la *Riksrevisionen* en Danio aŭ la *Riksrevisionsverket* en Svedio, sed tiutipa organizo estas ankaŭ la vjetnama Ŝtata Aŭdita Oficejo.
3. Laŭ la tria modelo parlamentaj oficejoj havas tiun funkcion, ekzemple la *National Audit Office* (Nacia Aŭdita Oficejo) en Britio, aŭ la *Állami Számvevőszék* (Ŝtata Aŭdita Oficejo) en Hungario.

Je la komenco de la prelego oni traktos la temon, kiel kaj kiam en la historio aperis tiu funkcio kaj trarigardos, kiuj institucioj havis tiun taskon en la diversaj landoj. Post tiu trarigardo oni diskutos la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de la diversaj uzataj kontrolaj kaj aŭditoraj modeloj. Poste oni analizos la metodojn, kiuj ebligas efike kontroli la agadojn de la registaraj oficejoj kaj je la fino de la prelego oni fokusiĝos pri la proponoj de INTOSAI (Internacia Organizo de Superaj Aŭditoraj Institucioj, angle *International Organization of*

Supreme Audit Institutions) celantaj pli efikan bataladon kontraŭ la koruptado kaj helpante pli rapidan ekonomian evoluon de la mondo.

Who supervises the world's governments?

Summary

Everyone knows that in modern, 21st-century societies governments organise and supervise the economic, social and cultural life of the world's various countries, so it can be said that governments supervise people. However, not everyone knows (though the question is a very important and significant one) who supervises the governments.

According to Montesquieu's principles, in democratic social systems it is necessary for the parliamentary, governmental and judiciary powers to be separated and a strong state institution to have the legal power to effectively supervise governments and audit how they spend money from the national budget. Nowadays there are three systems in use in the world.

1. In the Mediterranean model special courts have this function, for example the *Tribunal de Contas* in Portugal, or the *Cour des Comptes* in France.
2. In the Scandinavian model government offices perform the task, for example the *Riksrevisionen* in Denmark or the *Riksrevisionsverket* in Sweden, but the State Audit Office of Vietnam, also, is the same type of organisation.
3. In the third model parliamentary offices have this function, for example the National Audit Office in Britain or the *Állami Számvevőszék* in Hungary.

The lecture starts by looking at how and when in history this function appeared and gives an overview of which institutions had the task in various countries. After this overview there is a discussion of the advantages and disadvantages of the various supervisory and audit models in use. This is followed by an analysis of the methods that enable effective supervision of the activities of government offices, and the last part of the lecture focuses on the proposals from INTOSAI (International Organisation of Supreme Audit Institutions) for a more effective fight against corruption and for promoting faster economic development.

Qui contrôle les gouvernements dans le monde ?

Résumé

On sait que dans les sociétés modernes du vingt-et-unième siècle, les gouvernements organisent et contrôlent la vie économique, sociale et culturelle dans différents pays du monde; on peut donc dire que les gouvernements contrôlent les hommes. Mais peu de gens savent (quoique la question soit très importante et judicieuse) qui contrôle les gouvernements.

Selon le principe de Montesquieu, dans les systèmes sociaux démocratiques, les pouvoirs législatif, exécutif et judiciaire doivent être séparés et il est nécessaire qu'une puissante institution d'état soit autorisée par la loi à contrôler efficacement les gouvernements et à auditer la façon dont ils dépensent l'argent du budget national. Actuellement il existe trois systèmes dans le monde:

1. Selon le modèle méditerranéen, des cours spéciales remplissent cette fonction, comme le « Tribunal de Contas » au Portugal, ou la « Cour des Comptes » en France, etc.

2. Selon le modèle scandinave, des organismes gouvernementaux s'acquittent de cette tâche, par exemple le « Riksrevisionen » au Danemark ou le « Riksrevisionsverket » en Suède, mais l'Audit d'Etat du Vietnam est aussi un organisme de ce type.
3. Selon le troisième modèle, des offices parlementaires remplissent cette fonction, par exemple le « National Audit Office » (Office National d'Audit) en Grande-Bretagne, ou le « Állami Számvevőszék » (Office d'Audit de l'Etat) en Hongrie.

On commencera la conférence en examinant comment et quand dans l'histoire est apparue cette fonction et quelles institutions ont joué ce rôle dans les différents pays. Après cet examen on discutera des avantages et des inconvénients des divers modèles de contrôle et d'audit utilisés. Puis on analysera les méthodes qui permettent de contrôler efficacement l'action des offices gouvernementaux, et à la fin de la conférence on insistera sur les propositions de l'INTOSAI (Organisation Internationale des Institutions Supérieures d'Audit, en anglais « International Organization of Supreme Audit Institutions ») qui visent à lutter plus efficacement contre la corruption et à favoriser une évolution économique plus rapide du monde.

Ai giám sát các chính phủ trên thế giới?

Tóm tắt

Người ta biết rằng trong các xã hội hiện đại của thế kỷ 21, các chính phủ tổ chức và giám sát đời sống kinh tế, xã hội và văn hóa tại nhiều nước khác nhau trên thế giới, vậy người ta có thể nói rằng các chính phủ giám sát nhân dân. Nhưng nhiều người không biết ai giám sát các chính phủ (mặc dù câu hỏi này rất quan trọng và có ý nghĩa).

Theo nguyên lý của Montesquieu tại các hệ thống xã hội dân chủ, các quyền lập pháp, hành pháp và tư pháp phải được phân ra, và một cơ quan nhà nước mạnh phải có quyền theo pháp luật kiểm soát có hiệu quả các chính phủ và kiểm toán để biết chính phủ tiêu tiền của nhân sách quốc gia như thế nào. Ngày nay có ba hệ thống được sử dụng trên thế giới.

1. Theo mô hình Địa Trung Hải, cá tòa án có chức năng đó, thí dụ *Tribunal de Contas* ở Bồ Đào Nha hoặc *La Cour de Comptes* ở Pháp v.v.
2. Theo mô hình Bắc Âu, các cơ quan chính phủ làm nhiệm vụ này, thí dụ *Riksrevisionen* Đan Mạch hoặc *Riksrevisionsverket* ở Thụy Điển, nhưng Ban kiểm toán Nhà nước của Việt Nam cũng thuộc loại này.
3. Theo mô hình thứ ba, các cơ quan của Quốc hội có chức năng này, thí dụ *National Audit Office* (Cơ quan Kiểm toán Quốc gia) ở Anh Quốc, hoặc *Állami Számvevőszék* (Cơ quan Kiểm toán Nhà nước) ở Hungari.

Tại phần đầu của thuyết trình, người ta sẽ bàn bạc về chủ đề trong lịch sử chức năng này xuất hiện như thế nào và từ bao giờ và sẽ đi qua những cơ quan nào làm nhiệm vụ này ở các nước khác nhau. Tiếp theo tổng quan đó, người ta sẽ thảo luận về những điểm lợi và bất lợi của các mô hình giám sát và kiểm toán khác nhau. Sau đó người ta sẽ phân tích các phương pháp cho phép giám sát có hiệu quả hoạt động của các cơ quan chính phủ và trong phần cuối người ta sẽ tập trung vào những đề nghị của INTOSAI (Internacia Organizo de Superaj Aŭditaj Institucioj, angle „International Organization of Supreme Audit Institutions”, tiếng Việt là Tổ chức Quốc tế các Cơ quan Kiểm toán Tối cao), với mục đích đấu tranh có hiệu quả nhất chống tham nhũng và giúp cho sự phát triển kinh tế của thế giới được nhanh hơn.

Kiuj kontrolas la registarojn de la mondo?

Estas konate, ke en modernaj socioj de la dudekunua jarcento registaroj organizas kaj kontrolas la ekonomian, socian kaj kulturan vivon en diversaj landoj de la mondo, do oni povas diri, ke registaroj kontrolas la homojn. Sed ne estas konate por ĉiuj homoj (kvankam la demando estas tre grava kaj signifeca), kiuj kontrolas la registarojn.

Pro tio nun ni traktos ĉi tiun temon, do analizos, kiel kaj kiam en la historio aperis tiu funkcio kaj trarigardos, kiuj institucioj havas tiun taskon en la diversaj landoj. Sekvante tiun trarigardon ni diskutos la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de la diversaj uzataj kontrolaj kaj aŭditaj modeloj. Poste ni analizos la metodojn, kiuj ebligas efike kontroli la agadojn de la registaraj oficejoj kaj je la fino de la prelego ni fokusos pri la proponoj de INTOSAI (Internacia Organizo de Superaj Aŭditaj Institucioj, angle *International Organization of Supreme Audit Institutions*) celantaj la pli efikan bataladon kontraŭ la koruptado kaj helpantaj la pli rapidan ekonomian evoluon de la mondo.

Historia trarigardo

Dum la antikva tempo kaj la mezepoko en la plej multaj landoj imperiestroj, reĝoj, caroj, sultanoj ktp gvidis la landojn, kaj tiutipaj registaroj, kiuj nuntempe agadas, ankoraŭ ne funkciis. Sekve de tio la funkciado de organizoj, oficejoj aŭ kortumoj por kontroli la laŭleĝan agadon de la registaroj kaj aŭditi la enspezojn kaj elspezojn de la nacia buĝeto tiam ne estis bezonata. Sed dum la lastaj jarcentoj en kelkaj landoj jam oni sentis la mankon de tiutipaj institucioj, ĉefe kiam la ŝtatoj suferis pro signifa defecito.

Mia lando, Hungario, dum multaj jarcentoj apartenis al la Habsburg-imperio, kies centro estis en Aŭstrio. En tiu imperio Maria Teresia estis imperiestrino de Aŭstrio, reĝino de Hungario kaj multaj aliaj landoj, kiu en la dekoka jarcento reformis la publikan administradan sistemon en la tuta granda centroeŭropa imperio. La kialo de la reformo de la publika administrado estis tre simpla: tiam ankoraŭ ne estis centra ŝtata oficejo, kiu registris ĉiujn ŝtatajn enspezojn kaj elspezojn, do neniu vidis klare la veran financan situacion de la lando. En tiu tempo la situacio estis tre serioza, ĉar tiam la Habsburg-imperio havis longdaŭran militon kontraŭ Prusio, kies estro estis Frederiko la Granda. Tiu milito nomiĝas la Sepjara Milito en la historio, kaj pro tiu milito mankis mono en la nacia buĝeto. Tio estis serioza problemo, ĉar, kiel la fama militestro grafo Raimund Montecuccoli diris, por milito tri objektoj estas bezonataj: mono, mono kaj mono.

En la kadro de la publika administrada reformo la imperiestrino per sia Plej Supera Manuskripto la 23-an de decembro en la jaro 1761 fondis tri gravajn instituciojn, kiuj estis:

1. La Kortega Ĉambro, kies tasko estis kolekti la monon por la nacia buĝeto por ke la lando povu kovri la kostojn de la funkciado de la ŝtato. La oficejo havis ankaŭ alian taskon: ĝi ordonis la ŝtatajn elspezojn el la nacia buĝeto. La agado de tiu institucio do similis al la agado de la nuntempaj financministrejoj.
2. La Ĝenerala Fiska Direktejo, kies tasko estis akcepti la monon, kiu estis pagita al la oficejo laŭ la ordono de la Kortega Ĉambro; tiu oficejo havis ankaŭ la taskon aranĝi la ŝtatajn elspezojn. Oni povas konkludi, ke la agado de tiu institucio similis al la agado de la nuntempaj fiskoj, impostoficejoj kaj bankoj.
3. La Kortega Aŭdita Ĉambro, kies tasko estis la kontrolo kaj la inspekto de la kontorevizia sistemo. Tiu institucio havis similajn taskojn, kiujn nuntempe la superaj aŭditaj institucioj havas en la plejmulto de la landoj.

La titolo de mia prelego estas: “Kiu kontrolas la registarojn de la mondo?”. Rilate al la nuna epoko oni povas diri, ke tiun taskon plenumas en la plej multaj landoj la tiel nomataj superaj aŭditaj institucioj (mallonge: SAI); sed en la dekoka jarcento, kiam en la publika administrado tiu agado komenciĝis, laŭ la menciitaj faktoj videblas, ke la Kortega Aŭdita Ĉambro havis similajn taskojn. Tiutempe tiu oficejo havis sufiĉe vastan kompetent-teron:

- La oficejo faris anticipan kontrolon. En la praktiko tio signifis, ke kiam aliaj oficejoj volis fari ion ajn, kio rilatis al la publikaj financaj aferoj, la Kortega Aŭdita Ĉambro analizis la aferon kaj konstruis fakan opinion rilate al la afero. Se la agado de la aliaj ŝtatoficejoj ne plaĉis al la Kortega Aŭdita Ĉambro (do, se ili pensis, ke la afero estus tro multekosta, sen necesa ktp), ili havis la rajton ĉesigi aŭ interrompi la esploritan agadon. Oni povas do konkludi, ke en tiu senco tiu oficejo estis parto de la plenuma potenco.
- La Kortega Aŭdita Ĉambro ellaboris la nacian buĝeton de la imperio, kio nuntempe estas tasko de la financministrejoj.
- La Kortega Aŭdita Ĉambro pretigis la kalkularaporton pri la plenumo de la nacia buĝeto. Ankaŭ tiu laboro apartenas al la taskoj de la financministrejoj nuntempe en multaj landoj, inkluzive Hungarion, sed en Aŭstrio eĉ nun laŭ tradicio, la Ŝtata Aŭdita Oficejo faras tiun laboron. (En Hungario, kaj en multaj aliaj landoj la kalkularaporton preparas la financministrejo, poste la Ŝtata Aŭdita Oficejo analizas la dokumenton, faras rimarkojn kaj, diskutante tiujn dokumentojn kaj rimarkojn, finfine la parlamento decidas pri la afero.)
- La Kortega Aŭdita Ĉambro eldonis la dokumenton de senŝarĝigo rilate al la kalkularaporto pri la plenumo de la nacia buĝeto.
- La Kortega Aŭdita Ĉambro havis la devon por permanente analizi kaj plibonigi la metodojn de la kalkularaporta kaj librotenada sistemoj.
- La Kortega Aŭdita Ĉambro gvidis la laboron rilate al la publika librotenado.

Laŭ la menciitaj faktoj evidentiĝas, ke la Kortega Aŭdita Ĉambro havis tre gravajn kaj signifajn taskojn, kaj ke la institucio estis parto de la publikaj administradaj oficejoj en la plenuma potenco. Tiu laŭleĝa situacio de la oficejo havis multajn avantaĝojn kaj ankaŭ multajn malavantaĝojn. Certe estis avantaĝo, ke la oficejo rajtis fari anticipajn kontrolojn, rajtis ĉesigi aŭ interrompi la kritikitajn projektojn, kaj sekve de tio ĝi povis eviti la realigojn de finance aŭ ekonomie riskaj kaj malbonaj decidoj de aliaj ŝtatoficejoj.

La malavantaĝo de la sistemo devenis ankaŭ de la laŭleĝa situacio de la oficejo. Laŭleĝe en tiu situacio la Kortega Aŭdita Ĉambro ne estis sendependa de la plenuma potenco, eĉ la oficejo mem estis parto de la plenuma potenco, partoprenante en ties agado. En tiu situacio estis malfacile kontroli la agadojn, ĉar en tiu senco oni povas diri, ke la oficejo devis kontroli ankaŭ sin mem (ĉar ankaŭ la oficejo mem partoprenis en la kontrolita agado, aŭ en la preparo de la kontrolota agado).

Por eviti tiutipan kontrolon la Kortega Aŭdita Ĉambro tre ofte malhelpis la normalan funkciadon de la publika administrado, ĉesigante aŭ interrompante multajn projektojn, pri kiuj ni pensis, ke la efektivigo aŭ realigo povus esti riska por la financa ekvilibro de la buĝeto. Tiutipa dilemo ankaŭ en nia tempo spertebblas en la kontrola kaj aŭdita faka mondo: ĉu la supera aŭdita institucio povas esti parto de la plenuma potenco (do povas funkcii, kiel oficejo aŭ departemento de la registaro), aŭ la oficejo devas esti sendependa de tio kaj ili devas aparteni al la parlamento, aŭ ili devas funkcii, kiel sendependa kortumo.

Vidante la multajn malavantaĝojn, la malrapidigon de la funkciado de la publika administrada sistemo, la imperiestrino forprenis la permanentan anticipan kontrolan rajton de la

Kortega Aŭdita Ĉambro en la jaro 1768; sekve de tio la publika administrado povis denove pli normale funkcii, kaj ne plu estis ĉiamaj disputoj inter la diversaj oficejoj de la ŝtata publika administrado.

Dum la tempo, kiam Jozefo la Dua estis la imperiestro en la Habsburg-imperio, evidentiĝis, ke forta kaj kompetenta aŭdita oficejo estas bezonata por kunordigi la kontrolan kaj aŭditan laboron en la tuta imperio, do la imperiestro ordonis, ke en ĉiuj landoj de la granda imperio, inkluzive la nunajn Hungarion, Ĉeĥion, Belgion, Lombardion ktp, la Kortega Aŭdita Ĉambro gardu kaj inspektu la kontrolan kaj aŭditan agadojn de la lokaj fakaj aŭditaj instancoj.

En la jaro 1848 estis revolucio kaj Hungario komencis militon kontraŭ Aŭstrio por akiri sendependecon; tio tiam ne estis sukcesa. Sed en 1866 Aŭstrio malvenkis en milito kontraŭ Prusio en Königgrätz, kaj sekve de tio Aŭstrio fariĝis pli malforta kaj devis fari kompromison kaj interkonsentiĝi kun Hungario. Laŭ tiu interkonsentiĝo estiĝis la Aŭstro-Hungara Monarĥio, kiu funkciis ĝis la fino de la unua mondmilito. En tiu konstitucia monarĥio la imperiestro Franz Josef en la jaro 1866 fondis la imperiestran-reĝan Plej Superan Aŭditan Oficejon kun la tasko kontroli kaj aŭditi la buĝeton en Aŭstrio.

Post la interkonsentiĝo inter Aŭstrio kaj Hungario en la jaro 1868 Franz Josef, la imperiestro de Aŭstrio kaj reĝo de Hungario, fondis la Komunan Plej Superan Aŭditan Oficejon por kontroli kaj aŭditi la buĝetojn de la komunaj (aŭstria kaj hungaraj) aferoj, kiuj inkluzivis la internaciajn, la militajn kaj la financajn aferojn. Kaj finfine la imperiestro, kiel hungara reĝo en la jaro 1870 fondis la Hungaran Reĝan Ŝtatan Aŭditan Oficejon por la landoj de la Sankta Krono, kiuj estis dum tiu tempo Hungario, Kroatio kaj Slovenio. Tiu oficejo estas la antaŭinstitucio de mia nuna oficejo, la hungara Ŝtata Aŭdita Oficejo.

Post la fino de la unua mondmilito Hungario fariĝis sendependa ŝtato kaj ekde tiam tiu institucio kontrolas kaj aŭditas la enspezon kaj elspezon de mono el la nacia buĝeto. La oficejo funkciis ankaŭ post la dua mondmilito dum kelkaj jaroj, sed dum la komunisma epoko, same kiel en aliaj landoj de Orienta Eŭropo, oni paŭzigis la agadon de la oficejo. Post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo la hungara Ŝtata Aŭdita Oficejo denove funkcias kontrolante kaj aŭditante la nacian buĝeton kaj ankaŭ la buĝetojn de la lokaj registaroj.

La jerusalema INTOSAI-kongreso

La historia evoluo de la ŝtata aŭdita funkcio en aliaj landoj de la mondo estis simila al la trarigardita procezo en Aŭstrio kaj Hungario, kaj la rezulto de tio estis, ke en la dudeka jarcento jam en la plejmulto de la landoj agadis diversaj superaj aŭditaj institucioj. Post la dua mondmilito oni rekonis, ke la menciitaj institucioj pli efike povas plenumi siajn taskojn, se ili kunlaboras kaj regule informas unu la aliajn pri siaj fakaj agadoj kaj diskutas la uzatajn kaj rekomendebajn kontrolajn kaj aŭditajn metodojn. Por fari kadron por la tiutipa kunlaboro, en la jaro 1953 oni fondis la organizon INTOSAI, kio estas mallongigo de la vortoj: Internacia Organizo de Superaj Aŭditaj Institucioj.

Je la komenco la formo de la kunlaboro signifis nur organizadon de konferencoj kaj la uzon de aliaj similaj simplaj kunlaboraj ebloj, sed post kelkaj jaroj evidentiĝis, ke la pli profunda kaj efika faka kunlaboro bezonas la konstruon de pli forta internacia organizo. Por realigi tion dum la kvina ĝenerala kongreso de INTOSAI en Jerusalemo en la jaro 1965 oni decidis konstrui permanentan Ĝeneralan Sekretariejon por la internacia organizo kaj oni decidis, ke la loko de la funkciado de tiu oficejo estu en la aŭstria ĉefurbo kaj la ĝenerala sekretario de INTOSAI estu ĉiam la elektita prezidanto de la Aŭstria Ŝtata Aŭdita Oficejo.

Post tio la internacia faka kunlaboro kaj la interŝanĝo de la kontrolaj kaj aŭditaj spertoj pligrandiĝis kaj pliprofundiĝis, kaj sekve de tio la kvalito de la faka laboro plialtiĝis.

Nuntempe jam pli ol 170 superaj aŭditaj institucioj apartenas al INTOSAI kaj laboras kune por kontroli la agadojn de la registaroj, por aŭditi la enspezojn kaj elspezojn el la naciaj buĝetoj, kaj por batali kontraŭ koruptado en la tuta mondo. Sub la gvido de la aŭstria ĝenerala sekretario de la organizo kaj kun la efika partopreno de la Aŭstria Ŝtata Aŭdita Oficejo en vasta internacia kunlaboro oni ellaboris la direktoprincipojn de la financa kontrolo, kiujn oficiale akceptis la naŭa INTOSAI-kongreso en la urbo Lima. Ekde tiam la dokumento nomiĝas la Lima-Deklaro.

Ankaŭ la Hungarlanda Ŝtata Aŭdita Oficejo havas altan prestiĝon laŭ la efika faka agado post la refondo de la institucio en 1990. Danke al tio en la jaro 2001 la INTOSAI-kongreso en la urbo Seulo decidis, ke post Sud-Koreio oni organizu la venontan INTOSAI-kongreson en Hungario, kaj la prezidanto de la Hungara Ŝtata Aŭdita Oficejo fariĝu la nova INTOSAI-prezidanto.

Kiam Hungario aliĝis al Eŭropa Unio, estis kondiĉo de la aliĝo (same kiel ĉe ĉiuj aliaj orienteŭropaj landoj), ke la lando konstruu tutlandan kontrolan kaj aŭditan sistemon funkciantan laŭ la reguloj de la Eŭropa Komunumo. Tiam mi estis la kompetenta estro en la hungara parlamenta kontrolo kaj aŭdita organizo, kiu estas la supera aŭdita institucio en Hungario. Por prepari la landon al la eŭropa unuiĝo, mi vizitis kelkajn malnovajn EU-membroŝtatojn kune kun la respondecaj ŝtatssekretarioj de nia registaro kaj detale studis kaj analizis la kontrolan kaj aŭditan metodojn en Portugalio, Britujo, Danio, Svedio kaj Germanio. Laŭ miaj spertoj ricevita dum tiu internacia studprogramo ni rekonstruis nian nacian kontrolan kaj aŭditan sistemon en konsento kun la publika administrado de Eŭropa Unio. Post la aliĝo de mia lando al la Eŭropa Komunumo, nia Ŝtata Aŭdita Oficejo funkcias en konsento kun la Eŭropa Kortumo de Aŭditors kaj la internaciaj kontrolaj kaj aŭditaj normoj, kiel supera aŭdita institucio de Hungario. En ĉi tiu prelego mi klarigas la eblajn kaj vere funkciantajn formojn de la kontrolo kaj aŭdito de la registaroj laŭ la rezultoj de mia menciita studprogramo en la esploritaj landoj.

Dividitaj potencaj branĉoj en la demokratiaj politikaj sistemoj

Laŭ la principo de Montesquieu, en demokratiaj sociaj sistemoj la leĝodonada (parlamentara), la plenumada (registara) kaj la kortuma potencoj devas esti dividitaj kaj estas bezonate, ke forta ŝtata institucio havu la rajton laŭleĝe efike kontroli la registarojn kaj aŭditi, kiel ili elspezas monon el la nacia buĝeto. Nuntempe tri sistemoj estas uzataj en la mondo.

1. Laŭ la skandinavia modelo registaraj oficejoj plenumas tiun taskon, ekzemple la *Riksrevisionen* en Danio aŭ la *Riksrevisionsverket* en Svedio, sed tiutipa organizo estas ankaŭ la vjetnama Ŝtata Aŭdita Oficejo.
2. Laŭ la anglosaksa modelo (kiu nomiĝas Westminster-modelo), parlamentaj oficejoj havas tiun funkcion, ekzemple la *National Audit Office* (Nacia Aŭdita Oficejo) en Britio, aŭ la *Állami Számvevőszék* (Ŝtata Aŭdita Oficejo) en Hungario.
3. Laŭ la mediteranea modelo specialaj kortumoj havas tiun funkcion, ekzemple la *Tribunal de Contas* en Portugalio, aŭ la *Cour des Comptes* en Francujo.

Kiam oni analizas la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de la diversaj uzataj kontrolaj kaj aŭditaj metodoj estas dilemo pri tio, kiu sistemo estas pli efika ol la aliaj. La dua kaj la tria modeloj, do la mediteranea kortuma sistemo kaj la parlamenta aŭdita sistemo, certe havas gravan avantaĝon, ke ambaŭ institucioj (do kaj la kortumoj kaj la parlamentaj oficejoj) estas sendependaj de la kontrolataj kaj aŭditataj institucioj. Tio estas grava avantaĝo, kaj estas komprenebla kondiĉo de efika kontrolo, ke laŭeble neniu kontrolu sin mem.

Do, sen profunda analizo oni povus konkludi, ke la unua sistemo estas malpli efika ol la du aliaj, ĉar en tiu kazo iu registara institucio kontrolas, kiel la registaro, aŭ kiel la diversaj registaraj departementoj, ministrejoj ktp eluzas la publikan monon el la nacia buĝeto. Mi emfazas, ke mi diris, ke en tiu kazo oni povus konkludi tiel, ĉar en la vera situacio en la nuna mondo tiu konkludo estus falsa kaj erara. Estas konate, ke dum la lastaj kelkaj jardekoj ĉiam en la skandinaviaj landoj la koruptada nivelo estis la plej malalta en la mondo, kie tiutipaj kontrolaj kaj aŭditaj sistemoj estis kaj estas uzataj.

Sekve de tio evidentiĝas, ke la situacio estas pli kompleksa ol tio ŝajnas esti sen detala kaj profunda analizo de diversaj fenomenoj. La sendependeco de la kontrolaj kaj aŭditaj institucioj estas certe grava avantaĝo por la efika kontrolo, sed tiu kondiĉo mem ne sufiĉas por ke oni konstruu idealan politikan kaj ekonomian sistemon, kie la koruptada nivelo estas malalta, kaj kie la diversaj registaraj departementoj kaj ministrejoj efike kaj ĉiam laŭleĝe uzas la monon el la publika buĝeto.

En Skandinavio estas jam multjardeka kutimo, ĝenerala pensmaniero kaj socia tradicio vivi en senkorupta socia sistemo, kaj se tamen estas escepto kaj evidentiĝas, ke iu eniĝis en koruptajn rilatojn, la socio ne emas toleri tion. En tiuj landoj ankaŭ la gazetaro, la presaj kaj elektronikaj eldonejoj, la publikaj kaj privataj kanaloj de radio kaj televido, kiel la tiel nomata kvara potenca branĉo ĉiame esploras la suspektablajn fenomenojn, kaj krom tio ankaŭ la travidebla publika financa sistemo povas efike helpi preventi la disvastiĝon de la koruptado.

Ankaŭ en aliaj politikaj, sociaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj, en alia parto de la mondo, en Vjetnamio, kie nun ni ĉeestas nian Universalan Kongreson, tiutipa aŭdita kaj kontrola sistemo estas konstruita. Tio signifas, ke ankaŭ ĉi tie la Ŝtata Aŭdita Oficejo, kiel la supera aŭdita institucio de la lando funkcias (same, kiel la similaj skandinaviaj institucioj: ekzemple la *Riksrevisionen* en Danio, aŭ la *Riksrevisionsverket* en Svedio) kiel registaraj departementoj. Mi iom detale povis konatiĝi kun la aŭditaj metodoj uzataj en Vjetnamio kaj povis informiĝi ankaŭ pri la rezultoj de la laboro de la supera aŭdita institucio de tiu lando, ĉar estas multjara faka kunlaboro inter mia oficejo kaj la Vjetnama Ŝtata Aŭdita Oficejo.

En 2011 jam por la sepa fojo venis al mia oficejo en Budapeŝto, la hungara ĉefurbo, la reprezentantoj de la vjetnama supera aŭdita institucio por diskuti la uzatajn kontrolajn kaj aŭditajn metodojn en niaj landoj, do en Vjetnamio kaj en Hungario, unu el la membroŝtatoj de Eŭropa Unio. Krom tiu rekta kunlaboro ambaŭ oficejoj estas membroj de la Internacia Organizo de Superaj Aŭditaj Institucioj, kaj en ambaŭ landoj ni intencas adapti la plej bonajn aŭditajn metodojn laŭ la internaciaj spertoj per tiu kunlaboro.

Sekve de la aplikado de la kolektitaj spertoj ricevataj en la internacia kunlaboro kaj pro la favora konstitucia situacio de la Vjetnama Ŝtata Aŭdita Oficejo, oni povas efike kontroli kaj aŭditi la publikajn financojn en tiu lando. La supera aŭdita institucio en Vjetnamio estis fondita laŭleĝe de la parlamento, la leĝodona politika potenco de la lando. Kvankam la estro de la oficejo estas elektita kaj nomumita de la registaro, tamen laŭleĝe li estas sendependa en la senco, ke:

- li havas imunecon, do li estas protektata kontraŭ agadoj de aliaj institucioj pri lia faka agado;
- li sendepende planas, formas kaj konstruas la laborplanon por aŭditi la elspezon de publika mono el la nacia buĝeto;
- la estro de la Ŝtata Aŭdita Oficejo, la aŭditoro ĝenerala, raportas kaj respondecas al la ministro-prezidanto kaj estas sendependa de la leĝodona, la kortuma kaj la prokurora aŭ policeja esploraj organizoj;

- la Ŝtata Aŭdita Oficejo estas finance sendependa, pri la jara buĝeto de la oficejo la ministro-prezidanto mem decidas persone.

Por konkludi, ĉu la aŭdit-funkcio en iu lando estas forta aŭ malforta kaj ĉu la supera aŭdita institucio en la lando povas kaj rajtas bone aŭ nebone kontroli la registarajn departementojn kaj ministrejojn laŭleĝe, indikas ankaŭ la limoj de la kompetento de la institucio. Laŭleĝe la Vjetnama Ŝtata Aŭdita Oficejo kompetentas kontroli kaj aŭditi la venontajn instituciojn:

1. la federacian registaron;
2. la provincajn kaj lokajn registarojn;
3. la instituciojn, kiuj ne estas ŝtatposedaĵoj, sed estas signifgrade finance subtenataj de la ŝtato;
4. la bankojn, kies kapitalo devenas de la federacia, provinca aŭ loka registaroj, kaj la aŭtonomajn organizojn, kiuj ricevas signifan financan subtenon de la registaro;
5. la instituciojn, kiujn posedas aŭ kontrolas la federacia, provinca aŭ loka registaroj, kaj la aliajn organizojn, kiujn posedas aŭ kontrolas la menciitaj institucioj;
6. la enspezojn de la registaro;
7. la koncesiojn, kiujn la registaro donis al diversaj agentejoj por uzi naciajn publikajn fontojn;
8. la uzon de diversaj financaj fontoj alvenintaj de alilandaj registaroj; kaj
9. la ŝtatajn direktantajn kaj gvidantajn instituciojn (privatigo, medi-protektado, mal-puraĵo-kontrolo, telekomunikado ktp).

Trarigardante la supran liston de kompetento-terenoj ni povas konstati, ke laŭleĝe la vjetnama supera aŭdita institucio havas sufiĉe vastan kompetenton kontroli kaj aŭditi la uzadon de la publika mono el la nacia buĝeto. Sekve de tio la respondecado de la oficejo estas tre grava kaj oni povas konkludi, ke se la gvidantaj institucioj de la Ŝtata Aŭdita Oficejo – do la partio, la parlamento kaj la registaro – subtenas la agadon de la oficejo kaj postulas, ke ĝi serioze plenumu la taskon de kontrolo kaj aŭdito de la registaro, tiam la oficejo efike povas helpi la tutlandan komunan laboron, kies celo estas konstrui trarigardeblan, fortan kaj subteneblan financan sistemon kaj tiamaniere helpi la industrialigon, modernigon kaj internacian integradon de la lando.

Post tiu ĉi trarigardo de la agado de la vjetnama supera aŭdita institucio, nun ni fokusiĝos pri la agadoj de la superaj aŭditaj institucioj, kiuj funkciadas laŭ la anglosaksa metodo, do kie la oficejo apartenas al la nacia parlamento. Ni faros tion analizante la agadon de la Brita Nacia Aŭdita Oficejo (kaj parte enfokusiĝante ankaŭ pri la Hungara Ŝtata Aŭdita Oficejo), kiuj funkcias laŭ tiu modelo.

La fundamenta principo de la funkciado de la superaj aŭditaj institucioj laŭ tiu modelo estas, ke laŭ la principo de Montesquieu en demokratiaj sociaj sistemoj la leĝdona (parlamenta) kaj la plenuma (registara) potencoj devas esti dividitaj, kaj la leĝdona potenco kontrolas la plenumajn instituciojn. Kompreneble tiu kontrolo ne rekte okazas, sed per speciala kontrola kaj aŭdita institucio de kontrolistaj fakuloj kaj alte kvalifikitaj aŭditoroj. Tiutipaj institucioj estas ekzemple la Nacia Aŭdita Oficejo de Britio kaj la Hungara Ŝtata Aŭdita Oficejo. En tiu aŭditomodelo grava fundamenta principo estas, ke la vere sendependa ŝtata kontrolo kaj aŭdito devas havi dek specialajn kondiĉojn:

1. La leĝa situacio devas esti klara kaj unusenca; la taskoj kaj la funkcioj de la supera aŭdita institucio (poste: SAI) devas esti determinitaj en leĝo, aŭ en la konstitucio.

2. La estro de la SAI devas esti sendependa de la kontrolataj kaj aŭditataj institucioj kaj devas havi la fidon de la parlamento. En Britio la estro de la SAI devas esti akceptita kaj de la registaro kaj de la plej granda opozicia partio en la parlamento. En Hungario du trionoj de la membroj de la parlamento elektas la estron de la SAI por 12 jaroj, sed la estro de la registaro estas elektata por nur kvar jaroj.
3. La estro de la SAI devas havi sekurecon por plenumi siajn taskojn sen risko, ke aliuloj ĝenu lin en la laboro, aŭ maldungu lin pro lia kontrola kaj aŭdita agado. En Britio nur la reĝino rajtas forigi lin kaj nur post kiam ambaŭ ĉambroj de la parlamento akceptis tiurilatan proponon. En Hungario du trionoj de la membroj de la parlamento rajtas decidi, ĉu forigi lin aŭ ne.
4. La financado de la SAI devas esti sendependa de la plenuma potenco (do sendependa de la registaro). En Britio parlamenta komitato traktas tiun temon, kaj laŭ la propono de tiu komitato la parlamento decidas pri la buĝeto de la SAI. En Hungario la situacio estas simila: la estro de la SAI preparas la buĝetplanon kaj la parlamento decidas pri la afero.
5. La estro de la SAI devas havi imunecon, do li devas esti protektata kontraŭ agadoj de aliaj institucioj pro lia faka agado.
6. Necesas doni liberecon al la SAI por ke la institucio mem povu ellabori sian kontrolan kaj aŭditan planon kaj mem povu elekti la kontrolotajn kaj aŭditotajn fakterenojn kaj instituciojn.
7. La SAI devas havi eblon dungi la plej kvalifikitajn kontrolistojn kaj aŭditorojn, kiuj devas esti sendependaj de la plenuma potenco. En Britio la SAI havas pli-malpli 750 fakulojn, kaj du trionoj de tiuj fakuloj estas alte kvalifikitaj aŭditoroj. La situacio estas simila en Hungario.
8. La SAI devas havi laŭleĝan rajton por akiri ĉiujn indikojn, statistikojn kaj informojn en la arĥivoj de ĉiuj ministrejoj kaj aliaj registaraj oficejoj, kiuj estas bezonataj por efike plenumi la taskon de kontrolo kaj aŭdito. Kaj en Britio kaj en Hungario la SAI-oj laŭleĝe havas tiun rajton.
9. La SAI devas havi senliman eblon raporti pri siaj konkludoj kaj aŭditrezultoj. En Britio la estro de la SAI laŭleĝe sendas la raportojn pri la aŭditoj al la parlamento. Poste la permanenta parlamenta komitato analizas la raporton, invitas la plej altrangajn reprezentantojn de la aŭdititaj institucioj, kaj post aŭskulto al iliaj opinioj oni faras rekomendojn por la plenuma potenco. En Hungario la procezo estas simila; la sola diferenco estas, ke tie la SAI mem faras rekomendojn por la plenuma potenco laŭ la rezultoj de la aŭdito.
10. La SAI devas havi rajton kontroli post la fino de la aŭdito, ĉu la aŭdititaj institucioj agados laŭ la rekomendoj dum la sekvonta tempo aŭ ne. Kaj en Britio kaj en Hungario laŭleĝe la aŭdititaj institucioj devas reagi al ĉiuj rekomendoj en la aŭditraporto. La SAI ĉiam havas la rajton por postkontrolo aŭ postaŭdito laŭ sia propra decido.

Tiuj estas do la karakterizoj de la skandinavia kaj anglosaksa aŭditsistemoj. Komuna karakterizo de la skandinavia kaj anglosaksa aŭditsistemoj estas, ke en ambaŭ sistemoj la superaj aŭditaj institucioj ne kompetentas rekte realigi la konstataĵojn kaj rekomendojn, korekti la trovitajn erarojn, kaj ĉesigi aŭ interrompi la kontraŭleĝajn agadojn. Ili rajtas nur sendi la aŭditraportojn kiel signalojn al la kompetentaj ŝtataj instancoj, inkluzive la krimopolicajn kaj prokurorajn instancojn proponante esplorojn en la afero. Oni povas diri, ke en tiuj sistemoj la publikeco estas la plej forta rimedo, kiun la tiutipaj superaj aŭditaj institucioj povas uzi por plibonigi la financ-rilatajn laborojn en la publika administrado.

Kompare kun tiuj sistemoj, tute malsama estas la mediteranea aŭditsistemo. En tiu sistemo specialaj kortumoj havas la kontrolan kaj la aŭditan funkciojn, ekzemple la *Tribunal de Contas* en Portugalio, aŭ la *Cour des Comptes* en Francio. Antaŭ kelkaj jaroj mi povis persone studi la aŭditan praktikon de la *Tribunal de Contas* en Portugalio, do nun mi parolas iomete pri tiu aŭditsistemo. Tiun organizon oni fondis antaŭ pli ol 600 jaroj, do ili havas jam plurcentjarajn tradiciojn. La institucio havas tri ĉambrojn; en la unua ĉambro oni traktas anticipajn kontrolojn. En la dua ĉambro okazas la posta financa kontrolo kaj aŭdito, kaj se oni konstatas, ke la aŭditita institucio uzis publikan monon kontraŭleĝe kaj sekve de tio necesas repagigi la maljuste uzitan monon, tiam oni ĉiam sendas la aŭditraporton al la ŝtata prokuroro.

Poste laŭ la interveno de la ŝtata prokuroro la aferon ricevos la tria ĉambro de la *Tribunal de Contas*. Do, la tria ĉambro funkcias kiel kortumo. Tie unue sola juĝisto decidas pri la afero. Se la aŭditita institucio akceptas la decidon, tiam la afero finiĝas. Se ne, tiam oni rajtas apelacii kontraŭ la verdikto al la supera juĝistaro. En tiu kazo la plena tria ĉambro estas la supera juĝistaro, do ili kune decidas pri la finverdikto. (En tiu procezo la juĝisto, kiu faris la unuan verdikton, ne rajtas voĉdoni.)

Internacie uzataj kontrolaj kaj aŭditaj metodoj kaj teknikoj

Por ke oni povu efike kontroli la elspezojn el la nacia buĝeto kaj por ke oni povu reale konkludi, ĉu la institucioj elspezis la monon efike kaj laŭleĝe aŭ ne, necesas uzi specialajn kontrolajn kaj aŭditajn metodojn. La fundamentaj problemoj kaj dilemoj estas la jenaj:

- La financa fonto kaj homa kapablo por kontrolo kaj aŭdito estas limigitaj. Kutime la tasko de la aŭditoroj estas kontroli kaj aŭditi la uzon de miliardoj da dolaroj (aŭ eŭroj, ktp) el la nacia buĝeto kaj konkludi ĉu la registaro uzis tiun monon efike aŭ malefike, laŭleĝe aŭ kontraŭleĝe. Pro limigita tempo kaj limigitaj financaj rimedoj ne eblas ĉiujare plene kontroli kaj aŭditi detale ĉiujn organizojn kaj instituciojn, kiuj uzas publikan monon el la nacia buĝeto. Do, oni ĉiam devas elekti, kiujn oni kontrolos detale kaj kiujn ne. Rilate al tiu dilemo estas fundamenta principo, ke oni neniam elektu la kontrolatajn instituciojn aŭ personojn laŭ subjektivaj vidpunktoj aŭ kriterioj. (Simple dirite, la aŭdit-institucio ne rajtas decidi, ke institucioj, kiuj ne plaĉas al ĝi, estu regule kontrolataj ĉiujare, kaj la aliaj institucioj malofte aŭ neniam.)
- Aŭditoroj ofte spertas, ke por financi kelkajn projektojn necesas nur centoj da dolaroj, sed en aliaj kazoj necesas uzi ekzemple milionojn da dolaroj. Do, se oni volus kontroli kaj aŭditi ĉiujn projektojn plene kaj detale, en tiu kazo povus okazi, ke la kontrolkosto estus pli alta ol la kontrolata sumo. Tio certe ne estus efika kaj saĝa kontrolmaniero. Solvi tiun dilemon ne estas facila tasko, ĉar se oni deklarus, ke pro tro altaj kontrolkosto oni neniam kontrolas malmultekostajn projektojn, ties projektmanaĝeroj povus konkludi, ke sen risko de kontrolo al ili eblas uzi publikan monon kontraŭleĝe. Sed estas ankaŭ kondiĉo de la kontrolo, ke la kontrolkosto ne estu tro alta, do laŭeble ne okazu, ke la kontroloficejo pagu ekzemple mil dolarojn por kontroli projekton, kies kosto estas nur kelkcent dolaroj.

La fundamenta principo de efika kontrolo estas do, ke oni neniam uzu subjektivajn kontrolmetodojn, kaj elektu la kontrolatajn instituciojn kaj projektojn laŭ objektivaj kaj ekzaktaj kriterioj. Estas ankaŭ grava kondiĉo, ke ĉiuj institucioj kaj projektoj havu ŝancon esti kontrolataj sendepende de la sumo de la uzata publika mono. Tamen, por plialtigi la efikecon

de la kontrolo oni devas fokusiĝi pri la grandaj projektoj, kiam oni elektas la kontrolotajn projektojn, do ili ĉiam devas havi pli altan probablecon esti plene kaj detale kontrolataj, ol la etaj projektoj.

Nuntempe en Eŭropa Unio oni subvencias la agrikulturon de la EU-membroŝtatoj el la centra buĝeto de la Eŭropa Komunumo, kaj tio estas la plej granda parto de la komuna buĝeto. Pro tio oni serioze postulas, ke la registaroj de la membroŝtatoj detale kontrolu kaj aŭditu la uzon de la subvencioj kiuj estas financataj de la EU-buĝeto, kaj la Eŭropa Kortumo de Aŭditoroj regule kontrolas la registarojn, ĉu ili konstruis efikan kontrolan kaj aŭditan sistemon aŭ ne. Ĉar temas pri granda sumo, Eŭropa Unio postulas ne nur regulajn kontrolojn kaj aŭditojn, sed oni determinas ankaŭ la aplikeblajn aŭditmetodojn. Mi studis tiujn metodojn en la urbo Stokholmo, do nun mi klarigos la problemaron laŭ miaj svedaj spertoj.

En tiu lando la sveda supera aŭdita institucio devas kontroli kaj aŭditi pli-malpli 300 mil projektojn jare. Tio signifas, ke la svedaj farmistoj ricevas kelkcent mil diversajn subvenciojn de la buĝeto de la Eŭropa Komunumo, kaj kompreneble ne eblas, ke la aŭditoroj plene kaj detale kontrolu ĉiujn projektojn. Necesas do elekti kelkajn projektojn por detala kontrolo; rilate al la problemo estiĝas du gravaj demandoj:

1. kiom da projektoj devas esti detale kontrolataj, kaj
2. kiujn el la 300 mil projektoj oni elektu por la aŭdito.

La elektaj kriterioj estas klaraj:

- ĉiu projekto devas havi ŝancon esti detale kontrolata,
- la pli multekostaj projektoj devas havi pli grandan ŝancon por la detala kontrolo,
- la signifeca kriterio estu 1%,
- la fidindeca nivelo estu 95%, kaj
- la elektometodo ne estu subjektiva.

Por precize kompreni la uzeblan metodon, necesas paroli pli detale pri du konceptoj: signifeca kriterio kaj fidindeca nivelo. La celo de la aŭdito estas fari ekzaktan konkludon, ĉu malbone aŭ kontraŭleĝe elspezita mono kaŭzis signifan, aŭ nur etan damaĝon. Por respondi al tiu demando necesas difini, kian damaĝon oni konsideras signifa kaj kia estas rigardata kiel eta. En ĉi tiu kazo la svedaj aŭditoroj difinis, ke la signifeca kriterio estu 1%. Tio signifas, ke post la aŭdito oni volas precize scii, ĉu la malbone elspezita mono estas pli, aŭ malpli ol 1% de la tuta pagita sumo.

Mi diris, ke oni volas precize scii tion post la aŭdito. Kompreneble tio tute ne eblas. Oni povus precize vidi la sumon de la malbone uzita mono nur se oni plene kaj detale kontrolus ĉiujn (en tiu kazo pli-malpli 300 mil) projektojn. Se la aŭditoro ne faras tion, tiam li kompreneble povas konkludi, sed necesas kompreni, ke en tiu kazo la konkludo ne ĉiam estas vera. En tiu kazo necesas precize difini, kia estu la fidindeca nivelo, kiam la konkludoj de la aŭdita raporto devas esti veraj. La sveda supera aŭdita institucio difinis, ke tio estu 95%, do tio signifas, ke se oni legas 100 aŭditraportojn (kaj 100 konkludojn), necesas scii, ke pli-malpli 95 el la konkludoj estas veraj kaj pli-malpli 5 estas falsaj.

Antaŭe ni vidis, ke por fari la aŭdiron necesas elekti kelkajn el la 300 mil projektoj por detala kontrolo, kaj ni komprenis, ke rilate al la problemo estiĝis du gravaj demandoj:

1. kiom da projektoj devas esti detale kontrolataj, kaj
2. kiujn el la 300 mil projektoj oni elektu por detala kontrolo.

Post klarigo de la traktitaj du konceptoj jam eblas precize respondi al tiuj demandoj. Uzante perkomputilan elektometodon oni povas facile kalkuli, ke necesas elekti nur kelkcent (pli-malpli 400) projektojn por detala kontrolo kaj aŭdito, kaj per la komputilo oni povas elekti eĉ la konkretajn aŭditotajn projektojn. La metodo estas jene:

- Sur nombrolinio ni metu ĉiujn projektojn unu apud la alia.
- Per speciala komputila programo kalkulu la nombron de la detale kontrolotaj projektoj.
- Dividu la tutan pagitan sumon per la kalkulita nombro por ricevi intervalon.
- Per speciala komputila programo kalkulu hazardan nombron en la ricevita intervalo por difini la unuan kontrolotan projekton.
- Ekde la unua projekto sur la nombrolinio metu la intervalon kelkcentfoje unu apud la alia, kaj la finpunktoj de la intervaloj indikas la aŭditotajn projektojn.

Tiamaniere oni povas elekti la aŭditotajn projektojn; kiam oni uzas la metodon evidentiĝas, ke:

- Ĉiu projekto havas ŝancon esti detale kontrolata.
- La pli multekostaj projektoj havas pli grandan ŝancon por la detala kontrolo.
- La elektometodo tute ne estas subjektiva. Se alia aŭditoro intencas denove kontroli la procezon, li povas ricevi la samajn konkludojn.

Multkolora situacio en EU kaj en la mondo

Trarigardante la uzatajn aŭdit-tipojn oni povas konkludi, ke diversaj kontrolaj kaj aŭditaj sistemoj estas uzataj en la nuntempa mondo; eĉ en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio, tute diversaj estas la uzataj sistemoj kaj la aplikataj labormetodoj. La kialoj estas la malsamaj sociaj tradicioj kaj la fakto, ke ĉiuj sistemoj havas kaj avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Pro tio en la Eŭropa Komunumo ne estas ĝenerala regulo, kiu ordonas la membroŝtatojn uzi la saman kontrolan kaj aŭditan sistemon kaj metodon en ĉiuj membroŝtatoj. En la malnovaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio (antaŭ la aliĝo de la orienteŭropaj landoj al la komunumo) la jenaj kontrolaj kaj aŭditaj tipoj estis uzataj laŭ la esploro de la brita Nacia Aŭdita Oficejo:

Membroŝtatoj de la Eŭropa Unio	Anticipa kontrolo	Posta kortuma aŭdito	Posta financa aŭdito	Posta efikeca aŭdito
Aŭstrio	-	-	*	*
Belgio	*	*	*	*
Danio	-	-	*	*
Finnlando	-	-	*	*
Francio	-	*	*	*
Germanio	-	-	*	*
Greklando	*	*	*	-
Irlando	-	-	*	*
Italio	*	*	*	*
Luksemburgo	*	*	*	-
Nederlando	-	-	*	*
Portugaliao	*	*	*	*
Hispanio	-	*	*	*
Svedio	-	-	*	*
Britio	-	-	*	*

Kiam oni analizas la tabelon bone, evidentiĝas, ke la situacio estas multkolora. En ĉiuj landoj estas financa aŭdito. En la plejmulto de la landoj estas ankaŭ efikeca aŭdito, kaj en duono de la landoj oni adaptis la kortuman sistemon. Estas nur kelkaj landoj, kie ankaŭ anticipa kontrolo estas uzata. Tiu fenomeno rilatas al la jam detale traktita problemo, pri kiu mi parolis, kiam mi skizis la kompetento-terenojn de la Kortega Aŭdita Ĉambro en la iama Habsburg-imperio.

Rigardante tiun multkoloran situacion en Eŭropa Unio kaj la eĉ pli multkoloran en la mondo, trarigardante la diversegajn uzatajn kontrolajn kaj aŭditajn sistemojn kaj metodojn, oni sentas bezonon por deklaro de ĝeneralaj fundamentaj principoj de kontrolo kaj aŭdito. Tia principaro ekzistas kaj nomiĝas la Lima-Deklaro, akceptita ĉe la naŭa INTOSAI-kongreso en la sudamerika urbo Lima.

En la fino de la prelego mi mallonge skizos la ĉefajn principojn laŭ tiu dokumento. La celo de la kontrolo kaj aŭdito farata de la superaj aŭditaj institucioj havas plurajn aspektojn. Unu estas esplori kaj konkludi ĉu la uzo de publika mono estis laŭleĝa aŭ kontraŭleĝa, kaj ĉu ĝi estis efika kaj ekonomia. Alia grava celo estas malhelpi kontraŭleĝan agadon en la kontrolataj institucioj kaj ĝenerale plibonigi la publikan administradon.

Pere de anticipaj kontroloj oni povas preventi aŭ eviti la kontraŭleĝan aŭ malefikan uzon de la publika mono; do fari tion estas rekomendate, sed oni devas scii, ke la postaj kontrolo kaj aŭdito estas la plej gravaj taskoj de ĉiuj superaj aŭditaj institucioj.

En la publika administrado permanentaj internaj kaj eksteraj kontrolaj kaj aŭditaj agadoj estas bezonataj, kaj la superaj aŭditaj institucioj kiel eksteraj aŭditaj organizoj havas la taskon esplori kaj kontroli, ĉu la interna kontrolo en la aŭditata institucio estas efika aŭ neefika.

La fundamenta tasko de la superaj aŭditaj institucioj estas la financaj kontrolo kaj aŭdito, sed krom tio ankaŭ la efika kaj ekonomia kontrolo estas farinda kaj rekomendenda.

La superaj aŭditaj institucioj devas esti sendependaj de la aŭditataj institucioj. Kvankam absoluta sendependeco nenie povas esti, ĉar ankaŭ la SAI mem kiel ŝtata institucio estas parto de la ŝtato, tamen en leĝo, prefereble en la konstitucio, necesas sekurigi, ke la SAI havu neces-nivelan sendependecon por ke la institucio kapablu sukcese plenumi siajn taskojn. Por tio estas kondiĉoj ke ankaŭ la aŭditoroj estu sendependaj, kaj pri la financado de la SAI laŭleĝe ne povu decidi la aŭditataj institucioj.

Estas rekomendate ke la rilato inter la SAI kaj la parlamento estu determinita per leĝo, aŭ laŭeble en la konstitucio laŭ la konstitucia sistemo de la lando. La SAI laŭleĝe devas havi la rajton akiri ĉiujn dokumentojn, informojn kaj indikojn bezonatajn por ke la institucio efike povu plenumi siajn kontrolajn kaj aŭditajn taskojn.

La aŭditataj institucioj devas reagi al la konstataĵoj de la aŭdita raporto, kaj se la SAI ne funkcias kiel kortumo, en tiu kazo la SAI devas havi la rajton laŭleĝe transsendi la aŭdit-raporton al ĉiuj kompetentaj instancoj, inkluzive la prokuroron.

La SAI laŭ sia propra decido rajtas kontribui al la plibonigo de la publika administrado per konsiloj, proponoj ktp, sed la publikaj administraj institucioj kompetentas decidi, ĉu ili akceptas la konsilojn kaj proponojn aŭ ne.

La SAI devas havi sufiĉajn financajn rimedojn por kovri la kostojn de la kontroloj kaj aŭditoj, inkluzive la salajrokoston de siaj alte kvalifikitaj aŭditoroj. Se necesas, la institucio rajtas peti konsilojn de eksteraj specialistoj kaj fakuloj. Se la nombro de la kontrolataj aŭ aŭditataj institucioj aŭ projektoj estas tro alta, tiam per objektivaj perkomputilaj elektometodoj necesas elekti la detale aŭditotajn instituciojn aŭ projektojn.

La SAI devas havi la rajton laŭleĝe publikigi la raportojn kaj konstataĵojn de la aŭditoj. La SAI rajtas kontroli kaj aŭditi ankaŭ la agadojn de la ŝtatoficejoj, kiuj funkcias en aliaj landoj,

sed en tiu kazo necesas atenti ankaŭ pri la internacia jura situacio. La SAI devas havi laŭleĝan rajton por detale kontroli kaj aŭditi la uzon (la enspezojn kaj la elspezojn) de ĉiu publika mono, inkluzive la impostojn, publikajn laborprojektojn, elektronikajn sistemojn uzatajn en la publika administrado, publikajn-privatajn komunajn projektojn kaj ĉiujn projektojn, kiuj estis financataj per publika mono.

Konkludoj

1. Rilate al la efika funkciado de la demokratia institucia sistemo de la landoj, estas bezonata la agado de sendependa oficejo aŭ kortumo, kiu laŭ la konstitucio povas kaj rajtas kontroli la registaron kaj aŭditi la enspezojn kaj elspezojn de la nacia buĝeto.
2. La internacia kunlaboro, la interŝanĝo de la aŭditaj spertoj kaj la uzo de la plej bonaj internaciaj aŭditaj praktikoj helpas plialtigi la efikecon de la laboro en la superaj aŭditaj institucioj, kaj pro tio estas rekomendinde ke ĉiuj institucioj kunlaboru en la kadro de INTOSAI.
3. Por ke la aŭdito ne estu subjektiva, estas rekomendate al la superaj aŭditaj institucioj kalkuli la nombron de la detale kontrolotaj projektoj kaj elekti la konkretajn aŭditotajn projektojn kaj instituciojn per internacie uzataj kaj akceptataj aŭditmetodoj uzante specialajn komputilajn programojn.

Kvankam oni konstatas, ke en nia epoko de la dudekunua jarcento, en la plej multaj landoj jam funkcias superaj aŭditaj institucioj, tamen videblas, ke malgraŭ tio koruptado estas serioza problemo en multaj landoj, kaj ankaŭ nuntempe estas grandaj ekonomiaj krizoj en multaj regionoj de la mondo. Tio komenciĝis en Norda Ameriko antaŭ kelkaj jaroj kun seriozaj bankrotoj kaj poste etendiĝis al aliaj kontinentoj. Evidentiĝis, ke la risko de disfalo de la nacia buĝeto povas kaŭzi nekredible seriozajn ekonomiajn kaj sociajn krizojn; ekzemple, pro la greka krizo suferas la tuta eŭropa komunumo. Se la greka nacia ekonomio disfalus, tio signifus, ke milionoj da homoj perdus laboron, la ŝtato ne povus pagi salajron por homoj laborantaj por la publika administrado, la pensiuloj ne ricevus pension, kaj la alilandaj (ĉefe germanaj) bankoj ne povus ricevi la monon, kiun ili investis en Greklandon. Do, la greklanda krizo povus kaŭzi internacian krizon kaj malfacile solveblajn problemojn ankaŭ en multaj aliaj landoj, ĉefe en Eŭropa Unio. La situacio en Eŭropo pli malboniĝas, tiel ke estas risko, ke similaj situacioj povas estiĝi ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Italio aŭ en Hispanio.

Oni povas do demandi, ĉu la superaj aŭditaj institucioj, la naciaj aŭditaj oficejoj aŭ kortumoj ne devus esti antaŭvidintaj la riskojn kaj atentigintaj pri la negativaj prognozoj. Kaj eĉ pli gravaj estas la demandoj, kiuj fenomenoj kaŭzis la nuntempe sperteblajn krizojn en la diversaj landoj, kiel eblas krei denove ekvilibron inter la enspezoj kaj elspezoj de la naciaj buĝetoj, kaj kiel necesas evoluigi la agadon kaj funkciadon de la superaj aŭditaj institucioj por ke ili pli efike povu kontribui en la estonteco al la grandskala laboro kies celo estas eviti la tiutipajn krizojn kaj denove ekmovi la ekonomian evoluon. Tiuj demandoj estas tre gravaj, signifaj kaj seriozaj, do nepre indas analizi la situaciojn, la kaŭzojn kaj la solveblojn de la problemoj pli detale. Sed la problemaro estas tre ampleksa kaj komplika; pro tio analizi kaj ekspliki tiujn fenomenojn eblus nur en alia prelego, eble kadre de la Internacia Kongresa Universitato iam en la venontaj jaroj.

Bibliografio

- Bourn, Sir John. 1999. The Independence of Public Audit in the United Kingdom (en: Számvevőszéki Almanach). Budapest: Saldo.
- Fiedler, Franz. 1999. Gemeinsame wurzeln (en: Számvevőszéki Almanach). Budapest: Saldo.
- Sousa, Alfredo José. 1999. Manuel de Auditoria e de Procedimentos. Lisboa: Tribunal de Contas.
- Supreme Audit Institutions of Bolivia, China, Costa Rica, Arab Republic of Egypt, Iceland, Japan, The Netherlands, New Zealand, Republic of South Afrika, Tonga, United Kingdom, USA. 1998. Guidance for Reporting on the Effectiveness of Internal Controls. Budapest. State Audit Office.
- Riksrevisionsverket. 1993. Performance Auditing in the Swedish National Audit Bureau. Stockholm. The Swedish National Audit Bureau.
- Kordes, F.G., Leeuw, F.L., van Dam, J.H.A. 1991. The Management of Government Subsidies (State Audit and Accountability). Jerusalem. State Comptroller's Office.
- Bourn, Sir John. 1996. State Audit in the European Union. London. National Audit Office.